

eLIBRO

*Karel Čapek*

Milito  
kontraŭ  
salamandroj

I N K O

*Karel Čapek*

**MILITO KONTRAŬ  
SALAMANDROJ**

*El la ĉeĥa esperantigis*

*Josef Vondroušek*

*eLibro-eldono kunlabore*

*kun Miroslav Malovec*

**eLIBRO**

*Aranĝis: Franko Luin*

**ISBN 91-7303-168-2**

*inko@omnibus.se*

*http://www.omnibus.se/inko*

JANUARO 2003

## *Enhavo*

<b>Libro unua: Andrias Scheuchzeri</b>	<b>6</b>
1. La strangemo de kapitano van Toĥ	7
2. Sinjoro Golombek kaj sinjoro Valenta	27
3. G. H. Bondy kaj lia samlandano	39
4. La komerca entrepreno de kapitano van Toĥ	55
5. Kapitano J. van Toĥ kaj liaj dresitaj saŭroj	65
6. Jakto en la laguno	74
7. Daŭrigo de la jakto sur la laguno	92
8. Andrias Scheuchzeri	107
9. Andrew Scheuchzer	116
10. Kermeso en Nové Strašecí	128
11. Pri homlacertoj	136
12. Salamandra sindikato	145
<b>Libro dua: Laŭ ŝtupoj al civilizacio</b>	<b>172</b>
1. Sinjoro Povondra legas ĵurnalojn	173
2. Laŭ la ŝtupoj al civilizacio	179
3. Sinjoro Povondra denove legas ĵurnalojn	212

<b>Libro tria: Milito kontraŭ salamandroj</b>	<b>266</b>
1. Masakro sur la Kokosa Insularo	267
2. Konflikto en Normandio	276
3. Incidento en la Manika Markolo	283
4. Der Nordmolch	289
5. Wolf Meynert skribas sian verkon	296
6. X avertas	304
7. Tertremo en Luiziano	315
8. Chief Salamander prezentas postulojn	322
9. Konferenco en Vaduco	329
10. Sinjoro Povondra ĉion surprenas	343
11. La aŭtoro parolas kun si mem	354

*L*a libro, aperinta en la jaro 1936, surprizas pro sia artisma formo kaj profeta tono. La postmilitaj koloniaj bataloj, la mondo de koncentrejoj, atombombo kaj eble ankaŭ treege impeta modernigo de la ĉina popolo (mi persone opinias ĝin eĉ ne iom maltrankviliga), ĉio estas ĉi tie priskribita ok, naŭ eĉ dudek jarojn anticipe. Apokalipsa karaktero de la lasta parto ankaŭ anoncas militajn destrukciojn. Ĉapek antaŭvidis proksimecon de milito kaj mortis ĉe ĝia sojlo, per kio li senigis la naziojn, post kiam ili enmarŝis Pragon, pri ĝojo pro lia aresto.

Robert Merle (1967): *Animalo dotita de racio*  
(*Un animal doué de raison*)

Libro unua  
*Andrias Scheuchzeri*

## 1. La strangemo de kapitano van Toĥ

Se vi serĉus la insuleton Tana Masa sur mapo, vi trovus ĝin ĝuste sur la ekvatoro, iom okcidente de Sumatro; sed se vi demandus la kapitanon J. van Toĥ sur la ferdeko de la ŝipo Kandong Bandoeng, kio estas ĉi tiu Tana Masa, antaŭ kiu ĵus li ekankris, li sakrus tempeton kaj poste dirus al vi, ke ĝi estas la plej malpura truo en la tuta Sunda Insularo, ankoraŭ pli aĉa ol Tana Bala kaj minimume same damna kiel Pini aŭ Banjako; ke la sola, pardonu, homo tie vivanta — se ni ne inkluzivas la pedikulajn batakojn\* — estas ebria komerca agento, hibrido duone kubuo kaj duone portugalo kaj ankoraŭ pli granda ŝtelisto, pagano kaj porkulo ol la tuta kubuo\* kaj tuta blankulo sume; kaj se en la mondo estas io damna, tio estas do la damna vivo sur ĉi tiu damna Tana Masa, sinjoro. Post kio versimile vi demandus lin, kial do li mallevis ĉi tie la damnajn ankrojn, kvazaŭ li volus resti ĉi tie damnajn tri tagojn; kaj li incitite eksnufus kaj mormurus ion en tiu senco, ke Kandong Bandoeng ne ŝipus ĉi tien nur pro la damna kopro aŭ palmoleo, ja mem-

Batako — loĝanto de nordokcidenta Sumatro

Kubuo — indiĝenaj kaj duonindiĝenaj gentgrupoj en Sumatro

kompreneble, kaj cetera tio tute ne rilatas vin, sinjoro, mi havas miajn damnajn ordonojn, sinjoro, kaj estu tiel afabla, sinjoro, kaj vi atentu la vian. Kaj li sakrus tiel amplekse kaj abunde, kiel decas al neĵuna, sed tamen malgraŭ sia aĝo ankoraŭ vigla ŝipkapitano.

Sed se anstataŭ maldiskretaj demandoj vi lasus kapitanon J. van Toĥ, ke li murmuretu kaj malbenu por si mem, vi povus ekscii multe pli. Ĉu ne videblas je li, ke li bezonas senŝarĝiĝi? Nur lasu lin, lia ĉagreno mem trovos al si la vojon. "Do rigardu, sinjoro," ekvortigas la kapitano, "tiuj uloj ĉe ni en Amsterdamo, la damnaj judoj, tie nepre venas al ideo, nu, pri perloj, homo, serĉu iajn perlojn. Onidire la homoj furoras nun pri perloj kaj tiel." La kapitano indigne forkraĉas. "Nu jes, investi la tintaĵon en perlojn! Jen sekvo de tio, ke vi homoj senĉese volas iajn militojn aŭ kion ajn. Timo pri mono, jen ĉio. Kaj tion oni nomas krizo, sinjoro." Kapitano J. van Toĥ iomete hezitas, ĉu preparoli kun vi naci-ekonomiajn problemojn; nun nome oni parolas pri nenio alia. Sed ĉi tie antaŭ Tana Masa estas por tio tro varme kaj pigre; kaj kapitano van Toĥ mangestas kaj murmuretas: "Facile dirite, perlojn! Sinjoro, en Cejlono oni elrabis ilin por kvin jaroj, en Formozo oni malpermesis la perloĉasadon. — Do, klopodu, kapitano van Toĥ, trovi novajn ĉasejojn. Navigu al la damnaj insuletoj, eble oni trovos ĉe ili tutaj arojn da konkoj —" La kapitano malestime trumpe-



tas en la lazure bluan poŝtukon. ”Tiuj ratuloj en Eŭropo imagas, ke ĉi tie ankoraŭ io troveblas, pri kio neniu scias! Jesuomaria, kiaj bovuloj! Bone, se ili ankaŭ ne volas, ke mi rigardu ĉi tie en la muzelojn de la batakoj, ĉu ili mungas perlojn. Novajn ĉasejojn! En Padango estas nova bordelo, tio jes, sed novaj ĉasejoj? Sinjoro, ĉi tie mi konas ĉiujn ĉi insulojn kiel mian pantalonon ... de Cejlono ĝis la damna Cliperton Island... Se iu opinias trovi ĉi tie ankoraŭ ion, je kio oni povus profiti, do feliĉan vojaĝon, sinjoro! Tridek jarojn mi navigas ĉi tie, kaj nun tiuj imbeciloj volas de mi, ke ĉi tie mi ion malkovru!” Kapitano van Toĥ preskaŭ sufokiĝas pro la ofenda postulo. ”Ili sendu ĉi tien iun flavbekulon, tiu malkovros al ili tiom, ke ili okulegos; sed postuli tion de iu, kiu konas tion ĉi tie kiel kapitano J. van Toĥ... volu rekoni tion, sinjoro. Tie en Eŭropo oni povus ankoraŭ ion malkovri; sed ĉi tie — Ĉi tien ja venas homoj nur por priflari, kio estas forvorebla, kaj eĉ ne tion: kio estas aĉetebla kaj vendebla. Sinjoro, se entute en la tutaj damnaj tropiklandoj ankoraŭ estus io, kio valorus dubbeltje’n\*, tiam staros ĉe tio tri agentoj kaj svingos per mungita poŝtuko je ŝipoj de sep ŝtatoj, por ke ili haltu. Tiel estas, sinjoro. Mi konas ĉion ĉi pli bone, ol la Ofico por Kolonioj de Ŝia Reĝina Majesto, bonvolu pardoni.” Kapitano van Toĥ pene venkas sian justan koleron, kion post iom lon-

Dubbeltje — nederlanda monero

ga bruado li sukcesas. ”Ĉu vi vidas tie la du friponajn pigrulojn? Ili estas perloĉasantoj el Cejlono, dio ne punu min, sinhalanoj, kiel la Eternulo ilin kreis; sed kial li faris tion, tion mi ne scias. Ĉi tion nun mi veturigas kun mi, sinjoro, kaj se ie mi trovos parton da marbordo, sur kiu ne estas skribite Agency aŭ Ba’ta\* aŭ Doganejo, mi enlasas tion en la akvon, por ke tio serĉu konkojn. Tiu pli eta kanajlo subakviĝas eĉ okdek metrojn profunden; antaŭ nelonge apud la Princinsuloj li elakvigis el la profundo de naŭdek metroj krakon de kinematografo, sinjoro, sed perlojn, pa! Kia ideo! Sentaŭga aĉularo, tiuj sinhalanoj. Tian damnan laboron mi havas, sinjoro: fari, kvazaŭ mi aĉetas palmoleon, kaj dume serĉi novajn trovejojn de perlkonkoj. Eble ili ankaŭ volos, ke mi malkovru ian virgan teron, ĉu? Tio ja ne estas laboro por honesta komerca kapitano, sinjoro. J. van Toĥ estas neiu malbenita aventurulo, sinjoro. Ne, sinjoro.” Kaj tiel plu; la maro estas granda kaj la temp-oceano estas senlima; kraĉu en la maron, homo, kaj ĝi ne ŝaŭmiĝos, insultu vian sorton, kaj vi ne movos ĝin; kaj tiel post multaj preparoj kaj formalajoj fine okazas, ke la kapitano de la nederlanda ŝipo Kandong Bandoeng, J. van Toĥ, ĝemante kaj sakrante descendas en boaton, por elboatiĝi en ankaŭ kampongo\* sur Tana Masa kaj trakti kun la Ba’ta — la plej granda (iama) ĉeĥa ŝukonzerno, havanta filiojn preskaŭ en la tuta mondo  
Kampong — (*malaje*) malaja vilaĝo kun foiro

ebria hibrido inter kubuo kaj portugalo pri kelkaj komercaj aferoj.

”Sorry, Captain,” fine diris la hibrido inter kubuo kaj portugalo, ”sed ĉi tie, apud Tana Masa, kreskas neniuj konkoj. La malpuraj batakoj,” li diris kun ega abomeno, ”manĝaças eĉ meduzojn; ili estas pli en la akvo ol sur la tero, inoj ĉi tie fiŝfetas, vi eĉ ne povas imagi tion — kion nur mi volis diri? Aha, vi demandis pri virinoj?”

”Ĉu estas ĉi tie peco da bordo,” demandis la kapitano, ”kie tiuj batakoj ne iras en la akvon?”

La hibrido inter kubuo kaj portugalo kapneis. ”Ne estas, sinjoro. Eble nur Devil Bay\*, sed tio estas nenio por vi.”

”Kial?”

”Ĉar ... tien neniu darfus, sinjoro. Ĉu, kapitano, mi verŝu al vi?”

”Thanks. Ĉu tie estas ŝarkoj?”

”Ŝarkoj kaj entute,” murmuretis la hibrido. ”Malbona loko, sinjoro. La batakoj ne ŝatus vidi, se iu irus tien.”

”Kial?”

”... Estas tie diabloj, sinjoro, mardialoj.”

”Kio estas mardialo? Fiŝo?”

”Nenia fiŝo,” eviteme oponis la mestizo. ”Simple diablo, sinjoro. La batakoj nomas ĝin tapa. Tapa. Onidire ili havas tie sian urbon, tiuj diabloj. Ĉu verŝi al vi?”

Devil Bay — (*angle*) Diabla Golfo

”Kaj kiel aspektas ...tiu mardiablo?”

La hibrido inter kubuo kaj portugalo ŝultrolevis. ”Kiel diablo, sinjoro. Foje mi vidis ĝin... nome nur ĝian kapon. Mi estis revenanta boate de Kabo Harlemo ... kaj subite antaŭ mi ĝi malmergis kapaĉon.”

”Nu kaj? Al kio ĝi similas?”

”Kapegon ĝi havas ... kiel batako, sinjoro, sed tute kalvan.”

”Ĉu eble ĝi estis batako?”

”Ne, sinjoro. En tiu loko ja neniu batako eniros la akvon. Kaj plue ... ĝi palpebrumis je mi per *la malsupraj palpebroj*, sinjoro.” La hibrido ekskuis sin de teruro. ”Per malsupraj palpebroj etendiĝantaj trans la tutan okulon. Tio estas tapa.”

Kapitano J. van Toĥ turnis per la dikaj fingroj glason kun palmvino. ”Kaj ĉu vi ne estis ebria, nu? Ĉu ne ebriaĉa?”

”Jes, sinjoro. Alie mi ne remus tra tie. La batakoj ne ŝatas, se iu iam la ... diablojn ĝenas.”

Kapitano van Toĥ kapskuis. ”Homo, diabloj ne ekzistas. Kaj se ili ekzistus, ili devus aspekti kiel eŭropanoj. Eble ĝi estis ia fiŝo aŭ io.”

”Fiŝo,” balbutis la hibrido inter kubuo kaj portugalo, ”fiŝo ne havas manojn, sinjoro. Mi ne estas batako, sinjoro, mi frekventis lernejon en Badjoeng ... eblas, ke ankoraŭ mi scias la dekalogon kaj la aliajn science pruvi-

tajn doktrinojn; klera homo ja ekkonas, kio estas diablo kaj kio estas besto. Demandu la batakojn, sinjoro.”

”Nur negraj superstiĉoj,” deklaris la kapitano kun indulgema supereco de klera homo. ”Science ĝi estas absurdaĵo. Diablo ja ne povas vivi en akvo. Kion ĝi farus tie? Ne atentu la indiĝenajn parolaĉojn, knabo. Iu nomis la golfon Diabla Golfo, kaj ekde tiu tempo la batakoj ĝin timas. Jen, tiel,” diris la kapitano kaj per la dika polmo frapis la tablon. ”Nenio tie estas, knabo, tio ja estas science klara.”

”Estas, sinjoro,” asertis la hibrido frekventinta lernejon en Badjoeng. ”Sed neniuj prudenta homo serĉu ion en Devil Bay.”

Kapitano J. van Toĥ ekruĝis. ”Kion,” li brue ekkriis. ”Ĉi malpura kubuo, ĉu ci opinias, ke mi timos ciajn diablojn? Jen ni vidos,” li diris, leviĝante en plenpotenco de siaj solidaj ducent funtoj. ”Mi ne emas perdi kun ci mian tempon, devante zorgi pri business. Sed tion memoru: en nederlandaj kolonioj diabloj ne ekzistas; se iaj ekzistas, do en la francaj. Tie ili povus esti. Kaj nun venigu al mi la estron de ĉi tiu damna kampongo.”

La nomitan rangulon ne necesis longe serĉi; li sidis kaŭre apud la butikon de la hibrido kaj maĉis sukerkanon. Li estis nuda neĵuna sinjoro, sed multe pli magra, ol estas vilaĝestroj en Eŭropo. Iom post li, respektante la

decan distancon, kaŭre sidis la tuta vilaĝo ankaŭ kun virinoj kaj infanoj, videble atendente, ke oni filmos ilin.

”Aŭskultu do, knabo,” alparolis lin kapitano van Toĥ malaje (li povis same alparoli lin nederlande aŭ angle, ĉar la estimata maljuna batako sciis eĉ ne unu malajan vorton kaj la tutan parolon de la kapitano devis interpreti en la batakan lingvon la hibrido inter kubuo kaj portugalo; sed ial la kapitano opiniis la malajan lingvon pli konvena). ”Aŭdu do, knabo, mi bezonus kelkajn grandajn, fortajn, kuraĝajn ulojn, por ke ili iru ĉasi kun mi. Komprenu, ĉasi.”

La hibrido tion tradukis kaj la vilaĝestro kapjesis, ke li komprenas; post kio li turniĝis al la larĝa aŭditorio kaj parolis al ĝi kun evidenta sukceso.

”La estro diras,” interpretis la hibrido, ”ke la tuta vilaĝo iros kun tuan\* kapitano ĉasi, kien nur li volos iri.”

”Jen ci vidas. Diru do al ili, ke ni iros ĉasi konkojn en Devil Bay.”

Sekvis proksimume kvaronhora ekscita diskutado, kiun partoprenis la tuta vilaĝo, ĉefe maljunaj virinoj. Fine la hibrido turniĝis al la kapitano. ”Ili diras, sinjoro, ke al Devil Bay oni ne povas iri.”

La kapitano komencis ruĝiĝi. ”Kaj kial ne?”

La hibrido ŝultrolevis. ”Ĉar tie estas tapa-tapa. Diabloj, sinjoro.”

Tuan — (*malaje*) sinjoro

La kapitano komencis iĝi viola. "Diru do al ili, se ili ne iros ... ke mi elbatos ĉiujn iliajn dentojn ... ke mi forŝiros de ili la orelojn ... ke mi pendumos ilin ... ke mi forbruligos ilian pedikplenan kampongon, ĉu ci komprenas?"

La hibrido honeste tion tradukis, post kio denove sekvis pli longa vigla konsiliĝo. Fine la hibrido turnis sin al la kapitano. "Ili diras, ke ili iros plendi en Padangon al la polico, ke tuan minacis al ili. Por tio laŭdire estas paragrafoj. La vilaĝestro diras, ke tion li ne toleros."

Kapitano J. van Toĥ komencis bluiĝi. "Diru do al li," li ekkriegis, "ke li estas ..." Kaj li parolis senpaŭze dek unu minutojn.

La hibrido tion tradukis, ĝis kiam sufiĉis lia vortprovizo; kaj post nova, tamen longa, sed objektiva konsiliĝo de la batakoj li interpretis al la kapitano: "Ili diras, sinjoro, ke ili estus pretaj rezigni la tribunalan persekuton, se tuan kapitano pagos la punpagon en la manojn de la lokaj instancoj. Nome," li ekhezitis, "ducent rupiojn; sed tio estas iom multe, sinjoro. Ofertu al ili kvin."

La koloro de la kapitano komencis ŝanĝiĝi je brunaj makuloj. Unue li proponis masakron de ĉiuj batakoj en la mondo, poste li tion reduktis je tricent piedbatoj kaj fine li kontentiĝus pri tio, ke li rembuos la vilaĝestron por la kolonia muzeo en Amsterdamo; kontraŭe la batakoj iris de ducent rupioj al fera pumpilo kun rado kaj

fine persistis en tio, ke la kapitano donu al la vilaĝestro — kiel punpagon — benzinan fajrilon. ("Donu tion al ili, sinjoro," pledis la hibrido inter kubuo kaj portugalo, "mi havas stoke tri fajrilojn, sed sen meĉo.") Tiel estis renovigita la paco sur Tana Masa; sed kapitano J. van Toĥ sciis, ke nun estas riskata prestiĝo de la blanka raso.

\*

Posttagmeze apartiĝis de la nederlanda ŝipo Kandong Bandoeng boato, en kiu ĉeestis nome: kapitano J. van Toĥ, svedo Jensen, islandano Gudmundson, finno Gillemainen kaj du sinhalanoj-perloĉasistoj. La boato celis rekte al golfo Devil Bay.

Je la tria, kiam estis kulminanta la malfluso, la kapitano staris sur la bordo, la boato krozis proksimume cent metrojn de la marbordo por atenti ŝarkojn, kaj ambaŭ sinhalanaj subakvistoj atendis kun tranĉiloj enmane la signon por salti en la akvon.

"Do, nun ci," ordonis la kapitano al la pli longa nudulo. La sinhalano saltis en la akvon, vadis plurajn paŝojn kaj poste enfalis. La kapitano rigardis la horloĝon.

Post kvar minutoj kaj dudek sekundoj elmergiĝis ĉirkaŭ sesdek metrojn maldekstre bruna kapo; kun stranga, malespera kaj samtempe paralizita hasto la sinhalano rampis sur ŝtonegojn, en unu mano tranĉilon por fortranĉado de konkoj, en la alia perlokonkon.



La kapitano morniĝis. "Nu, kio?" li bruskis.

La sinhalano ankoraŭ glitis sur la ŝtonblokoj, laŭte ĝemante de teruro.

"Kio okazis?" kriis la kapitano.

"Sahibo, sahibo," elvortis la sinhalano kaj sinkis sur la bordo, sible elspirante. "Sahibo ... sahibo ..."

"Ŝarkoj?"

"Ĝinoj\*," ekveis la sinhalano. "Diabloj, sinjoro. Miloj, miloj da diabloj!" Li premis la pugnon sur la okulojn. "Nuraj diabloj, sinjoro!"

"Montru la konkon," ordonis la kapitano kaj malfermis ĝin per tranĉilo. En ĝi estis eta, pura perleto. "Kaj pli da ili ci ne trovis?"

La sinhalano eligis ankoraŭ tri konkojn el la saketo, kiu estis pendigita sur lia kolo. "Tie estas konkoj, sinjoro, sed la diabloj gardas ilin ... Ili rigardis min, kiam mi estis detranĉanta ilin..." Lia vila hararo hirtiĝis pro hororo. "Sahibo, ĉi tie ne!"

La kapitano malfermis la konkojn; du estis malplenaj kaj en la tria estis perlo kiel pizo, ronda kiel guto da hidrargo. Kapitano van Toĥ rigardis alterne la perlon kaj la sinhalanon, kolapsintan sur la tero.

"Ci," li diris heziteme, "ĉu ci volus salti tien ankoraŭ foje?"

Ĝino — spirito el la arabaj superstiĉoj, kapabla aperadi en homa aŭ besta formoj kun supernatura povo

La sinhalano senvorte kapneis.

Kapitano J. van Toĥ eksentis sur la lango fortan emon insultkrii; sed mem mirante li trovis, ke li parolas mal-laŭte kaj preskaŭ mole: "Ne timu, knabo. Kaj kiel aspektas tiuj ... diabloj?"

"Kiel malgrandaj infanoj," elspiris la sinhalano. "Ili havas voston, sinjoro, kaj estas tiel altaj," li montris proksimume metron dudek de la tero. "Ili staris ĉirkaŭ mi kaj rigardis, kion mi faras tie ... ili formis ian rondon..." La sinhalano skuiĝis. "Sahibo, sahibo, ĉi tie ne!"

Kapitano van Toĥ meditis. "Kaj ĉu ili palpebrumas per la malsupraj palpebroj aŭ kio?"

"Mi ne scias, sinjoro," raŭkis la sinhalano. "Da ili estas tie ... dek mil!"

La kapitano rerigardis la alian sinhalanon; tiu staris proksimume cent kvindek metrojn flanke kaj indiferece atendis kun la manoj kruĉmetitaj surŝultre; fakte, kiam oni estas nuda, oni ne povas meti la manojn ien alien ol sur la proprajn ŝultrojn. La kapitano silente gestis al li, kaj la eta sinhalano saltis en la akvon. Post tri minutoj kaj kvindek sekundoj li elmergiĝis, surrampante ŝtonegojn per la glitantaj manoj.

"Do rampu," ekkriis la kapitano, sed poste li ekrigardis pli atente kaj jam saltis de ŝtonbloko al ŝtonbloko al la malespere palpantaj manoj; oni ne kredus, ke tia korpego kapablas tiel salti. En la lasta momento li ekkaptis

unu manon kaj anhelante li tiris la sinhalanon el la akvo. Poste li metis lin sur la ŝtonblokon kaj viŝis sian ŝviton. La sinhalano kuŝis senmove; unu lia tibio estis kontuzita ĝisoste, versimile de ŝtono, sed alie li estis kompleta. La kapitano levetis lian palpebron; videblis nur okulblanko de la turnitaj okuloj. Li havis nek konkojn nek tranĉilon.

Tiumomente la boato kun la ŝipanoj ekdirektis proksimen al la bordo. "Sinjoro," vokis svedo Jansen, "estas ĉi tie ŝarkoj. Ĉu vi plu ĉasos?"

"Ne," diris la kapitano. "Boatu ĉi tien por preni tiujn du."

"Rigardu, sinjoro," atentigis Jensen, kiam ili estis revenantaj al la ŝipo, "kiel subite estas malprofunde ĉi tie. De ĉi tie ĝis la bordo," li montris pikante per remilo en la akvon. "Kvazaŭ estus ĉi tie sub la akvo ia digo."

\*

Nur sur la ŝipos la eta sinhalano rekonsciiĝi; li sidis, genuojn submentone, kaj tutkorpe tremis. La kapitano sendis la homojn for kaj eksidis larĝe diskrure.

"Do elen kun tio," li diris. "Kion ci vidis tie?"

"Ĝinojn, sahibo," flustris la eta sinhalano; nun komenciĝis tremi ankaŭ liaj palpebroj kaj sur la tuta korpo erupciis grajneca haŭto.

Kapitano van Toĥ ekspektoris. "Kaj ... kiel ili aspektas?"

"Kiel ... kiel ..." En la okuloj de la sinhalano denove montriĝis strio de okulblanko. Kapitano J. van Toĥ kun neatendita rapido vangofrapis per la manplato kaj mandorso ambaŭ liajn vangojn, por rekonsciigi lin.

"Thanks, sahibo," elspiris la eta sinhalano, kaj en lia okulblanko denove montriĝis pupiloj.

"Ĉu jam bone?"

"Jes, sahibo."

"Ĉu estis tie konkoj?"

"Jes, sahibo."

Kapitano J. van Toĥ daŭrigis la kruc-enketadon kun ne malgranda pacienco kaj fundemo. Jes, estas tie diaĵoj. Kiom? Miloĵ kaj miloj. Ili estas grandaj proksimume kiel dekjara infano, sinjoro, kaj preskaŭ nigraj. Ili naĝas en la akvo kaj sur la fundo ili marŝas per ambaŭ kruroj. Per ambaŭ, sahibo, kiel vi aŭ mi, sed dume ili balancas per la korpo, tiel tiel, senĉese tiel tiel ... Jes, sinjoro, ili havas ankaŭ manojn, kiel la homoj; ne, ili ne havas ungegojn, plivere tio estas kiel infanmanoj. Ne, sahibo, ili havas nek kornojn nek haregojn. Jes, voston ili havas preskaŭ kiel fiŝo, sed sen la vostonaĝilo. Kaj grandan kapon, rondan kiel la batakoj. Ne, ili diris nion, sinjoro, sed nur ŝajnis, kvazaŭ ili ŝmacus. Kiam la sinhalano estis fortranĉanta la konkojn en profundo de

ĉirkaŭ dek ses metroj, li eksentis surdorse tuŝon de etaj malvarmaj fingroj. Li rigardis, kaj ĉirkaŭe estis da ili centoj kaj centoj. Centoj kaj centoj, sinjoro, naĝantaj kaj starantaj sur ŝtonoj, kaj ĉiuj rigardis, kion la sinhalano tie faras. Li lasis fali la tranĉilon kaj konkon kaj klopo-dis naĝi supren. Dum tio li karambolis kun kelkaj diabloj naĝantaj super li, kaj kio estis poste, tion li ne scias, sinjoro.

Kapitano J. van Toĥ rigardis enpense la tremantan etan subakviston. Tiu knabo neniam plu taŭgos por io, li diris al si, mi sendos lin el Padango hejmen al Cejlono. Grumblante kaj anhelante li iris en sian kajuton. Tie li elŝutis el papersaketo sur la tablon du perlojn. Unu estis eta kiel sablero kaj la alia kiel pizo, brilanta arĝente kaj ruĝete. Kaj la kapitano de la nederlanda ŝipo eksnufis kaj eligis el ŝranketo sian irlandan viskion.

\*

Je la sesa li igis sin denove transporti per la boato en la kampongon kaj rekte al la hibrido inter kubuo kaj portugalo. "Toddy\*," li diris kaj tio estis la sola vorto, kiun li eldiris; li sidis sur verando el onda lado, tenis en la dikaj fingroj glason el dika vitro kaj trinkis kaj kraĉis kaj okulegis el sub la tufaj brovoj la flavajn magrajn kokinojn, bekantajn dioscias kion sur la malpura piedtreti-

Toddy — fermentinta palmvino

ta korteto inter palmoj. La hibrido gardis sin ion diri kaj nur verŝis. Lante sange subverŝiĝis la okuloj de la kapitano kaj liaj fingroj komencis malfacile fleksiĝi. Estis preskaŭ krepusko, kiam li leviĝis kaj ektiris iom supren la pantalonon.

”Ĉu jam vi iras dormi, kapitano?” demandis ĝentile la hibrido inter diablo kaj satano.

La kapitano pikis per fingre la aeron. ”Tamen mi ŝatus vidi,” li diris, ”ĉu ekzistas en la mondo iaj diabloj, kiujn ankaŭ mi ne konas. Ci, kie estas ĉi tie la damna nord-okcidento?”

”Jen,” montris la hibrido. ”Kien vi iras, sinjoro?”

”En la inferon,” ekgruntis kapitano J. van Toĥ. ”Rigardi al Devil Bay.”

\*

Ekde tiu vespero komenciĝis la strangemo de kapitano J. van Toĥ. En la kampongon li revenis nur ĉe mateniĝo; eĉ ne vorton li diris kaj igis sin transporti sur la ŝipon, kie li ŝlosis sin en sia kajuto ĝis vespero. Tio ankoraŭ ŝajnis al neniu okulfrapa, ĉar Kandong Bandoeng estis ŝarĝota el benrikolto de insulo Tana Masa (kopro, pipro, kamforo, gutaperko, palmoleo, tabako kaj laborfortoj); sed kiam vespere li ricevis raporton, ke ĉiu varo estas stokita, nur li eksnufis kaj diris: ”Boaton. En la kampon-

gon.” Kaj denove li revenis nur ĉe mateniĝo. La svedo Jensen, kiu helpis al li sur la ferdekon, nur pro ĝentileco demandis lin: ”Do, hodiaŭ oni plu veturos, ĉu, kapitano?” La kapitano turniĝis, kvazaŭ oni pikus lin en la postajon. ”Tio ne rilatas vin,” li abruptis. ”Atentu viajn damnajn aferojn!” La tutan tagon Kandong Bandoeng ankris en distanco de unu nodo disde la marbordo de Tana Masa kaj faris nenion. Antaŭ la vespero la kapitano elruliĝis el sia kajuto kaj ordonis: ”Boaton. En la kampongongon.” Malgranda greko Zapatis rigardis post lin per unu blinda okulo kaj la alia straba. ”Junuloj,” li kokerikis, ”aŭ nia maljuna havas tie bubinon aŭ li tute frenezigiĝis.” La svedo Jensen morniĝis. ”Ĉu tio vin rilatas?” li abruptis je Zapatis. ”Atentu viajn damnajn aferojn!” Poste kun la islandano Gudmundson li prenis malgrandan boaton kaj remis rekte al Devil Bay. Ili restis kun la boato malantaŭ ŝtonblokoj kaj atendis, kio plu okazos. En la golfo la kapitano estis iranta tien kaj reen kaj ŝajnis, ke li atendas iun; de temp’al tempo li haltis kaj vokis ion kiel ts, ts, ts. ”Rigardu,” diris Gudmundson kaj montris al la maro, nun brilblindige ruĝan kaj oran de la sunsubiro. Jensen kalkulis du, tri, kvar, ses naĝilojn falĉile akrajn, direktiĝantaj al Devil Bay. ”Sakre”, murmuris Jensen, ”kiom da ŝarkoj estas ĉi tie!” Ĉiumomente iu falĉilo mergiĝis, super la akvo svingbatis la vosto kaj en la akvo im-

pete ekkirliĝis. Tiam kapitano J. van Toĥ komencis sur la bordo furioze salteti, sputis blasfemojn kaj pugne minacis al la ŝarkoj. Poste estiĝis mallonga tropika krepusko kaj super la insulo ascendis la luno; Jensen ekremis kaj proksimiĝis kun la boato al la bordo ĝis distanco de unu furlongo\*. La kapitano nun sidis sur ŝtonbloko kaj faris ts, ts, ts. Io moviĝis ĉirkaŭ li, sed kio, tio ne estas bone ekkonebla. Ĝi aspektas kiel fokoj, opiniis Jensen, sed la foko rampas alie. Ĝi elmergiĝadis el la akvo inter la ŝtonblokoj kaj paŝetis sur la bordo balance kiel pingvenoj. Jensen silente ekremis kaj haltis duonfurlongon de la kapitano. Jes, la kapitano ion diris, sed diablo komprenu, kion; plej verŝimile ĝi estas malaje aŭ tamule. Li dismetas la manojn, kvazaŭ li ĵetas ion al la fokoj (sed tio ne estas fokoj, certigis sin Jensen), kaj dume li kvakas ĉine aŭ malaje. Tiumomente elglitis el la mano de Jensen la levita remilo kaj plaŭdis en la akvon. La kapitano levis la kapon, ekstaris kaj iris proksimume tridek paŝojn al la akvo; subite komencis fulmi kaj knali; la kapitano pafis el braŭningo direkte al la boato. Preskaŭ samtempe en la golfo ekmuĝis, ekkirliĝis, ekplaŭdis, kvazaŭ mil fokoj saltus en la akvon; sed tiam jam Jensen kaj Gudmundson plenforte remis kaj pelis sian boaton post la plej proksiman angulon, ke nur ĝi siblis. Reveninte sur la ŝipon, ili diris eĉ ne unu vorton al iu. Tiuj nordanoj

Furlongo — angla mezurunuo, 201 m



tamen nur scias silenti. Antaŭ la mateniĝo revenis la kapitano; li estis morna kaj kolerega, sed diris eĉ ne unu vorton. Nur kiam Jensen helpis al li suriri la ferdekon, du bluaj okulparoj renkontiĝis en malvarma kaj esplorama rigardo.

”Jensen,” diris la kapitano.

”Jes, sinjoro.”

”Hodiaŭ ni ŝipos.”

”Jes, sinjoro.”

”En Surabajo vi ricevos vian libron.”

”Jes, sinjoro.”

Kaj sufiĉe. Tiutage Kandong Bandoeng forŝipis al Padango. El Padango kapitano J. van Toĥ sendis al sia firmo en Amsterdamo paketon asekuritan je mil ducent pundoj. Kaj samtempe telegrafan peton pri unujara libertempo. Urĝa sanstato kaj tiel plu. Poste li vagis tra Padango, ĝis li trovis la serĉatan personon. Li estis sovaĝulo el Borneo, dajako\*, kiun de temp’al tempo dungis anglaj pasaĝeroj kiel ŝarkoĉasiston, por spektaklo; ĉar la dajako laboris ankoraŭ laŭ la malnova maniero, armita sole per longa tranĉilo. Versimile li estis kanibalo, sed havis sian firman tarifon: kvin pundojn por ŝarko, inkluzive manĝaĵon. Cetere estis terure lin rigardi, ĉar sur ambaŭ manoj, sur la brusto kaj sur la femuroj li havis fo-

Dajako — komuna nomo por pluraj gentgrupoj interne de Borneo

skrapitan haŭton de ŝagrino kaj la nazon kaj la orelojn ornamitajn per ŝarkodentoj. Oni nomis lin Shark.

Kun ĉi tiu dajako kapitano J. van Toĥ transloĝiĝis al insulo Tana Masa.

## 2. Sinjoro Golombek kaj sinjoro Valenta\*

Estis varmega redakcia somero, kiam nenio, nepre nenio okazas, kiam oni ne faras politikon kaj kiam ankaŭ estas nenia politika situacio; kaj tamen ankaŭ en tiu tempo la legantoj de ĵurnaloj, kuŝantaj en agonio de enuo sur la bordoj de akvoj aŭ en maldensa ombro de arboj, demoralizitaj de la varmego, naturo, kampara trankvilo kaj entute de la saniga kaj simpla libertempaj vivo, atendas kun la ĉiutage senrevigata espero, ke almenaŭ en la ĵurnaloj estos io nova kaj refreŝiga, ia murdo aŭ milito aŭ tertremo, kurte lo; kaj se ĝi ne estas tie, ili frapas per la ĵurnalo kaj amare deklaras, ke en la ĵurnalo estas nenio, sed tute Nenio, kaj ke ili ne plu abonos ĝin.

Kaj dume en la redakcio sidas kvin aŭ ses forlasitaj homoj, ĉar la ceteraj kolegoj ankaŭ ferias, kaj ankaŭ ili frapas indigne per la ĵurnaloj kaj plendas, ke en la ĵurnaloj nun nenio estas, tute Nenio. Kaj el la kompostejoj eliras sinjoro kompostisto kaj diras riproĉe: "Sinjoroj, sinjoroj, ankoraŭ ni ne havas por la morgaŭo ĉefartikolon."

Bedřich Golombek, Eduard Valenta — redaktoroj de la ĵurnalo  
*Lidové noviny*

”Nu, donu tien ... tiun artikolon ... pri la ekonomia situacio en Bulgario,” opinias unu el la forlasitaj sinjoroj.

La sinjoro kompostisto peze ĝemas: ”Sed kiu legu tion, sinjoro redaktoro? Jam denove en la tuta ĵurnalo estos Nenio Leginda.”

Ses forlasitaj sinjoroj levas la okulojn al la plafono, kvazaŭ tie eblus malkovri Ion Legindan.

”Se ie io okazus,” proponas iu necerte.

”Aŭ havi ... ian ... interesan riportaĵon,” aludas la alia.

”Pri kio?”

”Tion mi ne scias.”

”Aŭ elpensi ... ian novan vitaminon,” murmuretas la tria.

”Nun en somero?” oponas la kvara. ”Homo, vitaminoj, tio estas kleraj aferoj, tio pli konvenas aŭtune — ”

”Jesuo, kia varmego,” oscedas la kvina. ”Tio devus esti io el la polusaj regionoj.”

”Sed kio?”

”Nu. Io kiel tiu Eskimo Welzl\*. Forfrostiĝintaj fingroj, eterna glacio kaj io simila.”

”Facile dirite,” diras la sesa. ”Sed de kie preni tion?”

En la redakcio ekregis senespera silento.

Eskimo Welzl — ĉeĥa polusa ĉasisto kaj orserĉanto. Lia rakontado vekis siatempe sensacion. La ĵurnalistoj Golombek kaj Valenta eldonis, kun la verkisto R. Těsnohlídek, libron pri liaj vojaĝoj. La libro estis esperantigita sub la titolo *Tridek jarojn en la ora nordo*, fare de Moraviaj Esperanto-Pioniroj

”Dimanĉe mi estis en Jevičko ...” aŭdiĝis hezite sinjoro kompostisto.

”Nu kaj?”

”Onidire ferias tie iu kapitano Vantoĥ. Laŭdire li naskiĝis tie, en Jevičko.”

”Kia Vantoĥ?”

”Tia dika. Laŭdire li estas ŝipkapitano, tiu Vantoĥ. Oni diris, ke ie tie li perloĉasis.”

Sinjoro Golombek ekrigardis sinjoron Valenta.

”Kaj kie li ĉasis ilin?”

”Apud Sumatro ... kaj Celebeso ... entute ie tie. Onidire li vivis tie tridek jarojn.”

”Homo, kia ideo,” diris sinjoro Valenta. ”Tio povus esti bonega riportaĵo. Golombek, ĉu vi veturos?”

”Nu, ni povas provi tion,” opiniis sinjoro Golombek kaj deglitis desur la tablo, sur kiu li sidis.

\*

”Tiu sinjoro tie estas li,” diris la gastejestro en Jevičko.

En la ĝardeno ĉe la tablo sidis korpulenta, larĝe diskrura sinjoro en blanka ĉapo, trinkis bieron kaj enpense zigzagis per la dika montrofigro sur la tablo. Ambaŭ sinjoroj direktis al li.

”Redaktoro Valenta.”

”Redaktoro Golombek.”

La korpulenta sinjoro levis la okulojn. ”What? Kion?”

”Mi estas redaktoro Valenta.”

”Kaj mi redaktoro Golombek.”

La dika sinjoro digne leviĝis. ”Captain van Toĥ. Very glad. Sidiĝu, junuloj.”

Ambaŭ sinjoroj volonte alsidiĝis kaj metis antaŭ sin notblokojn.

”Kaj kion vi volos trinki, junuloj?”

”Frambakvon,” diris sinjoro Valenta.

”Frambakvon?” ripetis la kapitano nekredeme. ”Kaj kial? Gastejestro, alportu bieron al ili. — Do kion fakte vi volas,” li diris kaj ekkubutis je la tablo.

”Ĉu estas vere, sinjoro Vantoĥ, ke ĉi tie vi naskiĝis?”

”Jes. Naskiĝis.”

”Mi petas vin, kiel vi venis al la maro?”

”Nu, trans Hamburgo.”

”Kaj kiel longe jam vi estas kapitano?”

”Dudek jarojn, junulo. La paperojn mi havas ĉi tie,” li diris emfaze, frapetante sian brustpoŝon. ”Mi povas montri.”

Sinjoro Golombek emis rigardi, kiel aspektas kapitanodokumentoj, sed subpremis tion. ”Certe, sinjoro kapitano, dum la dudek jaroj vi ekkonis egan parton de la mondon, ĉu?”

”Jes. Do parton. Jes.”

”Kaj kion?”

”Java. Borneo. Philippines. Fidji Islands. Solomon Islands. Carolines. Samoa. Damned Cliperton Island\*. A lot of damned islands, junulo. Kial?”

”Nur tial, ĉar ĝi estas interesa. Sciu, ni ŝatus aŭdi de vi multe pli.”

”Jes. Do nur tiel, hm?” La kapitano fiksas je ili siajn helbluajn okulojn. ”Do vi estas de p’lís, nome de polico, ĉu?”

”Ne, sinjoro kapitano, ni estas de ĵurnalo.”

”Ha, tiel, de ĵurnalo. Reporters, ĉu? Skribu do: Captain J. van Toĥ, kapitano de la ŝipo Kandoeng Bandoeng — ”

”Kiel?”

”Kandoeng Bandoeng, haveno Surabajo. Celo de la vojaĝo: vacances — kiel oni diras tion?”

”Libertempo”.

”Jes, sakre, libertempo. Donu tion do en la ĵurnalon, kiu albordiĝis. Kaj nun kaŝu la notblokon, junuloj. Your health\*.”

”Sinjoro Vantoĥ, ni venis al vi, por ke vi rakontu al ni ion el via vivo.”

”Kial?”

Damned Clipperton Island. A lot of damned islands — (*angle*)  
damna Clipperton Insulo. Aro da damnaj insuloj.  
Your health — (*angle*) je via sano

”Ni skribos tion por ĵurnalo. La homojn ege interesas legi pri foraj insuloj, kaj kion tie vidis kaj travivis ilia samlandano, ĉeĥo, naskita en Jevíčko ...”

La kapitano kapjesis. ”Jen vero. Junulo, mi estas sola Captain el tuta Jevíčko. Do jes. Onidire estas de ĉi tie ankaŭ iu kapitano de ... de ... de karuselo, sed mi opinias,” li aldiris konfide, ”ke li ne estas vera Captain. Tion oni mezuras laŭ tonelaro.”

”Kaj kiun tonelaron havis via ŝipo?”

”Dek du mil tons, junulo.”

”Do vi estas granda kapitano, ĉu?”

”Jes, granda,” diris la kapitano digne. ”Junuloj, ĉu vi havas monon?”

Ambaŭ sinjoroj ekrigardis sin iom necerte. ”Ni havas, sed malmulte. Ĉu eble vi bezonas, kapitano?”

”Jes. Do, tion mi bezonus.”

”Jen vidu. Se vi rakontos multon al ni, ni skribos tion por ĵurnalo, kaj vi ricevos monon por tio.”

”Kiom?”

”Eble eĉ ... iun milon,” diris donaceme sinjoro Golombek.

”En pounds of sterling?”

”Ne, nur en kronoj.”

Kapitano van Toĥ kapskuis. ”Tion do ne. Tiom mi mem havas, junulo.” Li elpoŝigis dikan faskon da bankbiletoj. ”See!” Poste li ekkubutis je la tablo kaj kliniĝis al



ambaŭ sinjoroj. "Sinjoroj, mi havus por vi big business. Kiel oni diras tion?"

"Grandan negocon."

"Jes. Grandan negocon. Sed vi devus doni al mi dek kvin ... halt, dek kvin, dek ses milions da kronoj. Nu?"

Ambaŭ sinjoroj denove necerte ekrigardis sin. Redaktoroj havas nome siajn spertojn kun la plej diversaj specoj de frenezuloj, trompisto kaj inventistoj."

"Halt," diris la kapitano, "ion mi povas montri al vi." Li fiŝis per siaj dikaj fingroj en la veŝtpoŝeto, ion eltiris kaj metis sur la tablon. Tio estis kvin rozetaĵoj en grandeco de ĉerizkerneto. "Ĉu vi komprenas perlojn?"

"Kiom ĝi povas kosti?" elspiris sinjoro Valenta.

"Well, lots of money\*, junulo. Sed tion mi kunportas nur ... por montri, kiel specimeno. Do, ĉu vi partoprenus?" li demandis aletendante trans la tablon sian larĝan manplaton.

Sinjoro Golombek suspiris. "Sinjoro Vantoĥ, tiom da mono — "

"Halt," interrompis lin la kapitano. "Mi scias, ci ne konas min; sed demandu pri Captain van Toĥ en Subaraja, en Batavia, en Padang, aŭ kie ci volas. Iru kaj demandu, kaj ĉiu diros al ci, jes, Captain van Toĥ, he is as good as his word\*."

Well, lots of money — (*angle*) bone, multe da mono

He is as good as his word — (*angle*) li tenas sian vorton

”Sinjoro Vantoĥ, ni kredas al vi,” protestis sinjoro Golombek. ”Sed — ”

”Halt,” ordonis la kapitano. ”Mi scias, ci ne volas doni cian belan monon nur tiel; brave, junulo. Sed ci investos ilin en ŝipon, see? Ci aĉetos la ŝipon, ci estos tiu ship-owner\* kaj povas kunŝipi; jes, ci povas, por vidi, kiel mi mastrumas per cia mono. Sed la mono, kiun ni gajnos tie, estos fifty-fifty. Tio estas honesta business, ĉu?”

”Sed sinjoro Vantoĥ,” elvortigis fine sinjoro Golombek iom deprimate, ”ja ni ne havas tiom da mono!”

”Ha, tio estas io alia,” diris la kapitano. ”Sorry. Mi ne scias do, sinjoroj, kial vi venis al mi.”

”Por ke vi rakontu al ni, kapitano. Vi devas ja havi tiom da spertoj —”

”Jes, mi havas, junulo. Damnajn spertojn mi havas.”

”Ĉu vi travivis iam ŝip-pereon?”

”What? Ion kiel ship-wrecking? Tion do ne. Kion ci entute opinias? Se ci donos al mi bonan ŝipon, nenio do povas okazi al ĝi. Ja ci povas demandi en Amsterdamo pri miaj references. Iru kaj demandu.”

”Kaj kion la indiĝenoj? Ĉu vi konatiĝis tie kun indiĝenoj?”

Kapitano van Toĥ kapskuis. ”Nenio por kleraj homoj. Tion mi ne rakontos.”

Ships-owner — (*angle*) ŝipposedanto

My lad — (*angle*) mia knabo

”Rakontu do al ni ion alian.”

”Ba, rakonti,” murmuris la kapitano malkonfide. ”Kaj poste vi vendos tion al iu Company kaj tiu sendos tien siajn ŝipojn. Mi diras al vi, my lad\*, homoj estas grandaj ŝtelistoj. Kaj la plej grandaj ŝtelistoj estas tiuj bankers en Colombo.”

”Ĉu vi estis ofte en Kolombo?”

”Jes, tre ofte. Kaj en Bangkok ankaŭ, kaj en Manilla. — Junuloj,” li diris subite, ”mi scius pri unu ŝipo. Ege taŭga ŝipo kaj por tiu sumo malkara. Ĝi kuŝas en Rotterdam. Venu rigardi ĝin. Rotterdam estas tuj apude,” li montris per la polekso trans la ŝultrojn. ”Nun la ŝipoj estas ridinde malkaraj, knaboj. Kiel ferrubo. Ĝi aĝas nur ses jarojn kaj kun dizel-motoro. Ĉu vi volas rigardi ĝin?”

”Ni ne povas, sinjoro Vantoĥ.”

”Nu vi estas strangaj homoj,” ekĝemis la kapitano kaj brue mungis en la lazure bluan poŝtukon. ”Kaj ĉu vi scias tie pri iu, kiu volus aĉeti ian ŝipon?”

”Ĉi tie en Jevičko?”

”Jes, ĉi tie, aŭ ie ĉirkaŭe. Mi volus, ke tiu granda negoco venu al iu ĉi tie, in my country\*.”

”Tio estas bela de vi, kapitano —”

”Jes. La ceteraj estas ege grandaj trompuloj. Kaj ili ne havas monon. Vi de newspapers\* devas koni ĉi tie gran-

in my country — (*angle*) en mia patrio  
newspapers — (*angle*) ĵurnaloj

dajn homojn, tiujn bankers kaj ship-owners, kiel oni diras tion, ŝipmastroj, ĉu?”

”Ŝip-posedantoj. Tiujn ni ne konas, sinjoro Vantoĥ.”

”Domaĝe,” morniĝis la kapitano.

Sinjoro Golombek ion rememoris. ”Ĉu eble vi konas sinjoron Bondy?”

”Bondy? Bondy?” pripensis kapitano van Toĥ. ”Momenton, tiun nomon kvazaŭ mi konas. Bondy. Jes, en London estas ia Bond-Street, kaj tie vivas tre riĉaj homoj. Ĉu li havas ian komercejon en tiu Bond-Street, tiu via Bondy?”

”Ne, li vivas en Prago, sed naskiĝis, mi opinias, ĉi tie en Jevičko.”

”Aj, sakre,” laŭtegis la kapitano ĝoje, ”ci pravas, knabo. Tiu, kiu havis sur la placo mercerejon. Jes, Bondy — kiel nur li nomiĝis? Maks. Maks Bondy. Do nun li havas komercejon en Prago?”

”Ne, tiu estis versimile lia patro. Ĉi tiu Bondy nomiĝas G. H. Prezidanto G. H. Bondy, kapitano.”

”G. H.” kapskuis la kapitano. ”G. H., ĉi tie estis neniu. Eble li povus esti Gustl Bondy — sed li estis neniu prezidanto. Gustl estis tia lentuga judeto. Do li ne povas esti tiu.”

”Li estas tiu, sinjoro Vantoĥ. Ja, longajn jarojn vi ne vidis lin.”

”Jes, ci pravas. Tiom da jaroj,” konsentis la kapitano. ”Kvardek jaroj, knabo. Povas esti, ke tiu Gustl estas jam granda. Kaj kio li estas?”

”Li estas prezidanto de la administraro de MEAS, sciuj, tiu granda fabriko je kaldronoj kaj similaj aĵoj, nu, kaj prezidanto de almenaŭ dudek kompanioj kaj karteloj. — Ege granda sinjoro, sinjoro Vantoĥ. Oni nomas lin kapitano de nia industrio.”

”Kapitano?” miris Captain van Toĥ. ”Mi ne estas do sola kapitano el Jevičko! Sakre, tiu Gustl estas ankaŭ Captain. Mi bezonus kunveni kun li. Kaj ĉu li havas monon?”

”Kara ĉielo! Da mono kiom da fojno, sinjoro Vantoĥ. Tiu sendube havas siajn kelkcent milionojn. La plej riĉa homo en la lando.”

Kapitano van Toĥ profunde serioziĝis. ”Kaj ankaŭ Captain. Do, mi dankas al vi, knabo. Mi ŝipos do al li, al tiu Bondy. Jes, Gustl Bondy, I know\*. Tia judeto li estis. Kaj nun li estas Captain G. H. Bondy. Jes, jes, kiel la tempo pasas,” li suspiris melankolie.

”Sinjoro kapitano, ni devos jam iri, por ke la vespera trajno ne forveturu al ni — ”

”Nu, mi akompanos vin en havenon,” diris la kapitano kaj komencis levi ankrojn. ”Ĝojigis min tre, ke vi

I know — (*angle*) mi scias

a good friend of mine — (*angle*) mia bona amiko

alveturis, sinjoroj. Mi konas en Surabaya iun redaktoron, brava knabo li estas, jes, a good friend of mine\*. Terura drinkulo, junuloj. Se vi volus, mi havigus al vi ĵurnalistan postenon en Subaraja. Ne? Nu, kiel vi volas.”

Kaj kiam la trajno jam ekveturis, svingis kapitano van Toĥ malrapide kaj solene per grandega blua poŝtuko. Dume unu lia granda neregula perlo elfalis en sablon. Perlo, kiun neniam iu trovis.

### 3. *G. H. Bondy kaj lia samlandano*

**K**iel estas konate, ju pli granda sinjoro, des malpli estas skribite sur tabuleto de lia pordo. Tia maljuna sinjoro Makso Bondy en Jevíčko devis havi super la butiko, sur ambaŭ pordo-flankoj kaj sur la fenestroj per grandaj literoj pentrite, ke ĉi tie estas Makso Bondy, butiko kun ĉiaspeca merceraĵo, dotaĵoj por fianĉinoj, vebvaroj, mantukoj, viŝtukoj, tablotukoj kaj tegaĵoj, katunoj kaj gradloj, unuarangaj drapoj, silko, kurtenoj, lambrekinoj, pasamentoj kaj ĉiaj kudraĵoj. Fondita en la jaro 1885. — Lia filo, G. H. Bondy, kapitano de industrio, prezidanto de la kompanio MEAS, komerca konsiliano, borsa konsilisto, vicprezidanto de Industriista Asocio, Consulado de la República Ecuador, membro de multnombraj administraroj ktp. ktp., havas sur sia domo nur malgrandan, nigran vitran tabuleton kun ora surskribo

#### BONDY

Nenio pli. Nur Bondy. La aliaj skribu sur siajn pordegojn Julius Bondy, reprezentanto de firmo General Motors, aŭ MUD-ro Ervin Bondy, aŭ S. Bondy kaj kompanio; sed ekzistas nur unusola Bondy, kiu estas simple

Bondy, sen pluaj detaloj. (Mi opinias, ke la papo havas sur sia pordego simple skribite Pius, kaj nenian titolon, neniun numeron. Kaj Dio havas iun tabuleton nek sur la ĉielo nek sur la tero. Vi devas, homo, mem ekkoni, ke Li tie loĝas. Sed tio fakte ne apartenas ĉi tien kaj estu aludite nur pretere).

Kaj antaŭ tiu vitra tabuleto iun ardantan tagon haltis sinjoro en blanka marista ĉapo kaj viŝis per blua poŝtuko sian potencan grasdikan nukon. Damne nobla domo, li opiniis, kaj iom necerte ektiris latunan sonorilbutonon.

En la pordo aperis pordisto Povondra, okulmezuris la dikkan sinjoron de la ŝuoj ĝis la oraj ĉapgalonoj kaj diris rezerviĝeme: "Bonvolu?"

"Nu, knabo," laŭtis la sinjoro, "ĉu loĝas ĉi tie iu sinjoro Bondy?"

"Vi deziras?" demandis glacitone sinjoro Povondra.

"Diru al li, ke volus paroli kun li Captain van Toĥ el Surabaya. Jes," li rememoris, "jen karteto." Kaj li transdonis al sinjoro Povondra vizitkarton, sur kiu estis matricita ankro kaj presita nomo:

Captain J. van Toĥ  
E.I. & P.L. Co. S. Kandong Bandoeng  
Surabaya Naval Club

Sinjoro Povondra klinis la kapon kaj hezitis. Ĉu diri al li, ke sinjoro Bondy ne estas hejme? Aŭ: mi bedaŭras,



sed sinjoro Bondy ĝuste havas gravan konferencon? Estas vizitoj, kiujn necesas anonci, kaj aliaj, kiujn korekta pordisto solvas mem. Sinjoro Povondra sentis ĝenan paneon de sia instinkto, kiun li en tiaj kazoj sekvis; tiu dika sinjoro neniel konvenis en la kutimajn kategoriojn de la neanoncitaj vizitoj, li ŝajnis esti nek agento, nek funkciulo de bonfara societo. Dume kapitano van Toĥ anhelas kaj viŝas per poŝtuko sian kalvon; kaj krome tiel senruze li palpebrumas per siaj helbluaj okuloj — Sinjoro Povondra subite decidiĝis surpreni la tutan responson. "Bonvolu eniri," li diris, "mi anoncos vin al sinjoro konsiliano."

Captain J. van Toĥ viŝas per blua poŝtuko sian frunteton kaj rigardas la vestiblon. Tondre, tiu Gustl estas instalita; ja ĝi estas kiel saloon sur ships, navigantaj el Rotterdam al Batavia. Egan sumon ĝi devis kosti. Kaj tia lentuga judeto li estis, miras la kapitano.

Dume G. H. Bondy enpense observas en sia laborĉambro la vizitkarton de la kapitano. "Kion li volas?" li demandas suspekto.

"Mi ne scias, pardonu," murmuretas respekte sinjoro Povondra.

Sinjoro Bondy ankoraŭ tenas en la mano la vizitkarton. La matricita ŝipankro. Captain J. van Toĥ, Surabaya — kie fakte situas Surabajo? Ĉu ie en Javo? Malproksimumo ekblovis sinjoron Bondy. Kandong Bandoeng, ĝi so-

nas kiel gongbatoj. Surabajo. Kaj ĝuste hodiaŭ estas tia tropika tago. Surabajo. "Do, venigu lin," ordonas sinjoro Bondy.

En la pordo staras fortega viro en kapitanĉapo kaj soldatsalutas. G. H. Bondy iras renkonte al li. "Very glad to meet you, Captain. Please, come in.\*"

"Nazdar, nazderek, sinjoro Bondy," vokas ĝoje la Captain.

"Vi estas ĉeĥo?" miras sinjoro Bondy.

"Jes, ĉeĥo. Ja ni konas nin, sinjoro Bondy. El Jevičko. Farunvendisto Vantoĥ, do you remember\*?"

"Ĝuste, ĝuste," laŭte ĝojas sinjoro G. H. Bondy, sed samtempe sentas leĝeran senreviĝon. (Do li ne estas nederlandano!) "Farunvendisto sur foirplaco, ĉu? Ankaŭ vi tute ne ŝanĝiĝis, sinjoro Vantoĥ. Senĉese tiu sama. Do, kiel prosperas la farunvendado?"

"Thanks," diris la kapitano ĝentile. "La patro jam de longe forpasis, kiel oni diras — "

"Mortis? Aj, aj! Ve re, vi devas esti lia filo ..." La okuloj de sinjoro Bondy vigliĝis pro subita rememoro. "Homo kara, ĉu vi estas tiu Vantoĥ, kiu batiĝis kun mi en Jevičko, kiam ni estis buboj?"

Very glad to meet you, Captain. Please come in — (*angle*) ĝojigas min, ke mi vidas vin, kapitano. Mi petas, eniru.

Do you remember? — (*angle*) ĉu vi memoras?

”Jes, tiu mi estas, sinjoro Bondy,” konsentis la kapitano serioze. ”Tial oni elhejmigis min al Moravská Ostrava.”

”Ofte ni interbatiĝis. Sed vi estis pli forta ol mi,” rekonis sinjoro Bondy sportece.

”Jes, tia mi estis. Kaj vi estis tia febla judeto, sinjoro Bondy. Kaj ege vi ricevadis sur la postaĵon. Tre.”

”Mi ricevadis, vere,” rememoris G. H. Bondy emocie. ”Kaj sidiĝu, samlandano! Brave, ke vi rememoris min! Kial tiel subite vi aperis ĉi tie?”

Kapitano van Toĥ digne sidiĝis en leda fotelo kaj planken metis la ĉapon. ”Mi prenas ĉi tie miajn aferojn, sinjoro Bondy. Nu, jes. That’s so.\*”

”Ĉu vi rememoras,” dronis en rememoroj sinjoro Bondy, ”kiel vi postkriis min: judo, judo, prenos vin Baal-Zebubo?”

”Jes,” diris la kapitano kaj ektrumpetis emocie en la bluan poŝtukon. ”Ho jes. Tiam estis belaj tempoj, knabo. Sed kion fari, la tempo pasas. Nun ni ambaŭ estas maljunaj homoj kaj ambaŭ Captains.”

”Vere, vi estas kapitano,” rememorigis al si sinjoro Bondy. ”kiu antaŭvidus tion! Captain of Long Distances\*, — tiel oni diras tion, ĉu?”

That’s so — (*angle*) tiel ĝi estas

Captain of long distances — (*angle*) kapitano por longdistancaj navigoj

”Yeah, sir. A Highsear. East India and Pacific Lines, sir.\*”

”Bela okupo,” suspiris sinjoro Bondy. ”Tuj mi ŝanĝus kun vi, kapitano. Vi devas rakonti al mi pri vi.”

”Ho jes, volonte,” vigliĝis la kapitano. ”Mi volus rakonti ion al vi, sinjoro Bondy. Ege interesa afero, junulo.” Kapitano van Toĥ malkviete ĉirkaŭrigardis.

”Ĉu vi serĉas ion, kapitano?”

”Jes. Ĉu tute vi ne trinkas bieron, sinjoro Bondy? Nome survoje el Surabaja mi tiel eksoifis.” La kapitano komencis serĉi en la vasta pantalonpoŝo kaj eligis bluan poŝtukon, tolsaketon kun io, saketon kun tabako, tranĉilon, kompason kaj faskon da bankbiletoj. ”Mi venigus iun por biero. Eble tiun stevardon, kiu kondukis min en vian kabinon.”

Sinjoro Bondy sonorigis. ”Lasu tion, kapitano. Dume bruligu al vi cigaron —”

La kapitano prenis cigaron kun ruĝa kaj ora bendo kaj alflaris ĝin. ”Tabako el Lombok. Tie estas grandaj latronoj, jen la vero.” Post kio je konsterno de sinjoro Bondy li dispremis la multekostan cigaron en sia potenca pugno kaj la tabakpistaĵon ŝutis en pipon. ”Jes, Lombok. Aŭ Sumba.”

Dume en la pordo senbrue aperis sinjoro Povondra.

Yeah, Sir. A higsear. East India and Pacific Lines, Sir. — (*angle*)

Jes, sinjoro. Marflot-ŝipisto. Orienta Indio kaj Pacifik-vojaĝoj

”Alportu bieron,” ordonis sinjoro Bondy.

Sinjoro Povondra levis la brovojn: ”Bieron? Kiom da?”

”A gallon\*,” murmuris la kapitano kaj surtretis brulintan alumeton en tapiŝon. ”En Adeno estis terura varmo, knabo. — Do mi havas iajn novaĵojn, sinjoro Bondy. El Sunda Islando, see? Tie oni povus fari fabelajn negocojn, sinjoro. A big business. Sed necesus rakonti la tutan, kiel oni diras story?”

”Rakonto.”

”Jes. Nome ia tia rakonto, sinjoro. Atendu.” La kapitano turnis siajn miozotkolorajn okulojn al la plafono. ”Nu mi ne scias, kie preni la komencon.”

(Denove ia negoco, ekpensis G. H. Bondy. Miadio, kia tede! Li rakontos al mi, ke li povus importi kudromaŝinojn en Tasmanion aŭ vaporkaldronojn kaj pinglojn en Fiĝojn. Fabela negoco, mi scias. Por tio mi estas bona al vi. Diable, mi estas ja neniu butikisto. Mi estas revulo. Mi estas miamaniere poeto. Rakontu al mi, maristo Sindibado, pri Surabajo aŭ Feniks-insuloj. Ĉu altiris vin la Magneta Monto, ĉu forrabis vin en sian neston birdo Grifo? Ĉu vi revenas kun kargo da perloj, cinamo kaj bezaroj\*? Nu, homo, do komencu mensogi!)

”Do mi komencus pri tiu saŭro,” anoncis la kapitano.

A gallon — (*angle*) galjono (4,54 l)

Bezaroj — kalkulusaj konkrementoĵoj en intestoj aŭ en urinvojoj de kvarpieduloj. Iam oni atribuis al ili kuracan econ

”Pri kia saŭro?” miris la komerca konsiliano Bondy.

”Nu, pri la saŭroj. Kiel oni diras tion, lizards.”

”Lacertoj?”

”Jes, damne, lacertoj. Tie estas nome tiaj lacertoj, sinjoro Bondy.”

”Kie?”

”Sur iu tia insulo. Mi ne povas ĝin nomi, knabo. Ĝi estas ege granda secret, worth of millions\*.” Kapitano van Toĥ viŝis sian frunton per poŝtuko. ”Diable, kie estas la biero?”

”Tuj ĝi estos ĉi tie, kapitano.”

”Jes. Do bone. Sciu, sinjoro Bondy, ili estas tre amin-daj kaj bravaj bestoj, tiuj lacertoj. Mi konas ilin, knabo.” La kapitano potence frapis la tablon. ”Kaj ke ili estus diabloj, tio estas mensogo. A damned lie, sir. Pli vere vi estas diablo kaj mi estas diablo, mi Captain van Toĥ, sinjoro. Tion vi povas kredi al mi.”

G. H. Bondy ektimis. Delirio, li diris al si. Kie restas tiu damna Povondra?

”Kelkmil da ili estas tie, da tiuj lacertoj, sed ilin ege voris la — diable, la, kiel oni nomas ilin ĉi tie? Sharks?”

”Ŝarkoj?”

”Jes, ŝarkoj. Tial estas tiuj lacertoj tiel raraj, sinjoro, kaj nur en ununura loko, en tiu golfo, kiun mi ne povas nomi.”

secret, worth of millions — (*angle*) sekreto de miliona valoro

”Do tiuj lacertoj vivas en la maro?”

”Jes, en la maro. Nur nokte ili rampas sur bordon, sed baldaŭ ili devas denove en la akvon.”

”Kaj kiel ili aspektas?” (Sinjoro Bondy klopodis akiri tempon, antaŭ ol revenos tiu mizera Povondra.)

”Nu, ili estas grandaj, ni diru, kiel fokoj, sed kiam ili paŝetas per la malantaŭaj piedetoj, ili estas tiel altaj,” montris la kapitano. ”Ke ili estas belaj, tion mi ne povas diri. Ili ne havas sur si ŝelojn.”

”Skvamojn?”

”Jes, skvamojn. Ili estas tute kalvaj, sinjoro Bondy, kiel ranoj aŭ iaj salamanders. Kaj iliaj antaŭaj piedetoj estas kiel infanmanetoj, sed ili havas nur kvar fingrojn. Do tiaj povruoj ili estas,” aldiris la kapitano komplate. ”Sed ege saĝaj kaj amindaj bestoj, sinjoro Bondy.” Kaj la kapitano kaŭriĝis kaj komencis en tiu pozicio balance piedumi. ”Tiel ili paŝetas, tiuj lacertoj.”

La kapitano klopodis sian potencon korpon en kaŭro ondmovigi; dum tio li tenis la manojn antaŭ si kiel stariginta kaj petanta hundo kaj fiksitis je sinjoro Bondy siajn miozotkolorajn okulojn, ŝajnantaj petegi pri simpatio. G. H. Bondy estis per tio profunde impresita kaj iel home hontigita. Krome en la pordo aperis la senbrua sinjoro Povondra kun bierkruĉo kaj levis indigne la brovojn, rigardante la nedignan konduton de la kapitano.

”La bieron ĉi tien kaj iru for,” rapidis diri sinjoro Bondy.

La kapitano leviĝis kaj anhelis. ”Do tiaj bestetoj ili estas, sinjoro Bondy. Your health,” li diris kaj ekstrinkis. ”Bonan bieron ci havas, knabo. Kompreneble, tia domo, kian ci havas —” La kapitano viŝis siajn lipharojn.

”Kaj kiel vi trovis la lacertojn, kapitano?”

”Tio estas ĝuste la historieto, sinjoro Bondy. Nome ĝi okazis tiel, ke mi ĉasis perlojn sur Tana Masa —” La kapitano embarasiĝis. ”Aŭ ie tie. Jes, ĝi estis ia alia insulo, sed provizore ĝi estas mia secret, junulo. Homoj estas grandaj latronoj, sinjoro Bondy, kaj oni devas atenti la buŝon. Kaj kiam tiuj du damnaj sinhalanoj tranĉis sub la akvo la shells for de la perloj —”

”Konkojn?”

”Jes. Tiajn konkojn, kiuj teniĝas sur ŝtonoj firme kiel la juda kredo kaj oni devas ilin fortranĉi per tranĉilo. Dume la lacertoj rigardis la sinhalanojn kaj la sinhalanoj opiniis, ke tio estas mardabloj. Ege malklera popolo, tiuj singhales kaj batakis. Ke tie estas diabloj. Jes.” La kapitano potence ektrumpetis en sian poŝtukon. ”Sciu, knabo, tio onin ne lasas trankvila. Mi ne scias, ĉu ni ĉeĥoj estas tia scivolema nacio, sed kie mi renkontis nian samlandanon, do ĉie en ĉion li devis ŝovi sian nazon, ĉar ni ĉeĥoj volas nenion kredi. Do en mia maljuna stulta kapo fiksiĝis ideo, ke tiujn diablojn mi devas rigardi de pli



proksime. Ankaŭ mi estis ebria, sed tial, ĉar daŭre mi havis en la kapo la stultajn diablojn. Tie sube sur equator pluraj aferoj eblas, mia kara. Vespere do mi iris rigardi tiun Devil Bay —”

Sinjoro Bondy provis imagi tropikan golfon, borderitan de rokoj kaj arbarego. ”Nu kaj?”

”Mi sidas do tie kaj faras ts — ts — ts, por ke la diabloj venu. Kaj, knabo, post tempeto elrampis el la maro ia tia lacerto, stariĝis sur la postaj piedoj kaj per la tuta korpo tordiĝis. Kaj faras je mi ts — ts — ts. Se mi ne estus ebria, eble mi pafus kontraŭ tio; sed, amiko, mi estis plenverŝita kiel anglo, kaj tial mi diras, venu, ci, venu, tapaboy, mi ne volas malutili cin.”

”Vi parolis kun ĝi ĉeĉe?”

”Ne, malaje. Tie oni plejparte parolas la malajan, knabo. Ĝi nenion, nur tiel popaŝetas kaj tordiĝas, kvazaŭ hontus infano. Kaj ĉirkaŭe en la akvo estis kelkcent lacertoj kaj el la akvo elŝovadis siajn faŭketojn kaj rigardis min. Kaj mi, nu jes, mi estis vere ebriega, do mi kaŭriĝis kaj komencis tordiĝi kiel tiu lacerto, por ke ili ne timu min. Kaj poste el la akvo elrampis dua lacerto, proksimume granda kiel dekjara bubo, kaj komencis ankaŭ same paŝeti. Kaj en la antaŭa piedeto ĝi tenis ian perlokonkon.” La kapitano ektrinkis. ”Je la sano, sinjoro Bondy. Vere, mi estis brandizita kaj diras al ĝi, ci sagaculo, ci nome volas, ke mi malfermu cian konkon, ĉu? Do

venu ĉi tien, mi povas tion fari per mia tranĉilo. Sed ĝi nenion, ankoraŭ ĝi ne kuraĝis. Do denove mi komencis tordiĝi, kvazaŭ mi estus eta knabino antaŭ iu hontanta. Ĝi alpaŝetis pli proksimen, kaj mi malrapide etendas la manon al ĝi kaj prenas la konkon el ĝia piedeto. Vere, ni ambaŭ timis, tion vi povas pensi, sinjoro Bondy; sed mi estis ebria, vere. Mi prenis do mian tranĉilon kaj la konkon mi malfermis; fingre mi palpserĉas, ĉu tie eble estas perlo, sed ne estis tie, nur ia abomena nazmuko, la mukozaj mollusc vivanta en la konkoj. Jen, mi diris, ts-ts-ts, formanĝu tion, se ci volas. Kaj mi ĵetas al ĝi la malfermitan konkon. Vi rigardus, knabo, kiel ĝi ellekis la konkon. Ĝi devas esti por tiuj lacertoj ega tit-bit, kiel oni diras tion?”

”Delikataĵo.”

”Jes, delikataĵo. Sed la etaj povruloj ne povas penetri en la durajn konkojn per siaj fingretoj. Peza vivo, jes.” La kapitano ektrinkis. ”Poste ĉion mi analizis en mia kapo, junulo. Kiam la lacertoj vidis, kiel la sinhalanoj tranĉas la konkojn, versimile ili diris al si, ha, tion ili voras, kaj volis rigardi, kiel la sinhalanoj ilin malfermos. Tia sinhalano aspektas en la akvo sufiĉe simile al lacerto, sed tia lacerto estas pli saĝa ol singhales aŭ batak, ĉar ĝi volas ion ellerni. Kaj batak neniam ion ellernas, nur la ŝteladon,” aldiris indigne kapitano J. van Toĥ. ”Kaj kiam sur la bordo mi faris ts-ts-ts kaj tordiĝis kiel lacerto, ili opi-

niis, ke eble mi estas ia granda salamander. Tial ili ne tro timis kaj venis al mi, ke mi malfermu al ili la konkon. Tiaj saĝaj kaj konfidemaj bestoj ili estas.” Kapitano van Toĥ ruĝiĝis. ”Kiam mi konatiĝis kun ili pli bone, sinjoro Bondy, mi senvestigadis min por esti al ili pli simila, por esti kalva, tamen ĉiam ili miris, ke mi havas tian vilan bruston kaj tiajn aĵojn. Jes.” La kapitano frotetis per la poŝtuko sian puncan nukon. ”Sed mi ne scias, ĉu tio ne estas por ci tro longa, sinjoro Bondy.”

G. H. Bondy estis ravita. ”Ne, ne. Nur rakontu plu, kapitano.”

”Nu jes, mi povas. Kiam tiu lacerto ellekis la konkon, la aliaj rigardis tion kaj rampis sur la bordon. Kelkaj ankaŭ havis konkojn en la piedetoj — estas sufiĉe strange, knabo, ke ili sciis la konkojn de cliffs\* forŝiri per tiaj infanmanaĉoj sen poleksoj. Komence ili hontis, sed poste ili lasis preni la konkojn el la manetoj. Nu vere, tio ne estis nuraj perlokonkoj, ĉia ebla aĉaĵo ĝi estis, senkernaj ostroj kaj aliaj, tiujn mi ĵetadis do en la akvon kaj diras, tion ne, infanoj, tio estas senvalora, tion mi ne malfermos al vi per mia tranĉilo. Sed kiam ĝi estis perlokonko, mi malfermis ĝin per mia tranĉilo kaj palpserĉis, ĉu tie estas perlo. Kaj tiun konkon mi donis al ili por elleko. Sed tiam sidis ĉirkaŭe jam kelkcent lizards kaj rigardis, kiel mi malfermas tion. Kaj pluraj mem provis malcliffs — (*angle*) rifoj

fermi konkon pere de ia karapaco tie kuŝanta. Do tio mirigis min, knabo. Neniu besto scias manipuli kun instruments; kion vi volas, besto estas tamen nur naturo. Nu jes, en Buitenzorg\* mi vidis simion sciantan malfermi per tranĉilo ian tin, ian konservujon; sed simio ne plu estas ĝusta besto, sinjoro. Tamen, stranga ĝi estis por mi.” La kapitano ektrinkis. ”Dum tiu nokto, sinjoro Bondy, mi trovis en la shells entute dek ok perlojn. Estis tie etaj kaj pli grandaj kaj tri kiel ĉerizkerno, sinjoro Bondy. Kiel ĉerizkerno.” Kapitano van Toĥ serioze kapbalancis. ”Kiam matene mi estis revenanta al mia ŝipo, mi diris al mi, Captain van Toĥ, nur vi sonĝis, sir, vi estis ebriega, sinjoro, kaj simile; sed — en ĉi tiu poŝeto mi havis la dek ok perlojn. Jes.”

”Jen la plej bela historieto,” suspiris sinjoro Bondy, ”kiun en mia vivo mi aŭdis.”

”Do, vidu, knabo,” diris la kapitano ĝojgite. ”Dum la tago mi analizis ĉion en mia kapo. La lacertojn — mildigi, ĉu? jes, mildigi kaj dresi, kaj ili alportados al mi pearl-shells\*. Tie en Devil Bay devas esti enorme da konkoj. Vespere do mi iris tien denove, sed iom pli frue. Kiam la suno komencas subiĝi, la lacertoj elŝovas el la akvo siajn muzelojn, tie, alie, ĝis estas plene da ili. Mi sidas sur la

Buitenzorg — nuntempe Bogor, urbo sur la insulo Javo,

famekonata pro siaj botanikaj ĝardenoj

Pearl-shells — (*angle*) perlkonkoj

bordo kaj faras ts-ts-ts. Subite mi vidas, ŝarko, nur ĝia naĝilo videblas el la akvo. Poste ĝi ekplaŭdis en la akvo, kaj unu lacerto estis for. Dek du ŝarkojn mi kalkulis, kiuj ĉe la sunsubiro direktiĝis al Devil Bay. Sinjoro Bondy, tiuj monstroj en unu vespero forvoris pli ol dudek *miajn* lacertojn,” ekvortigis la kapitano kaj kolerege mungis. ”Jes, pli ol dudek! Estas klare, ke tia nuda lacerto per siaj etaj piedetoj ne defendas sin kontraŭ ili. Oni ploraĉus vidante tion. Vi devus tion vidi, knabo...”

La kapitano enpensiĝis. ”Nome, ege mi ŝatas bestojn, ”fine li diris kaj levis siajn lazurajn okulojn al G. H. Bondy. ”Mi ne scias, kiel vi tion komprenas, Captain Bondy —”

Sinjoro Bondy kapjesis signante konsenton.

”Nu, estas do bone,” ĝojiĝis kapitano van Toĥ. ”Ili estas ege bravaj kaj saĝaj, tiuj tapa-boys; kiam oni rakontas ion al ili, ili atentis same kiel hundo atentis sian mastron. Sed iliaj infanmanetoj — sciu, knabo, mi estas olda ulo kaj havas neniun familion... Jes, maljuna homo estas ege soleca,” murmuris la kapitano regante sian emociion. ”Ege ĉarmaj estas tiuj lacertoj, jes, jes. Nur se la ŝarkoj tiom ne vorus ilin! Kiam mi ĵetis sur ilin, nome sur la ŝarkojn, ŝtonojn, do *ankaŭ ili komencis ĵeti ŝtonojn*, tiuj tapa-boys. Tion vi ne kredos, sinjoro Bondy. Fakte estas, ke ne malproksimen, ĉar ili havas manetojn ege kurtajn. Sed mirige estas. Se vi estas tiel lertaj, knaboj,

mi diras, provu malfermi per mia tranĉilo iun konkon. Kaj mi metas la tranĉilon teren. Komence iom ili sin ĝenis, sed poste iu provas tion kaj enigas tranĉilpinton inter la karapacojn. Ci devas enrompi, mi diras, enrompi, see? tiel per la tranĉilo turni, kaj prete. Kaj ĝi senĉese provas tion, povrulo, ĝis ĝi krakis kaj la konko malfermiĝis. Vidu do, mi diras. Ĝi tute ne estas tiel malfacila. Se scias tion tia pagano Batak aŭ Singhales, kial ne sciustion tapa-boys, ĉu? — Al tiuj lacertoj ja mi ne rakontos, ke ĝi estas *nekredebla* marvel kaj miraklo, se tia besto tion kapablas. Sed nun mi povas tion diri, mi estis — mi estis — nu, tute thunderstruck.”

”Kvazaŭ en vizio,” sufloris sinjoro Bondy.

”Jes, richtik\*. Kvazaŭ en vizio. Sed super tio mi tiom cerbumis, ke mi restis tie kun mia ŝipo ankoraŭ unu tagon. Kaj vespere denove al Devil Bay kaj denove mi vidis, kiel tiuj sharks voras miajn lacertojn. Tiunokte mi ĵuris, knabo, ke tio devas ŝanĝiĝi. Ankaŭ mi donis *al ili* mian honorvorton, sinjoro Bondy. *Tapa boys, Captain J. van Toĥ promesas al vi ĉi tie sub la teruraj steloj, ke li helpos al vi.*”

richtik — richtig (*germane*) ĝuste, korekte

## 4. La komerca entrepreno de kapitano van Toĥ

**K**iam kapitano van Toĥ ĉi tion rakontis, hirtiĝis lia nukhararo pro emocio kaj ekscito.

”Jes, sinjoro, tion mi ĵuris. Ekde tiu tempo, knabo, eĉ ne momenton mi estis trankvila. Sur la Batana insulo mi prenis miajn feriojn kaj sendis al la judoj en Amsterdamo cent kvindek sep perlojn, ĉion kion la bestetoj alportis al mi. Poste mi trovis ian ulon, li estis dajako kaj shark-killer\*, mortiganta ŝarkojn per tranĉilo en la akvo. Latrono kaj murdanto, tiu dajako. Kaj kun li per malgranda trampŝipo reen al Tana Masa, kaj nun, fella\*, per cia tranĉilo ci mortigados ŝarkojn. Mi volis, ke li ekstermu tie la ŝarkojn, por ke ili lasu en trankvilo miajn laceratojn. Tiu dajako estis tia murdanto kaj pagano, li tute malatentis eĉ tiujn tapa-boys. Diablo nediablo, pri ĉio li estis indiferenta. Kaj dume mi faris pri lizards miajn observations and experiments\* — sed atendu, pri tio mi

Shark-killer — (*angle*) ŝark-mortigisto

Fella — (*angle*) ulo

Observations and experiments — (*angle*) observoj kaj eksperimentoj

havas logolibron, en kiun ĉiutage mi skribis tion.” La kapitano eltiris el la interna poŝo ampleksan notlibron kaj komencis en ĝi foliumi.

”Do, kiun daton ni havas hodiaŭ? Akurate, la dudek kvinan de junio. Ekzemple la dudekkvina de junio de la pasinta jaro. Jes, jen. La dajako mortigis ŝarkon. Lizards havas grandegan interest pri la kadavro. Toby — ĝi estis tia negranda lacerto, sed ege sagaca,” klarigis la kapitano. ”Mi devis doni al ili diversajn nomojn, sciu, por povi verki libron pri ili. — Do Toby enigadis la fingrojn en la truon de tiu tranĉilo. Vespere ili estis portantaj sekajn branĉojn por mia fajro. — Nenio grava,” murmuris la kapitano.” Mi serĉos ian alian tagon. Ekzemple la dudek trian de junio, ĉu? — Lizards plu konstruis — tiun — kiel oni diras jetty?”

”Digo, ĉu?”

”Jes, digo. Ian dam. Do ili plu konstruis novan digon je nordokcidenta ekstremaĵo de Devil Bay. — Homo,” li klarigis, ”ĝi estis fabela verko. Kompleta breakwater.”

”Ondbaraĵo?”

”Jes. Sur tiu flanko ili demetadis siajn ovojn kaj volis tie havi kvietan akvon, sciu. Tion ili m e m elpensis, konstrui tie ian dam; sed mi diras al vi, ke neniuj inĝenieroj aŭ oficistoj el Waterstaat en Amsterdamo farus pli bonan planon por tia subakva digo. Kolose lerta verko, sed la akvo ĝin forportadis. Ili fosas sub la akvo ankaŭ



profundajn kavojn en bordoj, kaj en tiuj kavoj ili dumtage vivas. Ege sagacaj bestoj, sinjoro, tute kiel beavers.”

”Kastoroj.”

”Jes, tiuj grandaj musoj sciantaj konstrui digojn en riveroj. Ili havis tie *amasegon* da digoj kaj digetoj, en Devil Bay, bele rektajn dams, ke ĝi aspektis kiel ia urbo. Kaj fine ili volis konstrui digon trans la tutan Devil Bay. Jes, tiel. — Ili scias jam forruladi ŝtonojn per krikoj,” li legis plu. ”Al Alberto — iu tapa-boy — ĝi frakasis du fingrojn. — La dudek unuan: *Dajako formanĝis Alberton!* Sed li naŭzis post ĝi. Dek kvin gutojn da opio. Li promesis neniam plu fari tion. Pluvis la tutan tagon. — La tri-dekan de junio: Lizards finkonstruis la digon. Toby ne volas labori. — Sinjoro, tiu estis ruza,” klarigis la kapitano mirante. ”La ruzuloj neniam volas ion fari. Senĉese en io ĝi amatoris, tiu Toby. Jes, jes, ankaŭ inter lacertoj estas tre grandaj diferencoj. La trian de julio: Sergeant ricevis tranĉilon. — Ĝi estis granda forta lacerto, tiu Sergeant. Kaj tre lerta, sinjoro. — La sepan de julio: Sergeant mortigis per la tranĉilo unu cuttlefish — ĝi estas fiŝo enhavanta en si brunajn fekaĵojn, ĉu vi scias?”

”Sepio?”

”Jes, ĝi povas esti. La dekan de julio: Sergeant mortigis per tiu tranĉilo grandan jelly-fish\* — ĝi estas ia bestaĉo kiel gelateno, kaj brulvundas kiel urtiko. Malbelega besto

Jelly-fish — (*angle*) meduzo

ĝi estas. Kaj nun atenton, sinjoro Bondy. *La dektrian de julio*: Ĝi estas ĉi tie substrekita. *Sergeant mortigis per tiu tranĉilo malgrandan ŝarkon*. Pezo sepdek funtojn. — Jen ĝi estas, sinjoro Bondy,” deklaris kapitano J. van Toĥ solene. “Jen nigre sur la blanka. Ĝi estas la granda tago, knabo. Akurate la dektrian de julio pasintjare.” La kapitano fermis la notlibron. “Mi ne hontas pri tio, sinjoro Bondy: sur bordo de Devil Bay mi ekgenuis kaj ploraĉis pro nura ĝojo. Nun jam mi scias, ke miaj tapa-boys ne lasos sin buĉi. Tiu Sergeant ricevis por tio belan novan harpunon, — harpuno estas la plej bona, knabo, kiam vi volos ĉasi ŝarkojn — kaj mi diras al ĝi, be a man\*, Sergeant, kaj montru al tapa-boys, kiel ili povas sin defendi. Homo,” ekkriis la kapitano, eksaltis kaj frapis pro entuziasmo la tablon, “sciu, ke tie post tri tagoj naĝis grandega mortaĉa ŝarko, full of gashes, kiel oni diras tion?”

“Vundoplena?”

“Jes, nuraj truoj post la harpuno.” La kapitano ektrinkis, ĝis ĝi gluglis. “Tiel statas, sinjoro Bondy. Nur nun mi faris kun tapa-boys ... ion kiel kontrakton. Nome mi donis al ili mian vorton, se ili alportos al mi la perlokonkojn, mi donos al ili kompanse harpoons kaj knives, nome tranĉilojn, por ke ili povu sin defendi, see? Tio estas honesta business, sinjoro. Jes, oni devas esti honesta an-

Be a man — (*angle*) estu viro

kaŭ al la bestoj. Ankaŭ iom da ligno mi donis al ili. Kaj du ferajn wheelbarows — ”

”Ĉarumojn. Puŝcarojn.”

”Jes, tiajn ĉarumojn. Por ke ili povu veturigi ŝtonojn por la digo. Ili, povruloj, devis ĉion treni en siaj antaŭaj piedetoj. Nu, amasegon da objektoj ili ricevis. Mi ne volus ilin trompi, nepre ne. Atendu, knabo, ion mi montros al vi.”

Kapitano van Toĥ levetis per unu mano la ventron kaj per la dua eltiris el la pantalonpoŝo tolsaketon. ”Ha, jen mi havas tion,” li diris kaj elŝutis ĝian enhavon sur la tablon. Tio estis proksimume mil perloj en ĉiuj grandecoj: etaj kiel kanabsemo, pli grandaj, pizograndaj, kelkaj grandaj kiel ĉerizo; perfektaj gutformaj perloj, bosaj barokperloj, perloj arĝentbrilaj, bluaj, perlamotaj, flavetaj, nigre nuancitaj kaj rozkoloraj. G. H. Bondy kvazaŭ havus vizion; li ne povis alie, li devis en ili manrasti, ruli ilin inter fingropintoj, kovri per ambaŭ polmoj —

”Kia beleco,” li suspiris kun mirego, ”kapitano, tio estas kiel sonĝo!”

”Jes,” diris la kapitano senemocie. ”Bele estas. Kaj ili mortigis proksimume tridek ŝarkojn en tiu jaro, dum mi estis tie kun ili. Ĉi tie ĝi estas notita,” li diris frapetante la internan poŝon. ”Sed mi donis al ili amasegon da tranĉiloj kaj kvin harpoons — **Min** kostas la tranĉiloj

ĉirkaŭ du usonajn dolarojn apiece, do po peco. Ege bonaj tranĉiloj, el tia ŝtalo, kiun tuŝas nenia rust.”

”Rusto”.

”Jes. Ĉar ili bezonas ilin sub la akvo, nome en la maro. Kaj ankaŭ la batakoj kostis al mi teruran sumon.”

”Kiaj la batakoj?”

”Nu, la indiĝenoj sur tiu insulo. Ili kredas, ke tapa-boys estas diabloj, kaj senmezure timas ilin. Kaj vidinte, ke mi parolas kun iliaj diabloj, ili volis min simple mortigi. Tutajn noktojn ili batis iajn sonorilojn, por forpeli tiujn diablojn for de sia kampongo. Teruran rumoron ili faris, sinjoro. Kaj poste ĉiumatene ili volis de mi, ke mi pagu al ili por la sonorado. Por la laboro, kiun ili havis kun tio, sciuj. Kion fari, la batakoj estas ege grandaj ŝtelistoj. Sed kun tiuj tapa-boys, kun tiuj lacertoj eblus fari honestan business. Jes ja. Tre bonan negocon, sinjoro Bondy.”

G. H. Bondy opiniis esti en ia fabelo. ”Aĉetadi perlojn de ili?”

”Jes. Sed en Devil Bay ne plu estas perloj kaj sur aliaj insuloj estas neniuj tapa-boys. Do tiel statas, junulo.” Kapitano J. van Toĥ triumfe plenklovis siajn vangojn. ”Jen ĝuste la granda negoco, kiun mi elpensis en mia kapo. Knabo,” li diris pikante la aeron per siaj dikaj fingroj,” ekde tiu tempo, kiam mi ekprotektis ilin, la lacertoj ja ege plimultiĝis! Ĉar nun ili povas sin defendi, you

see? He? Kaj senĉese ili estos pli multnombraj! Nu, sinjoro Bondy? Ĉu tio ne estus fabela entrepreno?"

"Ankoraŭ mi ne vidas," diris G. H. Bondy necerte, "... kiel fakte vi imagas tion, kapitano?"

"Nu transporti tapa-boys al aliaj perloinsuloj," elvortigis fine el la kapitano. "Mi rimarkis, ke la lacertoj ne povas mem transnaĝi vastan kaj profundan maron. Ili kapablas tempeton naĝi kaj tempeton plandeti la fundon, sed en granda profundo, tie estas por ili tro alta premo; ili estas ege molaj, sciu. Sed se mi havus tian ŝipon, en kiu eblus fari cisternon por ili, ian akvuĵon, mi povus ilin transporti, kien mi volus, see? Kaj ili serĉus tie perlojn, kaj mi veturadus al ili kaj importadus al ili tranĉilojn kaj harpoons kaj aliajn aĵojn, kiujn ili bezonas. Tiuj povruloj en Devil Bay tiom tro — nu sciu, kiel porkidoj."

"Tromultiĝis."

"Jes, tromultiĝis, ke baldaŭ ili havos tie nenion por manĝi. Ili manĝas etajn fiŝojn kaj mollusces kaj ĉiajn akvoinsektojn; sed ankaŭ terpomojn ili povas manĝi kaj biskvitojn kaj entute ordinarajn aĵojn. Do eblus manĝigi ilin en la cisterno sur la ŝipoj. Kaj en taŭgaj lokoj, kie ne estas tro da homoj, mi reenlasus ilin en la akvon kaj farus tie iajn — iajn farms por miaj lacertoj. Mi volus do, ke ili povu sin vivteni, tiuj bestetoj. Ili estas ege amindaj kaj saĝaj, sinjoro Bondy. Kiam vi ekvidos ilin, knabo, vi diros, allo, Captain, kiajn utilajn bestetojn vi havas. Jes.

Nuntempe la homoj freneze sopiras la perlojn, sinjoro Bondy. Do jen la granda business, kiun mi elpensis.”

G. H. Bondy hezitis. ”Terure mi bedaŭras, kapitano,” li komencis nedecide, ”sed — vere mi ne scias —”

La lazuraj okuloj de kapitano J. van Toĥ pleniĝis de larmoj. ”Nu, tio estas malbona, knabo. Mi lasus al vi ĉiujn ĉi perlojn kiel ... kiel guarantee\* por la ŝipo, sed mi mem ne povas ĝin aĉeti. Mi scius pri ege taŭga ŝipo en Rotterdam ... ĝi havas dizelon —”

”Kial vi ne proponis ĉi tiun negocon al iu en Nederlando?”

La kapitano kapneis. ”Tiujn homojn mi konas, knabo. Kun ili mi ne povas paroli pri tio. Nu, eble mi povus,” li diris mediteme, ”transporti per tiu ŝipo ĉiajn eblajn goods\*, sinjoro, kaj vendadus ilin sur la insuloj. Jes, tion mi povus. Tie mi havas amasojn da konatoj, sinjoro Bondy. Samtempe mi povus havi en la ŝipo iajn cisternojn por miaj lacertoj —”

”Tio estus plivere konsiderinda,” meditis G. H. Bondy. ”Hazarde ja ... Nu jes, n i d e v a s serĉi novajn merkatojn por nia industrio. Hazarde antaŭ nelonge mi parolis pri tio kun kelkaj homoj — Mi volus aĉeti unu aŭ du ŝipojn, unu por Sud-Ameriko kaj la alian por la orientaj mondopartoj —”

guarantee — (*angle*) garantio

goods — (*angle*) varoj

La kapitano vigliĝis. "Mi laŭdas vin, sinjoro Bondy, sir. La ŝipoj estas nun treege malkaraj, vi povas aĉeti da ili plenan havenon —" Kapitano van Toĥ komencis teknikan eksplikon, kie kaj por kio estas vendeblaj iaj vessels kaj boats kaj tank-steamers\*; G. H. Bondy lin ne aŭskultis kaj nur observis lin; G. H. Bondy estis sperta pri homoj. Eĉ ne momenton li opiniis serioze la lacertojn de kapitano van Toĥ; sed la kapitano valoris la konsideron. Honesta, jes. Kaj li scias la staton tie malsupre. Frenezulo, fakte. Sed damne simpatia. En la koro de G. H. Bondy eksonis ia romantika kordo. Ŝipoj kun perloj kaj kafo, ŝipoj kun spicoj kaj ĉiuj aromoj de Arabio. G. H. Bondy n ekregis sento de distriĝo, kiu kutime aperis ĉe li antaŭ ĉiu granda kaj sukcesa decidiĝo; sento, esprimebla per vortoj: mi ne scias ja kial, sed versimile mi entreprenos tion. Dume Captain van Toĥ skizis en la aero per la potencaj manegoj ŝipojn kun awning-decks\* aŭ quarter-decks\*, fabelajn ŝipojn, knabo —

"Sciu do, kapitano Vantoĥ," subite diris G. H. Bondy, "venu ĉi tien post dek kvar tagoj. Ni parolos denove pri la ŝipo."

vessels and boats and tanksteamers — (*angle*) ŝipoj kaj boatoj kaj cisternŝipoj

awning-decks — (*angle*) tegitaj ferdekoj

quarterdecks — (*angle*) luksa parto super ferdeko sur ŝip-pruo

Captain van Toĥ komprenis, kiom signifas tia vorto. Li ekruĝis pro ĝojo kaj elvortigis: "Kaj la lacertojn, — ĉu mi povas ankaŭ ilin kunpreni sur la ŝipon?"

"Jes ja. Nur, mi petas vin, antaŭ neniu menciu ilin. La homoj opinius, ke vi freneziĝis — kaj ankaŭ mi."

"Kaj la perlojn mi povas lasi ĉi tie?"

"Povas."

"Jes, sed mi devas elserĉi du tre belajn perlojn, mi volus ilin sendi al iu."

"Al kiu?"

"Al du redactors, knabo. Jes, diable, momenton."

"Kio?"

"Diable, kiel nur ili nomiĝis." Kapitano van Toĥ enpense palpebrumis per la lazuraj okuloj. "Mi havas tian malsaĝan kapon, homo. Mi ne plu scias, kiel tiuj du boys fakte nomiĝis."



## 5. Kapitano J. van Toĥ kaj liaj dresitaj saŭroj

O ni pendumu min,” diris homo en Marsejlo, ”se tiu ne estas Jensen.”

La svedo Jensen levis la okulojn. ”Atendu,” li diris, ”kaj ne parolu, dum mi serĉos en mia memoro.” Li metis la manon sur la frunton. ”Seagull, ne. Empress of India, ne. Pernambuko, ne. Jam mi havas ĝin, Vancouver. Antaŭ kvin jaroj sur Vancouver, Osaka-Line, Frisco. Kaj ci nomiĝas Dingle, ci vagulo, kaj ci estas irlandano.”

La viro vidigis siajn flavajn dentojn kaj alsidiĝis. ”Right, Jensen. Kaj mi trinkas ĉian ajn brandon, kia estas. De kie ci aperas ĉi tie?”

Jensen kapmontris. ”Nuntempe mi veturas Marsejlo-Sajgono. Kaj ci?”

”Mi ferias,” fanfaronis Dingle. ”Tial mi veturas hejmen, rigardi, kiom da infanoj nove venis al mi.”

Jensen serioze kapskuis. ”Denove ili elĵetis cin, ĉu? Pro drinkado dum deĵoro kaj simile. Se ci iradus en YMCA’n\*, kiel mi, homo, do —”

YMCA — (*angle*) [Young Men’s Christian Association] Ligo de junaj kristanaj viroj

Dingle ĝojgite ekgrimacis. "Ĉu ĉi tie estas YMCA?"

"Hodiaŭ ja estas sabato," murmuris Jensen. "Kaj kie ci veturadis?"

"Sur ia trampŝipo," diris Dingle eviteme. "Ĉiujn eblajn insulojn tie sube."

"Kapitano?"

"Ia van Toĥ, nederlandano aŭ io."

La svedo Jensen enpensiĝis. "Kapitano van Toĥ. Kun tiu ankaŭ mi veturadis antaŭ jaroj, frato. Ŝipo: Kandong Bandoeng. Linio: de satano al diablo. Dika, kalva kaj li insultas ankaŭ malaje, por ke da ĝi estu pli multe. Mi konas lin bone."

"Ĉu li estis jam tiam tia frenezulo?"

La svedo kapneis. "La maljuna van Toĥ estas all right, homo."

"Ĉu jam tiam li kunveturigadis siajn lacertojn?"

"Ne." Jensen iomete hezitis. "Ion mi aŭdis pri tio... en Singapuro. Iu babilulo tie klaĉparolis pri tio."

La irlandano iom ofendiĝis. "Nepre nenia klaĉado, Jensen. Tio kun la lacertoj estas sankta vero."

"Tiu en Singapuro ankaŭ diris, ke ĝi estas vero," murmuris la svedo. "Kaj tamen li ricevis sur la faŭkon," li aldiris venke.

"Lasu diri al ci," defendis sin Dingle, "kio estas en tio. Ja mi devas tion scii, kamarado. La bestaĉojn mi vidis per miaj propraj okuloj."

”Ankaŭ mi,” murmuris Jensen. ”Preskaŭ nigraj, kun vosto proksimume unu metron sesdek kaj iradas per la du kruroj. Mi scias.”

”Abomenaj,” ekskuis sin Dingle. ”Plenaj de verukoj, homo. Virgino Maria, mi ne volus tion tuŝi! Ĝi devas ja esti venena!”

”Kial,” murmuris la svedo. ”Homo, mi deĵoris jam sur ŝipo, kiu estis plenplena de homoj. Sur over- kaj lower-deck\*, nuraj viroj, nuraj virinoj kaj tiaj aĵoj, kaj ili dancis kaj kartludis — Tie mi estis hejtisto, sciu. Kaj nun diru al mi, ci imbecilo, kio estas pli venena.”

Dingle forkraĉis. ”Se tio estus kajmanoj, homo, mi dirus nenion. Foje jam mi transportis serpentojn en menaĝerion, tie el Bandjarmasin, kaj kiel ili fetoris, homo! Sed ĉi tiuj saŭroj — Jensen, tio estas ege kuriozaj bestoj. Dumtage ĝi estas tolerebla, dumtage ili estas en la akvujoj; sed nokte ili rampas eksteren — pland — pland, pland — pland ... La tuta ŝipo svarmis de ili. Ĝi staris sur la postaj kruroj kaj turnis la kapon post onin ...” La irlandano krucsignis sin. ”Ili vokas ts — ts — ts, kiel la putinoj en Hongkongo. Dio ne punu min, sed mi opinias, ke io ĉi tie ne estas en ordo. Se ne estus la postenoj tiel raraj, eĉ ne unu horon mi restus tie, Jensen. Eĉ ne unu horon.”

”Ha,” diris Jensen. ”Tial vi revenas al la panjo, ĉu?”

over-, lowerdeck — (*angle*) supra kaj malsupra ferdekoj

”Parte. Oni devis ege drinki por entute elteni tie, kaj vi scias, je tio la kapitano estas kiel diablo. Kia skandalo estis, ke onidire unu tiun bestaĉon mi piedbatis. Jes, piedbatis, kaj kun kia plaĉo, homo; ke eĉ ĝian spinon mi frakasis. Vi rigardus, kiel la oldulo ekscesis; li bluiĝis, levis min je la kolo kaj ĵetus min en la akvon, se ne estus tie la maato Gregory. Ĉu vi konas lin?”

La svedo nur jesis.

”Jam li havas sufiĉe, sinjoro, diris la maato, kaj verŝis sur mian kapon tinon da akvo. Kaj en Kakopo mi estis surlandigita.” Sinjoro Dingle forkraĉis malproksimen kaj plat-arke. ”Por la oldulo pli gravis la bestaĉoj ol la homoj. Ĉu vi scias, ke li instruis ilin paroli? Per mia animo, li fermadis sin kun ili kaj dum horoj instruis ilin paroli. Mi opinias, ke li dresas ilin por cirko. Sed la plej stranga estas, ke li enlasas ilin en la akvon. Li haltas ĉe ia idiota insuleto, boatveturas apud la bordo kaj mezuras la profundojn; poste li ŝlosas sin ĉe la cisternoj, malfermas hatch\* en la ŝipflanko kaj enlasas la bestaĉojn en la akvon. Homo, ili saltas tra la lukoj unu post la alia, kiel dresitaj fokoj, ĉiam dek aŭ dek du — Kaj poste nokte la maljuna van Toĥ navigas al la bordo kun iaj kestetoj. Kio estas interne, neniu darfas scii. Poste oni plu navigas. Do tiel statas kun la olda Toĥ, Jensen. Strange. Ege strange.” La okuloj de sinjoro Dingle rigidiĝis. ”Dio ĉiopova, Jen-Hatch — (*angle*) lukoj (aperturo)

sen, kiel mi angoris pro tio. Mi drinkis, homo, mi drinkis freneze; kaj kiam ĝi nokte plandadis sur la tuta ŝipo kaj stariĝadis ... kaj faris ts — ts — ts, iam mi pensis, ho, junulo, tio estas de drinkado. Foje mi havis tion en Sanfrancisko, vi scias tion, Jensen; sed tiam mi vidis nurajn araneojn. De-li-ro, diradis doktoroj en la sailor-hospitalo\*. Do mi ne scias. Sed poste mi demandis Big Bingon, ĉu ankaŭ li vidis tion nokte, kaj li diris, ke li vidis. Laŭdire li vidis per la propraj okuloj, kiel iu saŭro malfermis la pordon kaj iris al la kapitano en la kajuton. Do mi ne scias; ankaŭ Joe ege drinkis. Ĉu vi opinias, Jensen, ke Bing deliris? Kion vi opinias?”

Jensen nur ŝultrolevetis.

”Kaj la germano Peters diris, ke sur Manihiki Islands, kiam li veturigis la kapitanon al la bordo, li kaŝis sin post ŝtonbloko kaj rigardis, kion tie la maljuna Toĥ faras kun la kestetoj. Homo, la saŭroj, li diris, malfermis ilin mem, kiam la oldulo donis al ili ĉizilon. Kaj ĉu vi scias, kio estas en la kestetoj? Li diris, tranĉiloj, kamarado. Tiel longaj tranĉiloj kaj harpunoj kaj iaj aĵoj. Homo, tamen mi ne kredas al Peters, ĉar li havas okulvitron surnaze, sed miriga ĝi estas. Kion vi opinias?”

Al Jens Jensen ŝvelis la fruntvejoj. ”Mi diras do al vi,” li murmuris, ”tiu via germano ŝovas la nazon en aferojn,

sailor-hospital — (*angle*) hospitalo por maristoj

kiuj ne rilatas lin, komprenite? Kaj mi diras al vi, ke mi ne konsilas tion al li.”

”Do skribu tion al li,” mokis la irlandano. ”La plej certa adreso estas la infero, tie li tion versimile ricevos. Sed ĉu vi scias, kio mirigas min? Ke la olda Toĥ iradas de temp’ al tempo viziti siajn saŭrojn en tiuj lokoj, kie li elmetis ilin. Per mia animo, Jensen. Nokte li igas sin elŝipi sur la bordo kaj revenas nur matene. Do diru al mi, Jensen, kiun li havas tie. Kaj diru al mi, kio estas en la paketoj, kiujn li sendas en Eŭropon. Rigardu, tiel eta paketo, kaj li asekuras ĝin je mil pundoj.”

”De kie vi scias tion?” morniĝis la svedo ankoraŭ pli sombre.

”Kion oni scias, tion oni scias,” diris sinjoro Dingle eviteme. ”Kaj ĉu vi scias, de kie la maljuna Toĥ veturigas la saŭrojn? El Devil Bay. El la Diabla Golfo, Jensen. Tie mi havas iun konaton, li estas agento kaj klera homo, kaj tiu diris al mi, homo, tio tute ne estas dresitaj saŭroj. Nepre ne! Tion oni rakontu al etaj infanoj, ke temas nur pri bestoj. Kredigu nenion al vi, Jensen.” Sinjoro Dingle signifoplene palpebrumis. ”Jen ĝi statas, Jensen, sciu tion. Kaj al mi vi rakontas, ke Captain van Toĥ estas all right.”

”Diru tion ankoraŭ foje,” raŭkis la granda svedo minace.

”Se la olda Toĥ estus all right, do li ne transportus la diablojn tra la mondo ... kaj ne elmetadus ilin ĉie sur insulojn, kiel pedikojn en peltmantelon. Jensen, en tempo, dum kiu mi estis kun li, li distribuis plurajn milojn da ili. La maljuna Toĥ vendis sian animon, homo. Kaj mi scias, kion donas la diabloj al li por tio. Rubenojn, perlojn kaj similajn aĵojn. Ja vi povas pensi, senpage li ne farus tion.”

Jens Jensen puncigis. ”Kaj ĉu tio vin rilatas?” li ekkriegis kaj pugnofrapis la tablon. ”Zorgu pri viaj damnaj aferoj!”

La malgranda Dingle pro ektimo eksaltetis. ”Mi petas vin,” li ekbalbutis konfuzite, ”kial vi tiel subite ... Mi diras nur, kion mi vidis. Kaj se vi volas, do nur mi songis pri tio. Nur ĉar vi estas Jensen. Se vi volas, do mi diros, ke ĝi estas deliro. Vi ne darfus koleri je mi, Jensen. Vi scias ja, ke foje mi havis tion en Frisko. Peza kazo, diris la doktoroj en Sailor-hospitalo. Homo, per mia animo, mi songis, ke mi vidis la saŭrojn aŭ diablojn aŭ mi ne scias kion. Sed neniuj estis.”

”Estis, Pat,” diris morne la svedo. ”Mi vidis ilin.”

”Ne, Jensen,” Dingle estis konvinkanta lin. ”vi havis nur deliron. La maljuna Toĥ estas all right, sed li ne bezonus kolporti la diablojn tra la mondo. Sciu, kiam mi estos hejme, mi igos celebri meson por lia animo. Oni pendumu min, Jensen, se mi ne faros tion.”

”En nia konfesio,” muĝis Jensen melankolie, ”oni ne faras tion. Kion vi opinias, Pat, ĉu helpos, se oni igas celebri meson por iu?”

”Homo, treege,” vortimpetis la irlandano. ”Mi aŭdis kazojn ĉe ni, kiam ĝi helpis ... nu, ankaŭ en la plej pezaj kazoj. Ĝenerale kontraŭ diabloj kaj entute, sciu.”

”Ankaŭ mi igos celebri katolikan meson,” decidiĝis Jensen. ”por Captain van Toĥ. Sed mi igos ĝin celebri ĉi tie, en Marsejlo. Mi opinias, ke ĉi tie en tiu granda preĝejo oni faras tion pli malkare, nome kvazaŭ por la fabrikprezo.”

”Povas esti; sed la irlanda meso estas pli bona. Ĉe ni, homo, estas diablaj uloj, kiuj scias tute sorĉi. Tute kiel fakiroj aŭ paganoj.”

”Rigardu, Pat,” diris Jensen, ”mi donus al vi dek du frankojn por la meso. Sed vi estas misulo, frato; vi fordrinkos tion.”

”Jensen, mi ne volus ŝargi mian animon per tia peko. Sed atendu, por ke vi kredu al mi, mi donos al vi por la dek du frankoj ŝuldateston, ĉu vi volas?”

”Tio eblas,” opiniis la ordama svedo. Sinjoro Dingle prunteprenis pecon da papero kaj krajonon kaj larĝe ekkomfortis ĉe la tablo. ”Do kion mi skribu tie?”

Jens Jensen rigardis trans lian ŝultron. ”Do skribu supre, ke ĝi estas via kvitanco.”



Kaj sinjoro Dingle elŝovante la langon pro la penego kaj saliv-humidigante la krajonon lante skribis:

*Kvitanco*

*mi konfirmas perĉi tio kede Jen Jensen*

*mi akceptis pormeso por Animo de Captn*

*Toĥ du dekdu frankojn*

*Pat Dingle*

”Ĉu tiel estas bone?” demandis sinjoro Dingle necerte.  
”Kaj kiu el ni retenu la dokumenton ĉe si?”

”Nature vi, vi bovo,” diris la svedo kun memkompreneblo. ”Tial ja, por ke oni ne forgesu, ke oni ricevis la monon.”

La dek du frankojn sinjoro Dingle fordrinkis en Havro kaj krome anstataŭ en Irlandon li ŝipis al Ĝibuto; kurte, la meso ne estis celebrita, sekve de kio en la naturan procedon intervenis nenia supera potenco.

## 6. Jakto en la laguno

Mr. Abe Loeb fermetis la okulojn antaŭ la subiĝanta suno; li volus iel vortigi, kiel bela ĝi estas, sed lia karulineto *Li*, alie Miss Lily Valley, propranome fraŭlino Lilian Nowak, mallonge orhara *Li*, White Lily, tiu longkrura Lilian, kiel oni nomis ŝin ĝis ŝia deksepa jaro, dormis sur varma sablo, enbuliĝinta en vilan bankostumon kaj buliĝinta kiel dormanta hundo. Tial Abe diris nenion pri la beleco de la mondo kaj nur eksuspiris, movante la fingrojn de siaj nudaj piedoj, ĉar inter ili li havis sablerojn. Tie sur la maro ankras jakto nomata Gloria Pickford; tiun jakton Abe ricevis de paĉjo Loeb por tio, ĉar li faris la universitatajn ekzamenojn. Paĉjo Loeb estas bravulo. Jesse Loeb, filmmagnato kaj tiel plu. Abe, invitu kelkajn amikojn aŭ amikinojn kaj penu ĉirkaŭrigardi iom la mondon, diris la maljuna sinjoro. Paĉjo Jesse estas ega bravulo. Tie do kuŝas sur la perla-mota surfaco Gloria Pickford kaj ĉi tie en la varma sablo dormas la karulineto *Li*. Abe suspiris pro feliĉo. Ŝi dormas kiel eta infano, la povrulino. Mr. Abe eksentis senliman sopiron iel ŝin gardi. Fakte mi devus *vere* edziĝi al ŝi, opinias la juna sinjoro Loeb kaj sentas dume en la

koro belan kaj turmentan premon, konsistanta el firma decidiĝo kaj timo. Panjo Loeb versimile ne konsentos kun tio, kaj paĉjo Loeb disetendos la manojn: Ci estas frenezulo, Abe. Simple la gepatroj ne povas tion kompreni, jen la afero. Kaj Mr. Abe, suspirante pro tenero, kovris per pinto de la bankostumo la blankegan maleolon de karulino *Li*. Kiel malsaĝe, li opiniis embarasite, ke mi havas tiel *terure* vilajn krurojn!

Bona Dio, kiel bele, kiel bele estas ĉi tie! Domaĝe, ke *Li* ne vidas tion. Mr. Abe ekrigardis la belan linion de ŝia kokso kaj en ia neklara konekso komencis pensi pri arto. Koreto *Li* estas nome artistino. Filmartistino. Ankoraŭ ŝi ne ludis, sed firme ŝi decidiĝis esti la plej granda filmaktorino de ĉiuj jarcentoj; kaj kion *Li* ekintencas, tion ŝi faros. Jen ĝuste tio, kion la patrino Loeb ne komprenas; artistino estas simple — artistino, kaj ne povas esti kiel aliaj knabinoj. Kaj cetere la aliaj knabinoj estas neniel pli bonaj, decidis Mr. Abe; ekzemple tiu Judy sur la jakto, tia riĉa knabino — mi scias ja, ke Fred iradas en ŝian kabinon. Ĉiun nokton, mi petas, dume mi kaj *Li* ... Simple *Li* ne estas *tia*. Mi deziras tion al Baseball\* Fred, diris al si Abe grandanime, li estas amiko el universitato; sed ĉiun nokton — tion *tiel* riĉa knabino ne bezonus fari. Mi opinias, knabino el tia familio kiel Judy. Kaj Judy estas nenia artistino. (Pri kio la knabinoj iam flustras, reme-  
Baseball — (*angle*) basbalo, bazopilko

moris Abe; kiel iliaj okuloj ĉe tio brilas kaj ili ĥiĥiĥias — Pri *tiaj* aferoj neniam *mi* parolas kun Fred.) (*Li* ne bezonus trinki tiom da kokteloj, poste ŝi ne scias, kion ŝi parolas.) (Ekzemple hodiaŭ posttagmeze, tio estis superflua —) (Mi opinias, kiel ŝi kaj Judy ekdisputis, kiu el ili havas pli belajn krurojn. Memkomprene, ke *Li*. Tion mi scias.) (Kaj Fred ne bezonus havi tian idiotan ideon aranĝi konkurson pri la plej belaj kruroj. Tion oni povas fari ie en Palm Beach, sed ne en la privata societo. Kaj la knabinoj ne bezonus *tiel alten* refaldi la jupojn. Tio ja ne estis *nur* la kruroj. Almenaŭ ne *Li*. Kaj ĝuste antaŭ Fred! Kaj tia riĉa knabino, kiel Judy, ankaŭ ne bezonis fari tion.) (Kaj mi, mi opinias, mi ne bezonus venigi la kapitanon, por ke li estu juĝanto. Tio estis malsaĝa de mi. Kiel la kapitano ruĝiĝis, hirtigis la lipharojn, kaj "pardonu, sinjoro", kaj brufermis la pordon. Hontiga. Terure hontiga. La kapitano ne bezonis esti *tiel* kruda. Cetero tio esta *mia* jakto, ĉu?) (Nu jes, la kapitano havas kun si neniun karulinon; kiel nur, povrulo, li devas tion rigardi, *tiajn* aferojn? Mi opinias, kiam li devas esti sola.) (Kaj kial *Li* ploris, kiam Fred diris, ke Judy havas pli belajn krurojn? Poste ŝi diris, ke Fred estas tiel misedukita; ja li malĝuigas ŝian tutan vojaĝon ... Povrulino *Li*!) (Kaj nun la knabinoj ne interparolas kune. Kaj kiam mi volis paroli kun Fred, Judy alvokis lin al si, kiel hundon. Fred estas ja mia plej bona amiko. Memkomprene, kiam li

estas amanto de Judy, li *devas* diri, ke ŝi havas pli belajn krurojn! Fakte, li ne bezonis aserti tion tiel decide. Tio *ne estis* taktoplena al la povrulino *Li*; *Li* pravas, Fred estas plaĉema vulgarulo. Terura vulgarulo.) (Fakte la vojaĝon mi imagis alie. Diablo ŝuldis al mi tiun Fred!)

Mr. Abe konstatis, ke li ne plu rigardas ravite la perlamotan maron, sed ke li tre, tre mornas, igante gliti sablon kun konketoj inter siaj manoj. *Li* estis afliktita kaj mishumora. Paĉjo Loeb diris, penu vidi parton de la mondo. Ĉu jam ni vidis parton de la mondo? Mr. Abe provis rememori, kion fakte li vidis, sed li sciis imagi al si nenion, krom kiel Judy kaj karulino *Li* montras la krurojn kaj Fred, ŝultrolarĝa Fred, kaŭre genuas antaŭ ili. Abe morniĝis ankoraŭ pli. Kiel oni nomas ĉi tiun koralinsulon, Taraiva, diris la kapitano. Taraiva aŭ Tahuara aŭ Taraihatuara — ta — huara. Kio, se jam ni revenus, kaj mi diros al la olda Jesse, dad, ni estis ĝis ĉe Taraihatuara — ta — huara. (se almenaŭ mi ne estus veniginta la kapitanon, ĉagrenis Mr. Abe.) (Mi *devas* paroli kun *Li*, ke tiajn aferojn ŝi ne faru. Dio, kiel nur eblas, ke mi amas ŝin tiel *ege!* Kiam ŝi vekiĝos, mi parolos kun ŝi. Mi diros al ŝi, ke ni povus geedziĝi —) Mr. Abe havis plenlarmajn okulojn; miadio, ĉu estas amo aŭ doloro, aŭ senlima doloro apartenas al tio, ke mi amas ŝin?

La blue ŝminkitaj, brilaj palpebroj de karulino *Li*, similantaj al teneraj konketoj, ekstremis. "Abe," dormeme

aŭdiĝis, "ĉu vi scias, pri kio mi pensas? Ke sur ĉi tiu insulo estus eble fari fa-be-lan filmon."

Mr. Abe priŝutis siajn malfeliĉajn vilajn krurojn per delikata sablo. "Bonega ideo, karulino. Kaj kian filmon?"

Karulino *Li* malfermis sian profundege bluajn okulojn. "Nu eble — Imagu, ke mi estus sur ĉi tiu insulo Robinsona. Virina Robinsono. Ĉu tio ne estas nova konsterna ideo?"

"Jes," diris Mr. Abe necerte. "Kaj ĉu vi scias, kiel vi venus sur ĉi tiun insulon?"

"Mirige," diris la dolĉa voĉo. "Sciu, simple nia jakto vrakiĝus en tempesto, kaj vi ĉiuj dronus, vi, Judy, la kapitano, ĉiuj."

"Ĉu ankaŭ Fred? Fred nome scias kolose naĝi."

La glata frunto morniĝis. "Do Fredon devus forvori ŝarko. Tio estus fabela detalo," manklakis la karulino. "Por tio Fred havas frenezige belan korpon, ĉu vi ne opinias?"

Mr. Abe suspiris. "Kaj plue?"

"Min senkonscian ondo ĵetegus sur bordon. Mi surhavas piĝamon, tiun blue striitan, kiu antaŭhieraŭ tiel plaĉis al vi." Inter la ĉarmaj palpebroj elglitis streta rigardo, konvene demonstranta la virinan tenton. "Fakte ĝi devus esti kolora filmo, Abe. Ĉiu diras, ke la blua koloro senmezure akordiĝas al mia hararo."

"Kaj kiu trovas vin ĉi tie?" demandis afereme Mr. Abe.

La karulino enpensiĝis. "Neniu. Mi ne estus Robinsona, se estus ĉi tie homoj," ŝi diris kun surpriza logikemo. "Tial ja ĝi estus tiel fabela rolo, Abe, ke mi estus ĉiam sola. Imagu, Lily Valley en la ĉefa kaj entute unika rolo."

"Kaj kion vi farus dum la daŭro de la tuta filmo?"

Li ekkubutis. "Tion jam mi elpensis. Mi baniĝus kaj kantus sur roko."

"En piĝamo?"

"Sen," diris la karulino. "Ĉu vi ne opinias, ke tio estus miriga sukceso?"

"Vi ja ne ja ludi nuda en la tuta filmo," murmuretis Abe kun vigla sento de malkonsento.

"Kial ne?" miris la karulino senkulpe. "Ĉu gravus?"

Mr. Abe diris ion nekompreneblan.

"Kaj poste," meditis *Li*, "— atendu, jam mi havas tion. Poste forrabus min gorilo. Sciu, ia terure vila, nigra gorilo."

Mr. Abe ekruĝis kaj klopodis kaŝi siajn malbenindajn krurojn ankoraŭ pli en la sablo. "Ĉi tie ja ne estas goriloj," li oponis malmulte konvinke.

"Ho, jes. Entute ĉi tie estas ĉiaj eblaj bestoj. Tion vi devas rigardi artisme, Abe. Al mia haŭto gorilo senmezure konvenus. Ĉu vi rimarkis, kiajn harojn Judy havas sur la kruroj?"

"Ne," diris Abe, malfeliĉa pro ĉi tiu temo.

”Aĉegajn krurojn,” opiniis la karulino kaj rigardis siajn surojn. ”Kaj kiam la gorilo portus min enbrake, elirus el la arbarego juna, belega sovaĝulo kaj batfaligus ĝin.”

”Kiel li estus vestita?”

”Li havus pafarkon,” decidis la karulino senhezite. ”Kaj florkronon sur la kapo. Tiu sovaĝulo kaptus min kaj alkondukus min en tendaron de kanibaloj.”

”Ĉi tie neniu ekzistas,” provis Abe defendi la insuleton Tahuara.

”Tamen. La kanibaloj volus min oferi al siaj idoloj kaj al tio ili kantus havajajn kantojn. Sciu, tiajn, kiajn la negroj en la restoracio Paradizo. Kaj tiu juna kanibalo enamiĝus al mi,” suspiris la karulino kun larĝe malfermitaj okuloj pro mirego, ”... kaj poste ankoraŭ unu sovaĝulo enamiĝus al mi, eble la kanibalestro ... kaj poste iu blankulo —”

”De kie aperus ĉi tie blankulo?” demandis Abe por certiĝi.

”Tiu estus ilia kaptito. Eble li estus glora tenorulo, kiu falis en la manojn de sovaĝuloj. Nur tial, por ke li povu kanti en la filmo.”

”Kaj kiel li estus vestita?”

La karulino rigardis la poleksojn de siaj kruroj. ”Li estus sen vesto ... sen ĉio, kiel la kanibaloj.”

Mr. Abe kapneis. ”Karulino, tio ne eblas. Ĉiuj famaj tenoruloj estas aĉe dikaj.”



”Domaĝe,” bedaŭris la karulino. ”Do tiun povus ludi Fred, kaj la tenorulo nur kantus. Sciu, tiel oni sinkronigas filmon.”

”Sed Fredon forvoris ja ŝarko!”

La karulino ĉagreniĝis. ”Ne estu tiel terure realisma, Abe. Kun vi *entute* oni ne povas paroli pri arto. Kaj tiu tribestro ĉirkaŭvolvus min tutan per perloŝnuroj —”

”De kie li prenis ilin?”

”Ĉi tie estas *amaso* da perloj,” asertis *Li*. ”Kaj Fred pro ĵaluzo bokus kontraŭ li sur roko super la marondado. Fred fabele siluetus kontraŭ la ĉielo, ĉu? Ĉu ne brilega ideo? Dume ili ambaŭ falus en la maron —” La karulino sereniĝis. ”Kaj nun povus veni detalo kun ŝarko. Judy furiozus, se Fred ludus kun mi en filmo! Kaj mi edziniĝus al tiu bela sovaĝulo.” La orhara *Li* saltleviĝis. ”Ni starus tie sur la bordo ... kontraŭ la sunsubiro ... tute nudaj ... kaj kurteno lante fermiĝus —” *Li* deĵetis la banmantelon ... ”Mi iras en la akvon.”

”... vi ne surprenis la bankostumon,” atentigis Abe konsternite, rigardante la jakton, ĉu iu alrigardas; sed karulino *Li* jam dancis sur la sablo al la laguno.

... vestita ŝi aspektas pli bele, aŭdiĝis subite en la juna viro voĉo brutale frida kaj kritika. Abe konsterniĝis pro sia manko de ama mirego, preskaŭ li sentis sin kulpiĝinta; sed ... well, sed kiam *Li* surhavas vestaĵon kaj ŝuetojn, estas tio ... well, iel pli bela.

Eble vi volas diri pli deca, defendis sin Abe kontraŭ la frida voĉo.

Well, ankaŭ tio. Kaj pli bela. Kial ŝi tiel strange plan-  
das? Kial skuiĝas la karno sur ŝiaj kruroj? Kial tio kaj kial  
io ...

Ĉesu, defendis sin Abe teruriga. *Li* estas la plej bela  
knabino, kiu entute ekzistas! Mi amas ŝin senmezure ...

... eĉ se ŝi nenion surhavas? diris la frida kaj kritika  
voĉo.

Abe deturnis la okulojn kaj rigardis la jakton en la la-  
guno. Kiel Ĝi estas bela, kiel ĝi estas preciza en ĉiu linio  
de siaj flankoj! Domaĝe, ke Fred ne estas ĉi tie. Kun Fred  
eblus paroli, kiel bela estas la jakto.

Dume la karulino jam staris ĝisgenue en la akvo, sup-  
renetendis la manojn al la sunsubiro kaj kantis. Diable,  
ŝi baniĝu jam, opiniis Abe ekscitite. Sed tio estis bela,  
kiam ŝi kuŝis ĉi tie bultordiĝinta kaj mantelvolvita, kun  
la fermitaj okuloj. Karulino *Li*. Kaj Abe emocie suspiran-  
te kisis la manikon de ŝia banmantelo. Jes, li amas ŝin  
senmezure. Tiel multe, ke eĉ doloras.

Subite aŭdiĝis de la laguno akresona kriĉo. Abe ge-  
nuleviĝis por pli bone vidi. Karulino *Li* stridas, mansvin-  
gas kaj vadas trote al la bordo, stumblas kaj plaŭdas ĉir-  
kaŭ si ... Abe eksaltis kaj kuris al ŝi. "*Li*, kio okazas?"

(Rigardu, kiel strange ŝi kuras, atentigis lin la voĉo  
frida kaj kritika. Tro ŝi skuas la krurojn. Tro ŝi managi-

tas ĉirkaŭ si. Simple tio *ne estas* bela. Kaj krome ankoraŭ ŝi gakas, jes gakas.

”Kio okazas, *Li?*” vokas Abe kaj kuras helpi al ŝi.

”Abe, Abe,” balbutas la karulino kaj bum, jam ŝi pendas malseke kaj malvarme sur li. ”Abe, tie estis ia besto!”

”Nenio estis,” kvietigas ŝin Abe. ”Plej versimile ia fiŝo.”

”Ja ĝi havis teruran kapon,” plorsingultas la karulino kaj enigas la malsekan nazon en la bruston de Abe.

Abe volas ŝin patrece frapeti sur la malseka ŝultro, sed sur la malseka korpo tio tro laŭte plaŭdas. ”Nu, nu,” li murmuris, ”rigardu, jam nenio tie estas.”

Li rerigardis al la laguno. ”Ĝi estis terura,” ŝi elspiris kaj subite komencis kriĉi: ”Tie ... tie ... ĉu vi vidas?”

Al la bordo malrapide proksimiĝas nigra kapo, kies buŝaĉo malfermiĝas kaj fermiĝas. Karulino *Li* histerie ekkvovitis kaj malespere ekkuris for de la akvo.

Abe embarasiĝis. Ĉu kuri post *Lin*, por ke ŝi ne timu? Aŭ mi restu ĉi tie por montri, ke mi ne timas la beston? Li decidiĝis memkompreneme por la dua eventualo; li paŝis pli proksimen al la maro, ĝis li staris ĝismaleole en la akvo, kaj kun la pugnigitaj manoj li rigardis en la okulojn de la besto. La nigra kapo ĉesis proksimiĝi, strange balanciĝis kaj diris: ”Ts, ts, ts.”

Abe iom angoris, sed tion oni ne darfis malkaŝi. ”Nu, kio?” akre li diris direkte al la kapo.

”Ts, ts, ts,” faris la kapo.

”Abe, Abe, A-be,” kriaĉas karulino *Li*.

”Jam mi iras,” vokas Abe kaj malrapide (por ke oni ne kalumniu) paŝas al sia knabino. Ankoraŭ li haltas kaj turniĝas severaspekte al la maro.

Sur la bordo, kie la maro en la sablo desegnas sian eternan kaj efemeran punkton, staras sur la postaj kruroj ia malhela besto rondkapa kaj tordiĝas. Abe restis staranta kun la batanta koro.

”Ts, ts, ts,” faras la besto.

”Abe,” lamentas la karulino duonsvena.

Abe retiriĝas paŝon post paŝo, ne okullasante la beston; tiu ne plu moviĝas, nur turnas post li la kapon.

Fine Abe estas ĉe sia karulino, kiu kuŝas vizaĝaltere kaj balbute singultas pro hororo. ”Ĝi estas ... ia foko,” diras Abe necerte. ”Ni estu revenontaj sur la ŝipon, *Li*.” Sed *Li* nur tremas.

”Ĝi neniel estas danĝera,” asertas Abe; li volus genuiĝi al *Li*, sed li devas kavalire stari inter ŝi kaj la besto. Se mi ne estus nur en bankalsono, li pensas, kaj havus almenaŭ poŝtranĉilon; aŭ se mi trovus ian bastonon ...

Komencis krepuskiĝi. La besto denove proksimiĝis ĉirkaŭ je tridek paŝoj kaj restis staranta. Kaj post ĝi kvin, ses, ok la samaj bestoj, elmergiĝas el la maro kaj hezite, balance plandetas al la loko, kie Abe gardas karulinon *Li*.

”Ne rigardu, *Li*,” elspiris Abe, sed tio estis superflua, ĉar *Li* nepre ne rerigardus.

El la maro elmergiĝis pluaj ombroj kaj avancis en larĝa duonrondo. Ili estas proksimume sesdek, kalkulas Abe. Tie io hela, jen la banmantelo de karulino *Li*. La mantelo, en kiu antaŭ momento ŝi dormis. Dume la bestoj ĝisiris al la helaĵo, kiu kuŝis larĝe disĵetita sur la sablo.

Tiam Abe faris ion nekompreneblan kaj sensencan, kiel la kavaliro el Schiller-balado, iranta en leonkaĝon por ganto de sia damo. Kion fari, estas memkompreneblaj kaj absurdaj aferoj, kiujn la viroj faros, dum la mondo ekzistos. Sen konsidero, kun levita kapo kaj pugnigitaj manoj Mr. Abe iris inter tiujn bestojn por la bankostumo de karulino *Li*.

La bestoj iomete retretis, sed ne fuĝis. Abe levis la mantelon, ĵetis ĝin trans la manon kiel torero kaj restis staranta.

”A-be,” ĝemis malespere post li.

Mr. Abe eksentis en si senliman forton kaj kuraĝon. ”Nu, kio?” li diris al la bestoj kaj faris ankoraŭ pluan paŝon pli proksimen. ”Kion fakte vi volas?”

”Ts, ts,” ekŝmacis iu besto, kaj poste iel kvakeme kaj oldece ekbojis: ”Najf!”

”Najf!” aŭdiĝis ekbojo iom pli flanke. ”Najf!” ”Najf!”

”A-be!”

"Ne timu, *Li!*" vokis Abe.

"*Li,*" ĝi ekbojis antaŭ li. "*Li.*" "*Li.*" "*A-be!*"

Abe estis kvazaŭ en sonĝo. "Nu, kio?"

"Najf!"

"*A-be,*" ĝemis la karulino. "Venu ĉi tien!"

"Tuj. — Ĉu vi opinias knife? Mi havas nenium tranĉilon. Nenion mi faros al vi. Kion ankoraŭ vi volas?"

"*Ts-ts,*" ŝmacis la besto kaj balanciris al li.

Abe diskurris, mantelon transbrake, sed ne retiriĝis.

"*Ts-ts,*" li diris. "Kion vi volas?" Ŝajnis, ke la besto donas al li la antaŭan piedon, sed tio ne plaĉis al Abe. "Kion?" li diris iom akre.

"*Najf,*" ekbojis la besto kaj ellasis el la piedo ion blanketan, kiel gutetojn. Sed gutetoj tio ne estis, ĉar ĝi ruliĝis.

"*Abe,*" plorĝemis *Li.* "Ne lasu min ĉi tie!"

Mr. Abe tute ne plu timis. "For desur la vojo," li diris kaj eksvingis kontraŭ la besto per la banmantelo. La besto haste kaj mallerte retiriĝis. Nun Abe povis distanciĝi kun honoro, sed *Li* vidu, kiel li estas kuraĝa; li kliniĝis al tio blanketa, kion la besto lasis fali el la piedo, por tion rigardi. Tio estis tri duraj, glataj, senbrile brilantaj globetoj. Mr. Abe levis ilin al la okuloj, ĉar krepuskiĝis.

"*A-be,*" kriĉis la forlasita karulino. "*Abe!*"

"*Jam mi iras,*" vokis Mr. Abe. "*Li,* mi havas ion por vi! *Li, Li,* mi portas ion al vi!" Svingante la banmantelon

super la kapo, kuris Mr. Abe Loeb sur la bordo kiel juna dio.

Li kaŭre sidis kaj tremis. "Abe," ŝi plorsingultis kaj dentklakis. "Kiel vi povas ... Kiel vi povas ..."

Abe solene ekgenuis antaŭ ŝi. "Lily Valley, mardioj, Tritonoj venis por omaĝi vin. Mi komuniku al vi, ke ekde tiu tempo, kiam Venera elmergiĝis el la ŝaŭmo, neniam iu artistino tiel ege impresis ilin kiel vi. Por pruvi sian admiron ili sendas al vi —" Abe manetendis — "jen tri perlojn. Rigardu."

"Ne babilaĉu, Abe," plorsnufis karulino *Li*.

"Serioze, *Li*. Rigardu nur, ke tio estas veraj perloj!"

"Montru," ploretis *Li* kaj per tremantaj fingroj tuŝis la blanketajn globetojn. "Abe," ŝi elspiris, "ja tio estas *perloj!* Tion vi trovis en la sablo?"

"Ho, *Li*, karulino, perloj ja ne troviĝas en sablo!"

"Ho, jes," asertis la karulino. "Kaj oni tralavas ilin. Vidu, mi diris al vi, ke ĉi tie estas amasoj da perloj!"

"Perloj kreskas en konkoj sub la akvo," diris Abe preskaŭ kun certeco. "Je mia animo, *Li*, tion alportis al vi tiuj Tritonoj. Nome, ili vidis vin, kiam vi baniĝis. Ili volis tion doni al vi persone, sed kiam vi tiel timis ilin —"

"Ja, ili estas tiel malbelegaj," ekvortigis *Li*. "Abe, kiaj *fabelaj* perloj! Mi enorme ŝatas perlojn!"

(Nun ŝi estas bela, diris la kritika voĉo. Kiel ŝi genuas kun la perloj sur la polmo — nu, bela, tion oni devas rekoni.)

”Abe, kaj ĉu *vere* tion alportis ... tiuj bestoj?”

”Ili ne estas bestoj, karulino. Ili estas mardioj. Ili nomiĝas Tritonoj.”

La karulino tute ne miris. ”Tio estas de ili tre bela, ĉu? Ili estas treege karaj. Kion vi opinias, Abe, ĉu iel mi danku al ili?”

”Ĉu vi ne plu timas ilin?”

La karulino ektemis. ”Timas. Abe, mi petas vin, forkonduku min de ĉi tie.”

”Do, rigardu,” diris Abe. ”Ni devas atingi nian boaton. Iru kaj ne timu.”

”Sed ... sed ili baras nian vojon,” dentklakis *Li*. ”Abe, ĉu vi volus mem iri al ili? Sed vi ne darfis lasi min ĉi tie sola!”

”Mi transportos vin surbrake,” proponis Mr. Abe heroe.

”Tio eblas,” elspiris la karulino.

”Sed surprenu la mantelon,” murmuretis Abe.

”Tuj.” Fraŭlino *Li* ordigis ambaŭmane sian gloran oran hararon. ”Ĉu mi ne estas *t.e.r.u.r.e* taŭzita? Abe, ĉu vi havas ĉe vi ruĵon?”

Abe surmetis la mantelon sur ŝiajn ŝultrojn. ”Prefere jam iru, *Li!*”



”Mi timas,” elspiris la karulino. Mr. Abe prenis ŝin sur la brakojn. *Li* opiniis sin malpeza kiel plumeto. ”Tondre, pli peza, ol vi pensis, ĉu?” diris al Abe la voĉo malvarma kaj kritika. Kaj nun vi havas ambaŭ manojn plenajn, homo; se la bestoj nin atakus, — kion poste?”

”Ĉu vi volus trote kuri?” proponis la karulino.

”Jes,” anhelis Mr. Abe, pene movante la krurojn. Tiu-tempe jam rapide krepuskiĝis. Abe proksimiĝis al la larĝa besta duoncirklo. ”Rapide, Abe, kuru, kuru,” flustris *Li*. La bestoj komencis strangmaniere ondmovite pendoli kaj turni la supran duonon de la korpo.

”Do kuru, kuru rapide,” ekĝemis la karulino piedbatante histerie ĉirkaŭ si, kaj en la kolon de Abe eniĝis la ungoj arĝentkoloro lakitaj.

”Sakre, *Li*, lasu min trankvila,” ekgrumblis Abe.

”Najf,” ekbojis apud li. ”Ts-ts-ts.” ”Najf.” ”*Li*.” ”Najf.” ”Najf.” ”Najf.” ”*Li*.”

Sed ili estis jam for el la duoncirklo, kaj Abe sentis, ke liaj kruroj enprofundiĝis en la humidan sablon. ”Vi povas min starigi,” susuris la karulino ĝuste en la momento, kiam kolapsis la manoj kaj kruroj de Abe.

Abe peze anhelis, viŝante per la antaŭbrako ŝviton desur la frunto. ”Al la boato, rapide,” ordonis karulino *Li*. Duoncirklo de la malhelaj ombroj turniĝis frunte al *Li* kaj avancis pli proksimen. ”Ts-ts-ts.” ”Najf.” ”Najf.” ”*Li*.”

Sed *Li* ne kriis. *Li* ne komencis fuĝi. *Li* levis la brakojn al la ĉielo, kaj la banmantelo deglitis desur ŝiaj ŝultroj. La nuda *Li* ambaŭmane svingis al la pendolantaj ombroj kaj sendis al ili kisojn. Sur ŝiaj tremetantaj lipoj aperis io, kion ĉiu devus nomi rava rideto. "Tiel dolĉaj vi estas," diris la tremsonanta voĉeto. Kaj la blankaj brakoj denove etendiĝis al la pendolantaj ombroj.

"Venu helpi al mi, *Li*," grumblis Abe iom maldelikate, puŝante la boaton en la pli profundan akvon.

Karulino *Li* levis sian banmantelon. "Adiaŭ, miaj karuloj!" Jam aŭdeblis, kiel la ombroj padelas en la akvo. "Faru rapide, Abe," siblis la karulino, vadante al la boato. "Denove ili jam estas ĉi tie!" Mr. Abe Loeb malespere klopodis surmarigi la boaton. Nu, kaj nun eniris ĝin fraŭlino *Li* kaj salute managitis. "Iru al la alia flanko, Abe, ili ne vidas min."

"Najf." "Ts-ts-ts." "A-be."

"Najf, ts, najf."

"Ts-ts."

"Najf!"

Fine la boato balanciĝis sur la ondoj. Mr. Abe enrampis ĝin kaj plenforte ekremis. Unu remilo ekbatis ian glitan korpon.

Karulino *Li* profunde elspiris. "Ĉu ili ne estas ege ĉarmaj? Kaj ĉu mi faris tion *perfekte*?"

Mr. Abe plenforte remis al la jakto. "Survestu la mantelon, *Li*," li diris iom seke.

"Mi opinias, ke tio estis *grandioza* sukceso," konstatis fraŭlino *Li*. "Kaj la perloj, Abe! Kion vi opinias, kian prezon ili havas?"

Mr. Abe ĉesis momenton remi. "Mi opinias, ke vi ne bezonus tiel montriĝi al ili, karulino."

Fraŭlino *Li* iom ofendiĝis. "Ĉu ŝoka? Oni vidas, Abe, ke vi ne estas *artista*. Mi petas, remu, al mi estas malvarme en la mantelo."

## 7. Daŭrigo de la jakto sur la laguno

Tiuvespere sur la jakto Gloria Pickford ne estis personaj konfliktoj; nur sciencaj opinioj brue koliziis. Fred (lojale apogata de Abe) opiniis, ke tio *nepre* devis esti iaj saŭroj, dum la kapitano tipis je mamuloj. En la maro estas neniam saŭroj, asertis la kapitano sangvine; sed la junaj sinjoroj el la universitato ne atentis liajn objektojn; saŭroj estas nome pli granda sensacio. Karulino *Li* kontentiĝis kun tio, ke ili estas tritonoj, ke simple ili estas *amindaj* kaj entute, ke estis *tiela* sukceso; kaj *Li* (en la blue striita piĝamo, kiu al Abe *tiel* plaĉis) revis kun brilantaj okuloj pri perloj kaj mardioj. Judy kompreneble estis konvinkita, ke ĉio ĉi estas komediaĵo kaj blufado, ke tion *Li* kun Abe elpensis, kaj kolerege palpebrumis al Fred, ke jam li lasu tion. Abe opiniis, ke *Li povus* menciiti tion, kiel li, Abe, sentime iris inter la saŭrojn por ŝia banmantelo; tial trifoje li rakontis, kiel *Li grandioze* frontis al ili, dum li, Abe, estis forpuŝanta la boaton en la akvon, kaj ĵus komencis tion priskribi la kvaran fojon; sed Fred kaj la kapitano tute ne aŭskultis, pasie disputante pri saŭroj kaj mamuloj. (Ĉu entute *tiel* gravus, kio ĝi estas, opiniis Abe.) Fine Judy oscedis kaj diris, ke ŝi iras dormi;

ŝi ekrigardis multsignife je Fred, sed Fred ĵus rememoris, ke antaŭ la diluvo vivis tiaj maljunaj komikaj saŭroj, kiel nur, tondre, ili nomiĝis, diplosaŭroj, bigosaŭroj, aŭ iel simile, kaj tiuj promenis sur la postaj kruroj, sinjoro; Fred mem vidis tion en ia komika scienca bildo, sinjoro, en tiel dika libro. Kolosa libro, sinjoro, tiun vi devus scii.

”Abe,” aŭdiĝis karulino *Li*. ”Mi havas *fabelan* film-ideon.”

”Kian?”

”Ion mirige novan. Sciu, nia jakto eble dronus, kaj nur mi saviĝus sur ĉi tiu insulo. Kaj tie mi vivus kiel Robinsona.”

”Kion vi farus tie?” oponis la kapitano skeptike.

”Mi baniĝus kaj tiel,” diris la karulino simple. ”Kaj dume enamiĝus al mi la mardioj tritonoj ... kaj portadus al mi nurajn perlojn. Sciu, tute laŭ realeco. Povus esti eventuale naturfilmo kaj kleriga filmo, kion vi opinias? Io kiel Trader Horn.”

”*Li* pravas,” deklaris subite Fred. ”Morgaŭ vespere ni filmu la saŭrojn.”

”Nome la mamulojn,” korektis la kapitano.

”Nome min,” diris la karulino, ”min staranta inter la maraj tritonoj.”

”Sed en banmantelo,” subitis Abe.

”Mi survestus la *blankan* bankostumon,” diris *Li*. ”Kaj Greta devus fari al mi belan frizaĵon. Hodiaŭ mi aspektis simple terrure.”

”Kaj kiu filmus tion?”

”Abe. Por ke almenaŭ por io li taŭgu. Kaj Judy devus per io lumi, se jam estus mallumo.”

”Kaj kion Fred?”

”Fred havus pafarkon kaj florkronon sur la kapo, kaj se la tritonoj volus min forrabi, do li mortigus ilin, ĉu?”

”Respektan dankon,” rikanis Fred. ”Sed revolveron pli mi preferus. Kaj ankaŭ la kapitano, mi opinias, devus esti tie.”

La kapitano bataleme hirtigis la lipharojn. ”Bonvolu ne zorgi. Mi faros jam, kio necesos.”

”Kaj kio tio estos?”

”Tri homoj el la ŝipanaro, sinjoro. Kaj bone armitaj, sinjoro.”

Karulino *Li* ĉarme ekmiris. ”Ĉu vi opinias, ke estas *tiel* danĝere, kapitano?”

”Mi opinias nenion, infano,” murmuris la kapitano. ”Sed mi havas miajn ordonojn de Mr. Jesse Loeb — almenaŭ koncerne sinjoron Abe.”

La sinjoroj pasie ĵetiĝis en la teknikajn detalojn de la entrepreno. Abe palpebrumis la karulinon, jam vi bezonus iri dormi, kaj tiel. *Li* obeeme iris. ”Sciu, Abe, ŝi diris en sia kabino, mi opinias, ke tio estos *m.i.r.i.g.a* filmo.”

”Certe, karulino,” konsentis Abe kaj volis ŝin kisi.

”Hodiaŭ ne, Abe,” defendis sin la karulino. ”Vi devas ja kompreni, ke mi devas *e.n.o.r.m.e* koncentriĝi.”

\*

La sekvintan tagon fraŭlino *Li* intense koncentriĝadis; la povrulino Greta havis plenmanojn da laboro kun tio. Tio estis banoj kun gravaj saloj kaj esencoj, harlavado per Nurb blond-ŝampuo, masaĝoj, pedikuro, manikuro, ondumado kaj kombado, gladado kaj vesto-provado, rekudrado kaj ŝminkado kaj versimile ankoraŭ multaj aliaj preparoj; ankaŭ Judy estis entrenita de la hasto kaj helpis al karulino *Li*. (Ekzistas pezaj momentoj, kiam la virinoj scias esti al si mirinde lojalaj, kiel ekzemple la vestado.) Dume en la kajuto de fraŭlino *Li* regis febra aktiveco, la sinjoroj memstariĝis kaj dislokante sur la tablo cindruojn kaj glasetojn kun brando, fiksitis strategian planon, kie kiu staros kaj kian funkcion havos, se io okazus; dum tio la kapitano estis plurfoje peze ofendita en la prestiĝ-problemo de komando. Posttagmeze ili transportis sur bordon de la laguno filmaparaton, leĝeran mitralon, korbon kun manĝilaro kaj manĝaĵo, fusilojn, gramofonon kaj aliajn militbezonaĵojn; ĉio ĉi estis bonege kamuflita per palmfolioj. Ankoraŭ antaŭ la sunsubiro okupis siajn postenojn tri armitaj viroj el la ŝipanaro kaj la kapitano en funkcio de la ĉefkomandanto. Poste estis

transportita sur la bordon grandega korbo kun kelkaj etaj necesajoj de fraŭlino Lily Valley. Poste alboati Fred kun fraŭlino Judy. Poste komenciĝis la sunsubiro en la plena tropika superbo.

Dume Mr. Abe frapetas la kajuton de fraŭlino *Li* jam la dekan fojon. "Karulino, *vere* jam estas la plej urĝa tempo!"

"Tuj, tuj," respondas voĉo de la karulino, "mi petas, ne nervozigu min! Ja mi devas *min vesti*, ĉu?"

Dume la kapitano pririgardas la situacion. Tie sur la surfaco de la golfo brilas rekta, longa zono, kiu apartigas la ondiĝantan maron disde la kvieta profundo de la laguno. Kvazaŭ tie estus sub la akvo ia digo aŭ ondrompilo, opinias la kapitano; eble ĝi estas sablo aŭ koralriffo, sed ĝi aspektas preskaŭ kiel artefaritaĵo. Stranga loko. Super la kvieta surfaco de la laguno ie kaj tie elmergiĝas nigraj kapoj kaj direktiĝas al la bordo. La kapitano kunpremas la lipojn kaj tuŝas maltrankvile revolveron. Estus pli bone, li opinias, se la virinoj restus sur la ŝipo. Judy komencas tremi kaj spasme teniĝas al Fred. Kiel forta li estas, ŝi pensas, miadio, kiel mi amas lin!"

Fine forpuŝiĝas de la jakto la lasta boato. En ĝi estas fraŭlino Lily Valley en blanka bantrikoto kaj en diafana dressing-gown\*, en kiu evidente ŝi estos ĵetegita el la maro kiel ŝiprompulino; plue miss Greta kaj Mr. Abe.

Dressing-gown — (*angle*) negliĝa robo



”Kial vi remas tiel malrapide, Abe,” riproĉas la karulino. Mr: Abe vidas la nigrajn kapojn proksimiĝantajn al la bordo kaj diras nenion.

”Ts-ts.”

”Ts.”

Mr. Abe tiras la boaton sur la sablon kaj helpas al karulino *Li* kaj fraŭlino Greta elen. ”Kuru rapide al la aparato,” flustras la artistino. ”Kaj kiam mi diros al vi ’nun’, komencu filmi.”

”Sed nenio jam videblos,” oponas Abe.

”Do Judy devas lumi. Greta!”

Dum Mr. Abe Loeb okupis sian lokon ĉe la aparato, la artistino lokiĝas sur la sablon kiel agonianta cigno, kaj fraŭlino Greta aranĝas la faldojn de ŝia dressing-gown. ”Estu videbla parto de mia kruro,” flustras la ŝipromptulino. ”Ĉu preta? Do for! Abe, nun!”

Abe komencis turni la krankon. ”Judy, lumon!” Sed neniu lumo eklumis. El la maro elmergiĝas balanciĝantaj ombroj kaj proksimiĝas al *Li*. Greta permane ŝtopas sian buŝon, por ne krii.

”*Li*,” vokas Mr. Abe, ”*Li*, fuĝu!”

”Najf!” ”Ts-ts-ts.” ”*Li*.” ”*Li*.” ”Abe!”

Iu pafpretigas revolveron. ”Diable, ne pafu,” siblas la kapitano.

”*Li*,” vokas Abe kaj ĉesas kranki. ”Judy, lumon!”

*Li* lante, suple leviĝas kaj levas la manojn al la ĉielo. La leĝereta dressing-gown deglitas desur ŝiaj ŝultroj. Tie nun staras la neĝblanka Lily plektante gracie la manojn super la kapo, kiel tion faras ŝiprompiĝintoj vekigantaj el la sveno. Mr. Abe komencis hastege turni la krankon.

"Sakre, Judy, lumon!"

"Ts-ts-ts."

"Najf."

"Najf."

"A-be!"

La nigraj ombroj balanciĝas kaj rondiras ĉirkaŭ la blanka *Li*. Halt, halt, atendu, tio ne plu estas ludo. *Li* ne plu plektas la manojn super la kapo, sed forpuŝas ion de si kaj kriaĉas: "Abe, Abe, ĝi tuŝis min!" Tiumomente ek-lumis blindiga lumo, Abe rapide turnas la krankon, Fred kaj la kapitano kuras kun la revolveroj al *Li*, kiu kaŭre sidas kaj dentklakas pro hororo. Samtempe en la akra lumo videblas dekoj kaj centoj da longaj, malhelaj ombroj, kiel fuĝante ili glitas en la maron. En la sama momento du maristoj ĵetas reton sur iun fuĝantan ombron. Samtempe Greta svenas, falante kiel sako. Samtempe ekknalis du aŭ tri pafoj, en la maro ĝi kirle plaŭdas, du maristoj kun la reto kuŝas sur io, kio sub ili tordiĝas kaj baraktas, kaj la lumo en la manoj de fraŭlino Judy estingiĝis.

La kapitano lumigis poŝlampeton. "Infano, ĉu nenio okazis al vi?"

"Ĝi tuŝis mian kruron," lamentis la karulino. "Fred, ĝi estis terura!"

Nun venis ankaŭ Mr. Abe kun sia poŝlampeto. "Fabele ĝi procedis, *Li*," li laŭtis, "sed Judy devis pli frue lumi!"

"Ĝi ne volis lumi," voĉglitis Judy. "Ĉu ne vere, Fred, ke ĝi ne volis lumi?"

"Judy nome timis," senkulpigis ŝin Fred. "Per mia animo, ŝi ne faris tion intence, ĉu, Judy?"

Judy ofendiĝis; sed dume alproksimiĝis la du maristoj, trenante ion en la reto, kio baraktis kiel granda fiŝo. "Jen ĝi estas, kapitano. Kaj vivanta."

"Bestaĉo, ĝi ĉirkaŭŝprucigis el si ian venenaĵon. Miaj manoj estas vezikplenaj. Infere ĝi bruldoloras."

"Ankaŭ min ĝi tuŝis," plendaĉis fraŭlino *Li*. "Eklumigu, Abe! Rigardu, ĉu tie mi havas vezikon?"

"Ne, karulino, nenion vi havas tie," certigis ŝin Abe; preskaŭ li kiskus tiun lokon super la genuo, kiun la karulino zorge frotis. "Kiel malvarma ĝi estis, hu," plendis karulino *Li*.

"Vi perdis perlon, ma'am," diris iu maristo kaj donis al *Li* globeton, kiun li levis el la sablo.

"Jesuo, Abe," ekkriis fraŭlino *Li*, "denove ili alportis al mi perlojn! Infanoj, iru serĉi perlojn! Ĉi tie estas *a.m.a.*-

s.o.j da perloj, kiujn la povruloj alportis al mi! Ili estas ĉarmaj, ĉu, Fred? Ĉi tie ankaŭ estas perlo!”

”Kaj ĉi tie!”

Tri poŝlampetoj direktis siajn lumrondojn al la tero.

”Mi trovis unu egan!”

”Ĝi apartenas al mi,” hastdiris karulino *Li*.

”Fred,” aŭdiĝis glacitone fraŭlino Judy.

”Tuj,” diris sinjoro Fred, rampanta surgenue en la sablo.

”Fred, mi volas reveni sur la ŝipon!”

”Iu vin transportos tien,” konsilis Fred absorbite. ”Diable, tio ja estas farso!”

Tri sinjoroj kaj fraŭlino *Li* moviĝis tra la sablo kiel grandaj lampiroj.

”Jen tri perloj,” raportis la kapitano.

”Montru, montru,” kvivitis *Li* entuziasme kaj surgenue kuris al la kapitano. Tiumomente ekbrilis la magnifizulmo kaj ekbruegis kranko de la filmaparato. ”Nun vi ĉiuj estas tie,” deklaris Judy venĝeme. ”Kia grandioza foto por ĵurnaloj. Amerika Kompanio Serĉas Perlojn. Marsaŭroj Priĵetas Homojn Per Perloj.”

Fred sidiĝis. ”Diable, Judy pravas. Infanoj, tion ni *d.e.v.a.s* doni en ĵurnalojn!”

Li eksidis. ”Judy estas ĉarmulino. Judy, fotu nin ankoraŭ foje, sed de antaŭe!”

”Multon vi perdus ĉe tio, mia kara,” opiniis Judy.

”Infanoj,” diris Mr. Abe, ”prefere ni serĉu perlojn. Komenciĝas la fluso.”

En la mallumo ĉe rando de la maro ekmovis sin nigra balanciĝanta ombro. *Li* ekblekis: ”Tie — tie —”

Tri poŝlampetoj ĵetis lumrondon al tiu flanko. Tio estis nur Greta surgenu, serĉanta perlojn en la mallumo.

\*

Li havis sur la sino kapitanĉapon kun dudek unu perloj. Abe verŝis kaj Judy ludis gramofonon. Estis senmezura stelplena nokto dum la eterna muĝado de la maro.

”Do kian titolon ni donos al tio,” bruis Fred. ”FILINO DE INDUSTRIISTO EL MILVOKIO FILMAS FOSILAJN SAŬROJN.”

”Antaŭdiluvaj Saŭroj Omaĝas Belecon kaj Junecon,” proponis Abe poezie.

”JAKTO GLORIA PICKFORD MALKOVRAS NEKONATAJN ESTAĴOJN,” konsilis la kapitano. ”AŬ MISTERO DE LA INSULO TAHUARA.”

”Tio povus esti nur subtitolo,” diris Fred. ”La titolo devas diri multe pli.”

”Ekzemple: BASEBALL FRED BATALAS KONTRAŬ MONSTROJ,” aŭdiĝis Judy. ”Fred estis fabela atakante ilin. Nur bone ĝi reveliĝu sur la filmo.”

La kapitano tusetis. ”Nome, mi ekkuris pli frue, fraŭlino Judy; sed ne pri tio ni parolu. Mi opinias, ke la titolo

sonu science, sinjoro. Sobre kaj ... nu, science. ANTAŬ-LU-VA FAŬNO SUR PACIFIKA INSULO.”

”Antaŭliduva,” korektis Fred. ”Ne, antaŭviduala. Diable, kiel ĝi estas. Antiluvia. Anteduvia. Ne, ne eblas. Ni devas doni al tio ian pli simplan titolon, por ke ĉiu povu ĝin eldiri. Judy estas bravulino.”

”Antediluvia,” diris Judy.

Fred kapneis. ”Tro longa, Judy. Pli longa ol la bestaĉoj kune kun la vosto. La titolo devas esti mallonga. Sed Judy estas grandioza, ĉu? Diru, kapitano, ĉu ŝi ne estas superba?”

”Jes,” konsentis la kapitano. ”Rimarkinda knabino.”

”Ĝusta knabo, kapitano,” diris rekoneme la juna grandulo. ”Infanoj, la kapitano estas bravulo. Sed antaŭdiluviuala faŭno estas idiotaĵo. Tio estas nenia titolo por ĵurnaloj. Plivere Amantoj sur la Perlo-Insulo, aŭ iel simile.”

”Tritonoj Superŝutas per Perloj la Blankan Lily,” kriis Abe. ”Omaĝo el Pozidona Regno! Nova Afrodita!”

”Idiotaĵo,” protestis Fred indignite. ”Neniaj tritonoj iam estis. Tio estas science pruvita, knabo. Kaj nenia Afrodita estis, ĉu, Judy? *KOLIZIO INTER HOMOJ KAJ PRASAŬROJ! KURAĜA KAPITANO ATAKAS LA ANTAŬDILUVAJN MONSTROJN!* Homo, ĝi devas tinti, tiu titolo!

”Ekstra eldono,” vokis Abe. ”*FILMARTISTINO ATAKITA DE MARMONSTROJ! SEKS-ALLOGO DE L'MO-*

DERNA VIRINO VENKAS LA PRATEMPAJN SAŬROJN! FOSILIAJ REPTILIOJ PREFERAS BLONDULINOJN!”

”Abe,” aŭdiĝis karulino *Li*. ”Vi, mi havas ideon —”

”Kian?”

”Por filmo. Tio estus fabela afero, Abe. Imagu, mi baniĝus ĉe bordo de la maro —”

”Ĉi tiu trikoto mirige plaĉigas vin, *Li*,” rapidis diri Abe.

”Ĉu? Kaj la tritonoj enamiĝus al mi kaj forrabus min al la fundo de la maro. Kaj mi estus ilia reĝino.”

”Sur la marfundo?”

”Jes, sub la akvo. En ilia mistera regno, ĉu? Ja ili havas tie urbojn kaj ĉion eblan.”

”Karulino, vi devus ja tie droni!”

”Ne timu, mi scias naĝi,” diris karulino *Li* senzorge. ”Nur unufoje tage mi elnaĝus al la bordo por satspiri la aeron.” *Li* prezentis spirekzercojn kun plenblovado de la sino kaj elastaj brakmovoj. ”Proksimume tiel, jes? Kaj sur la bordo enamiĝus al mi ... eble juna fiŝisto. Kaj mi enamiĝus al li. Freneze,” suspiris la karulino. ”Sciu, li estus tiel bela kaj forta. Kaj la tritonoj volus lin dronigi, sed mi savus lin kaj irus kun li en lian kabanon. Kaj la tritonoj sieĝus nin — nu kaj poste eventuale vi venus nin savi.”

”*Li*,” diris Fred serioze, ”tio estas tiel stulta, ke fakte oni povus tion filmi. Mi miros, se olda Jesse ne faros el tio grandfilmon.”

\*

Fred pravis: el tio estis post iom da tempo grandfilmo el la produktado de Jesse Loeb Pictures\* kun fraŭlino Lily Valley en la ĉefrolo; krome estis en ĝi okupitaj sescent nereidinoj, unu Neptuno kaj dek du mil statistoj alives-titaj je diversaj antaŭdiluvaj saŭroj. Sed antaŭ ol tio realiĝis, forfluis multe da akvo kaj okazis multaj eventoj, ĉefe:

1. La kaptita besto, tenata en kuvo en la banĉambro de karulino *Li*, ĝuis dum du tagoj viglan intereson de la tuta societo; la trian tagon ĝi ĉesis moviĝi kaj fraŭlino *Li* asertis, ke la povrulo nostalgias; la kvaran tagon ĝi komencis feteri kaj devis esti elĵetita en progresinta putra stato.

2. El la fotoj filmitaj ĉe la laguno estis uzeblaj nur du. Sur la unua fraŭlino *Li* kaŭre sidiĝas pro la hororo, mal-espere mansvingante kontraŭ la baŭmintaj bestoj. Ĉiuj asertis, ke ĝi estas fenomenata foto. Sur la alia estis videblaj tri viroj kaj unu knabino, genuantaj kaj kliniĝantaj, la nazojn ĝis ĉe la tero; ĉiuj estis fotitaj de malantaŭe kaj aspektis kvazaŭ ili ion adorus. Ĉi tiu fotaĵo ne aperis.

Pictures — (*angle*) bildoj Ĉi tie: Filmkompanio



3. Kio koncernas la proponitajn titolojn por la ĵurnaloj, preskaŭ ĉiuj estis uzitaj (eĉ tiu pri la antediluvia faŭno) en centoj kaj centoj da usonaj kaj entute en monĉiĵurnaloj, revuoj kaj magazinoj; al tio estis aldonita prikskribo de la tuta okazaĵo kun multaj detaloj kaj fotoj, kiel ekzemple foto de karulino *Li* inter la saŭroj, foto de sola saŭro en la bankuvo, foto de sola *Li* en bankostumo, foto de fraŭlino Judy, de Mr. Abe Loeb, de Baseball Fred, de la kapitano de la jakto, de la jakto Gloria Pickford sola, de la sola insulo Taraiva kaj de la solaj perloj, dismetitaj sur nigra veluro. Per tio la kariero de karulino *Li* estis sekurigita; ŝi eĉ rifuzis ludi en varieteo kaj deklaris al la gazetraportistoj, ke ŝi intencas dediĉi sin nur al la Arto.

4. Trovis sin kompreneble ankaŭ homoj, kiuj sub preteksto de faka klereco asertis, ke — se eblas juĝi laŭ la fotoj — temas pri neniaj pratempaj saŭroj, sed pri ia specio de salamandroj. Homoj ankoraŭ pli fake instruitaj asertis, ke ĉi tiu specio de salamandroj science tute ne estas konata kaj tial ĝi nepre ne ekzistas. Pri tio estis longa prespolemiko, kiun finigis profesoro J. W. Hopkins (Yale Un.\*) per la deklaro, ke li esploris la prezentitajn fotojn, kaj ke li opinias ilin falsaĵo (hoax) aŭ trukfilmo; ke la bildigitaj bestoj rememorigas iom la Giant-salamandron kriptobrankan (*Cryptobranchus japonicus*, Yale un. — universitato en Yale

Sieboldia maxima, Tritomegas Sieboldii aŭ Megalobatrachus Sieboldi), sed malprecize, primitive kaj eĉ diletante imititan. Per tio la afero por ioma tempo estis science likvidita.

5. Fine post konvena tempo Mr. Abe Loeb edziĝis al fraŭlino Judy. Lia plej bona amiko Baseball Fred estis lia atestanto ĉe la edziĝofesto, kiu okazis kun granda pompo kaj kun partopreno de multaj personecoj el la rondoj politikaj, artistaj kaj aliaj.

## 8. *Andrias Scheuchzeri*\*

**S**enfina estas la homa scivolemo. La homoj ne kontentiĝas kun tio, ke profesoro J. W. Hopkins (Yale Un.), tiutempe la plej granda aŭtoritatulo en la fako de reptilioj, deklaris ĉi tiujn misterajn estaĵojn nescienca blufado kaj nura fantazio; en la fakpresado kaj en ĵurnaloj komencis multiĝi informoj pri apero de la ĝis nun nekonataj bestoj, similaj al grandegaj salamandroj, en la plej diversaj lokoj de Pacifiko. Relative fidindaj indikoj citis la trovejojn sur Salomon-Insuloj, sur Insulo Schouten, sur Kapingamarangi, Butaritari kaj Tapeteuea, plue sur aro da insuletoj: Nukufetau, Funafuti, Nukonono kaj Fukaofu, poste ĝis sur Hiau, Uahuka, Uapu kaj Pukapuka. Estis citataj famoj pri la diabloj de kapitano van Toĥ (ĉefe en regiono de Melanezio) kaj pri tritonoj de fraŭlino Lily (pli multe en Polinezio); do la ĵurnaloj konkludis:

Andrias Scheuchzeri — giganta salamandro; nomita laŭ la svisa natursciencisto d-ro Johann Scheuchzer (1672-1733), kiu en la jaro 1726 en rokrompejo de oeninga kalkŝtono malkovris ĝiajn fosiliajn spurojn. En sia traktaĵo "Homo diluvii testis" (Homo kiel atestanto de diluvo) li skribis, ke la fosiliĝinta salamandro egalas al la homa skeleto kaj tial temas pri antaŭdiluvia homo. Surbaze de ĉi tio Čapek konstruis sian salamandran historion.

dis, ke temas verŝimile pri diversaj specioj de la submaraj kaj antaŭdiluvaj monstroj, des pli, ke komenciĝis la somera sezono kaj mankis temoj. Submaraj monstroj havas ĉe la legantaro konsiderindan sukceson. Ĉefe en Usono la tritonoj enmodiĝis; en Novjorko oni ludis tricentfoje dekoraciriĉan revuon Pozidono kun tricent plej belaj tritoninoj, nereidinoj kaj sirenoj; en Miamo kaj sur la kaliforniaj plaĝoj la junularo baniĝis en kostumoj de tritonoj kaj nereidinoj (t.e. tri perloŝnuroj kaj nenio pli), dum en la mezaj kaj mezokcidentaj ŝtatoj neordinare potenciĝis Movado por Subpremado de Malmoraleco (M.S.M.); dum tio okazis pluraj manifestacioj kaj kelkaj negroj estis aŭ pendumitaj, aŭ brulmortigitaj.

Fine aperis en The National Geographic Magazine bulteno de Scienca Ekspedicio de la Kolumbia Universitato (aranĝita je kostoj de J. S. Tincker, tiel nomata Konservoreĝo); la raporton subskribis P. L. Smith, W. Kleinschmidt, Charles Kovar, Louis Forgeron kaj D. Herrero, do kapacitoj de mondfamo ĉefe en fako de fiŝparazitoj, anelidoj, plantobiologio, infuzorioj kaj afidoj: El la ampleksa raporto ni citas:

... Sur la insulo Rakahanga la ekspedicio unuafoje renkontiĝis kun spuroj de la malantaŭaj piedoj de ĝis nun ne konata giganta salamandro. La spuroj estas kvinfingraj, fingrolongo 3 ĝis 4 centimetrojn. Laŭ nombro da spuroj la bordo de insulo Rakahanga nepre svarmas de

ĉi tiuj salamandroj. Ĉar mankis tie spuroj de la antaŭaj piedoj (krom unu kvarfingra spuro, versimile de salamandrigo), la ekspedicio konkludis, ke ĉi tiuj salamandroj evidente moviĝas per la malantaŭaj korpomembroj.

Ni rimarkigas, ke sur la insuleto Rakahanga ekzistas nek rivero nek marĉo; la salamandroj vivas do en la maro kaj versimile estas solaj reprezentantoj de sia ordo, vivantaj en la pelaga medio. Estas ankaŭ konate, ke la meksika aksolotlo (*Amblystoma mexicanum*) restadas en la sallagoj; sed pri la pelagaj salamandroj (vivantaj en la maro) ni trovas eĉ ne mencion en la klasika verko de W. Korngold *Amfibioj Vosthavaj (Urodeloj)*, Berlino 1913.

... Ni atendis ĝis la posttagmezo por ĉasakiri aŭ almenaŭ ekvidi vivantan ekzempleron, sed vane. Kun bedaŭro ni forlasis la ĉarman insuleton Rakahanga, kie D. Herero sukcesis trovi belan novan specion de hemiptero ...

Multe pli grandan feliĉon ni havis sur la insulo Tongarewa. Ni atendis sur la bordo kun fusiloj enmane. Post la sunsubiro elmergiĝis el la akvo kapoj de salamandroj, relative grandaj kaj iom plataj. Post iom da tempo la salamandroj surrampis sur sablon, paŝante balance, sed sufiĉe lertmove per la malantaŭaj piedoj. Sidante ili estis pli ol unu metron altaj. Ili dissidiĝis en larĝa rondo kaj komencis per speciala movo giri la supran korpo-

parton; aspektis, kvazaŭ ili dancus. W. Kleinschmidt ekstaris por vidi pli bone. Tiam la salamandroj turnis la kapojn al li kaj en la unua momento tute konsterniĝis; poste ili komencis proksimiĝi al li kun konsiderinda rapideco, eligante siblajn kaj bojajn sonojn. Kiam ili estis ĉirkaŭ sep paŝojn de li, ni pafis kontraŭ ilin. Ili komencis tre rapide fuĝi kaj ĵetiĝis en la maron; tiuvespere ili ne plu montriĝis. Sur la bordo restis nur du mortaj salamandroj kaj unu kun frakasita spino, eligante strangan sonon, simile al "ogod, ogod, ogod." Kiam W. Kleinschmidt per tranĉilo malfermis ĝian pulm-ventriklon, ĝi mortis ... (*Sekvas anatomiaj detaloj, kiujn cetere ni laikoj ne komprenus; kaj ni resendas la legantojn-fakulojn je la citita bulteno.*)

Temas do, kiel laŭ la cititaj indikoj evidentas, pri tipa membro de la ordo de amfibiojn vostohavaj (Urodeloj), al kiu, kiel al ĉiu estas konate, apartenas ordo de la veraj salamandroj (Salamandrida), ampleksanta ordon de tritonoj (Tritones) kaj salamandroj (Salamandrae), kaj specion de salamandroj ranidaj (Ichthyoidea), kiu entenas salamandrojn kriptobrankajn (Cryptobranchiata) kaj fanerobrankajn (Phanerobranchiata). La salamandro trovita sur la insulo Tongarewa ŝajnas esti plej proksime parenca al la salamandroj ranidaj kriptomankaj; multilate, interalie pro sia grandeco, ĝi rememorigas la japanan gigantan salamandron (*Megalobatrachus Sieboldii*)

aŭ la amerikan hellbender, nomata "ŝlimdiablo", sed ĝi diferencas disde ili per bone evoluintaj sentorganoj kaj pli longaj, fortikaj korpomembroj ebligantaj al ĝi moviĝi sufiĉe lertmove en la akvo kaj sur la firma tero. (*Sekvas pluaj detaloj el la kompara anatomio.*)

Kiam ni estis konservintaj la skeletojn de la mortigitaj bestoj, ni akiris maksimume interesan ekkonon: nome, ke la skeleto de ĉi tiuj salamandroj preskaŭ perfekte konformiĝas al la fosilia premsigno de la salamandra skeleto, kiun trovis sur ŝtona tabulo el la Öhningenminejo d-ro Johano Jakobo Scheuchzer kaj bildigis en verko "Homo diluvii testis", eldonita en la jaro 1726. Al la malpli informitaj legantoj estu rememorigite, ke la nomita d-ro Scheuchzer opiniis ĉi tiun fosiliaĵon restaĵo de la *antaŭdiluva homo*. "La ĉi tie almetita bildo," li skribas, "kiun mi prezentas al la instruita mondo en bela lignogravuraĵo, estas sen ia ajn dubo figuraĵo de homo, kiu ĉeestis la mondodiluvon; ne estas ĉi tie linioj, laŭ kiuj la riĉa imagivo devus nur nun konstrui ion, kio similus al homo, sed ĉie perfekta koincido kun la unuopaj partoj de la homa skeleto kaj perfekta simetrio. Homo fosiliĝinta bildigita de antaŭe. Jen monumento al la pereinta homaro, pli aĝa ol ĉiuj monumentoj romiaj, grekaj kaj eĉ egiptaj kaj de ĉiuj orientaj entute." Pli poste Cuvier\*

Cuvier — Georges Baron de Cuvier (1769-1832), franca natursciencisto



*Fosiliĝinta homo bildigita de antaŭo  
Andrias Scheuchzeri*

rekonis en la öhningena skelet-spuro ŝtoniĝintan salamandron, kiu estis nomita *Cryptobranchus primaevus* aŭ *Andrias Scheuchzeri* Tschudi kaj opiniata specio de longe formortinta. Post ostologia komparado ni sukcesis identigi niajn salamandrojn kun la ŝajne formortinta prasalamandro *Andrias*. La mistera prasaŭro, kiel oni



indikadis ĝin en la gazetoj, *estas nenio alia ol la fosilia kriptobranka salamandro Andrias Scheuchzeri*; aŭ, se necesas nova nomo, *Cryptobranchus Tinckeri erectus* aŭ Giganta salamandro polinezia.

... Restas la problemo, kial ĉi tiu interesa giganta salamandro eskapis ĝis nun atenton de la scienco, kvankam almenaŭ sur la insuloj Bakahanga kaj Tongarewa en la arkipelago Manihiki ĝi aperas amase. Nek Randolph nek Montgomery mencias ĝin en sia verko "Du jarojn sur la insuloj Manihiki" (1885). La indiĝenoj asertas, ke ĉi tiu besto — kiun cetere ili opinias venena — komencis aperadi nur antaŭ ses aŭ ok jaroj. Ili rakontas, ke la "mardiabloj" scias paroli (!) kaj konstruas en golfoj, en kiuj ili vivas, kompletajn digo-sistemojn kaj remparojn similtajn al submaraj urboj; onidire en iliaj golfoj la akvo estas trankvila kiel en fiŝlago; onidire ili elfosadas sub la akvo multmetrajn longajn kuŝejojn kaj koridorojn, en kiuj dumtage ili restadas; onidire nokte ili ŝtelas sur la kampoj batatojn kaj jambosojn\* kaj forportas de la homoj hakfosilojn kaj alian ilaron. Entute la homoj ne ŝatas ilin kaj ilin eĉ timas; en multaj kazoj ili preferis transloĝiĝi aliloken. Evidente temas pri nuraj primitivaj onidiroj kaj superstiĉoj, motivataj eble pro la abomena aspekto kaj rekta iom homa irado de la ne damaĝantaj grandaj salamandroj.

Jamboso — manĝebla radiktubero de sudazia volvplanto

... Kun konsiderinda singardo necesas akcepti ankaŭ la informojn de vojaĝantoj, laŭ kiuj ĉi tiuj salamandroj aperas ankaŭ sur aliaj insuloj ol sur Manihiki. Male, sen minimuma dubo eblas determini nemalnovan spuron de la posta piedo, trovita sur la bordo de la insulo Tongatabu, kiun publicis kapitano Croisset en *La Nature*, kiel piedspuron de Andrias Scheuchzeri. Ĉi tiu trovaĵo speciale gravas tial, ĉar ĝi ligas la aperon sur la Maniki-Islands kun la teritorio aŭstralia-novzelanda, kie konserviĝis tiom da restaĵoj pri la evoluo de la praa faŭno; ni rememorigu al ni ĉefe la "antaŭdiluvan" saŭron Hatteria aŭ Tuatara, ĝis nun vivanta sur la Stephen-insulo. Sur ĉi tiuj izolaj, plejparte malmulte loĝataj kaj de la civilizacio preskaŭ ne tuŝitaj insuletoj povis sporade konserviĝi restaĵoj de animalaj tipoj aliloke jam formortintaj. Al la fosilia saŭro Hatteria nun viciĝas dank'al sinjoro J. S. Tincker la antaŭdiluva salamandro. La bona doktoro Johano Jakobo Scheuchzer nun povus ĝisvivi la reviviĝon de sia öhningena Adamo ...

\*

Ĉi tiu scienca bulteno certe sufiĉus, por plene science prilumi la problemon de la misteraj marmonstroj, pri kiuj jam estis tiom da paroloj. Bedaŭrinde samtempe aperis informo de la nederlanda esploristo van Hogenhouck, kiu alvicigis ĉi tiujn kriptobrankajn gigantsala-

mandrojn al la familio de aŭtentikaj salamandroj aŭ tritonoj sub nomon Megatriton moluccanus kaj fiksas ilin an disvastiĝon sur la nederland-sundaj insuloj Dĵilolo, Morotai kaj Ceram; plue raporto de la franca sciencisto doktoro Mignard, kiu determinis ilin kiel tipajn salamandrojn kaj destinas al ili originajn restadejojn sur la francaj insuloj Takaroa, Rangiroa kaj Raroira kaj nomis ilin tute simple *Cryptobranchus salamandroides*; poste raporto de H. W. Spence, kiu ekvidis en ili novan familion Pelagidae, aŭtoktona sur la Gilbert-Insularo kaj kapabla akiri la fakekzistadon sub la specia nomo Pelagotriton Spencei. Mr. Spence sukcesis transporti unu vivantan ekzempleron ĝis la londona zoo; ĉi tie ĝi fariĝis objekto de plua esplorado, el kio ĝi aperis sub la titoloj Pelagobatrachus Hookeri, Salamandrops maritimus, Abranchus giganteus, Amphiuma gigas kaj multaj aliaj. Kelkaj sciencistoj asertis, ke Pelagotriton Spencei identas kun *Cryptobranchus Tinckeri* kaj la salamandro de Mignard estas nenio alia ol *Andrias Scheuchzeri*; el tio rezultis multaj konfliktoj pri prioritato kaj aliaj nete sciencaj demandoj. Tiel okazis, ke fine naturscienco de ĉiu nacio havis siajn proprajn gigant-salamandrojn kaj sciencistoj plej furioze kontraŭbatalis la gigant-salamandrojn de aliaj nacioj. Tial ankaŭ ĝis la fino ne estis atingita, el la scienca vidpunkto, en la tuta granda salamandro-afero, sufiĉa klareco.

## 9. *Andrew Scheuchzer*

**K**aj okazis iun ĵaŭdon, kiam la londona zoo estis fermita por la publiko, ke sinjoro Tomaso Greggs, gardisto en la pavilono de saŭroj, estis puriganta ujojn kaj terariojn de siaj zorgatoj. Li estis solsula en fako de salamandroj, kie estis ekspoziciata Gigantsalamandro Japana, amerika helbendro, Andrias Scheuchzeri kaj multaj etaj tritonoj, trituroj, aksolotloj, amblistomoj, macaratoj, ripsalamandroj kaj branksalamandroj. Sinjoro Greggs svingis per ĉifono kaj balailo, fajfante dume Annie Laŭrie; kaj subite iu post li kvake diras:

”Rigardu, panjo.”

Sinjoro Tomaso Greggs turniĝis, sed neniu estis tie, nur helbendro ŝmacis en ŝlimo, kaj tiu granda nigra salamandro apogis sin per la antaŭaj piedetoj je rando de la ujo kaj tordis la trunkon. Io ŝajnis al mi, opiniis sinjoro Greggs kaj plu balais la plankon, ĝis ĝi siblis.

”Rigardu, salamandro,” aŭdiĝis post li.

Sinjoro Greggs rapide turniĝis; tiu nigra salamandro, tiu Andrias rigardis lin, palpebrumante per la malsupraj palpebroj.

”Hu, ĝi estas abomena,” diris subite la salamandro.  
”Iru for, karulo.”

Sinjoro Greggs malfermis la buŝon pro mirego. ”Kio?”

”Ĉu ĝi mordas?” kvakis la salamandro.

”Vi ... vi scias paroli?” balbutis sinjoro Greggs, ne kredante siajn sensojn.

”Mi timas ĝin,” elvortigis la salamandro. ”Panjo, kion ĝi manĝas?”

”Diru bonan tagon,” diris la mirigita sinjoro Greggs.

La salamandro ektordis la tutan korpon. ”Bonan tagon,” ĝi kvakis. ”Bonan tagon. Bonan tagon. Ĉu mi darfis doni kukon al ĝi?”

Sinjoro Greggs konfuzite enpoŝigis la manon kaj eltiris peceton da bulko. ”Jen, prenu.”

La salamandro prenis la bulkon per la piedeto kaj komencis ĝin ronĝi. ”Rigardu, salamandro,” ĝi gruntis kontente. ”Paĉjo, kial ĝi estas tiel nigra?” Subite ĝi mergiĝis en la akvon kaj elmergis nur la kapon. ”Kial ĝi estas en la akvo? Kial? Hu, kiel malbela ĝi estas!”

Sinjoro Tomaso Greggs gratis pro surprizo sian nukon. Ha, ĝi ripetas, kion ĝi aŭdas de la homoj. ”Diru Greggs,” li provis.

”Diru Greggs,” ripetis la salamandro.

”Sinjoro Tomaso Greggs.”

”Sinjoro Tomaso Greggs.”

”Bonan tagon, sinjoro.”

”Bonan tagon, sinjoro. Bonan tagon. Bonan tagon, sinjoro.” Ŝajnis, ke la salamandro ne povas satĝui la parolon; sed Greggs ne plu sciis, kion diri al ĝi; sinjoro Tomaso Greggs ne estis viro tro parolema. ”Nun fermu la faŭkon,” li diris, ”kaj kiam mi estos preta, mi instruos al vi paroli.”

”Nun fermu la faŭkon,” murmuris la salamandro. ”Bonan tagon, sinjoro. Rigardu, salamandro. Mi instruos al vi paroli.”

\*

Sed la direkcio de la zoo ne ŝatis vidi, kiam la gardistoj edukis siajn bestojn por prezentadoj; io alia estas elefanto, sed la ceteraj bestoj estas ĉi tie por instrukiado kaj ne por la cirko-prezentadoj. Tial sinjoro Greggs pasigis sian tempon en la fako salamandroj pli malpli sekrete, kiam neniu plua tie estis. Ĉar li estis vidvo, neniu miris pri lia solecado en la pavilono de saŭroj. Ĉiu homo havas siajn apartajn hobiajn. Cetere en la fakon de salamandroj venis nur malmultaj homoj; multe pli ĝuis ĝeneralan popularecon la krokodilo, sed Andrias Scheuchzeri pasigis siajn tagojn en relativa soleco.

Foje, kiam krepuskiĝis jam kaj la pavilonoj estis fermitaj, la direktoro de la zoo, Siro Karolo Wiggam, promenis tra kelkaj fakoj, por konvinkiĝi, ĉu ĉio estas en ordo.

Kiam li iris tra la fako de salamandroj, ekplaŭdis io en la ujo kaj iu kvake diris: "Bonan vesperon, sinjoro."

"Bonan vesperon," respondis la direktoro surprizite. "Kiu estas tie?"

"Pardonu, sinjoro," diris la kvakanta voĉo. "Tio ne estas sinjoro Greggs."

"Kiu tie?" ripetis la direktoro.

"Andy. Andrew Scheuchzer."

Siro Karolo iris pli proksimen al la ujo. Tie sidis nur rektiĝinta kaj senmova salamandro. "Kiu parolis ĉi tie?"

"Andy, sinjoro," diris la salamandro. "Kiu vi estas?"

"Wiggam," ekvortigis Siro Karolo mirigite.

"Ĝojigas min," diris Andrias ĝentile. "Kiel vi fartas?"

"Diable," ekkriegis Siro Karolo. "Greggs! Hej, Greggs!"

La salamandro svingiĝis kaj fulmorapide kaŝiĝis en la akvo.

En la pordon enfalis sinjoro Tomaso Greggs, senspira kaj maltrankvila. "Mi petas, sinjoro?"

"Greggs, kion ĝi signifas?" bruskis Siro Karolo.

"Ĉu io okazis, sinjoro?" balbutis sinjoro Greggs malcerte.

"Jen, la besto parolas!"

"Pardonu, sinjoro," diris sinjoro Greggs konsternite. "Tion ni ne faru, Andy. Milfoje mi diris al vi, ke vi ne ĝenu la homojn per via babilado. — Mi petas pardonon, sinjoro, neniam plu tio okazos."

”Ĉu vi estas tiu, kiu instruis la salamandron paroli?”

”Sed ĝi komencis, sinjoro,” defendis sin Greggs.

”Mi esperas, ke tio ne ripetiĝos, Greggs,” diris Siro Karolo severe. ”Mi atentis vin.”

\*

Post iom da tempo Siro Karolo sidis kun profesoro Petrov kaj parolis pri la tiel nomata besta inteligenteco, pri la kondiĉitaj refleksoj kaj pri tio, kiel popularaj opinioj trotaksas la racian agadon de bestoj. Profesoro Petrov esprimis siajn dubojn pri la Elberfeldaj ĉevaloj, sciantaj onidire ne nur kalkuli, sed ankaŭ potencigi kaj radiki; ja eĉ normala kaj klera homo ne scias radiki, diris la granda sciencisto. Siro Karolo rememoris la parolantan salamandron de Greggs. ”Mi havas ĉi tie salamandron,” li komencis hezite, ”ĝi estas la konata Andrias Scheuchzeri; kaj ĝi lernis paroli kiel papago.”

”Ekskludite,” diris la sciencisto. ”La salamandroj ja havas alkreskiĝintan langon.”

”Iru do rigardi ĝin,” diris Siro Karolo. ”Hodiaŭ estas tago de purigado, tial ne estos tie multaj homoj.” Kaj ili iris.

Antaŭ la enirejo al la salamandroj Siro Karolo haltis. El la interno aŭdeblis grincado de balailo kaj monotona voĉo ion silabumanta.

”Atendu,” flustris Siro Karolo Wiggam.



”ĈU ESTAS HOMOJ SUR MARSO?” silabis monoton-  
na voĉo. ”Ĉu tion legi?”

”Ion alian, Andy,” respondis la alia voĉo.

”ĈU VENKOS EN LA NUNJARA DERBIO PELHAM-  
BEAUTY AŬ GOVERNADOR?”

”Pelham-Beauty,” diris la alia voĉo. ”Sed legu.”

Siro Karolo malfermis silente la pordon. Sinjoro To-  
maso Greggs balais la plankon per balailo; kaj en base-  
neto kun marakvo sidis Andrias Scheuchzeri kaj malrap-  
ide kvake silabis el vesperĵurnalo, kiun ĝi tenis en la an-  
taŭaj piedetoj.

”Greggs,” ekvokis Siro Karolo. La salamandro svin-  
giĝis kaj malaperis sub la akvo.

Mr. Greggs faligis pro ektimo la balailon. ”Jes, sin-  
joro?”

”Kion tio signifas?”

”Mi petas pardonon, sinjoro,” balbutis la malfeliĉa  
Greggs. ”Andy laŭtlegas al mi, dum mi balaas. Kaj kiam  
ĝi balaas, tiam mi laŭtlegas al ĝi.”

”Kiu instruis tion al ĝi?”

”Ĝi mem alproprigis tion al si, sinjoro. Mi ... donas al  
ĝi mian ĵurnalon, por ke ĝi ne tiom parolu. Ĝi volis sen-  
ĉese paroli, sinjoro. Do mi opiniis, ke ĝi almenaŭ lernu  
klere paroli —”

”Andy,” ekvokis Siro Wiggam.

El la akvo elmergiĝis la nigra kapo. ”Jes, sinjoro,” ĝi ekkvakis.

”Profesoro Petrov venis rigardi vin.”

”Ĝojigas min, sinjoro. Mi estas Andy Scheuchzer.”

”De kie vi scias, ke via nomo estas Andreas Scheuchzeri?”

”Jen tie estas skribite, sinjoro. Andreas Scheuchzeri. Gilberta Insularo.”

”Kaj ĵurnalon vi legas ofte?”

”Jes, sinjoro. Ĉiutage, sinjoro.”

”Kaj kio plej interesas vin tie?”

”El la tribunala halo, ĉevalkonkursoj, futbalo —”

”Ĉu iam vi vidis futbalon?”

”Ne, sinjoro.”

”Aŭ ĉevalon?”

”Mi ne vidis, sinjoro.”

”Kial do vi legas tion?”

”Ĉar tio estas en la ĵurnalo, sinjoro.”

”Ĉu politiko vin interesas?”

”Ne, sinjoro. ĈU ESTOS MILITO?”

”Tion neniu scias, Andy.”

”GERMANIO KONSTRUAS NOVAN TIPON DE SUBMARŜIPOJ,” diris Andy zorgeme. ”MORTIGAJ RADIOJ POVAS ŜANĜI LA TUTAJN KONTINENTOJN AL DEZERTO.”

”Tion vi legis en ĵurnalo, ĉu?” demandis sinjoro Karolo.

”Jes, sinjoro. ĈU VENKOS EN LA NUNJARA DERBIO PELHAM-BEAUTZ AŬ GOBERNADOR?”

”Kion vi opinias, Andy?”

”Gobernador, sinjoro; sed sinjoro Greggs opinias, ke Pelham-Beauty.” Andy kapbalancis. ”AĈETU ANGLAJN VAROJN, sinjoro. PLEJ BONAJ ESTAS SNIDER-ŜELKOJ. ĈU VI JAM HAVAS NOVAN SESCILINDRAN TANCRED JUNIOR? RAPIDA, MALKARA, ELEGANTA.”

”Dankon, Andy. Tio sufiĉas.”

”KIU FILMAKTORINO PLEJ PLAĈAS AL VI?”

Profesoro Petrov hirtigis la harojn kaj barbon. ”Pardonu, Siro Karolo,” li murmuris, ”sed mi devas jam iri.”

”Bone, ni iru. Andy, ĉu vi havus ion kontraŭ tio, se mi sendus al vi kelkajn doktajn sinjorojn? Mi opinias, ke ili ŝatus paroli kun vi.”

”Ĝojigos min, sinjoro,” kvakis la salamandro. ”Ĝis la revido, Siro Karolo. Ĝis la revido, profesoro.”

Profesoro Petrov kuris anhelante kaj grumblante. ”Pardonu, Siro Karolo,” fine li diris, ”sed ĉu vi povus montri al mi iun beston, kiu *ne* legas ĵurnalon?”

\*

La doktaj sinjoroj estis Siro Bertram, D.M., profesoro Ebbigham, Siro Olivero Dodge, Julian Foxley kaj aliaj. Ni citas parton de la protokolo pri ilia eksperimento kun Andrias Scheuchzeri.

*Kiel vi nomiĝas?*

*Resp.: Andrew Scheuchzer.*

*Kiun aĝon vi havas?*

*Resp.: Tion mi ne scias. Ĉu vi volas aspekti junece? Portadu korseton Libella.*

*Kiun daton ni havas hodiaŭ?*

*Resp.: London. Bela vetero, sinjoro. Ĉi tiun sabaton konkursos Gibraltar en Epsom.*

*Kiom estas trioble kvin?*

*Resp.: Kial?*

*Ĉu vi scias kalkuli?*

*Resp.: Jes, sinjoro. Kiom estas dek sepoble dudek naŭ?*

*Lasu nin demandi, Andrew. Nomu al ni la anglajn riverojn.*

*Resp.: Tamizo ...*

*Pluajn?*

*Resp.: Tamizo.*

*La aliajn vi ne scias, ĉu? Kiu regas en Anglio?*

*Resp.: King George. God bless him.\**

*Bone, Andy. Kiu estas la plej granda verkisto?*

King George. God bless him — (angle) Reĝo Georgo. Dio benu lin.

*Kipling.*

*Tre bone. Ĉu vi legis ion de li?*

*Resp.: Ne. Kiel plaĉas al vi Mae West\*?*

*Prefere ni demandos vin, Andy. Kion vi scias el la angla historio?*

*Resp.: Henriko la Oka\*.*

*Kion vi scias pri li?*

*Resp.: La plej bela filmo el la lastaj jaroj. Fabela scenaranĝo. Grandioza spektaklo.*

*Ĉu vi vidis ĝin?*

*Resp.: Mi ne vidis ĝin. Ĉu vi volas ekkoni Anglion? Aĉetu al vi Ford Baby.*

*Kion plej ŝate vi volus vidi?*

*Resp.: Konkurson Kembriĝo-Oksfordo, sinjoro.*

*Kiom da mondpartoj estas.*

*Resp.: Kvin.*

*Tre bone. Kaj kiuj ili estas.*

*Resp.: Anglio kaj la ceteraj.*

*Kiuj estas la ceteraj?*

*Resp.: Bolŝevistoj kaj germanoj. Kaj Italio.*

*Kie estas la Gilbert-Insuloj?*

*Resp.: En Anglio. Anglio ne ligos siajn manojn sur kontinento. Anglio bezonas dek mil aviadilojn. Vizitu bordregionon de la suda Anglio.*

Mae West — amerika filmaktorino

Henriko la VIII-a — angla reĝo (1491-1547)

*Ĉu ni darfus rigardi vian langon, Andy?*

*Resp.: Jes, sinjoro. Purigu viajn dentojn per pasto Flit. Ĝi estas ekonomia, ĝi estas la plej bona, ĝi estas angla. Ĉu vi volas havi bonodoran spiron? Uzadu la paston Flit.*

*Ni dankas, tio sufiĉas. Kaj nun, diru al ni, Andy ...*

Kaj tiel plu. La protokolo pri la interparolo kun Andrias Scheuchzeri ampleksis dek ses plenajn paĝojn kaj estis publicita en The Natural Science. Je la fino de la protokolo la faka komisiono resumis la rezultojn de sia eksperimento jene:

1. Andrias Scheuchzeri, salamandro zorgata en la londona zoo, scias paroli, eĉ se iom kvake; ĝi disponas proksimume per kvarcent vortoj; ĝi diras nur, kion ĝi aŭdis aŭ legis. Pri la memstara pensado ĉe ĝi ja ne eblas paroli. Ĝia lango estas sufiĉe movebla; la voĉmembranojn ni ne povis sub la ekzistantaj kondiĉoj pli funde esplori.

2. La sama salamandro scias legi, sed nur vesperĵurnalojn. Ĝi havas intereson pri la samaj aferoj kiel mez-kvalita anglo kaj reagis al ili sammaniere, tio estas en direkto al la stabilaj, ĝeneralaj opinioj. Ĝia spirita vivo — se eblas pri ia paroli — konsistas ĝuste el imagoj kaj opinioj tiutempe kurantaj.

3. Ĝian inteligentecon nepre ne necesas trotaksi, ĉar neniel ĝi transpaŝas la inteligentecon de meza nuntempa homo.

Malgraŭ ĉi tiu sobra ekspertizo de la fakuloj la Parolanta salamandro iĝis sensacio de la londona zoo. Karulo Andy estis sieĝata de homoj, volantaj konversacii kun ĝi pri ĉio ebla, komencante de la vetero kaj finante ĉe la ekonomia krizo kaj politika situacio. Dume li ricevadis de siaj vizitantoj tiom da ĉokolado kaj bombonoj, ke ĝi peze malsaniĝis je stomaka kaj intesta kataroj. La fako salamandroj devis esti fine fermita, sed estis jam malfrue; Andrias Scheuchzeri, nomata Andy, pereis je sekvoj de sia populareco. Kiel oni vidas, gloro demoralizas ankaŭ salamandrojn.

## 10. *Kermeso en Nové Strašecí*

**S**injoro Povondra, pordisto en la domo de Bondy, pasigis siajn feriojn ĉifoje en sia naskiĝurbo. Postmorgaŭ estis okazonta kermeso; kaj kiam sinjoro Povondra eliris el la domo, kondukante sian okjaran Franciskon je la mano, tuta Nové Strašecí bonodoris de kukoj kaj trans la straton hastis virinoj kaj knabinoj, portantaj nebakitajn kukojn al la bakisto. Sur la placo jam konstruis siajn standojn du sukerajistoj, unu foirulo kun vitro kaj porcelano kaj iu bruanta sinjorino, vendanta ĉiaspecan merceron. Kaj poste estis tie tolbudo de ĉiuj flankoj kovrita per tukegoj. Eta viro, staranta sur eskalo, ĝuste estis firmiganta surskribon supre.

Sinjoro Povondra haltis por vidi, kio ĝi estos.

La seka vireto descendis desur la eskaletoj kaj kontente rigardis la pendigitan surskribon. Kaj sinjoro Povondra legis surprizite:

Kapitano J. van TOŬ  
kaj  
liaj dresitaj salamandroj



Sinjoro Povondra rememoris la grandan dikan viron kun la kapitanĉapo, kiun iam li enlasis al sinjoro Bondy. Nu, al kia fino li venis, povrulo, diris al si sinjoro Povondra kunsente; kapitano kaj nun li koĉeras tra la mondo kun tia aĉa cirko! Kia fortika, sana homo li estis! Mi estu rigardonta lin, opiniis sinjoro Povondra komplete.

Dume la eta vireto pendigis apud la enirejon de la buĉo alian surskribon:

### PAROLANTAJ SAŬROJ

!! La plej granda scienca sensacio !!

Enirpago Kĉs 2,— Infanoj en akompano  
de gepatroj nur duonon!

Sinjoro Povondra ekhezitis. Du kronojn kaj unu kronon por la bubo, tio estas sufiĉe multe. Sed Francisko bone lernas, kaj koni ekzotajn bestojn apartenas al la klereco. Sinjoro Povondra estis preta ion oferi por la klereco kaj tial li alpaŝis al la seka eta hometo. "Amiko," li diris, "mi volus paroli kun kapitano van Toĥ."

La vireto streĉis la bruston en la striita trikoto. "Tiu estas mi, sinjoro."

"Ĉu vi estas kapitano van Toĥ?" ekmiris sinjoro Povondra.

"Jes, sinjoro," diris la vireto kaj montris sur sia pojno tatuitan ankron.

Sinjoro Povondra enpense palpebrumis. Ĉu eblas, ke tiu kapitano tiom ŝrumpus? Tio ja ne eblas. "Nome, mi konas kapitanon van Toĥ persone," li diris. "Mi estas Povondra."

"Jen io alia," diris la vireto. "Sed la salamandroj estas fakte de kapitano van Toĥ, sinjoro. Garantiite aŭtentikaj aŭstraliaj saŭroj, sinjoro. Bonvolu eniri. Ĝuste komen-cigās granda prezentado," li grakis, levante la tukegon ĉe la enirejo.

"Venu, Francisko," diris la patro Povondra kaj eniris internen. Al la tableto rapide sidiĝis neordinare dika kaj granda sinjorino. Kia stranga paro, ekmiris sinjoro Povondra, pagante siajn tri kronojn. Interne de la budo estis nenio, nur iom malagrabra fetoro kaj lada bankuvo.

"Kie vi havas la salamandrojn?" demandis sinjoro Povondra.

"En la kuvo," diris la giganta damo indifere.

"Ne timu, Francisko," diris la patro Povondra kaj alpaŝis al la kuvo. Tie kuŝis en la akvo io nigra kaj inerta, granda kiel maljuna siluro; nur la haŭto post la kapo de ĉi tio iom ŝvelis kaj malŝvelis.

"Do jen estas tiu antaŭdiluva salamandro, pri kiu oni skribis en la ĵurnaloj," diris instrue la patro Povondra, ne eksterigante sian senreviĝon. (Denove ja mi igis min

trompi, li opiniis, sed la bubo bezonas tion scii. Domaĝe pri la tri kronoj!)

”Paĉjo, kial ĝi estas en akvo?” demandis Francisko.

”Ĉar la salamandroj vivas en akvo, ĉu vi scias?”

”Paĉjo, kaj kion ĝi manĝas?”

”Fiŝojn kaj iajn aĵojn,” opiniis la patro Povondra. (Ion ĝi devas manĝi.)

”Kaj kial ĝi estas tiel malbelega?” insistis Francisko. Sinjoro Povondra ne sciis, kion diri; sed en tiu momento eniris en la standon la eta vireto. ”Do mi petas, sinjorinoj kaj sinjoroj,” li komencis raŭke.

”Vi havas nur ĉi tiun solan salamandron?” demandis riproĉe sinjoro Povondra. (Se almenaŭ du ĉi tie estus, li opiniis, miaj elspezoj kvitiĝus).

”La alia mortaĉis,” diris la vireto. ”Do jen la mondkonata Andriaŝo, sinjorinoj kaj sinjoroj, rara kaj venena saŭro el la aŭstraliaj insuloj. En sia hejmlando ĝi plenkreskas ĝis alteco de homo kaj iradas per ambaŭ kruroj. Jen,” li diris kaj per vergo puŝis tion nigran kaj indiferentan, kio kuŝis senmove en la tino. Tio nigra svingiĝis kaj pene leviĝis el la akvo. Francisko iom retropaŝis, sed sinjoro Povondra premis lian manon, ne timu, mi estas kun vi.

Nun ĝi staras sur la postaj piedoj kaj per la antaŭaj piedetoj apogas sin je rando de la tino. La blankoj post la kapo konvulsie tikas kaj la nigra faŭko pene kaptas la

aeron. Ĝi havas ĝissange forfrotitan kaj tro lozan haŭton plenplenan je verukoj kaj la rondajn ran-okulojn, de temp' al tempo dolore kuntiriĝantaj per membranaj mal-supraj palpebroj.

"Kiel vi vidas, sinjorinoj kaj sinjoroj," daŭrigis raŭke la vireto, "ĉi tiu besto vivas en la akvo; tial ĝi estas ekipita per brankoj kaj pulmoj, por povi spiri, kiam ĝi suriras la bordon. Sur la malantaŭaj piedoj ĝi havas po kvin fingroj kaj sur la antaŭaj po kvar, sciante per ili prenadi diversajn objektojn. Jen." La besto kunpremis en la fingroj la vergon kaj tenis ĝin antaŭ si kiel plorindan sceptron.

"Ankaŭ ĝi scias fari nodon," anoncis la vireto, prenis la vergon de la besto kaj donis al ĝi malpuran ŝnureton. La besto tenis ĝin dum tempeto en la fingroj kaj poste vere faris nodon.

"Ankaŭ ĝi scias tamburi kaj danci," grakis la vireto kaj donis al la besto infantambureton kaj bastoneton. La besto kelkfoje ekbatis la tambureton kaj tordis la supran parton de la korpo; ĉe tio ĝi lasis fali la bastoneton en la akvon. "Fi, bestaĉo," bruskis la vireto kaj elakvigis la bastoneton.

"Kaj ĉi tiu besto," li aldiris, altigante solene la voĉon, "estas tiel inteligenta kaj talenta, ke ĝi scias paroli kiel homo." Kaj li manklakis.

”Guten morgen,” ekkvakis la besto, dolore palpebrumante per la malsupraj palpebroj. ”Bonan tagon.”

Sinjoro Povondra preskaŭ ektimis, sed Franciskon ĝi neniel aparte impresis.

”Kion ci diros al la ŝatata publiko?” demandis akre la vireto.

”Mi bonvenigas vin,” riverencis la salamandro; ĝiaj brankoj konvulsie kuntiriĝis. ”Willkommen. Benvenuti\*.”

”Ĉu ci scias kalkuli?”

”Mi scias.”

”Kiom estas ses oble sep?”

”Kvardek du,” kvakis la salamandro pene.

”Vidu, Francisko,” atentigis paĉjo Povondra, ”kiel ĝi scias kalkuli.”

”Sinjorinoj kaj sinjoroj,” kokerikis la vireto, ”vi mem povas meti demandojn al ĝi.”

”Do demandu ĝin pri io, Francisko,” insistis sinjoro Povondra.

Francisko embarase tordiĝis. ”Kiom fariĝas ok oble naŭ?” fine li elvortigis; versimile tion li opiniis la plej malfacila el ĉiuj eblaj demandoj.

La salamandro lante ekpalpebrumis. ”Sepdek du.”

”Kiu tago estas hodiaŭ?” demandis sinjoro Povondra.

”Sabaton,” diris la salamandro.

Benvenuti — (*itale*) bonvenon

Sinjoro Povondra mirigite kapskuetis. "Vere, kiel homo." — "Kiel nomiĝas ĉi tiu urbo?"

La salamandro malfermis la faŭkon kaj mallevis la okulojn. "Jam ĝi estas laca," klarigis haste la vireto. "Kiel ci diros al la gesinjoroj?"

La salamandro riverencis. "Mian respekton. Mi dankas ĝentile. Adiaŭ. Ĝis revido."

"Ĝi estas — ĝi estas stranga besto," miris sinjoro Povondra; sed ĉar tri kronoj tamen nur estas granda sumo, li aldiris: "Kaj nenion pluan vi havas por montri al la infano?"

La vireto embarase tiris sian malsupran lipon. "Jen ĉio," li diris. "Iam mi havis simietojn, sed kun ili estis tia afero," li rakontis necerte. "Eble mi povus montri al vi mian edzinon. Ŝi estas iama plej dika virino de la mondo. Marinja, venu ĉi tien!"

Marinja pene leviĝis. "Nu, kio?"

"Montru vin al la sinjoroj, Marinja."

La plej dika virino en la mondo kokete klinis la kapon, elŝovis antaŭen unu piedon kaj levetis jupon super la genuon. Estis videbla ruĝa lanŝtrumpo kaj en ĝi io ŝvela, potenca kiel ŝinko. "Perimetro de la kruro supre okdek kvar centimetrojn," klarigis la seka vireto, "sed nuntempe pro la konkurenco Marinja ne plu estas la plej dika virino en la mondo."

Sinjoro Povondra tiris la konfuzitan Franciskon eksteren. "Mankison," ĝi kvakis el la tino. "Venu denove. Auf Wiedersehen."

"Nu, Francisko," demandis sinjoro Povondra, kiam ili estis ekstere. "Ĉu vi instruiĝis?"

"Jes," diris Francisko. "Paĉjo, kial tiu sinjorino havas ruĝajn ŝtrumpojn?"

## 11. Pri homlacertoj

Estus certe troigo aserti, ke tiutempe oni parolis kaj skribis pri nenio alia ol pri la parolantaj salamandroj. Oni parolis kaj skribis ankaŭ pri venonta milito, pri ekonomia krizo, pri ligo-matĉoj, vitaminoj kaj modo; tamen pri la parolantaj salamandroj oni skribis tre multe kaj ĉefe tre malfake. Tial eminenta sciencisto profesoro doktoro Vladimír Uher (universitato de Brno) skribis por *Lidové noviny* artikolon, en kiu li rimarkigis, ke la ŝajna kapablo de Andrias Scheuchzeri artikulare paroli, tio estas papagi parolatajn vortojn, el scienca vidpunkto eĉ ne proksimume estas tiel interesa kiel kelkaj aliaj demandoj, rilatantaj ĉi tiun kuriozan amfibion. La scienca enigmo de Andrias Scheuchzeri kuŝas tute alie: ekzemple de kie ĝi devenas; kie estas ĝia prapatrujo, en kiu ĝi transvivis la tutajn geologiajn periodojn; kial ĝi restis tiel longe nekonata, se nun estas anoncata ĝia amasa ekzistado preskaŭ en la tuta ekvatora zono de Pacifiko. Ŝajnas, ke lastatempe ĝi multiĝas neordinare rapide; de kie aperis ĉi tiu ega vitaleco en la praaĝa terciara kreitaĵo, kiu ĝis antaŭ nelonge vivis tute kaŝatan, do probable ekstreme sporadan eĉ topografie izolitan



ekzistadon? Ĉu eble iel ŝanĝiĝis la vivkondiĉoj por ĉi tiu fosilia salamandro en direkto biologie favora, tiel ke por la rara miocena transvivaĵo komenciĝis nova, mirige sukcesa evolu-periodo? Poste ne estus ekskludite, ke Andrias multiĝos ne nur kvante, sed ankaŭ kvalite kaj nia scienco havos unikan okazon asisti almenaŭ ĉe unu animala specio potenca mutacian procezon in actu. Tio, ke Andrias Scheuchzeri kvakas kelkajn dekduojn da vortoj kaj ellernas kelkajn farojn, ŝajnantaj al laiko manifestiĝo de ia inteligenteco, tio estas, science konceptite, nenia miraklo; sed miraklo estas la potenca viv-elano, kiu tiel subite kaj abunde vivigis rigidiĝintan ekzistadon de la kreitaĵo evolue postrestinta kaj preskaŭ jam formortinta. Atentindaj estas ĉi tie kelkaj specialaj cirkonstancoj: Andrias Scheuchzeri estas la *sola* salamandro vivanta en la maro kaj — ankoraŭ pli frapanta — la *sola* salamandro aperanta en teritorio etiopia-aŭstralia, en la mita Lemurio. Ĉu eblus diri, ke la Naturo volas nun suplemente kaj preskaŭ haste devanci unu el viv-ebloj kaj formoj, kiun ĝi *en tiu sfero* forgesis aŭ ne povis plene disvolvi? Kaj plue: estus strange, ke en la oceana sfero, situanta inter grandegaj gigantsalamandroj japanaj unuflanke kaj la aleganaj aliflanke, tute ne ekzistus kuniga ĉenero. (Se ne ekzistus Andrias, ni devus ĝin ja *supozi* ĝuste en la lokoj, kie ĝi aperis; kvazaŭ simple ĝi plenigus la spacon, en kiu laŭ la geografiaj kaj evoluaj koneksoj

ĝi *devus* ekde pratempe esti. Estu kiel ajn, finiĝis la artikolo de la dokta profesoro, je ĉi tiu evolua reviviĝo de la miocena salamandro ni vidas kun respekto kaj mirigo, ke Genio de Evoluo sur nia planedo ankoraŭ eĉ ne proksimume fermis sian kreivan agadon.

Ĉi tiu artikolo aperis malgraŭ mallaŭta, sed energia decido de la redakcio, ke tia dokta babilado ja ne apartenas en ĵurnalo. Tuj sekve profesoro Uher ricevis leteron de iu leganto.

### **Moŝta sinjoro,**

pasintjare mi aĉetis domon sur la placo en Čáslav. Dum trarigardo de la domo mi trovis en la subtegmento kestoj kun ĉefe malnovaj raraj, plejparte sciencaj verkoj, kiel ekzemple du jarkolektojn de la Hýbl\*-gazeto *Hyllos* el la jaroj 1821-22, de Jan Svatopluk Presl\* La Mamularo, de Adalberto Sedláček\* Bazoj de la naturscienco aŭ de fiziko, dek naŭ jarkolektojn de la publika verko enciklopedia *Krok\** kaj dek tri jarkolektojn de la *Revuo de la*

Hýbl — Jan Hýbl ĉeĥa verkisto (1786-1834), eldoninto de la popularsciencia gazeto "Hyllos"

Presl — Jan Svatopluk Presl (1791-1849) eminenta ĉeĥa natursciencisto

Sedláček — Vojtěch Sedláček (1785-1836) ĉeĥa verkisto kaj sciencisto

*Krok* — la unua ĉeĥa scienca gazeto en la jaroj 1821-1840

*Ĉeĥa Muzeo*\*. En la traduko de Presl Dialogo pri la reversoj de la terkrusto de Cuvier (el la jaro 1834) mi trovis kiel legosignon eltranĉaĵon el iu malnova gazeto, en kiu estis presita raporto pri iaj strangaj saŭroj.

Kiam mi legis Vian rimarkindan artikolon pri la misteraj salamandroj, mi rememoris tiun legosignon kaj elserĉis ĝin. Mi opinias, ke ĝi povus Vin interesi, kaj tial kiel entuziasma amiko de la naturo kaj Via fervora leganto mi sendas ĝin al Vi.

Respektoplene

J. V. Najman

Sur la almetita gazet-deŝiraĵo estis citita nek titolo nek jaro; sed laŭ prestipo kaj ortografio ĝi devenis el la dudekaj ĝis tridekaj jaroj de la pasinta jarcento; ĝi estis ege flaviĝinta kaj sekputra, apenaŭ legebla. Jamjam profesoro Uher volis ĝin ĵeti en paperkorbon, sed iel li emociiĝis pro la antikveco de la presita folio; kaj li komencis ĝin legi; post tempeto li elspiris "Mil tondroj" kaj ekscitite ĝustigis sian okulvitron. Sur la eltranĉaĵo estis la jena teksto:

### PRI HOMLACERTOJ.

En iu fremdlanda gazeto ni legosciighas, ke certa kapitano (komandanto) de angla militŝipo, reveninta el

*Časopis českého muzea* — *Gazeto de la Ĉeĥa Muzeo*, aperanta en la jaroj 1827-1831

foraj landoj, donis raporton pri strangaj rampuloj, kiujn li trovis sur iu malgranda insulo en la maro Aŭstralia. Sur chi tiu insulo nome estas lago kun salakvo, sed kun la maro ne koneksanta, kaj ankaŭ tre malfacile alirebla, kie tiu kapitano kaj shipa vundflegisto ripozis. Jen eliras el la lago bestoj, lacerto-similaj, sed per ambaŭ kruroj kiel homoj pashantaj en grandeco de marhundo aŭ foko kaj sur la bordo aminde kaj strange ili movighis, kvazaŭ ili dancus. La komandanto kaj flegisto ekpafinte el pafiloj du bestojn chasis. Laŭdire ili havas korpon mukoza, sen tegumento kaj sen iaj skvamoj, tiel ke al salamandroj ili similas. Kiam morgaŭ ili venis por ili, ili devis la salamandrojn surloke pro granda fiodoro lasi kaj ordonis al la shipanoj, ke ili per retoj elchasu la lagon kaj paron da monstroj vivantaj transportu sur la shipon. La shipanoj elchasisinte la lagon ekstermis chiujn lacertojn en granda nombro kaj nur du ili altrenis sur la shipon, rakontante, ke la bestoj havas la korpon venenan kaj bruldolorigan kiel urtikoj. Poste oni metis ilin en barelojn kun marakvo por transporti ilin vivantajn en Anglujon. Sed jen! Kiam ili preterveturis la insulon Sumatro, tiam la kaptitaj lacertoj elrampinte el la bareloj kaj mem malferminte nokte lukojn en la subferdeko jhetighis en la maron kaj malaperis. Laŭ atesto de la komandanto kaj vundflegisto ili estas bestoj tre strangaj kaj ruzaj, pashantaj per du piedoj kaj strange bojantaj kaj shmacan-

taj, sed neniel al homoj dangheraj. Tial certe prave ni povus nomi ilin homlacertoj.

Ĝis tie la gazet-eltranĉaĵo. Mil tondroj, ripetis ekscitite profesoro Uher, kial ne estas ĉi tie ia dato aŭ titolo de la gazeto, el kiu ghin iam iu eltondis? Kaj kiu fremdlanda gazeto ghi estis, kiel nomighis tiu certa komandanto, kiu angla ŝipo ghi estis? Kaj kiu insuleto ghi estis en la Aŭstralia maro? Ĉu la homoj ne povis esti iom pli precizaj, kaj — nu jes, iom pli sciencaj? Ĝi estas ja historia dokumento de senmezura valoro. —

Insuleto en la maro Aŭstralia, jes. Lageto kun salakvo. Laŭ tio ghi estus koral-insulo, atolo kun pene alirebla sallaguno: ghuste loko, sur kiu povus tia fosilia besto konservighi, estante izolita antaŭ medio evolue progresinta kaj neghenata en sia natura rezervejo. Memkompreneble, ghi ne povis multighi, char en tiu lageto ghi ne trovus sufiche da nutrajho. Estas ja klare, diris al si la profesoro. Besto similanta al lacerto, sed sen skvamoj kaj pashanta per ambaŭ kruroj kiel homoj: do aŭ Andrias Scheuchzeri, aŭ alia salamandro al ghi tre parenca. Ni supozu, ke ghi estis nia Andrias. Ni supozu, ke la malbenaj ŝipanoj ghin en la lageto ekstermis, kaj ke nur unu paro atingis vivanta la ŝipon; la paro, kiu, mire, apud la insulo Sumatro fughis en la maron. Ghuste do sur la ekvatoro, sub kondichoĵ biologie maksimume favoraj kaj en medio donanta senliman nutrad-eblon. Chu

eblus, ke chi tiu shangho en la medio donus al la miocena salamandro tiun potencan evolu-impulson? Certas, ke ghi estis kutimighinta je la salakvo; ni imagu ghian novan restadejon, kiel trankvilan, fermitan margolfon kun richa nutrajh-abundo; kio okazos? La salamandro komencos viglegi, estante transigita en optimumajn cirkonstancojn, kun enorma vitala energio. Jen ghi, jubilis la sciencisto. La salamandro ekas evolui kun senbrida emo; ghi jhetighas en la vivon kiel frenezulo; ghi multi-ghas mirige, char ghiaj ovo kaj larvoj ne havas en la nova medio specifajn malamikojn. Ghi kolonias insulon post insulo, — strange ja estas, ke plurajn insulojn ghi dum sia migrado preteras. Alie ghi estas tipa migrado pro nutrad-kaŭzoj. — Kaj nun demando: kial ghi ne evoluis jam pli frue? Chu tio koneksas kun la fenomeno, ke en la etiopia-aŭstralia teritorio estas aŭ ghis nun estis konataj neniaj salamandroj? Chu eble estighis sur chi tiu teritorio dum la mioceno iaj shanghoj al la salamandroj biologie malfavoraj? Ebla ghi estas. Eble povis aperi specifa malamiko, kiu la salamandrojn simple ekstermis. Nur sur *unu* insulo, en enfermita lago konservighis la miocena salamandro — sed por la prezo, ke evolue ghi postighis; ghia evolua procedo haltis; kiel strechita elasta risorto ne povanta disvolvighi. Ne estas ekskludite, ke la Naturo havis kun chi tiu salamandro grandajn planojn, ke ghi estis evoluonta ankoraŭ plu kaj plu, alten kaj pli

alten, kiu scias kiel alten ... (Profesoro Uher sentis eĉ leĝeran frostadon ĉe ĉi tiu imago; kiu scias, ĉu Andrias Scheuchzeri ne estis iĝonta homo de la mioceno!)

Ha, vidu! Chi tiu *nefinevoluinta* besto subite venas en novan, senfine pli shancoplenan medion; la strechita evolu-risorto liberighas en ghi. — Kun kia viv-elano, kun kia miocena viglego kaj avido jhetighas Andrias al la evolu-vojo! Kiel febre ghi devancas la jarcentmilojn kaj milionojn da jaroj, kiujn ghi evolue preterpasis! Chu estas penseble, ke ghi kontentighos kun la evolu-grado, sur kiu ghi hodiaŭ trovighas? Chu ghi elvivighos per sia specia impeto, kies atestantoj ni estas — aŭ ghi estas sole sur sojlo de sia evoluo kaj pretighas nur nun gradighi — kiu povas hodiaŭ diri, kien?

Tio estis konsideroj kaj perspektivoj, kiujn profesoro d-ro Vladimír Uher skribis super la flaviĝinta eltondaĵo de la malnova gazeto, tremante pro intelektula entuziasmo de malkovrinto. Mi donos la artikolon en ĵurnalon, li diris al si, ĉar la organojn de la scienco neniu legas. Ĉiu sciu, kian grandan natur-okazaĵon ni spektas! Kaj al tio mi donos titolon: ĈU LA SALAMANDROJ HAVAS EST-ONTECON?

Sed la redakcio de Lidové noviny rigardis la artikolon de profesoro Uher kaj kapskuis. Denove la salamandroj! *Mi opinias, ke niaj legantoj havas la salamandrojn ĝis-*

kole. Estus jam tempo veni kun io alia. Kaj cetere tia erudicia rakontado ne konvenas en ĵurnalon.

Sekve de tio la artikolo pri evoluo kaj estonteco de la salamandroj tute ne aperis.



## 12. Salamandra sindikato

**P**rezidanto G. H. Bondy sonorigis kaj leviĝis. "Estimataj sinjoroj!" li komencis, "mi havas la honoron inaŭguri ĉi tiun eksterordinaran ĝeneralan kunvenon de Pacifika Eksport-Kompanio. Mi bonvenigas ĉiujn ĉeestantojn kaj dankas ilin pro ilia multnombra partopreno."

"Sinjoroj," li daŭrigis per emocia voĉo, "mi havas funebran devon anonci al vi afliktan informon. Kapitano Jan van Toĥ ne plu ekzistas. Mortis nia, por tiel diri, fondinto, patro de la feliĉa ideo ligi komercajn rilatojn kun miloj da insuloj en la ekstrema Pacifiko, nia unua kapitano kaj la plej fervora kunlaboranto. Li mortis komence de ĉi tiu jaro sur la ferdeko de nia ŝipo Ŝárka proksime al la Faning-Insulo, trafita de apopleksio, en deĵora funkcio. (Versimile li muĝegis, povrulo, preterpase ekpensis sinjoro Bondy.) Mi petas vin, honori helan memoron pri li per ekstaro."

La sinjoroj leviĝis, bruetante per seĝoj, kaj staris en solena silento, regataj de la komuna penso, ĉu la ĝenerala kunveno ne daŭros tro longe. (Povra amiko Vantoĥ, pensis kun sincera emocio G. H. Bondy. Kiel nun li as-

pektas! Versimile oni ĵetis lin desur lignotabulo en la maron — kiel ĝi ekplaŭdegis! Jes ja, li estis brava homo, kaj havis tiel bluajn okulojn —)

”Mi dankas al vi, sinjoroj,” li aldiris mallonge, ”ke vi rememoris kun tia pietato kapitanon van Toĥ, mian personan amikon. Mi petas direktoron sinjoron Volavka, ke li konigu al vi ekonomiajn rezultojn, kun kiuj P.E.K. povas ĉijare kalkuli. La ciferoj ankoraŭ ne estas definitivaj, sed mi petas, ne atendu, ke ili povus esence ŝanĝiĝi antaŭ la fino de la jaro. Mi petas do.”

”Tre estimataj sinjoroj,” komencis lirli sinjoro direktoro Volavka, kaj nun li estis en sia elemento. ”Stato sur perlo-merkato tre nekontentiga. Post la pasinta jaro, kiam la perlo-produktado kompare al la favora jaro 1925 estis preskaŭ dudekobligita, la perloj komencis katastrofe sinki en prezo ĝis je sesdek kvin procentoj. Tial la administra konsilantaro decidis tute ne lanĉi la ĉijaran perlo-rikolton sur la merkaton kaj stoki ĝin por tempo de pli vigla mendado. Bedaŭrinde, en la pasintjara aŭtuno la perloj eksmodiĝis, versimile tial, ĉar ili tiel ege mal-kariĝis. En nia Amsterdama filio nuntempe estas stokitaj pli ol ducent mil perloj dume preskaŭ nevendeblaj.”

”Kontraŭe,” lirlis plu direktoro Volavka, ”ĉijare la perloproduktado riske sinkas. Necesis rezigni je pluraj trovejoj, ĉar ilia rentabilitato ne valoras la penon, por ke oni navigadu al tiuj lokoj. Trovejoj malfermitaj antaŭ du-

tri jaroj ŝajnas esti pli-malpli forekspluatitaj. Tial la administra konsilantaro decidis turni la atenton al aliaj produktoj de la marprofundoj, al koraloj, konkoj kaj spongoj. Ni sukcesis tamen vigligi la merkaton por koral-juveloj kaj aliaj ornamaĵoj, sed el ĉi tiu konjunkturo dume profitas pli italaj koraloj ol la pacifikaj. Plue la administra konsilantaro studas la eblon de intensa fiŝado en la profundoj de Pacifiko. Ĉefe temas pri tio, kiel transporti la tieajn fiŝojn al la eŭropaj kaj amerikaj merkatoj; rezultoj laŭ la ĝisnunaj informoj ne estas tro esperigaj.”

”Sed kontraŭe,” la direktoro legis per voĉo iom laŭtigita, ”iom pli altan spezon etatas komerco kun diversa *akcesora varo*, kiel eksporto de tekstilaĵoj, emajlita vazaro, radioaparatoj kaj gantoj al la insularo de Pacifiko. Ĉi tiun negocadon eblas plu konstruadi kaj profundigi; jam ĉijare ĝi estos ligita kun defcito relative sensignifa. Memkompreneble estas ekskludite, ke P.E.K. pagus je fino de la jaro ian ajn dividendon por siaj akcioj; tial la administra konsilantaro jam anticipe anoncas, ke ĝi ĉi-foje rezignas je kia ajn tantiemoj kaj rekompencoj...”

Estiĝis iom longa silento. (Kiel aspektas tiu Fanning-Insulo, meditis G. H. Bondy. Li mortis kiel ĝusta maristo, la bonulo Vantoĥ. Domaĝe pri li, li estis brava viro. Kaj ankoraŭ li ne estis tiel aĝa ... apenaŭ pli aĝa ol mi ...) Al la parolo anonciĝis d-ro Hubka; ni citu plu la protoko-

lon de la eksterordinara ĝenerala kunveno de Pacifika Eksporta Kompanio:

D-ro HUBKA demandas, ĉu eble oni konsideru likvidon de P.E.K.

G. H. BONDY respondas, ke la administra konsilantaro decidiĝis ĝisatendi en ĉi tiu afero pluajn proponojn.

M. LOUIS BONENFANT riproĉas, ke transprenado de perloj en la trovejoj ne okazis pere de konstantaj reprezentantoj, daŭre surloke establita, kiuj kontrolus, ĉu la perloĉasado okazas sufiĉe intense kaj fake.

Direktoro VOLAVKA rimarkigis, ke la afero estis konsiderata, sed estis konstatite, ke per tio tro altiĝus la kostoj de la entrepreno. Necesus minimume tricent daŭre salajrataj agentoj; plue bonvolu konsideri, kiamaniere la agentoj estus kontrolataj, ĉu ili liveras ĉiujn trovitajn perlojn.

M.H. BRINKELAER demandas, ĉu eblas fidi la salamandrojn, ke fakte ili liveras *ĉiujn* trovitajn perlojn, kaj ĉu ili ne transdonas ilin al iu alia, ol al la personoj komisiitaj de la Kompanio.

G. H. BONDY konstatas, ke unuafoje ĉi tie publike aperas mencio pri la salamandroj. La ĝisnuna regulo estis citi neniajn precizajn detalojn ĉi-loke, kiamaniere la perloĉasado estas praktikata. Li atentigas, ke ĝuste tial estis elektita la neniel frapanta titolo Pacifika Eksport-Kompanio.

M. H. BRINKELAER prezentas demandon, ĉu eble *ne estas allaseble* paroli ĉi tie pri aferoj, koncernantaj la interesojn de la Kompanio kaj krome jam delonge konataj en la plej vasta publiko.

G. H. BONDY respondas, ke ĝi ne estas neallasebla, sed nova. Li bonvenigas, ke de nun ni povas paroli pli sincere. Je la unua demando de sinjoro Brinkelaer li povas komuniki, ke laŭ lia scio, ne necesas dubi pri la absoluta honesteco kaj laborkapacito de la salamandroj okupataj ĉe perloĉasado kaj koraloj. Sed ni devas kalkuli kun tio, ke la ĝisnunaj perlo-trovejoj estas aŭ estos en ne malproksima tempo esence elĉerpitaj. Kio koncernas la novajn trovejojn, mortis nia neforgesebla kunlaboranto kapitano van Toĥ, ĝuste dum navigado al insuloj ĝis nun ne ekspluatitaj. Dumtempe ni ne povas anstataŭi lin per viro kun samaj spertoj kaj de la same neskuebla honesteco kaj amo al la afero.

COL. D.W. BRIGHT plene rekonas la meritojn de la mortinta kapitano van Toĥ. Sed li atentigas, ke la kapitano, kies foriron ni ĉiuj bedaŭras, la menciitajn salamandrojn tro dorlotis. (Konsento.) Ja ne necesis liveri al la salamandroj tranĉilojn kaj alian ilaron en la unuaranga kvalito, kiel faris tion la mortinta van Toĥ. Ne necesis nutri ilin tiel multekoste. Estis eble konsiderinde malmaltigi la kostojn ligitajn kun la vivtenado de la sala-

mandroj kaj tiel altiĝi la profiton de niaj entreprenoj. (Vigla aplaŭdo.)

Vicprezidanto J. GILBERT konsentas kun kolonelo Bright, sed rimarkigas, ke dum la vivo de kapitano van Toĥ ĝi ne estis farebla. Cptn. van Toĥ asertis, ke li havas al la salamandroj siajn personajn devoligojn. Pro diversaj kaŭzoj nek eblis nek estis konsilinde neglekti tiudirekte la dezirojn de la maljuna viro.

CURT VON FRISCH demandas, ĉu eblas la salamandrojn alimaniere okupi kaj eventuale pli profitdone ol per la perloĉasado. Oni konsideru ilian naturan, tiel dirante kastoran talenton konstrui digojn kaj aliajn konstruaĵojn sub la akvo. Eble oni povus uzi ilin por profundigo de havenoj, konstruado de moleoj kaj aliaj teknikaj taskoj sub la akvo.

G. H. BONDY anoncas, ke tion la administra konsilantaro intense pripensas; tiudirekte certe malfermiĝas grandaj ebloj. Li mencias, ke la nombro de salamandroj en posedo de la Kompanio estas nun proksimume ses milionoj; konsiderante, ke paro da salamandroj havas ĉiujare, ni diru, cent larvojn, venontjare ni povos disponi eĉ kun tricent milionoj da salamandroj, en dek jaroj tio estos numeroj vere astronomiaj. G. H. Bondy demandas, kion la Kompanio intencas entrepreni kun tia grandega kvanto da salamandroj, kiujn jam nun oni devas en la troplenaj salamandrejoj kompletige manĝigi pro manko

de la natura manĝaĵo per kopro, terpomoj, maizo kaj simile.

C. VON FRISCH demandas, ĉu la salamandroj estas manĝeblaj.

J. GILBERT: Nepre ne. Ankaŭ ilia haŭto taŭgas por nenio.

M. BONENFANT direktas demandon al la administra konsilantaro, kion ĝi entute intencas entrepreni.

G. H. BONDY (leviĝas). "Estimataj sinjoroj, ni kunvo-  
kis ĉi tiun eksterordinaran ĝeneralan kunvenon tial, por  
sincere atentigi vin je la ekstreme malfavoraj ŝancoj de  
nia Kompanio, kiu, permesu al mi tion rememorigi, en  
la pasintaj jaroj fiere etatis dividendon de dudek ĝis du-  
dek tri procentoj, krom bone dotitaj rezervoj kaj amor-  
tizoj. Nun ni staras sur dislimo; al la entreprenad-ma-  
niero, kiu pruviĝis al ni en la pasintaj jaroj, praktike ve-  
nis fino; restas al ni nenio alia, ol serĉi novajn vojojn."  
(Bonege!)

"Mi dirus, ke eble ĝi estas avizo de la sorto, ke ĝusta-  
tempe forpasis de ni nia eminenta kapitano kaj amiko J.  
van Toĥ. Kun lia persono estis ligita tiu romantika, bela  
kaj — sincere dirite — iom naiva negoceto kun perloj. Mi  
opinias tion finita ĉapitro de nia entrepreno; ĝi havis,  
por tiel diri, sian ekzotan ĉarmon, sed ne konvenis en la  
moderna tempo. Estimataj sinjoroj, perloj neniam povas  
esti objekto grandskala, horizontale kaj vertikale dis-

membrigita entreprenado. Por mi persone la afero kun perloj estis nur eta divertissement-” (Maltrankvilo.) ”Jes, sinjoroj, divertissement, kiu al vi kaj al mi enspezigas nemalmulte da mono. Krome, komence de nia entreprenado la salamandroj havis ian, mi dirus, ĉarmon de noveco. Tricent milionoj da salamandroj jam ne havos tiun ĉarmon.” (Rido.)

”Mi diris, novajn vojojn. Dum vivis mia bona amiko kapitano van Toĥ, estis ekskludite, doni al nia entreprenado alian karakteron, ol tiun, kiun mi nomus *stilo de kapitano van Toĥ*.” (Kial?) ”Ĉar mi havas tro da belgusto, sinjoro, por miksi diversajn stilojn. Stilo de kapitano van Toĥ estis, mi dirus, stilo de aventuraj romanoj. Tio estis stilo de Jack London, Joseph Conrad kaj de la aliaj. Malnova, ekzota, kolonia, preskaŭ heroa stilo. Mi ne neas, ke ĝi min siamaniere ĉarmis. Sed post la morto de kapitano van Toĥ ni ne rajtas daŭrigi en la aventura kaj juneca epiko. Tio, kio estas antaŭ ni, ne estas nova ĉapitro, sed nova koncepto, sinjoroj, tasko por nova kaj esence alia imagipovo.” (Vi parolas pri tio kiel pri romano!) ”Jes, sinjoro, vi pravas. Min interesas la komerco kiel artiston. Sen ia arto-talento, sinjoro, vi elpensos neniam ion novan. Ni devas esti poetoj, se ni volas konservi la funkciadon de la mondo.” (Aplaŭdo.)

G. H. BONDY riverencis. ”Sinjoroj, kun bedaŭro mi fermas la ĉapitron, mi povas diri, van Toĥecan; en ĝi ni



trapasis ĉion, kio en ni mem estis infaneca kaj aventura. Estas jam tempo finigi la fabelon pri la perloj kaj koraloj. Sindibado estas morta, sinjoroj. La demando estas, kion nun.” (Ĝuste pri tio ni demandas vin!) ”Do, bone, sinjoro: bonvolu preni kraĵonon kaj skribu. Ses milionoj. Ĉu skribite? Multipliku ilin per kvindek. Tio estas tricent milionoj, ĉu? Multipliku denove per kvindek. Tio estas dek kvin miliardoj. Kaj nun, sinjoroj, konsilu al mi aŭdeble, *kion ni faros post tri jaroj kun dek kvin miliardoj da salamandroj.* Per kio ni okupos ilin, kiel ni manĝigos ilin kaj tiel plu.” (Do lasu ilin mortaĉi!) ”Jes, sed ĉu tio ne estus domaĝo, sinjoro? Ĉu vi ne opinias, ke ĉiu unuopa salamandro prezentas ian ekonomian valoron, valoron de laborforto, atendanta en ĝi sian uzon? Sinjoroj, kun ses milionoj da salamandroj ni povas iel tiel mastrumi. Kun tricent milionoj estos malpli facila. Sed dek kvin miliardoj da salamandroj, tio nepre superkreskos nian kapon. La salamandroj forvoros la Kompanion. Tiel statas.” (Por tio vi responsos! Vi komencis la tutan aferon kun la salamandroj!)

G. H. BONDY levis la kapon. ”La respondecon, sinjoroj, plene mi akceptas. Kiu volas, povas tuj seniĝi de la akcioj de Pacifika Eksport-Kompanio. Mi estas preta elpagi por ĉiu akcio ...” (Kiom?) ”Plenan valoron, sinjoro.” (Ekscito. La prezidantaro koncedas dekminutan paŭzon.)

Post la paŭzo petas parolon H. BRINKELAER. Li esprimas sian kontenton, ke la salamandroj tiel fervore multiĝis, per kio grandiĝas la posedaĵo de la Kompanio. Sed, sinjoroj, estus nepra absurdaĵo ilin senutile bredi; se ni mem ne havas por ili komforman laboron, mi proponas en nomo de la akciula grupo, ke la salamandroj estu *vendataj* simple kiel laborfortoj al kiu ajn, kiu volus entrepreni ian laboron en la akvo aŭ sub la akvo. (Aplaŭdo.) Manĝigo de salamandro kostas kelkajn centimojn tage; se oni vendus ĉiun salamandro-paron, ni diru, po cent frankoj, kaj se laborsalamandro eltenus, ni supozu, nur unu jaron, tia investo lude amortiziĝos al ĉiu entreprenanto. (Voĉoj de konsento.)

J. GILBERT konstatas, ke la salamandroj atingas aĝon konsiderinde pli altan ol unu jaron; kiel longe fakte ili vivas, pri tio ni ankoraŭ ne havas sufiĉe longajn spertojn.

H. BRINKELAER korektas sian proponon en tiu direkto, ke prezo po unu salamandro-paro estu fiksita je tricent frankoj loko haveno.

S. WEISSBERGER demandas, kiajn laborojn fakte la salamandroj povus plenumadi.

Direktoro VOLAVKA: Pro sia natura instinkto kaj sia *neordinara* teknika lernemo la salamandroj taŭgas speciale por konstruado de akvodigoj, remparoj kaj ondo-rompiloj, por profundigado de havenoj kaj kanaloj, por forigado de malprofundaĵoj kaj ŝlim-aluvioj kaj por libe-

rigado de akvovojoj; ili povas sekurigi kaj reguligi la marbordojn, vastigi firman teron kaj simile. En ĉiuj ĉikazoj temas pri amaslaboroj, postulantaj centojn kaj milojn da laborfortoj; temas pri laboroj tiel ampleksaj, ke eĉ la moderna tekniko neniam kuraĝos ilin entrepreni, dum ĝi ne havos je dispono laborfortojn treege malkarajn. (Bonege! Brave!)

D-ro HUBKA oponas, ke per vendado de salamandroj, kiuj eventuale povus reproduktiĝi ankaŭ sur novaj lokoj, la Kompanio perdos sian monopolon je la salamandroj. Li proponas, ke al entreprenantoj de akvokonstruaĵo *estu luigataj* laborkolonioj de salamandroj bone ekzercitaj kaj kvalifikitaj, kondiĉe ke ilia eventuala fraĵo plu apartenos al la Kompanio.

Direktoro VOLAVKA atentigas, ke ne eblas gardi en la akvo milionojn, eventuale miliardojn da salamandroj, des pli ilian fraĵon. Bedaŭrinde jam multaj salamandroj estis ŝtelitaj por zoologiaj ĝardenoj kaj menaĝerioj.

COL. D. W. BRIGHT: Oni vendu, respektive luigu nur salamandro-masklojn, por ke ili ne povu multiĝi ekster la salamandraj kovejoj kaj rezervejoj, kiuj estas posedaĵo de la Kompanio.

Direktoro VOLAVKA: Ni ne povas aserti, ke la salamandraj farmo-rezervejoj estas *posedaĵo* de la Kompanio. Ne eblas posedi aŭ farmi pecon da marfundo. Jura demando, al kiu fakte apartenas salamandroj vivantaj en

la suverenaj akvoj, ni diru, de Ŝia Majesto reĝino de Nederlando, estas tre necerta kaj povas konduki al multaj konfliktoj. (Maltrankvilo.) En plejparto da kazoj ni havas garantiitan eĉ ne rajton de fiŝado; ni fondadis niajn salamandro-farmojn, sinjoroj, sur la Pacifikaj insuloj fakte neleĝe. (Kreskanta maltrankvilo.)

J. GILBERT respondas al Col. Bright, ke laŭ la ĝisnuna spertoj izolitaj salamandraj maskloj perdas post iom da tempo la vigecon kaj laborvaloron; ili estas maldiligentaj, indiferentaj kaj ofte pereas pro nostalgio.

VON FRITSCH demandas, ĉu eblus la merkat-salamandrojn kasti aŭ steriligi.

J. GILBERT: Tio estus tro multekosta; simple ni ne povas malhelpi, ke la venditaj salamandroj ne plu multiĝu.

S. WEISSBERGER postulas kiel membro de la Societo por Protekto de la Bestoj, ke la estonta vendado de la salamandroj okazu pli humane kaj laŭ maniero, kiu ne ofendus la homajn sentojn.

J. GILBERT dankas por ĉi tiu temo; memkompreneble, la kaptado kaj transportado de la salamandroj estos konfidita nur al la ekzercita personaro sub deca inspektado. Kompreneble ni ne povas garantii, kiel traktos la salamandrojn la entreprenantoj, kiuj ilin aĉetos.

S. WEISSBERGER deklaras, ke li estas kontentigita per la certigo de la vicprezidanto J. Gilbert. (Aplaŭdo.)

G. H. BONDY: "Sinjoroj, anticipu ni rezignu la ideon, ke en la estonteco ni konservus monopolon je la salamandroj. Bedaŭrinde, laŭ la validaj reguloj ni ne povas ilin patentigi por ni." (Rido.) "Nian privilegian pozicion en la komercado kun salamandroj ni devas kaj ankaŭ povas sekurigi alie; memkomprene, necesa premiso estas, ke niajn negocojn ni ekprenos en la alia stilo kaj en multe pli granda mezuro ol ĝis nun." (Aŭdu!) "Jen kuŝas, sinjoroj, tuta dosiero da provizoraj interkonsentoj. La administra konsilantaro proponas, ke estu kreita nova vertikala trusto sub titolo Salamander-Syndicate. Membroj de la Salamandra Sindikato estus krom nia Kompanio difinitaj grandaj entreprenoj kaj finance fortaj grupoj: ekzemple iu konzerno fabrikanta specialan *patentitan* metalan ilaron por la salamandroj —" (Ĉu vi opinias MEAS-on?) "Jes, sinjoro, mi parolas pri MEAS. Plue kemia kaj nutraĵ-industria karteloj, kiuj produktos malkaran patentitan furaĝon por la salamandroj; grupo da transport-kompanioj, kiu — utiligante la ĝisnunajn spertojn — patentigos specialajn higienajn cisternojn por transporto de la salamandroj; bloko da asekurejoj, kiuj transprenos asekuron de la aĉetitaj bestoj kontraŭ lezo kaj pereco kiel dum la transporto, tiel sur laborlokoj; plue aliaj interesatoj industriaj, eksportaj kaj financaj, kiujn pro gravaj kaŭzoj provizore ni ne nomos. Sufiĉos eble al vi, sinjoroj, se mi diros, ke ĉi tiu Sindikato dispo-

nus komence per kvarcent milionoj da pundoj sterlingaj.” (Ekscito.) ”Jen la dosiero, amikoj, nuraj kontraktoj, kiujn sufiĉas nur subskribi, por ke estiĝu unu el la plej grandaj ekonomiaj organizaĵoj de nia tempo. La administra konsilantaro petas vin, sinjoroj, ke vi plenrajtigu ĝin por fondo de ĉi tiu giganta konzerno, kies tasko estos racia bredado kaj ekspluatado de la salamandroj.” (Aplaŭdo kaj protestaj voĉoj.)

”Sinjoroj, bonvolu konsciiĝi al vi la avantaĝojn de tia kooperado. La Salamandro-Sindikato liverados ne nur salamandrojn, sed ankaŭ ĉian ilaron kaj furaĝon por ili, tio estas maizon, amelaĵojn, bovsebon kaj sukeron por miliardoj da aldone manĝigataj bestoj; plue transporton, asekuron, veterinaran inspekton kaj tiel plu, ĉion por minimumaj tarifoj, kiuj garantios al ni se ne la monopolon, do almenaŭ absolutan superecon super ĉia estonta konkurenco, kiu volus vendi salamandrojn. Provu tion iu, sinjoroj; longe li ne konkurencos kontraŭ ni.” (Brave!) ”Sed ne nur tion. La Salamandro-Sindikato liveros ĉian konstru-materialon por subakvaj laboroj, kiujn la salamandroj faros; tial post ni staras la peza industrio, cemento, konstru-ligno kaj ŝtono —” (Ankoraŭ vi ne scias, kiel la salamandroj laboros!) ”Sinjoroj, en ĉi tiu momento laboras dek du mil salamandroj en la sajgona haveno super novaj dokoĵ, basenoĵ kaj moleoj.” (Tion vi ne diris al ni!) ”Ne. Tio estas la unua pogranda eksperimen-

to. Ĉi tiu eksperimento, sinjoroj, sukcesis maksimume kontentige. Nuntempe la estonteco de la salamandroj estas ekster ĉia dubo.” (Entuziasma aplaŭdo.)

”Sed ne nur tio, sinjoroj. Per tio la taskoj de la Salamandro-Sindikato eĉ ne proksimume estas elĉerpitaj. La Salamandro-Sindikato serĉados en la tuta mondo laboron por milionoj da salamandroj. Ĝi liveros planojn kaj ideojn por superregado de la maroj. Ĝi propagandos utopiojn kaj gigantajn revojn. Ĝi liverados projektojn por novaj bordoj kaj kanaloj, por digoj ligantaj kontinentojn; por tutaj ĉenoj da artinsuloj cele de transoceaniaj flugoj, por novaj kontinentoj konstruitaj meze de oceanoj. Tie kuŝas la estonteco de la homaro. Sinjoroj, kvar kvinonoj de la tersurfaco estas kovritaj de la maro; nekontesteble estas iom multe; la surfaco de nia mondo, la mapo de la maroj kaj landoj estas korektenda. Ni donos al la mondo mar-laboristojn, sinjoroj. Tio ne plu estos la stilo de kapitano van Toĥ; la aventuran rakonton pri perloj ni anstataŭos per himna laborkanto. Aŭ ni bazaristos aŭ ni estos kreantoj; sed se ni ne pensos en kontinentoj kaj oceanoj, ni ne kapablis por niaj ebloj. Ĉi tie, mi petas, oni parolis, por kia prezo oni vendu salamandro-paron. Mi ŝatus, ke vi pensu en tutaj miliardoj da salamandroj, en milionoj kaj milionoj da laborfortoj, en transŝovo de la terkrusto, en novaj genezoj kaj novaj geologiaj periodoj. Jam nun ni povas paroli pri eston-

taj Atlantidoj, pri malnovaj kontinentoj, kiuj etendiĝos plu kaj plu en la mondan maron, pri Novaj Mondo, kiujn la homaro mem konstruos al si. — Pardonu, sinjoroj, eble ĝi ŝajnas al vi utopia. Jes, ni eniras fakte en la Utopion. Jam ni estas en ĝi, amikoj. Nur ni devas finpensi la estontecon de la salamandroj laŭ teknika flanko — ” (Kaj ekonomia!)

”Jes, aparte laŭ la ekonomia flanko. Sinjoroj, nia Kompanio estas tro malgranda, por mem ekspluati miliardojn da salamandroj; por tio ni sufiĉas nek finance nek politike. Se ŝanĝiĝos la mapo de la maroj kaj landoj, ankaŭ la grandpotencoj havos intereson pri la afero, sinjoroj. Sed pri tio ni ne parolos; ni ne mencios altajn faktorojn, kiuj jam nun sintenas al la Sindikato tre pozitive. Tamen mi petas vin, sinjoroj, ke vi ne okullasu la senmezuran signifon de la afero, pri kiu vi balotos.” (Entuziasma, longe daŭranta aplaŭdo. Bonege! Brave!)

\*

Tamen antaŭ la baloto pri la Salamandro-Sindikato necesis promesi, ke je la akcio de Pacifika Eksport-Kompanio oni elpagos en la kuranta jaro almenaŭ dekprocentan dividendon debete de la rezervoj. Post tio okdek sep procentoj de la akcioj voĉdonis por kaj nur dek tri kontraŭ. Sekve de tio la propono de la administra konsilan-



taro estis akceptita. Salamander-Syndicate enpaŝis en la vivon. Al G. H. Bondy oni gratulas.

”Ege bele vi diris tion, sinjoro Bondy,” laŭdis la maljuna Sigi Weissberger. ”Tre bele. Sed diru al mi, sinjoro Bondy, kiel vi venis al la ideo?”

”Kiel?” diris G. H. Bondy distre. ”Fakte, por diri al vi la veron, sinjoro Weissberger, tio estis pro la maljuna van Toĥ. Li tiel favoris siajn salamandrojn... — Kion li dirus je tio, povrulo, se ni lasus tiujn liajn Tapa-boys mortaci aŭ ekstermi!”

”Kiajn Tapa-boys?”

”Nu, la mizerajn salamandrojn. Nun almenaŭ oni traktos ilin bone, kiam ili havas ian valoron. Kaj por nenio alia taŭgas tiuj bestaĉoj, sinjoro Weissberger, nur por entrepreni per ili ian utopion.”

”Tion mi ne komprenas,” opiniis sinjoro Weissberger. ”Ĉu jam vi vidis iun salamandron, sinjoro Bondy? Fakte mi ne scias, kio ĝi estas. Mi petas vin, kiel ĝi aspektas?”

”Tion mi vere ne diros al vi, sinjoro Weissberger. Ĉu mi scias, kio estas salamandro? Kial mi sciu tion? Ĉu mi havas mi la tempon, kiel io aspektas? Mi devas ĝoji, ke la Salamandro-Sindikaton ni havas sub tegmento.”

(SUPLEMENTO)

## Pri la seksa vivo de la salamandroj

Unu el la ŝatataj aktivecoj de la homa spirito estas imago, kiel foje en la fora estonteco aspektos la mondo kaj la homaro, kiuj teknikaj mirakloj estos faritaj, kiuj socialaj problemoj solvitaj, kiom multe progresos la scienco kaj socia organizo kaj tiel plu. Tamen plejparto de ĉi tiuj Utopioj ne forgesas havi tre viglan intereson pri la demando, kiel en tiu pli bona, progresinta aŭ almenaŭ teknike pli perfekta mondo funkcios institucio tiel malnova, sed konstante populara, kiel la seksa vivo, generado, amo, edzeco, familio, virina demando kaj simile. Tiu direkte vidu la koncernan literaturon, kiel de Paul Adam\*, H. G. Wells, Aldous Huxley kaj multaj aliaj.

Invokante ĉi tiujn ekzemplojn, la aŭtoro opinias sia devo, rigardante futuron de nia terglobo, ke ankaŭ li pri-traktu, kiel en la estonta mondo de la salamandroj formiĝos la seksa ordo. La seksa vivo de Andrias Scheuchzeri en la fundamentaj trajtoj kompreneble koincidas kun la generado de la aliaj vosthavaj amfibioj; ne ekzistas kopulacio en vera senco de la vorto, la femalo demetas ovojn en kelkaj etapo, fekundigitaj ovojn evoluas en la akvo kiel larvoj kaj tiel plu; pri tio oni povas lege sciiĝi en ĉiu biontologio. Nur ni mencias kelkajn kurio-Adam — Paul Adam, franca romanverkisto (1862-1920)

zaĵojn, kiuj tiurilate estis rimarkitaj ĉe Andrias Scheuchzeri.

Komence de aprilo, rakontas *H. Bolte*, la maskloj asociiĝas al la femaloj; en ĉiu seksperiodo masklo restas ĉe la sama femalo kaj neniel ŝin forlasas dum kelkaj tagoj. En tiu tempo masklo akceptas neniun nutraĵon, dum la femalo montras konsiderindan voremon. La masklo trapelas ŝin tra la akvo kaj klopodas meti sian kapon strikte al la ŝia. Kiam li sukcesis, li antaŭŝovas iomete sian faŭkon antaŭ ŝian muzelon, eble por malebligi ŝian fuĝon, kaj rigidiĝas. Tiel, tuŝante sin nur per la kapoj, dum iliaj korpoj formas proksimume tridekgradan angulon, ambaŭ bestoj naĝas senmove unu apud la alia. De temp'al tempo la masklo komencas tiel potence tordiĝi, ke li frapas per siaj koksoj tiujn de la femalo; poste li denove rigidiĝas, larĝe diskurinta, tuŝante nur per sia faŭko la kapon de la elektita kunulino, kiu dume indiferente voras ĉion renkontatan. Ĉi tiu, se ni povas diri, kiso daŭras kelkajn tagojn; iam la femalo forimpetas por nutraĵo, kaj tiam la masklo ŝin persekutas, videble tre ekscitita, eĉ furiozanta. Fine la femalo rezignas la pluan reziston, ne plu fuĝas, kaj la paro ŝvebas senmove en la akvo, simila al nigraj, al si alligitaj ŝtupoj. Tiam komencas trakuri la korpon de la masklo spasmaj ekstretoj, dum kiuj li eligas en la akvon abundan, iom gluan spermon. Tuj poste li forlasas la femalon kaj rampas inter ŝtonojn, ekstre-

me elĉerpiĝinta; en tiu tempo oni povas detranĉi de li piedon aŭ voston, sen liaflanka defenda reago.

Dume la femalo restas iom da tempo en sia rigida, senmova pozicio; poste ŝi forte fleksiĝas kaj komencas eligi el la kloako ovoĉenon, garnitan de gelatena kovraĵo; ofte ŝi helpas al si per la postaj piedoj, same kiel faras tion bufoj. Estas kvardek ĝis kvindek ovojoj kaj ili pendas desur la korpo de la femalo kiel tufoj. Kun ili la femalo naĝas al ŝirmitaj lokoj kaj fiksas ilin al algoj, fukoj aŭ nur sur ŝtonojn. Post dek tagoj la femalo demetas duan serion da ovojoj, proksimume dudek ĝis tridek, ne renkontiĝinte en tiu tempo kun la masklo; versimile la ovojoj estis fekundigitaj rekte en ŝia kloako. Kutime post pluaj sep aŭ ok tagoj okazas la tria kaj kvara demetadoj po dek kvin eĉ po dudek ovojoj, ĉiuj fekundigitaj, el kiuj post unu ĝis tri semajnoj eloviĝas viglaj larvoj kun branĉformaj blankoj. Jam post unu jaro ĉi tiuj larvoj finkreskas je adultaj salamandroj kaj povas plu reproduktiĝi.

Kontraŭe fraŭlino *Blanche Kistemaekers* observis du femalojn kaj unu masklon Andrias Scheuchzeri en kaptiteco. Dum la frajado la masklo aliĝis nur al unu el la femaloj kaj persekutis ŝin sufiĉe brutale; ŝin eskapantan li batis per fortaj vostobatoj. Li ne ŝatis vidi, kiam ŝi estis akceptanta nutraĵon, kaj de la nutraĵo li ŝin forpuŝadis; videblis, ke li volas ŝin havi nur por si kaj simple ŝin tiranis.

Kiam li eligis sian laktumon, li ĵetiĝis al la dua femalo kaj volis ŝin forvori; li devis esti eligita el la ujo kaj alilokita. Malgraŭ tio ankaŭ la dua femalo demetis *fekundigitajn* ovojn, entute sesdek tri. Ĉe ĉiuj tri bestoj fraŭlino Kistemaekers rimarkis, ke la kloak-randoj estis tiutempe konsiderinde ŝvelaj. Ŝajnas do, skribas fraŭlino Kistamaekers, ke ĉe Andrias la fekundigo okazas nek per kopulacio nek per frajado, sed pere de io, kion oni povas nomi *seksa medio*. Kiel videblas eĉ ne necesas la dumtempa kuniĝo por fekundigo de la ovojn. Tio inspiris la junan esplorantinon al pluaj interesaj eksperimentoj. Ŝi apartiĝis ambaŭ seksulojn; kiam poste venis la konvena momento, ŝi elpremis el la masklo la spermon kaj donis ĝin en la akvon al la femaloj. La femaloj komencis demetadi ovojn *fekundigitajn*. En plua eksperimento filtris fraŭlino Blanche Kistemaekers la masklan spermon kaj la filtraĵon ŝi *senigis de la spermokorpuskloj* (ĝi estis klara, acideta fluidaĵo) kaj aldonis al la femaloj en la akvon; la femaloj ankaŭ nun komencis demetadi la ovojn, ĉiu proksimume kvindek, el kiuj plejparto estis *fekundigita* kaj el kiuj eloviĝis normalaj larvoj. Ĝuste tio alkondukis fraŭlinon Kistemaekers al grava nocio de la *seksa medio*, formanta memstaran transiron inter partenogenezo kaj la seksa reproduktiĝo. La fekundigo de la ovojn okazas simple per kemia ŝanĝo de la medio (ia acidigo, kiun oni ankoraŭ ne sukcesis arte krei), per ŝanĝo, kiu iamaniere koneksas kun

la maskla seksa funkcio. Sed ĉi tiu funkcio fakte ankaŭ ne estas necesa; tio, ke la masklo kuniĝas kun la femalo, estas evidente ekvivado post la pli aĝa evolugrado, kiam la fekundigado ĉe Andrias okazadis same kiel ĉe aliaj salamandroj. Tiu asociigo estas fakte, kiel fraŭlino Kistemackers ĝuste rimarkigas, ia heredita iluzio de la patreco; fakte la masklo ne estas patro de la larvoj, nur ia certa, esence tute ne persona kemia faktoro de la seksa medio, kiu mem estas la vera fekundiganto. Se ni havus en unu baseno cent kuniĝintajn parojn de Andrias Scheuchzeri, ni opinius, ke tie okazas cent individuaj generaj aktoj; reale, ĝi estas akto unu, kaj nome kolektiva seksigo de la difinita medio, aŭ pli precize dirite: ia superacidigo de la akvo, je kiu la maturaj ovojoj de Andrias aŭtomate reagas per evoluo je la larvo. Konstruu arte la nekonatan acidan faktoron kaj la maskloj ne necesos. Tiel la seksa vivo de mirinda Andrias montriĝas al ni kiel Granda Iluzio; ĝia erotika pasio, ĝia edzeco kaj seksa tiranado, ĝia dumtempa fideleco, ĝia pezmensa kaj lanta volupto, ĉio ĉi estas fakte superflujaj, ekvivaj, preskaŭ simbolaj faroj, akompanantaj, aŭ tiel dirante ornamantaj la propran nepersonan masklan akton, per kiu estas kreita fekundiga seksa medio. Aparta indiferento de la femaloj, kun kiu ili akceptas la sencelan, frenezan *personan* amindumadon de la maskloj, klare atestas, ke en la svatado la femaloj instinkte sentas nuran formalan ceremonion aŭ enkondukon al la

propra nupta akto, en kiu *ili* sekse kuniĝas kun la fekundiga medio; ni dirus, ke la femalo de Andrias ĉi tiun aferstaton komprenas pli klare kaj travivas pli objektive, sen erotikaj iluzioj.

(La eksperimentojn de fraŭlino Kistemaeckers kompletigis interes-maniere la klera abato *Bontempelli*. Li sekigis kaj pulvorigis la laktumon de Andrias kaj aldonis ĝin al la femaloj en la akvon; ankaŭ nun la femaloj komencis demetadi fekundigitajn ovojn. La sama rezulto estis, kiam li sekigis kaj pulvorigis la seksorganojn de Andrias, aŭ kiam li ekstraktis ilin per alkoholo aŭ dekoktis, kaj verŝis la ekstraktaĵon en ujon kun femaloj. La samo kun la sama rezulto ripetigis kun ekstrakto de la cerba hipofizo kaj eĉ kun sekrecioj de haŭtglandoj de Andrias, elpremitaj en tempo de pasiiĝo. En ĉiuj ĉi kazoj la femaloj komence ne reagis je la ingrediencoj; nur post tempeto ili ĉesis sin peli por nutraĵo kaj fiksiĝis senmove, ja eĉ rigide en la akvo, kaj post kelkaj horoj komenciĝis la elpuŝado de gelatenaj, proksimume kiel faboj grandaj ovojn.)

En ĉi tiu konekseco oni ankaŭ menciuj strangan ceremonion, nomatan *danco de salamandroj*. (Ĉi tie ne estas opiniata la Salamandro-Danco, kiu tiutempe enmodiĝis, nome en la plej bona societo, kaj estis proklamita de episkopo Hiram kiel "la plej obscena danco, pri kiu entute iam li aŭdis.") Nome dum la plenlunaj vesperoj (ekster

la pariĝo-tempo) eliradis Andriasoj, *sed nur maskloj*, sur la bordon, cirkle sidiĝis kaj komencis strangmaniere, ondmovite tordi la supran duonon de la korpo. Ĝi estis movo ankaŭ dum la aliaj cirkonstancoj karakteriza por ĉi tiuj grandaj salamandroj; sed dum la diritaj "dancoj" ili fordonadis sin al ili sovaĝe, pasie ĝis elĉerpiĝo, kiel dancantaj derviŝoj. Kelkaj sciencistoj opiniis ĉi tiun frenezan tordiĝadon kaj popaŝadon kulto al la luno, do religia ceremonio; male la aliaj vidis en ĝi dancon esence erotikan kaj klarigadis ĝin ĝuste per tiu stranga seksa ordo, pri kiu jam estis parolite. Ni diris, ke ĉe Adrias Scheuchzeri la propra fekundiganto estas la tiel nomata seksa medio, kiel amasa kaj nepersona peranto inter la masklaj kaj femalaj individuoj. Estis ankaŭ dirite, ke la femaloj akceptas ĉi tiun nepersonan seksrilaton multe pli realisme kaj memkompreneble ol la maskloj, kiuj — versimile pro la instinkta maskla vantemo kaj konkereco — volas konservi almenaŭ ŝajnon de la seksa triumfo kaj tial ili *ludas* la svatadon kaj la geedzan posedon. Ĝi estus unu el la plej grandaj erotikaj iluzioj, interese korektata ĝuste de tiuj grandaj masklaj solenoj, kiuj onidire estas nenio alia ol la instinkta strebado konsciigi sin mem kiel la Masklan Kolektivon. Per la amasdancado onidire estas superata la atavisma kaj sensenca iluzio pri la maskla seksa individuismo; ĉi tiu tordiĝanta, ravita,



freneza greco estas nenio alia ol la Opa Masklo, Kolektiva Fianĉo kaj Granda Kopulacianto, prezentanta sian gloran nupto-dancon kaj fordonanta sin al la granda geedziĝa ceremonio — sub stranga ekskludo de la femaloj, kiuj dume indifereinte ŝmacas pro la manĝata fiŝeto aŭ sepio. La fama *Charles J. Powell*, nominta ĉi tiujn salamandrajn solenojn Danco de la Maskla Principo, skribas plue: "Ĉu en la komunaj masklaj ceremonioj ne enestas mem la radiko kaj fonto de la mirinda salamandra kolektivismo? Ni konsciigu al ni, ke la faktajn bestkomunecojn ni trovas nur tie, kie la vivo kaj evoluo de la specio ne baziĝas sur seksa paro: ĉe abeloj, formikoj kaj termitoj. Komunecon de la abeloj oni povas esprimi vorte: Mi, La Patrino Abelujo. Komunecon de salamandraj komunumoj oni povas esprimi tute alie: Ni, la Vira Principo. Nur ĉiuj maskloj en la difinita momento kune ek-sudas el si la fekundigan seksan medion, estas la Granda Masklo, kiu penetras sinojn de la femaloj kaj abunde multigas la vivon. Ilia patreco estas kolektiva; tial ilia tuta natureco estas kolektiva kaj manifestiĝas per la komuna agado, dum la femaloj, seniĝinte de la ovo-de-metado, vivas ĝis la proksima printempo vivon pli-mapli distran kaj solecan. Nur la maskloj estas komunumo. Nur la maskloj praktikas komunajn taskojn. Ĉe neniu animala genro la femalo ludas tiel malĉefan rolon kiel ĉe

Andriaso; ili estas ekskluditaj el la komuna aktiveco kaj pri ĝi ankaŭ ili montras nenian intereson. *Ilia* momento estiĝas, kiam la Vira Principo saturas ilian medion per acideco kemie apenaŭ perceptebla, sed tiel vivpenetra, ke ĝi efikas ankaŭ dum ega diluo per la tajdo. Estas, kva-zaŭ la Oceano mem fariĝus masklo fekundiganta sur siaj bordoj milionojn da ĝermoj.”

”Malgraŭ ĉia kok-orgojlo,” daŭrigas Charles J. Powell, ”la naturo donis ĉe la plejparto da animalaj genroj la viv-superecon plivere al la femaloj. La maskloj ekzistas ĉi tie por sia volupto kaj tial, por mortigadi; ili estas arogantaj kaj ekscitiĝemaj unuopuloj, dum la femaloj prezentas la genton mem en ĝia forto kaj stabilaj virtoj. Ĉe Andriaso (kaj parte ankaŭ ĉe homo) la rilato estas esence alia; per kreo de maskla komuneco kaj solidareco la masklo akiras evidente biologian superecon kaj difinas la evoluon de la specio en multe pli granda mezuro ol la femalo. Eble ĝuste pro la distinge maskla evolu-direkto validiĝas ĉe Andriaso tiel forte la *teknika*, do tipe vira talento. Andriaso estas denaska teknikisto inklinanta al amasa entreprenado; ĉi tiuj sekundaraj *viraj* seksaj signoj, nome la teknika talento kaj senco por organizo, evoluas en ĝi rekte antaŭ niaj okuloj tiel rapide kaj sukcese, ke ni devus paroli pri natur-miraklo, se ni ne sci-us, kiel potenca viv-faktoro estus ĝuste la seksaj deter-

minantoj. Andrias Schechzeri estas animal faber\* kaj eble jam en vidatingebla tempo ĝi teknike superos eĉ la homon mem, kaj ĉion ĉi nur per forto de la natura fakto, ke ĝi kreis la netan masklan komunecon.”

animal faber — (*lat.*) laborantaj estaĵoj

Libro dua

# LAŬ ŜTUPOJ AL CIVILIZACIO

## 1. *Sinjoro Povondra legas ĵurnalojn*

**E**kzistas homoj kolektantaj poŝtmarkojn, kaj aliaj kolektantaj inkunablojn. Sinjoro Povondra, pordisto en la domo de G. H. Bondy, longe ne trovis sencon de sia vivo; jarojn li hezitis inter intereso pri la praepokaj tomboj kaj pasio por eksterlanda politiko; iun vesperon tamen subite aperis al li, kio ĝis nun mankis al li, por ke lia vivo estu plena vivo. Grandaj aferoj kutime venas neatendite.

Tiuvespere sinjoro Povondra legis ĵurnalon, sinjorino Povondrová estis riparanta la ŝtrumpojn de Francisko, kaj Francisko ŝajnis, ke li lernas enfluojn de Danubo desur la maldekstra bordo. Estis agrabla silento.

”Por freneziĝo,” ekmumuris sinjoro Povondra.

”Nu, kio,” demandis sinjorino Povondrová tredante fadenon.

”Nu, kun salamandroj,” diris patro Povondra. ”ĝuste mi legas, ke en la lasta kvaronjaro estis venditaj sepdek milionoj da pecoj.”

”Tio estas multe, ĉu?” diris sinjorino Povondrová.

”Tion mi opinias. Ĝi estas ja kolosa cifero, panjo. Konsideru, sepdek milionoj!” Sinjoro Povondra kapskuis.

”Per tio oni devas gajni fabelajn sumojn! — Kaj kiom da laboro nun estas farata,” li aldiris post mallonga meditado. ”Jen mi legas, kiel ĉie galope oni konstruas novajn landojn kaj insulojn. Mi diras al vi, nun la homoj povas konstrui al si tiom da kontinentoj, kiom ili volos. Kia granda afero, patrino. Mi diras al vi, ke ĝi estas pli granda progreso ol la malkovro de Ameriko.” Sinjoro Povondra super tio enpensiĝis. ”Nova historia epoko, ĉu ci scias? Jes, jes, panjo, ni vivas en la granda tempo.”

Sekvis denove longa hejma silento. Subite patro Povondra impete ekfumegis la pipon. ”Ĉe ekpenso, se ne mi estus, la afero ne estus okazinta!”

”Kiu afero?”

”La negocado kun salamandroj. La Nova Epoko. Konsiderante ĉion, fakte mi estis tiu, kiu ĉion ekfunkciigis.”

Sinjinino Povondrová okullevis de la trua ŝtrupo. ”Mi petas vin, kiel?”

”Ĉar tiam mi enlasis tiun kapitanon al sinjoro Bondy. Se mi ne anoncus lin, neniam renkontiĝus tiu kapitano kun sinjoro Bondy. Se ne mi estus, panjo, estus nenio el la afero. Tute nenio.”

”Eble la kapitano trovus iun alian,” oponis sinjinino Povondrová.

En la piptubo de sinjoro Povondra malestime ekrasilis. ”Vi tion komprenas! Tian aferon scias fari nur G. H. Bondy. Karulin’, tiu vidas pli foren, ol kiu ajn alia. La aliaj

vidus en tio eble nur stultaĵon aŭ trompon; sed nepre ne sinjoro Bondy! Li havas ja nazon, mia kara!” Sinjoro Povondra enpenŝiĝis. ”Tiu kapitano nome, kiel nur li nomiĝis, Vantoĥ, tute ne aspektis laŭ tio. Tia dika provinca onklo. Alia pordisto dirus al li, kien, kien, la sinjoro ne estas hejme, kaj entute; sed mi havis ian antaŭsenton, aŭ kion. Mi anoncos lin, mi diris al mi; sinjoro Bondy eble insultos min, sed tion mi surprenos kaj lin anoncos. Ĉiam mi diras, pordisto devas havi flarsenton por homoj. Iam sonorigas homo aspektanta kiel barono, kaj dume li estas agento kun fridujoj. Kaj alfoje venas ia dika patreto kaj jen, kio enestas en li. Oni devas esti sperta pri homoj,” meditis patro Povondra. ”El tio vi vidas, Francisko, kion oni povas fari ankaŭ en subalterna posteno. Sekvu la ekzemplon kaj penu ĉiam plenumi vian devon, kiel mi mem tion faris.” Sinjoro Povondra solene kaj emocie kapskuis. ”Mi povis forrifuzi la kapitanon kaj ŝpari al mi la ŝtuparon. Alia pordisto pufiĝus kaj brufermus la pordon antaŭ lia nazo. Kaj tiel li vanigus tian fabelan progreson en la mondo. Memoru, Francisko, se ĉiu homo plenumus sian devon, estus hej en la mondo. Kaj aŭskultu atente, kiam mi diras ion al vi.”

”Jes, paĉjo,” murmuris Francisko malfeliĉe.

Patro Povondra ektusis. ”Donu al mi tondilon, panjo. Tion mi eltondu el la ĵurnalo, por havi foje post mi ian memoraĵon.”

Tiel do okazis, ke sinjoro Povondra komencis amasiĝi eltondaĵojn pri la salamandroj. Pro lia kolekta pasio ni dankemas por multo da materialo, kiu alie forgesiĝus. Li eltondadis kaj kaŝadis ĉion, kion nur kie ajn li trovis presite pri la salamandroj; ne estu sekretigite, ke post iaj komencaj malfacilaĵoj li ellernis dezertigi en sia preferata kafejo ĵurnalojn, en kiuj estis ia ajn mencio pri salamandroj, kaj atingis specialan, preskaŭ sorĉistan virtuozecon en tio, kiel li sciis diskrete elŝiri el ĵurnalo la respektivan paĝon kaj malaperigi en poŝo ĝuste antaŭ la okuloj de sinjoro ĉefkelnero. Kiel konate, ĉiuj kolektantoj pretas ŝteli aŭ murdi, se temas pri tio, akiri novajn aĵojn por sia kolekto; sed tio neniel malaltigas ilian moralan karakteron.

Nun lia vivo havis sencon, ĉar ĝi estis vivo de kolektanto. Ĉiuvespere li ordigis kaj tralegis siajn eltondaĵojn antaŭ la indulgaj okuloj de sinjorino Povondrová, scianta, ke ĉiu viro estas parte frenezulo kaj parte eta infano; prefere li ludu per la eltondaĵoj, ol iradu en gastejon kaj kartludu. Ŝi faris en komodo eĉ lokon por liaj skatoloj, kiujn li mem kungluis por sia kolekto; ĉu eblas postuli pli de edzino kaj mastrino?

G. H. Bondy foje ĉe ia okazo mem estis surprizita pro enciklopediaj scioj de sinjoro Povondra en ĉio, kio koncernas la salamandrojn. Sinjoro Povondra iom honteme konfesis, ke li kolektas ĉion kio nur ie estas presita pri



salamandroj, kaj montris al sinjoro Bondy siajn skatolojn. G. H. Bondy afable laŭdis lian kolekton; kion fari, nur grandaj sinjoroj scias esti tiel degnaj, kaj nur potencaj homoj povas feliĉigadi la aliajn, kvankam tio kostas ilin eĉ ne unu heleron; grandaj sinjoroj havas tion entute bone. Ekzemple sinjoro Bondy simple ordonis, ke al Povondra oni sendadu el la buroo de la Salamandro-Sindikato ĉiujn eltondaĵojn pri salamandroj, kiujn oni ne bezonas arkivi; kaj la feliĉega kaj iom konsternita sinjoro Povondra ricevadis ĉiutage tutajn pakaĵojn da dokumentoj en ĉiuj lingvoj de la mondo, el kiuj ĵurnaloj presitaj en la cirila, greka alfabetoj, skriboj hebrea, araba, ĉina, bengala, tamula, java, birma aŭ en taalik, plenigadis lin per pia respekto. "Kiam nur mi ekpensas," li diradis super ili, "ke ĉio-ĉi sen mi ne estus!"

Kiel jam dirite, la kolekto de sinjoro Povondra konservis multe da historia materialo pri la tuta historio kun salamandroj; sed per tio ne estas dirite, ke ĝi povus kontentigi sciencan historiiston. Unue, sinjoro Povondra, ricevinta nenian fakan klarecon en la historiaj helpsciencoj kaj en arkivaj metodoj, aldonis al siaj eltondaĵoj nek font-indikon, nek la respektivan jarkalkulon, tial plejparte ni ne scias, kiam kaj kie tiu aŭ alia dokumento aperis. Due pro la superabundo de la materialo, kiu amasiĝis sub liaj manoj, sinjoro Povondra konservis ĉefe nur la longajn artikolojn, kiujn li opiniis gravaj, dum la

koncizajn informojn kaj depeŝojn simple li forĵetadis en karbujon; sekve de tio konserviĝis al ni pri ĉi tiu tuta periodo nekutime malmulte da informoj kaj faktoj. Trie, en la aferon funde intervenis la mano de sinjorino Povondrová; kiam la skatoloj de sinjoro Povondra konsiderinde pleniĝis, silente kaj sekrete ŝi eligadis parton da eltondaĵoj kaj forbruligis ilin, kio ripetiĝis kelkfoje jare. Ŝi savis nur tiujn, da kiuj ne tro venadis, kiel eltondaĵojn presitajn en la malabara, tibeta aŭ kopta skriboj; tiuj restis deponitaj preskaŭ komplete, sed pro iaj vakuoj en nia klereco ne tro ili utilas al ni. La materialo, al ni disponebla por historio de la salamandroj estas do esence malkompleta, simile kiel katastro-libroj el la oka jarcento post Kristo, aŭ kiel verkaro de la poetino Sapfo\*; nur hazarde konserviĝis al ni dokumentaro pri tiu aŭ alia sektoro de tiu granda mond-okazado, kiun tamen malgraŭ ĉiaj interspacoj ni provos resumi sub la titolo Laŭ ŝtupoj al civilizacio.

Sapfo — eminenta greka poetino, vivinta ĉ. la jaro 600 a.K.

## ***2. Laŭ la ŝtupoj al civilizacio*** **(Historio de la salamandroj<sup>1</sup>)**

**E**n la historia epoko, anoncita per la profetaj vortoj de G. H. Bondy en la memorinda ĝenerala kunveno de Pacifika Eksport-Kompanio pri la komenciĝanta utopio<sup>2</sup>, ni povas jam mezuri la historian okazadon nek per jarcentoj nek per jardekoj, kiel estis en la ĝisnuna historio de la mondo, sed per kvaronjaroj, en kiuj aperas trimestraj ekonomiaj statistikoj<sup>3</sup>. En la nuntempo nome produktado de la historio estas, se ni povas tiel diri, entreprenata pogrando; tial la ritmo de la historio nekutime (laŭ takso proksimume kvinoble) urĝiĝas. Hodiaŭ simple ni ne povas atendi kelkajn jarcentojn, por ke okazu kun la mondo io bona aŭ malbona. Ekzemple la migrado de nacioj, kiu iam treniĝis dum kelkaj generacioj, per la nuna organizo de transporto estus farebla entute dum tri jaroj; alie oni povus per ĝi neniom gajni. Same estas kun la likvido de la Romia regno, kun la koloniigo de kontinentoj, la genocido de indianoj kaj tiel plu. Ĉio ĉi nun estus farebla senkompare pli rapide, se ĝi estus konfidita al kapitale fortaj entreprenantoj. Tiu-direkte la grandega sukceso de la Salamandro-Sindika-

to kaj ĝia potenco influo al la mondhistorio sendube montras la vojon al la estonto.

La historio de salamandroj estas do karakterizata dekomence per tio, ke ĝi estis bone kaj racie organizita; la unua, sed ne sola merito pri tio apartenas al la Salamandro-Sindikato, kiu tiel dirante tag' post tago konkeradis por la salamandroj novajn kontinentojn kaj bordojn, malgraŭ tio, ke ĝi devis superi multajn obstaklojn, brem-santaj ĉi tiun ekspancion<sup>4</sup>. La trimestraj informoj de la Sindikato montras kiel iom post iome estas loĝigataj de salamandroj la havenoj hindaj kaj ĉinaj; kiel la salamandra koloniigado inundas la bordojn de Afriko kaj transiĝas sur la amerikan kontinenton, kie baldaŭ estiĝas novaj, la plej modernaj salamandraj kovejoj en la Meksikia Golfo; kiel krom ĉi tiuj larĝaj koloniigaj ondoj estas ekspedataj negrandaj grupoj da salamandroj kiel pionira avangardo de la estonta eksporto. Tiel ekzemple la Salamandro-Sindikato donace sendis al la nederlanda Waterstaat mil unuarangajn salamandrojn; al la urbo Marsejlo ĝi donacis sescent salamandrojn por purigo de la Malnova Haveno, kaj simile alie. Simple diference de la homa loĝigado de la mondo la vastiĝo de la salamandroj okazis laŭplane kaj grandskale; se ĝi estus lasita al la naturo, ĝi treniĝus certe dum jarcentoj kaj jarmiloj; jes, jes, la naturo ne estas kaj neniam estis tiel entreprenema kaj celhava, kiel la homa produktado kaj ko-

merco. Ŝajnas, ke la vigla mendado influis ankaŭ la fekundecon de la salamandroj; la frajo-produkto el unu femalo altiĝis ĝis cent kvindek larvoj jare. Certaj regulaj perdoj, kiujn kaŭzis la ŝarkoj al la salamandroj, preskaŭ tute ĉesis, kiam la salamandroj estis armitaj pere de subkvaj pistoloj kun dumdumaj ŝargoj por defendo kontraŭ rabofiŝoj<sup>5</sup>.

La propagandado de salamandroj memkomprene ne okazis ĉie same glate; ie la konservativaj rondoj akre protestis kontraŭ ĉi tiu enkondukado de novaj laborfortoj, vidante en ili nelojalan konkurencon por la homa laboro<sup>6</sup>; unuj esperimis timon, ke la salamandroj, nutrantaj sin per marfaŭno, endanĝerigos la fiŝadon; aliaj asertis, ke ili per siaj submaraj kuŝuloj kaj koridoroj subfosas la bordojn kaj insulojn. Verdire, estis sufiĉe da homoj, rekte avertantaj kontraŭ la enkondukado de salamandroj; sed de ĉiam okazas, ke ĉiu nova maniero kaj ĉia progreso renkontiĝas kun rezisto kaj malkonfido; tiel estis kun la fabrikmaŝinoj kaj ripetiĝis kun la salamandroj.

Aliloke okazis miskomprenoj alispecaj <sup>7</sup>, sed dank' al efika helpo de la mondgazetaro, ĝuste aprecinta kiel enormajn eblojn de komerco kun la salamandroj, tiel la profitdonan kaj grandskalan gazetanoncadon, kiu estis ligita kun ĝi, instalado de salamandroj en ĉiuj partoj de

la mondo estis bonvenigata plejparte kun vigla intereso, jes, ankaŭ kun entuziasmo<sup>8</sup>.

La komerco kun salamandroj estis plejparte en la manoj de la Salamandro-Sindikato, kiu ĝin realigadis per siaj propraj, por tiu celo speciale konstruitaj cistern-ŝipoj; la centro de la komerco kaj ia Salamandro-borso estis Salamander-Building\* en Singapuro<sup>9</sup>.

Pro la kreskanta spezo en eksporto de la salamandroj estiĝis memkomprene ankaŭ nigra komerco; La Salamandro-Sindikato ne povis kontroli kaj administri ĉiujn salamandrajn kovejojn, kiujn la mortinto kapitano van Toĥ dissemis ĉefe ĉe etaj kaj foraj insuloj de Mikronezio, Melanezio kaj Polinezio, tial multaj salamandro-golfoj estis lasitaj al si mem. Sekve de tio krom la racia bredado de la salamandroj kreiĝis en konsiderindaj dimensioj ankaŭ ĉasado de sovaĝaj salamandroj, rememoriganta multilate iaman foko-kaptadon; ĝi estis ĉasado iom neleĝa, sed ĉar ne ekzistis leĝoj por la protekto de salamandroj, ĝi estis persekutata maksimume kiel nerajtigita enpaŝo sur teritorion de tiu aŭ alia ŝtata suvereneco; ĉar la salamandroj sur tiuj insuloj ege multiĝis kaj ie-tie kaŭzis al la indiĝenoj damaĝojn sur kampoj kaj fruktokulturoj, estis ĉi tiuj sovaĝaj ĉasoj silente opiniataj natura reguligo de la salamandra populacio.<sup>10</sup>

Salamander-Building — (*angle*) Salamandro konstruaĵo

Krom la bone organizita komerco kun salamandroj kaj la vasta gazetara propagando la plej grandan meriton pri disvastiĝo de la salamandroj havis grandega ondo de la teknika idealismo, kiu en tiu epoko inundis la tutan mondon. G. H. Bondy ĝuste antaŭvidis, ke la homa spirito nun komencos labori kun la tutaj novaj kontinentoj kaj novaj Atlantidoj. Dum la tuta Salamandro-Epoko regis inter la teknikistoj vigla kaj fruktodona polemiko, ĉu oni konstruu pezajn kontinentojn kun ferbetonaj bordoj aŭ polderan firman teron, ŝutitan el la marsablo. Preskaŭ ĉiutage aperis novaj gigantaj projektoj; italaj inĝenieroj parte proponis konstruon de Granda Italio, ampleksanta preskaŭ la tutan Mediteraneon ĝis Tripolio, Belearoj kaj Dodekaneso, parte fondon de nova kontinento, tiel nomata Lemurio, oriente de la itala Somalio, kiu foje okupus la tutan Hindan Oceanon. Fakte helpe de la tuta armeo de salamandroj estis kunŝutita nova insuleto kontraŭ la somalia haveno Mogadiŝo etendiĝanta sur dektri kaj duono de akreoj. Japanio projektis kaj parte realigis novan grandan insulon surloke de la iama Mariana Insularo kaj preparis unuigon de la Karolinaj Insuloj kaj la Marŝalaj Insuloj en du grandajn insulojn, anticipe nomitaj Nova Nipono; sur ĉiu estus instalita ankaŭ arta vulkano, kiu al la estontaj loĝantoj rememorigus la sanktan Fiĝi-monton. Aŭdiĝis ankaŭ, ke germanaj inĝenieroj sekrete konstruas en la Sargasa

maro pezan betonan kontinenton, fariĝonta la estonta Atlantido kaj onidire ĝi povus endanĝerigi la francan Okcidentan Afrikon; sed ŝajnas, ke efektiviĝis nur la konstruo de fundamentoj. En Nederlando oni alpaŝis al sekigado de Zelando; Francio ligis sur Gvadelupo Grande Terre, Basse Terre kaj La Dosirade en unu benatan insulon; la Unuiĝintaj Ŝtatoj komencis konstrui sur la 37-a meridiano la unuan fluginsulon (duetaĝan, kun grandega hotelo, sporta stadiono, lunaparko kaj kinoteatro por kvin mil personoj). Koncize, ŝajnis, ke nun falis la lastaj limoj, kiujn al la homa ekspansio obstaklis la mondmaro; estiĝis ĝoja epoko de grandiozaj teknikaj planoj; la homo konsciiĝis, ke nur nun li iĝas Mastro de la Mondo, dank'al la salamandroj, kiuj enpaŝis la scenejon de la mondo ĝustatempe kaj tiel dirante pro la historia neceso. Estas nekontesteble, ke ne estus okazinta la enorma disvastigo de la salamandroj, se nia teknika epoko ne estus preparinta por ili tiom da labortaskoj kaj tiel grandegan kampon por daŭra okupo. La estonteco de la Laboristoj de la Maro ŝajnis sekurigita por jarcentoj.

Konsiderindan kvoton en la prospera evoluo de komerco kun la salamandroj havis ankaŭ scienco, kiu baldaŭ turnis sian atenton al esploro de la salamandroj, kiel laŭ la korpa flanko, tiel ankaŭ laŭ la spirita.<sup>11</sup>



— Dank'al la scienco esplorado la homoj ĉesis opinii la salamandrojn ia miraklo; en la reala lumo de la scienco la salamandroj perdis multon el sia komenca nimbo de ekstreco kaj escepteco; fariĝinte objekto de psikologiaj testoj, ili vidigis tre mezajn kaj seninteresajn kvalitojn; ilia alta talento estis science resendita en la fabelregnon. La scienco malkovris la Normalan Salamandron, kiu montriĝis entute kiel estaĵo enuiga kaj sufiĉe spritmanka; nur ĵurnaloj ankoraŭ iam-tiam malkovris Miraklan Salamandron, kiu sciis ekstemporale multipliki kvinciferajn nombrojn, sed ankaŭ ĉesis imponi al la homoj, ĉefe kiam montriĝis, ke tion povas lerni, post konvena ekzercado, ankaŭ la homo mem. La homoj komencis konsideri la salamandrojn sama evidentajn kiel estas kalkulmaŝino aŭ alia aŭtomato; ne plu ili vidis en ili ion misteran, kio elmergiĝis el nekonataj profundoj dioscias kial kaj por kio. Krome la homoj neniam opinias mistera tion, kio al ili servas kaj utilas, sed nur tion, kio malutilas al ili aŭ ilin endanĝerigas; kaj ĉar la salamandroj, kiel montriĝis, estis estaĵoj alte kaj multflanke utilaj<sup>12</sup>, ili estis akceptataj simple kiel io, kio esence apartenas al la racia kaj kutima ordo de la aferoj.

Finfine estas tute nature, ke la salamandroj ĉesis esti sensacio, tuj kiam ili estis kelkcent milionoj en la mondo; la intereso de la popolo, kiun ili elvokis, dum ankoraŭ ili estis ia tia novaĵo, finsonis ankoraŭ dum iom da

tempo en filmgroteskoj (Sally and Andy, du bravaj salamandroj) kaj en kabaretscenoj, kie kantistoj kaj subretoj talentaj per aparte malbona voĉo, prezentiĝis en nerezistebla rolo de kvakantaj kaj gramatike mizere sin esprimantaj salamandroj. Tuj kiam la salamandroj iĝis amasa kaj ĉiutaga aperaĵo, ŝanĝiĝis ilia problemaro.<sup>13</sup> La vero estas, ke la granda salamandra sensacio baldaŭ aerdisiĝis, por fari lokon al io alia kaj certagrade pli solida, nome al la Salamandra Demando. Antaŭbatalanto de la Salamandra Demando — ne unuafoje en la historio de la homa progreso — estis ja virino. Ŝi estis Mme Louise Zimmermann, direktorino de knabina pensiono en Laŭzano, kiu kun neĉiutaga energio kaj necedanta entuziasmo propagandis tra la tuta mondo sian noblan devizon: Donu al la salamandroj regulan lernejan edukadon!

Longe ŝi renkontiĝadis kun malkomprenemo ĉe la publiko, kiam senlace ŝi atentigadis unue pri la natura lernemo de la salamandroj, due pri la danĝero, kiu povus elkreski por la homa civilizacio, se la salamandroj ne ricevus zorgeman moralan kaj intelektan edukon. "Kiel la romia kulturo pereis pro invado de barbaroj, pereus ankaŭ nia klereco, se ĝi estus insulo en maro de estaĵoj spirite subjigitaj, al kiuj estas forneata kvoto en la plej altaj idealoj de la nuntempa homaro," tiel profete ŝi vokis en sesmil tricent kvindek sep paroladoj, kiujn ŝi havis en virinaj kluboj de la tuta Eŭropo kaj Ameriko, an-

kaŭ en Japanio, Ĉinio, Turkio kaj alie. ”Se la kulturo konserviĝu, ĝi estu ĉies klereco. Ni povas en kvieto ĝui nek donacojn de nia civilizacio, nek fruktojn de nia kulturo, dum ĉirkaŭ ni ekzistas milionoj kaj milionoj da malfeliĉaj kaj malkleraj estaĵoj, artefike tenataj en animala stato. Kiel devizo de la dek naŭa jarcento estis Liberigo de la Virino, tiel devizo de nia epoko devis esti DONU AL LA SALAMANDROJ REGULAJN LERNEJOJN!” Kaj tiel plu. Dank’ al sia elokvento kaj nekredebla persistemo Mme Louise Zimmermann mobilizis virinojn de la tuta mondo kaj akiris sufiĉajn financajn rimedojn, por fondi en Beaulieu (apud Nico) La Unuan Liceon por Salamandroj, en kiu frajo de la salamandroj, laborantaj en Marsejlo kaj Tulono, estis instruata al la franca lingvo kaj literaturo, retoriko, societa konduto, matematiko kaj kulturhistorio. Ne same sukcesa estis la Knabina Lernejo por Salamandroj en Mentono, kie ĉefe la muzik-kursoj, dietistiko kaj kursoj de fajnaj manlaboroj (je kiuj Mme Zimmermann persistis ĉefe pro pedagogiaj kaŭzoj) renkontiĝis kun frapanta manko de lernemo, se ne rekte kun obstina malintereso ĉe la junecaj salamandraj liceaninoj. Kontraŭe tuj la unuaj publikaj ekzamenoj de la salamandridoj havis tiel surprizan sukceson, ke tuj estis establita (je kostoj de Societoj por Protekto de Bestoj) Marista Polikliniko por Salamandroj en Cannes kaj Sa-

lamandra Universitato en Marsejlo; ĉi tie pli poste la unua salamandro atingis gradon de doktoreco pri juro.

La demando pri la salamandra edukado komenciĝis nun evolui rapide kaj normalmaniere. Kontraŭ la modelaj Écoles\* Zimmermann pli progresemaĵ instruistoj levigis multajn gravajn objetojn; ĉefe oni asertis, ke por edukado de la salamandra junularo ne taŭgas la malnoviĝinta humanisma lerneja sistemo de la homa junularo; nepre estis rifuzata instruado de literaturo kaj historio kaj estis rekomendate dediĉi maksimumon da spaco kaj tempo al praktikaj kaj modernaj fakoj, kiel al natursciencistoj, al laboro en lernejoj metiejoj, teknika instrukciaĵo de la salamandroj, gimnastado kaj tiel plu. Ĉi tiu tiel nomata Reforma Lernejo aŭ Lernejo por la Praktika Vivo estis siavice pasie kontraŭbatalata de adeptoj de la klasika klereco proklamantaj, ke la salamandrojn oni povas alproksimigi al la kulturaj homaj bonumoj nur sur la latina bazo, ke ne sufiĉas instrui ilin paroli, se oni ne instruos ilin citi poetojn kaj oratori kun la cicerona elokventeco. El tio rezultis longa kaj sufiĉe indigna disputo, kiu fine estis solvita tiel, ke la lernejoj por salamandroj estis ŝtatigitaj kaj la lernejoj por la homa junularo reformitaj tiel, ke ili maksimume proksimiĝu al idealoj de la Reforma Lernejo por Salamandroj.

Écoles — (france) Lernejoj

Nature, nun ankaŭ en la aliaj ŝtatoj aŭdiĝis postuloj pri la regula kaj deviga lerneja sistemo por salamandroj sub ŝtata inspekto. Tio efektiviĝis iom post iome en ĉiuj ĉemaraj ŝtatoj (memkompreneble esceptante Grandan Brition); ĉar ĉi tiuj salamandraj lernejoj ne estis ŝarĝitaj de la malnovaj klasikaj tradicioj de la homaj lernejoj kaj povis do uzadi ĉiujn plej novajn metodojn de psikotekniko, teknologia edukado, antaŭmilita ekzercado kaj aliajn lastajn atingaĵojn pedagogiajn, baldaŭ evoluis el ili la plej moderna kaj science plej progresinta lernejsistemo en la mondo, kiu rajte estis objekto de envio ĉe ĉiuj homaj pedagogoj kaj lernantoj.

Man-en-mane kun la salamandra lernejsistemo elmergiĝis la lingva problemo. Kiun el la mondlingvoj la salamandroj lernu unue? La unuaj salamandroj el la Pacifika insularo esprimadis sin per piĝino, tiel kiel ili ek-kaptis tion de la indiĝenoj kaj maristoj; multaj parolis la malajan lingvon aŭ per aliaj lokaj dialektoj. La salamandroj bredataj por la singapura merkato estis gvidataj paroli en Basic-English\*, tiu science simpligita angla lingvo, al kiu sufiĉas kelkcent esprimoj sen la arkaiĝinta gramatika balasto; tial oni komencis nomi ĉi tiun reformitan niveligitan anglan lingvon Salamander-English. En la modelaj Écoles Zimmermann la salamandroj esprimis sin en la lingvo de Kornelio, sed ne pro la na-Basic English — de C. K. Ogden ellaborita simpligita angla lingvo

ciismaj kaŭzoj, sed tial, ĉar ĝi apartenas al la pli supera klereco; kontraŭe en la Reformaj Lernejoj ili lernis Esperanton kiel interkompreniĝan lingvon. Krome tiutempe estiĝis kvin aŭ ses novaj Universalaj Lingvoj volantaj anstataŭi la babilonan konfuzon de la homaj lingvoj kaj doni unu komunan gepatran lingvon al la tuta mondo de la homoj kaj salamandroj; memkomprene estis multaj disputoj pri tio, kiu el ĉi tiuj Internaciaj Lingvoj estas la plej celhava, belsona kaj universala. Ĝi finiĝis tiel, ke en ĉiu nacio estis propagandata alia Universala Lingvo.<sup>15</sup>

Per ŝtatigo de la salamandra lernejsistemo la tuta afero simpliĝis: en ĉiu ŝtato la salamandroj estis simple edukataj en la ŝtata lingvo de la koncerna nacio. Kvankam la salamandroj lernis fremdajn lingvojn relative facile kaj fervore, ilia lingva kapablo montris specialajn mankojn parte pro formiĝo de iliaj paroliloj, parte pro kaŭzoj plivere psikaj; do ekzemple nur malfacile ili prononis longajn, multsilabajn vortojn kaj ili klopodis redukti ilin al unu silabo, kiun ili elbuŝigis kurte kaj iom kvake; ili diris l anstataŭ r kaj en la ŝuŝaj konsonantoj ili iom lispis; ili ignoris la gramatikajn finaĵojn kaj neniam ellernis diferencigi inter "mi" kaj "ni" kaj estis tute indiferentaj, ĉu iu vorto havas genron inan aŭ viran (eble en tio manifestiĝas ilia seksa fridigeo krom en tempo de pariĝo). Simple ĉiu lingvo en ilia buŝo karakterize transformiĝis kaj iel raciiĝis je la plej simplaj kaj rudimentaj

formoj. Estas atentinde, ke iliajn neologismojn, ilian prononcadon kaj gramatikan primitivecon komencis rapide alproprigadi al si parte la homa feĉo en havenoj, parte la tiel nomata plej bona societo; de tie tiu esprimmaniero venis en la ĵurnalojn kaj baldaŭ ĝeneraligis. Ankaŭ ĉe la homoj grandparte malaperis la gramatikaj genroj, forfalis la finaĵoj, pereis la deklinacio; "la ora ĵurnularo" subpremis r kaj komencis lispigi; apenaŭ iu el la kleraj homoj kapablus diri, kion signifas indeterminismo aŭ transcendo, simple tial, ĉar la vortoj fariĝis ankaŭ por la homoj tro longaj kaj neproneblaj.

Mallonge, ĉu bone, ĉu malbone, la salamandroj sciis paroli preskaŭ ĉiujn lingvojn de la mondo, laŭ tio, sur kiu marbordo ili vivis. Tiam aperis ĉe ni (mi opinias, ke en *Národní Listy*\*) artikolo, kiu (certe prave) amare demandis, kial la salamandroj ne lernas ankaŭ ĉeĥe, se jam en la mondo ekzistas salamandroj parolantaj portugale, nederlande kaj aliajn lingvojn de la malgrandaj nacioj. Nia nacio bedaŭrinde ne havas sian marbordon, koncedis la artikolo, kaj tial ĉe ni ankaŭ ne estas maraj salamandroj; sed eĉ se ni ne havas nian maron, tio ne signifas, ke ni ne havas en la monda kulturo la saman, jes multrilate eĉ pli gravan partoprenon ol multaj nacioj, kies lingvon lernas miloj da salamandroj. Estus nur jus-

"Národní listy" — ("Naciaj Folioj") gvida ĉeĥa ĵurnalo ĝis la jaro  
1941

te, ke la salamandroj ekkonu ankaŭ nian spiritan vivon; sed kiel ili povas informiĝi pri ĝi, se inter ili estas neniu, kiu posedus nian lingvon? Ni ne atendu, ke iu en la mondo rekonos ĉi tiun kulturan ŝuldon kaj instalos katedron de la ĉeĥa lingvo kaj de la ĉeĥoslovaka literaturo en iu ajn salamandra instituto. Kiel diras poeto, "kredu neniun en la mond' vasta, havas ni neniun amikon tie". Tial ni mem zorgu pri la rebonigo, vokis la artikolo. Kion en la mondo ni faris, ni faris propraforte! Estas nia rajto kaj nia devo, ke ni penu akiri niajn amikojn ankaŭ inter la salamandroj; sed kiel ŝajnas, nia ministerio de eksterlando ne montras multe da intereso por konvena propagando de nia nomo kaj de niaj produktoj inter la salamandroj, kvankam la aliaj kaj malpli grandaj nacioj dediĉas milionojn por malfermi al la salamandroj siajn kulturajn trezorojn kaj samtempe vekis ilian intereson pri industriaj produktoj. — La artikolo vekis grandan atenton ĉefe en la Ligo de Industriistoj kaj almenaŭ tiun rezulton ĝi havis, ke estis eldonita eta kompendio La Ĉeĥa por Salamandroj kun ekzemploj el la ĉeĥoslovaka belestro. Sonas eble nekredeble, sed de ĉi tiu libreto vere oni vendis pli ol sepcent ekzemplerojn; ĝi estis do entute rimarkinda sukceso.<sup>16</sup>

La demando pri edukado kaj lingvo estis kompreneble nur unu flanko de la granda salamandra problemo, kiu, tiel dirante, elkreskis en grandan dimension. Tiel



baldaŭ ekzemple elmergiĝis la demando, kiel fakte trakti la salamandrojn en la rilato, ni diru, pli societa. En la unuaj, preskaŭ prahistoriaj jaroj de la Salamandra Epoko tio estis Societoj por la Protekto de Bestoj, fervore zorgintaj, ke oni ne traktu la salamandrojn kruele kaj nehome; dank' al iliaj persistaj intervenoj sukcesis, ke preskaŭ ĉie oficoj inspektis, ĉu estas respektataj koncerne la salamandrojn policaj kaj veterinaraj direktivoj, validaj por la cetera bredbestaro. Ankaŭ la principaj kontraŭuloj de vivisekcio subskribis multajn protestojn kaj peticiojn, ke estu malpermesite fari sciencajn eksperimentojn sur vivantaj salamandroj; en pluraj ŝtatoj tia leĝo estis efektive eldonita.<sup>17</sup> Sed kun la kreskanta klereco de la salamandroj ĉiam pli kaj pli oni sentis embarasojn inkluzivi la salamandrojn simple sub besto-protektado; tio ŝajnis pro iaj ne tute klaraj motivoj iom malkonvena. Tiam estis fondita internacia Ligo por la Protekto de Salamandroj (Salamander Protecting League) sub patroneco de dukino of Huddersfield. Ĉi tiu Ligo, havanta pli ol ducent mil membrojn ĉefe en Anglio, faris por la salamandroj konsiderindan kaj laŭdindan laboron; nome ĝi atingis tion, ke sur la marbordoj estis establataj specialaj salamandraj ludejoj, kie la salamandroj, ne ĝenataj de scivolaj spektantoj, farus siajn "mitingojn kaj sportajn solenojn" (sub tio versimile oni opiniis la sekretajn Lundancojn); ke en ĉiuj lernejoj (ankaŭ

en Oksforda Universitato) oni insiste rekomendis al la lernantoj ne ŝtonumi la salamandrojn; ke certgrade oni atentis tion, ke la junsalamandroj ne estu tro ŝarĝataj de lernaĵo; kaj fine, ke la salamandraj laborlokoj kaj barakaro estis ĉirkaŭigitaj per alta lignotabula barilo, gardanta la salamandrojn antaŭ diversa ĝenado kaj ĉefe ĝi sufiĉe apartigadis la mondon de la salamandroj antaŭ la homa mondo.<sup>18</sup>

Sed la laŭdindaj privataj iniciatoj, penantaj konvene kaj humane reguligi rilaton de la homa socio al la salamandroj, baldaŭ ne sufiĉis. Estis ja relative facile envicigi la salamandrojn, kiel oni diras, en la produkt-procezon, sed multe pli komplike montriĝis anigi ilin iamaniere al la ekzistantaj soci-ordoj. La konservativuloj ja asertis, ke ne povas esti parolo pri iaj juraj kaj publikaj problemoj; la salamandroj simple estas posedaĵo de sia mastro, kiu garantias por ili kaj responsas ankaŭ por eventualaj damaĝoj, kiujn liaj salamandroj kaŭzus; malgraŭ sia nedubinda inteligenteco la salamandroj estas nenio alia ol jura subjekto, aĵo aŭ bonumo, kaj ĉiu speciala leĝa dispozicio, koncernanta la salamandrojn, estus onidire atenca interveno en la sanktajn posed-rajtojn. Kontraŭe la alia partio oponis, ke la salamandroj, kiel estaĵoj inteligentaj kaj altgrade responsaj, povas arbitre kaj plej diversmaniere atenci validajn leĝojn. Kial posedanto de salamandroj estus kulpa, kaj portus responde-

con pro eventualaj deliktoj, pri kiuj liaj salamandroj kulpiĝos? Tia risko sendube subfosus la privatan entreprenemon sur kampo de la salamandraj laboroj. En la maro ne estas bariloj, oni diris; la salamandrojn vi ne povas fermi, por havi ilin sub kontrolo. Tial necesas leĝe devoligi la salamandrojn mem, ke ili respektu la homan juran ordon kaj sekvu la instrukciojn por ili eldonotajn.<sup>19</sup>

Kiel estas konate, la unuaj leĝoj por la salamandroj estis eldonitaj en Francio. La unua paragrafo determinis la devojn de la salamandroj en kazoj de mobilizo kaj milito; la dua leĝo (nomata lex Deval) ordonis al la salamandroj, ke ili rajtas loksidiĝi nur sur tiuj lokoj de la bordo, kiujn destino al ili ilia posedanto aŭ kompetenta departamenta ofico; la tria leĝo deklaris, ke la salamandroj estas devigataj senkondiĉe obei ĉiujn policajn ordonojn; en kazo, ke ili ne farus tion, la polic-oficoj rajtas puni ilin per fermo en seka kaj hela loko aŭ eĉ per forpreno de laboro por pli longa tempo. Post tio la maldekstrumaj partioj prezentis en la parlamento proponon, ke estu ellaborita sociala leĝaro por la salamandroj, kiu determinus iliajn labordevojn kaj taskus al labordonantoj certajn devoligojn por la laborantaj salamandroj, (ekzemple dusemajnan feriadon en la tempo de la printempa pariĝo); male, la ekstrema maldekstruma partio postulis, ke la salamandroj estu tute elpelitaj kiel malamikoj de la laboranta popolo, ĉar en servo de kapitalis-

mo ili laboras tro multe kaj preskaŭ senpage kaj per tio endanĝerigas la vivnivelon de la laborista klaso. Pravigon de ĉi tiu postulo pruvis striko en Brest kaj grandaj demonstracioj en Parizo; estis multaj vunditoj kaj la ministerio de Deval estis devigita demisii. En Italio la salamandroj estis subigitaj al Speciala Salamandra Korporacio, konsistanta el labordonantoj kaj oficoj, en Nederlando ili estis administrataj de la ministerio de akvokonstruaĵoj, koncize, ĉiu ŝtato solvis la salamandran problemon siamaniere kaj diference; sed la amaso da ofic-aktoj, per kiuj estis reguligataj la publikaj devoj kaj konvene limigita la animala libereco de la salamandroj, estis ĉie entute egala.

Memkomprene, tuj kun la unuaj leĝoj por la salamandroj aperis homoj, kiuj en nomo de jura logiko konkludis, ke se la homa socio taske donas al la salamandroj certajn devojn, ke ankaŭ ĝi devas atribui al ili iajn rajtojn. Ŝtato donanta al la salamandroj leĝojn, agnoskas ilin ĝuste per tio estaĵoj responsaj kaj liberaj, juraj subjektoj, ja eĉ siaj ŝtatanoj; tiukaze necesas iel ordigi ilian civitanan rilaton al ŝtato, sub kies jurisdikcio ili vivas. Ankaŭ eblus opinii la salamandrojn fremdaj enmigrintoj, sed tiukaze ŝtato ne povus taske doni al ili certajn servojn kaj devojn en tempoj de mobilizo kaj milito, kiel okazas (esceptante Anglion) en ĉiuj civilizitaj landoj. Certe ni postulos de la salamandroj en kazo de milit-

konflikto, ke ili defendu siajn bordregionojn; sed poste ni ne povas kontesti al ili certajn civitanajn rajtojn, ekzemple balotrajton, kunvenrajton, reprezenton en diversaj publikaj korporacioj kaj tiel plu.<sup>20</sup> Oni eĉ proponis, ke la salamandroj havu ian submaran aŭtonomion; sed ĉi tiuj kaj la aliaj konsideroj restis nete akademiaj; okazis nenia praktika solvo, ĉefe tial ne, ĉar la salamandroj neniam kaj nenie postulis civitanajn rajtojn.

Simile sen rekta intereso kaj intervenoj flanke de la salamandroj estis okazanta alia granda diskuto, okupiganta pri demando, ĉu la salamandroj povas esti baptitaj. La Katolika Eklezio defendis dekomence konsekvence la vidpunkton, ke ne; ĉar la salamandroj, ne estante posteuloj de Adamo, ne estis koncipitaj en la pra-peko, ankaŭ ne povas esti absolvitaj de ĉi tiu peko per la sakramento de bapto. La Sankta Eklezio neniel volas decidi la demandon, ĉu la salamandroj havas senmortan animon aŭ alian partoprenon en la graco kaj Dia savo; ĝia korfavoro al la salamandroj povas esti esprimita nur en tio, ke ĝi memoros ilin en speciala preĝo, kiu estos legata en difinitaj tagoj kun preĝo por la animoj en la purtagorio kaj kun propeto por la nekredantoj<sup>21</sup>. Malpli simpla estis la afero por la protestantaj konfesioj; ili atribuis tamen al la salamandroj racion kaj tial kapablon kompreni la kristanan instruon, sed hezitis fari ilin membrojn de la eklezio kaj tial ankaŭ fratojn en Kristo.

Tial ili limigis sin je tio, ke ili eldonis (en mallongigita teksto) la Sanktan Skribon por salamandroj sur akvorestista papero kaj disvastigis ĝin en multmilionaj ekzempleroj; ankaŭ oni pripensis konsistigi por la salamandroj (analoge al Basic-English) ian Basic-Christian, bazan kaj simpligitan kristanan instruon; sed eksperimentoj tiurilate faritaj elvokis tiom da teologiaj disputoj, ke fine oni rezignis pri tio<sup>22</sup>. Ne tiom da skrupuloj havis kelkaj religiaj sektoj (nome amerikaj), kiuj elsendadis al la salamandroj siajn misiistojn, por ke ili prediku al ili la veran kredon kaj baptu ilin laŭ la vortoj de la Sankta Skribo: Iru kaj disĉipligu ĉiujn naciojn. Sed nur malmultaj misiistoj sukcesis penetri post la lignotabulan barilon, apartigantan la salamandrojn disde la homoj; la laboronantoj malhelpis al ili la aliron al la salamandroj, por ke ili per sia prediko superflue ne detenu ilin de laboro. Tiam do oni povis tie aŭ alie vidi predikanton, starantan ĉe la gudrita barilo inter hundoj, furioze bojantaj kontraŭ siaj malamikoj sur alia flanko de la barilo, kiu vane, sed fervore ekzegezis la Dian Vorton.

Laŭ kiom estas konate, iom pli grandan disvastiĝon atingis inter la salamandroj monismo; pluraj salamandroj kredis ankaŭ je materiismo, ora bazo kaj aliaj sciencaj dogmaroj. Iu populara profesoro, nomata Georgo Sequezn, verkis eĉ kuriozan religian instruon por la salamandroj, kies ĉefa kaj plej supera artikolo estis kre-

do je la Granda Salamandro. Ĉi tiu kredo tamen tute ne enradikiĝis ĉe la salamandroj, sed des pli da adeptoj ĝi trovis inter homoj, ĉefe en grandaj urboj, kie preskaŭ dumnokte estiĝis aro da sekretaj temploj por la salamandra kulto<sup>23</sup>. La salamandroj mem en pli posta tempo preskaŭ ĝenerale akceptis alian kredon, pri kiu ne estas konate, de kie ĝi aperis inter ili; ĝi estis adorado de grandega Moloko\* kun homa kapo; onidire ili havis kolosajn submarajn idolojn el gisfero, kiujn ili igis al si fari ĉe Armstrong\* aŭ Krupp, sed pliaj detaloj pri iliaj kultaj ceremonioj, onidire neordinare kruelaj kaj sekretaj, neniam malkaŝiĝis, ĉar ili okazadis sub la akvo. Ŝajnas, ke ĉi tiu kredo disvastiĝis ĉe ili tial, ĉar la nomo Moloko rememorigis al ili la natursciencan (molche) aŭ la germanan (Molch), nomon por salamandro.

\*

Kiel el la antaŭaj alineoj evidentas, la Salamandra Demando komence kaj dum longa tempo estis prezentata nur tiusence, ĉu kaj ĝis kia mezuro la salamandroj kiel raciaj kaj konsiderinde civilizitaj estaĵoj kapablas ĝui certajn homajn rajtojn, eĉ se nur ĉerande de la homa socio kaj homa ordo; alivorte ĝi estis interna demando de unuopaj ŝtatoj, solvata en kadro de la civitana rajto.

Moloko — semida dio, al kiu estis oferataj infanoj  
Armstrong — unu el la fondintoj de la brita arsenalo

Dum pluraj jaroj eĉ ne ideeto venis al iu, ke la Salamandra Demando povas havi vastan signifon internacian, kaj eble ke necesos trakti la salamandrojn ne nur kiel inteligentajn estaĵojn, sed ankaŭ kiel la salamandran kolektivon aŭ la salamandran nacion. Verdire, la unuan paŝon al ĉi tiu koncepto de la Salamandra Problemo faris tiuj iom ekscentraj kristanaj sektoj, provantaj bapti la salamandrojn, invokante la vortojn de la Sankta Skribo: Iru kaj disĉipligu ĉiujn naciojn. Per tio unuafoje estis dirite, ke la salamandroj estas io kiel nacio<sup>24</sup>. Sed la unuan vere internacian kaj principan agnoskon de salamandroj kiel nacio, alportis nur la fama deklaro de la Komunista Internacio, subskribita de kamarado Molo-kov kaj adresita al "ĉiuj subpremataj kaj revoluciaj salamandroj de la tuta mondo."<sup>25</sup> Eĉ se tiu proklamo, kiel ŝajnas, rekte ne influis la salamandrojn, tamen ĝi elvokis konsiderindan eĥon en la mondgazetaro kaj estis multe sekvata almenaŭ en tiu direkto, ke sur la salamandrojn komencis plui flamaĵoj de la plej diversaj partioj, ke ili, kiel granda salamandra tuto aliĝu al tiu aŭ alia ideologia aŭ sociala programo de la homa socio<sup>26</sup>.

Nun komencis okupiĝi pri la Salamandra Problemo ankaŭ Internacia Laboroficejo en Ĝenevo. Tie koliziis du konceptoj: unu agnoskis la salamandrojn kiel nova laboranta klaso kaj pretendis, ke al ili estu pliampleksigita ĉia socia leĝaro, koncernanta la labortempon, paga-



tajn feriojn, invalidan kaj maljunaĝ-asekurojn kaj tiel plu; kontraŭe la dua koncepto proklamis, ke en la salamandroj kreskas danĝera konkurenco al la homaj laborfortoj, ke la salamandran laboron kiel kontraŭsocialan oni devas simple malpermesi. Kontraŭ ĉi tiu propono protestis ne nur la reprezentantoj de la labordonantoj, sed ankaŭ delegitoj de la laboristaro, rimarkigante, ke la salamandroj ne estas nur la nova labor-armeo, sed ankaŭ granda kaj ĉiam pli grava kliento. Kiel ili citis, lastatempe plialtiĝis en mezuro ĝis nun neniam okazinta la okupiteco en la fakoj metalindustria (labor-ilaro, maŝinoj kaj metalaj idoloj por la salamandroj), armil-industria, kemia industrio (submaraj eksplodaĵoj), paperproduktado (lernolibroj por la salamandroj), cemento, ligno, art-nutraĵoj (Salamander-Food\*) kaj multaj aliaj fakoj; la ŝiptonelaro altiĝis kompare al la antaŭsalamandraj tempoj je 27%, la karbominado je 18,6%. Nerekte pro altiĝo de la okupiteco kaj bonstato ĉe homoj, grandiĝas spezo en la aliaj industriaj branĉoj. Fine, lastatempe la salamandroj mendas diversajn maŝin-partojn laŭ siaj propraj desegnaĵoj; laŭ tio ili mem muntas sub la akvo pneŭmatikajn borilojn, martelojn, submarajn motorojn, presmaŝinojn, akvo-disaŭdigilojn kaj aliajn aparatojn de propra konstruado. Ĉi tiujn konsistaĵojn ili pagas per la plialtigita laborrezulto; nuntempe jam unu Salamander Food — salamandra nutraĵo

kvinono de la tuta mondproduktado en la peza industrio kaj preciza mekaniko dependas de la salamandraj mendoj. Nuligu la salamandrojn, kaj vi povas fermi unu kvinonon de la fabrikoj; anstataŭ la nuntempa prosperado vi havos milionojn da senlaboruloj. Internacia Labor-Oficejo ja ne povis ne preteratenti ĉi tiujn kontraŭdirojn; fine post longa traktado oni atingis almenaŭ tian kompromisan solvon, ke "la supre cititaj okupitoj de grupo S (amfibia) rajtas esti okupataj nur sub akvo aŭ en akvo, sur bordoj nur ĝis proksimeco de dek metroj disde linio de la maksimuma alfluso; ili ne darfis mini karbon aŭ nafton sur la marfundo; ili ne rajtas produkti por la sekreta konsumo paperon, tekstilaĵojn aŭ artledojn el maralgoj" kaj tiel plu; ĉi tiuj limigoj taskitaj al la salamandra produktado, estis kodigitaj en dek naŭ alineoj, kiujn pli detale ni ne citas ĉefe tial, ĉar ilin, memkomprene, oni nenie atentis; sed kiel grandioza, vere internacia solvo de la Salamandra Problemo, el vidpunktoj ekonomia kaj sociala, la menciita kodekso estis meritplena kaj impona verko.

Iom malpli rapide progresis la alia internacia agnosko de salamandroj, nome sur la kampo de kulturaj rilatoj. Kiam aperis en la fakgazetaro la ofte citata traktaĵo "Geologia konsisto de la marfundo apud Bahamoj", subskribita de John Seaman, neniu sciis, ke temas pri scienca verko de sciplena salamandro; sed kiam al scien-

cistaj kongresoj aŭ al la adreso de diversaj akademioj kaj doktaj societoj venadis de esploristoj-salamandroj informoj kaj studoj el la fakoj de oceanografio, geografio, hidrobiologio, supera matematiko kaj aliaj ekzaktaj sciencoj, tio kaŭzis nemalgrandajn embarasojn, eĉ indignon, kiun la granda d-ro Martel esprimis per la vortoj: "Tiu fibestaro volas nin instrukcii?" La japana sciencisto d-ro Onoŝita, aŭdacinta citi informon de iu salamandro (estis io pri evoluo de la ovoŝlavo sako ĉe la larvoj de la profundmara fiŝeto *Argyropelecus hemigymnus* Cocco), li estis bojkotata de sciencistoj kaj harakiris; por universitatoj estis afero de honoro kaj kastfiero ignori ĉian sciencan laboron de la salamandroj. Des pli grandan atenton (se ne indignon) ekscitis la gesto farita de Centre Universitaire de Nice<sup>27</sup> per invito al solena prelego de d-ro Charles Mercier, klerega salamandro el la Tuloŝna haveno, kiu kun rimarkinda sukceso prelegis pri la teorio de konikoj en la neeŭklida geometrio. Ĉi tiun manifestacion ĉeestis kiel delegitino por la Ĝenevaj organizoj ankaŭ Mme Maria Dimineanu; ĉi tiu eminenta, grandanima damo estis tiel emociita de la modesta konduto kaj klereco de d-ro Mercier ("Pauvre petit," onidire ŝi esprimiĝis, "il est tellement laid\*!"), ke ŝi taskis al si por sia nelacigebla aktiva vivo, ke la salamandroj estu

Pauvre petit, il est tellement laid — (*france*) Povrulo, ĝi estas tiel malbelega

akceptitaj kiel anoj de Ligo de Nacioj. Vane ŝtatviroj klarigis al la elokventa kaj energia damo, ke la salamandroj, havante en la mondo nek sian propran ŝtatan suverenecon, nek sian propran ŝtatan teritorion, ne povas esti membroj de Ligo de Nacioj. Mme Dimineanu komencis propagandi la ideon, ke la salamandroj do ricevu ie sian liberan teritorion kaj sian submaran ŝtaton. Tiu ideo estis sufiĉe malbonvena, eĉ rekte riska; tamen fine oni trovis feliĉan solvon, nome ĉe Ligo de Nacioj instali specialan Komisionon por Studo de la Salamandra Problemo, al kiu estos inviritaj ankaŭ du delegitoj Salamandroj; kiel unua, laŭ insisto de sinjorino Dimineanu, estis nomumita d-ro Charles Mercier el Tulono, la dua estis iu Don Mario, dika kaj klerega salamandro el Kubo, science laboranta en la fako de planktono kaj nerita pelago. Per tio la tiutempaj salamandroj atingis la plej superan internacian agnoskon de sia ekzisto<sup>28</sup>.

Ni vidas do la salamandrojn en forta kaj permanenta progreso. Ilia nombro estas taksata je sep miliardoj, kvankam kun la kreskanta civilizacio ilia naskokvanto abrupte malpliiĝas (je dudek ĝis tridek larvoj el ĉiu femalo jare). Ili loĝatigis jam pli ol sesdek procentojn da ĉiuj marbordoj; ankoraŭ la polusbordoj ne estas loĝataj, sed la kanadaj salamandroj komencis koloniigi la bordregionon de Groenlando, kie ili eĉ forpuŝas la eskimojn en la enlandon kaj transprenas en siajn manojn la fiŝa-

don kaj negocadon kun fiŝoleo. Man-en-mane kun ilia materiala impeto kontinuas ankaŭ ilia civilizacia progreso; ili enviciĝas inter la klerajn naciojn kun deviga lerneja frekventado kaj povas fieri pri multaj centoj da propraj submaraj ĵurnaloj, aperantaj en milionoj da ekzempleroj, pri modele establitaj sciencaj institutoj kaj tiel plu. Kompreneble, ĉi tiu kultura evoluo ne okazis en ĉio glate kaj sen interna rezisto; ni scias ja neordinare malmulte pri la internaj aferoj de la salamandroj, sed laŭ pluraj signoj (ekzemple laŭ tio, ke estis trovitaj kadavroj de salamandroj kun formorditaj nazoj kaj kapoj), ŝajnas, ke dum ne mallonga tempo regis sub la marnivelo treniĝanta kaj pasia ideologia konflikto inter Oldsalamandroj kaj Junsalamandroj. La Junsalamandroj versimile evidente estis por la progreso senrezerva kaj nelimigata kaj diskonigadis, ke ankaŭ sub la akvo oni atingu ĉian kontinentan kleracon tute kaj plene, esceptante nek futballon, flirton, faŝismon kaj seksajn perversiojn; male la Oldsalamandroj, kiel ŝajnas, konservative inklinegis al la natura salamandreco kaj neniel volis rezigni je la malnovaj bonaj bestaj kutimoj kaj instinktoj; sendube ili kondamnis la febran avidadon pri la novaĵoj kaj vidis en ĝi dekadencan fenomenon kaj perfidon je la hereditaj salamandraj idealoj; certe ankaŭ ili ĵaluzis pri la fremdaj influoj, al kiuj blinde subiĝas la nuntempa tentita junularo, kaj demandis, ĉu tia simiado laŭ la homoj indas la

fierajn kaj memkonsciajn salamandrojn<sup>29</sup>. Ni povas facile imagi, ke estis lanĉitaj sloganoj kiel: Returne al Mio-ceno! For kun ĉio, kio volas nin homigi! Al batalo por la aŭtentika salamandreco! Kaj tiel plu. Sendube estis ĉi tie ĉiuj premisoj por vigla generacia konflikto de opinioj kaj por profundaj spiritaĵoj en evoluo de la salamandroj; ni bedaŭras, ke ni ne povas citi pri ili pluajn detalojn, sed ni esperu, ke la salamandroj faris el ĉi tiu konflikto, kion nur ili povis.

Nun ni trafas do la salamandrojn survoje al la plej alta florado; sed ankaŭ la homa mondo ĝuas eksterordinaran prosperon. Fervore oni konstruas novajn bordregionojn, sur la malnovaj malprofundaĵoj kreskas novaj firmaĵoj, meze de oceano leviĝas artaj fluginsuloj; sed ĉio ĉi estas nenio kompare al la gigantaj teknikaj projektoj pri plena rekonstruo de nia tergloba, atendantaj nur, ke iu financu ilin. La salamandroj laboras senripoze en ĉiuj maroj kaj sur la randoj de ĉiuj kontinentoj, dum daŭras la nokto; ŝajnas, ke ili estas kontentaj kaj postulas por si nenion, nur laboron kaj eblon bori en la bordoj truojn kaj koridorojn de siaj mallumaj barakoj. Ili havas siajn submarajn kaj subterajn urbojn, siajn enprofundajn metropolojn, siajn Essen'ojn kaj Birmingamojn sur la marprofundo, en profundo de dudek ĝis kvindek metroj; ili havas siajn troplenajn fabrik-kvartalojn, havenojn, transportliniojn kaj milionajn aglomeraĵojn; sim-

ple ili havas sian pli-malpli konatan<sup>30</sup>, sed teknike, kiel ŝajnas, alte progresintan mondon. Ili ne havas siajn fand-fornegojn kaj metalurgiajn uzinojn, sed homoj liveras al ili metalojn interŝanĝe por ilia laboro. Ili ne havas proprajn eksplodaĵojn, sed tiujn vendadas la homoj al ili. Ilia movo-materio estas la maro kun sia tajdo, kun siaj malsupraj fluoj kaj temperatur-diferencoj; kio alia estas la civilizacio ol kapablo utiligi aĵojn, kiujn elpensis iu alia? Eĉ se la salamandroj, ni diru, ne havas siajn proprajn ideojn, ili povas tute bone havi sian sciencan. Ili ne havas siajn muzikon aŭ literaturon, sed ili povas perfekte ekzisti sen tio; kaj la homoj komencas konstati, ke ĉio de la salamandroj estas fabele moderna. Vidu, oni jam povas ĉe la salamandroj diverson lerni — kaj ne mirinde; ĉu la salamandroj ne estas supermezure sukcesaj, kaj el kio alia la homoj prenu ekzemplon, se ne el sukcesoj? Ankoraŭ neniam en la historio de la homaro oni tiom produktadis, konstruadis kaj perlaboradis, kiel en ĉi tiu granda epoko. Kion fari, kun la salamandroj venis en la mondon grandega progreso kaj idealo, nomata Kvanto. "Ni, homoj de la Salamandra Epoko," oni diras kun justa fiero; kien elrampus la malnoviĝinta Homa Epoko kun sia lanta, bagatela kaj senutila filigranado, kiun oni nomis kulturo, arto, neta scienco aŭ iel! La veraj, konsciaj homoj de la Salamandra Epoko ne plu vanigos sian tempon per cerbumado pri la Esenco

de la Aferoj; ili apenaŭ kapablos okupiĝi pri ilia nombro kaj amasproduktado. La tuta estonteco de la mondo konsistas en tio, konstante altigadi la produktadon kaj konsumon; tial devas esti ankoraŭ pli da salamandroj, por ke ili povu ankoraŭ pli produkti kaj forvori. La salamandroj estas simple la Kvanto. Ilia epoka faro estas en tio, ke ili estas tiel multaj. Nur nun la homa inĝenio povas labori plenintense, ĉar ĝi laboras pogrande, kun ekstrema produktadkapacito kaj rekorda ekonomia spezo; mallonge, ĝi estas granda tempo. — Kio do ankoraŭ mankas, por ke dum la ĝenerala kontento kaj prospero efektiviĝu la Feliĉa Nova Epoko? Kio malhelpas, ke naskiĝu la sopirata Utopio, en kiu oni rikoltus ĉiujn ĉi teknikajn triumfojn kaj grandiozajn eblojn, kiuj al la homa bonfarto kaj salamandra diligenteco malfermiĝas plu kaj plu, ĝis vidneatingeblo?

Vere nenio; ĉar nun Komerco kun la salamandroj estos kronita ankaŭ per la ŝtatista antaŭvidemo anticipe zorganta, ke foje ĝi ne knaru en la radoaro de la Nova Epoko. En Londono kunvenas konferenco de la ĉemaraj ŝtatoj, en kiu estas ellaborita kaj aprobita Internacia Konvencio pri Salamandroj. Altaj kontraktpartneroj devoligas sin reciproke, ke ili ne sendados siajn salamandrojn en suverenajn akvojn de la aliaj ŝtatoj; ili ne toleros, ke iliaj salamandroj iamaniere atencu la teritorian integrecon aŭ agnoskitan interes-sferon de kiu ajn alia



ŝtato; nenimaniere ili intervenos en la salamandraj aferoj de alia marpotenco; en kazo de kolizio inter siaj kaj fremdaj salamandroj ili subiĝos al la Haga Arbitracia Tribunalo; siajn salamandrojn ili armos per neniaj armiloj, kies kalibro superus la kutimajn subakvajn pistolojn kontraŭ ŝarkoj (tiel nomataj Ŝafránekgun aŭ sharkgun); ili ne allasos, ke iliaj salamandroj ligu iajn ajn pli proksimajn rilatojn kun la salamandroj, surbordigitaj al alia ŝtata suvereneco; ili ne konstruos helpe de salamandroj novajn kontinentojn aŭ pligrandigos siajn teritoriojn sen anticipa aprobo de la Konstanta Mar-Komisiono en Ĝenevo kaj tiel plu. (Entute tridek sep paragrafoj.) Kontraŭe estis rifuzita la brita propono, ke la marpotencoj devontigu sin ne subigadi siajn salamandrojn al la deviga soldata instrukciado; la franca propono, ke la salamandroj estu internaciigitaj kaj subigitaj al Internacia Salamandra Ofico por Reguligo de la Mond-Akvo; la germana propono, ke al ĉiu salamandro estu brulmarkita signo de ŝtato, kies subulo ĝi estas; plua germana propono, ke al ĉiu marpotenco estu permesita nur certa nombro da salamandroj en la difinita nombro-rilato; la itala propono, ke al ŝtatoj kun superfluo da salamandroj estu donitaj novaj koloniigitaj bordoj aŭ parceloj sur marfundo; la japana propono, ke super la salamandroj (de la naturo nigraj) efektivigadu internacian mandaton la japana nacio, kiel reprezentanto de la ko-

loraj rasoj<sup>31</sup>. Plejparto de la proponoj estis forŝovita al venonta konferenco de la marpotencoj, sed tiu pro diversaj kaŭzoj ne plu okazis.

”Per ĉi tiu internacia akto,” skribis en *Le Temps* M. Jules Sauerstoff,” estas sekurigita la estonteco de la salamandroj kaj la paca evoluo de la homaro dum longaj jardekoj. Ni gratulas al la Londona Konferenco pro sukcesa finigo de ĝiaj malfacilaj konsiliĝoj; ni gratulas ankaŭ al la salamandroj, ke per la donita statuto ili ĝuas protekton de la Haga Tribunalo; nun ili povas kun trankvilo kaj konfido dediĉi sin al sia laboro kaj sia submara progreso. Estu emfazite, ke malpolitigo de la Salamandra Problemo, kiu atingis esprimon en la Londona Konferenco, estas unu el la plej gravaj garantioj de la tutmonda paco; nome senarmigo de la salamandroj malgrandigas probablon de la submaraj konfliktoj inter unuopaj ŝtatoj. Fakto estas, ke — eĉ se daŭras tiel multaj lim- kaj potenckonfliktoj preskaŭ sur ĉiuj kontinentoj — la mondpacon atencas nenia aktuala danĝero, almenaŭ ne flanke de la maro. Sed ankaŭ sur la firma tero paco ŝajnas esti pli bone sekurigita ol iam ĝi estis; la marŝtatoj estas plene absorbitaj de konstruado de novaj bordoj kaj povas vastigadi siajn teritoriojn en la mondmaron, anstataŭ strebi pluŝovi siajn limojn sur la firma tero. Ne plu necesos batali per fero kaj gaso pri ĉiu spano de la tero; sufiĉos simplaj hakfosiloj kaj ŝoveliloj de la sala-

mandroj, por ke ĉiu ŝtato povu konstrui al si tiom da teritorio, kiom ĝi bezonas; kaj ĉi tiun kvietan salamandran laboron por la paco kaj bonfarto de ĉiuj nacioj ĝuste garantias la Londona Konvencio. Ankoraŭ neniam la mondo estis tiel proksima al la daŭra paco kaj trankvilo, sed glora florado kiel ĝuste nun. Anstataŭ la Salamandra Problemo, pri kiu oni tiom parolis kaj skribis, eble prave oni parolos pri la Ora Salamandra Epoko.”

### *3. Sinjoro Povondra denove legas ĵurnalojn*

**P**er nenio alia videblas la paso de la tempo tiel, kiel per la infanoj. Kie estas tiu eta Francisko, kiun ni forlasis (sed ne tiel tro longe!) super la alfluoĵ al Danubo de la maldekstra bordo?

”Kie denove estas tiu Francisko?” murmuretas sinjoro Povondra, dismetante sian vesperĵurnalon.

”Nu, vi scias ja, kiel ĉiam,” respondas sinjorino Povondrová, klinante sin super la kudrado.

”Denove do li iris al la knabino,” mentore diras patro Povondra. ”Damna bubo! Apenaŭ tridekjara, kaj neniun vesperon li sidas hejme!”

”Kiom da ŝtrumpetoj li tratruas,” ĝemas sinjorino Povondrová, denove surmetante ian senesperan ŝtrumpeton sur lignan ŝtipeton. ”Kion mi faru kun ĉi tio,” ŝi meditas super ampleksa truo sur la kalkano, laŭ formo simila al Cejlono. ”Elĵeti,” ŝi opinias kritike, sed tamen post iom longa strategia konsidero, enpikas kudrilon rezolute en la sudan bordregionon de Cejlono.

Ekregis digna familia trankvilo, tiel kara al patro Povondra; nur la ĵurnalo susuras kaj al ĝi respondas la rapide tredata fadeno.

”Ĉu oni kaptis lin?” demandas sinjorino Povondrová.

”Kiun?”

”Tiun murdinton, kiu murdis tiun virinon.”

”Ĉu mi zorgu pri via murdinto?” grumbas sinjoro Povondra kun ia abomeno. ”Ĝuste mi legas ĉi tie, ke ekis streĉo inter Japanio kaj Ĉinio. Tio estas grava afero. Tie ĉiam ĝi estas grava.”

”Mi opinias, ke oni ne kaptos lin plu,” opinias sinjorino Povondrová.

”Kiun?”

”Tiun murdinton. Kiam iu mortigas virinon, do nur malofte oni lin kaptas.”

”Japano ne ŝatas vidi, ke Ĉinio reguligas la Flavan Riveron. Jen la politiko. Dum tie la Flava Rivero faras misordon, estas en Ĉinio ĉiumomente inundo kaj malsato, kaj tio ĉinojn senfortigas, ĉu? Pruntu al mi la tondilon, panjo, tion mi eltondos por mi.”

”Kial?”

”Nu, ĉi tie mi legas, ke sur la Flava Rivero laboras du milionoj da salamandroj.”

”Tio estas multe, ĉu?”

”Tion mi opinias. Sed tiujn certe pagas Ameriko, mia kara. Tial la mikado volus sidigi tie siajn proprajn salamandrojn. — Ha, ni vidu!”

”Kio do?”

”*Petit Parisien* skribas, ke tion Francio ne povas toleri. Kaj ĝi pravus. Ankaŭ mi ne tolerus tion.”

”Kion vi ne tolerus?”

”Ke Italio vastigu la insulon Lampeduson. Ĝi estas ege grava strategia pozicio, tion vi devas scii. Italio povus de Lampeduso endanĝerigi Tunizion. Ĉi tie skribas *Petit Parisien*, ke Italio volus konstrui el tiu Lampeduso unuarangan marfortikaĵon. Onidire, ĝi havas tie sesdek mil armitajn salamandrojn. — Tio estas pripensinda. Sesdek mil, tio estas tri divizioj, panjo. Mi diras al vi, sur Mediteraneo, tie foje io okazos. Donu, tion mi eltondos por mi.”

Dume malaperis Cejlono sub la diligenta mano de sinjorino Povondrová kaj reduktiĝis al dimensio de la insulo Rodoso.

”Kaj Anglio,” rezonis patro Povondra, ”ankaŭ tiu havos siajn malfacilaĵojn. En la Ĉambro de Deputitoj estis paroloj, ke Granda Britio versimile postrestas la ceterajn ŝtatojn koncerne la akvokonstruaĵojn. La aliaj koloniaj potencoj vetkonstruas novajn bordojn kaj firmajn terojn, dume la brita registaro pro konservativa malkonfido al la salamandroj. — Jen vero, panjo. La angloj estas ege konservativaj. Mi konis iun lakeon el la brita ambasadorejo, kaj tiu por nenio en la mondo volis enbuŝigi nian ĉeĥan premkolbason. Ĉe ili oni tion ne manĝas, kaj tial ankaŭ li tion ne manĝos. Ne mirigas min, ke poste

la aliaj ŝtatoj ilin devancas.” Sinjoro Povondra serioze kapskuis. ”Kaj Francio larĝigas siajn bordojn apud Kalezo. Nun la ĵurnaloj en Anglio rumoras, ke Francio pafos trans la Manikan Kanalon kontraŭ Anglion, se la Kanalo mallarĝiĝos. Jen la sekvo. Ili mem povus plivastigi siajn bordojn apud Dovero kaj pafi kontraŭ Francion.”

”Kaj kial ili devus pafi?” demandis sinjorino Povondrová.

”Tion vi ne komprenas. Tio estas militaj kaŭzoj. Mi ne mirus, se tie iam estiĝus pelmelo. Aŭ tie, aŭ ie aliloke. Tio per si mem kompreneblas, nun, pro la salamandroj, la mondsituacio estas tute alia, panjo. Tute alia.”

”Ĉu vi opinias, ke povus esti milito?” zorgis sinjorino Povondrová. ”Sciu, mi pensas pri nia Francisko, ke li devu rekrutiĝi.”

”Milito?” opiniis patro Povondra. ”Devos okazi mondmilito, por ke la ŝtatoj povu dispartigi al si la marojn. Sed ni restos neŭtralaj. Iu ja devas resti neŭtrala, por liveri armilojn kaj ĉion ceteran al la aliaj. Tiel estas,” decidis sinjoro Povondra. ”Sed tion vi virinoj ne komprenas.”

Sinjorino Povondrová lippremis kaj rapidstebe estis finanta la ekstermon de la insulo Cejlono desur la ŝtrumpeto de juna sinjoro Povondra.

”Kaj se mi nur konsideras,” aŭdiĝis patro Povondra kun apenaŭ subpremata fiero, ke ĉi tiu terura situacio ne

estus sen mi! Se tiam mi ne estus alkondukinta tiun kapitanon al sinjoro Bondy, la tuta mondhistorio aspektus tute alie. Iu alia pordisto enlasus lin eĉ ne internen, sed mi diris al mi, ke tion mi surprenos. Kaj jen, vidu, kiajn malfacilaĵojn havas kun tio tiaj ŝtatoj kiel Anglio aŭ Francio! Kaj krome ankoraŭ ni ne scias, kio povas okazi el ĉi tio —” Sinjoro Povondra ekscite eksuĉis sian pipon. ”Tiel statas, kara infano. La ĵurnaloj plenas pri la salamandroj. Ĉi tie denove —” Patro Povondra demetis la pipon. ”Ĉi tie estas, ke apud la urbo Kankesanturai sur Cejlono salamandroj ekatakis iun vilaĝon; onidire tie la indiĝenoj antaŭe batmortigis kelkajn salamandrojn. Estis venigita polico kaj plotono da indiĝena soldataro,” laŭtlegis sinjoro Povondra, ”post kio okazis regula pafado inter la salamandroj kaj homoj. Je la flanko de la soldataro estis kelkaj vunditoj —. Tio ne plaĉas al mi, panjo.”

”Kial?” ekmiris sinjorino Povondrová, zorgeme kaj kun kontentigo glatfrapante per tondiltenilo la lokon, sur kiu estadis la insulo Cejlono. ”Ja, nenio neordinara!”

”Mi ne scias,” elvortigis patro Povondra kaj komencis ekscitite reiradi tra la ĉambro. ”Sed tio tute ne volas plaĉi al mi. Ne, tion mi ne ŝatas vidi. Pafado inter homoj kaj salamandroj, tio ne bezonus esti.”

”Eble la salamandroj nur defendis sin,” kvietige opiniis sinjorino Povondrová kaj demetis la ŝtrumpetojn.



”Nu jes,” murmuretis sinjoro Povondra maltrankviligite. ”Kiam foje la bestaĉoj komencos sin defendi, estos malbone. Tio okazis unuafoje, ke ili faris tion ... Damne, tion mi ne ŝatas vidi!” Sinjoro Povondra hezite haltis. ”Mi ne scias, sed ... tamen, se nur mi ne estu enlasinta tiun kapitanon al sinjoro Bondy!”

- 1 Komp. G. Kreuzmann, *Geschichte der Molche\**. Hans Tietze, *Der Molch des XX. Jahrhunderts*. Kurt Wolff, *Der Molch und das deutsche Volk*. Sir Herbert Owen, *The Salamanders and the British Empire\**. Giovanni Focaja, *L'evoluzione degli anfibi durante il Fascismo\**. Léon Bonnet, *Les Urodèles et la Société des Nations\**. S. Madariaga, *Las Salamandras y la Civilización\**, kaj m.a.
- 2 Komp. Milito kontraŭ Salamandroj, volumo I., ĉapitro XII.
- 3 Tion dokumentu tuj la unua eltondaĵo el la kolekto de sinjoro Povondra:

The Salamanders and The British Empire — (*angle*) Salamandroj kaj la Brita Imperio  
 der Edelmolch — (*germane*) nobla salamandro  
 L'evoluzione degli anfibi durante il Fascismo — (*itale*) Evoluo de la amfibioj dum faŝismo  
 Les Urodèles et la Société des Nations — (*france*) La Salamandroj kaj Ligo de Nacioj  
 Las Salamandras y la Civilización — (*hispane*) La salamandroj kaj la civilizacio

## SALAMANDRO-MERKATO

/ĈTK/ Laŭ la lasta informo, kiun eldonis la Salamandro-Sindikato fine de la kvaronjaro, la debito de la salamandroj kreskis je preskaŭ 30 procentoj. En tri monatoj estis liveritaj preskaŭ sepdek milionoj da salamandroj ĉefe en la Sudan kaj Mezan Amerikojn, Indonezion kaj Italian Somalion. Por la plej proksima tempo estas preparata profundigo kaj larĝigo de la Panama Kanalo, purigo de la haveno en Guayaquil kaj forigo de kelkaj malprofundaĵoj kaj rifoĵoj en Torres-Markolo. Nur ĉi tiuj laboroj signifus laŭ la proksimuma takso transigon de naŭ miliardoj da kubometroj de firma teraĵo. Konstruado de pezaj fluginsuloj sur traceo Madejro-Bermudoj estas komencote nur venontjare. Superŝuto de la Marianaj Insuloj en la japana mandato plu progresas; ĝis nun estis akirite okcent kvardek mil akreoj da nova, tiel ke nomata leĝera seka tero inter la insuloj Tinian kaj Saipan. Konsidere al la kreskanta postulo estas la salamandroj tre firmaj en la prezo kaj notas Leading 61, Team 620. Provizoj sufiĉaj.

- 4 Pri la similaj obstakloj atestas ekzemple ĉi tiu informo, eltondita el ĵurnalo sen dato:

### ĈU ANGLIO FERMAS SIN KONTRAŬ LA SALAMANDROJ?

(Reuter.) Demandite de membro de la malsupra parlamento, Mr. J. Leeds, respondis hodiaŭ Siro Samuel Mendeville, ke la registaro de Ŝia Majesto fermis la Suezan Kanalon por ĉiaj salamandro-transportoj; plue, ke ĝi ne intencas allasi, ke eĉ nur unu salamandro estu okupata sur bordo aŭ en la suverenaj akvoj de la britaj insuloj. Kaŭ-

zo por ĉi tiuj dispozicioj, deklaris Siro Samuel, estas unue la sekureco de la britaj bordoj, due, valideco de la malnovaj leĝoj kaj kontraktoj pri persekutado de komerco kun sklavoj.

Je demando de parlamentano, Mr.B. Russel, anoncis Siro Samuel, ke ĉi tiu vidpunkto memkomprene ne koncernas la britajn dominiojn kaj koloniojn.

- 5 Ĝenerale oni uzis por tio pistolojn, kiujn inventis inĝ. Mirko Šafránek kaj kiujn fabrikis la arsenalo Zbrojovka en Brno.
- 6 Komp. kun ĉi tiu ĵurnala raporto:

### **STRIKMOVADO EN AŬSTRALIO**

(Havas.) Gvidanto de la aŭstraliaj Sindikatoj, Harry Mac Namara, anoncas ĝeneralan strikon de ĉiuj havenaj, transportaj, elektreaj kaj aliaj dungitoj. La sindikataj organizoj nome postulas, ke importo de laborsalamandroj en Aŭstralion estu severe kontingentata laŭ la enmigradleĝoj. Kontraŭe la aŭstraliaj farmistoj postulas, ke importo de salamandroj estu malblokita, ĉar per ilia furaĝado konsiderinde altiĝas la debito de la enlanda maizo kaj de bestgrasoj, ĉefe de la ŝafsebo. La registaro strebas pri kompromiso; la Salamandro-Sindikato proponas, ke ĝi pagus al Trade-Unioj por ĉiu importita salamandro sumon de ses ŝilingoj. La registaro pretas doni garantiojn, ke salamandroj estos estos okupataj nur en la akvo kaj (pro moralaj kaŭzoj) ili elmergiĝos el la akvo ne pli ol 40 centimetrojn, tio estas ĝis la brusto. La sindikatoj persistas pri 12 centimetroj kaj postulas por ĉiu salamandro

imposton de dek ŝilingoj kaj enregistran kotizon. Ŝajnas, ke la akordo estos atingita per subvencio el la ŝtata kaso.

- 7 Komp. la rimarkindan dokumenton el la kolekto de sinjoro Povondra:

### **Salamandroj savas la vivon de 36 dronantoj**

*(De nia ekstra raportisto.)*

En ĉi tiea haveno karambolis la vaporŝipo Indian Star kun boato transportanta ĉirkaŭ kvardek indiĝenojn, kiu tuj dronis. Antaŭ ol eblis ekspedi polican barkason, alhastis helpi salamandroj laborantaj por forŝlimigo de la haveno kaj surbordigis tridek ses dronantojn. Unu salamandro mem elteris el la akvo tri virinojn kaj du infanojn. Rekompençe por ĉi tiu brava ago la salamandroj ricevis skriban dankon de la lokaj aŭtoritatoj en akvomezista ujo. Kontraŭe, la indiĝena loĝantaro estas ekstreme inicitita, ĉar al la Salamandroj estis permesite tuŝi la dronantajn personojn de la superaj kastoj. Ĝi opinias la salamandrojn malpuraj kaj netuŝendaj. En la haveno tumultis kelkmil indiĝenoj postulantaj, ke la salamandroj estu elpelitaj el la haveno. Sed la polico konservas ordon; nur tri estis mortigitaj kaj cent dudek arestitaj.

Ĉirkaŭ la naŭa vespere estis restarigita trankvilo. La salamandroj plu laboras.

- 8 Komparu la jenan altgrade interesan eltondaĵon, bedaŭrinde en nekonata lingvo kaj tial netradukeblan:

### **SACHT na kchri te Salaam Ander bwtat**

Saght gwan t'lap ne Salaam Ander bwtati og t'cheni berchi ne Simbwana m'bengwe ogandi sŭkh ma moŭ-moŭ

opwana Salaam Ander sri m'oana gwen's. Og di Limbw og di bwtat na Salaam Ander kchri p'we ogandi p'we o'gwandi te ur maswæli sŭkh? Na, ne ur lingo t'Islamli kcher oganda Salaam Andrias sahti. Bend op'tonga kchri Simbwana mâdh, salaam!

- 9 Komp. detalan kaj objektivan priskribon, signitan per signo e.w., la 5-an de oktobro:

### S-TRADE

"Singapuro la 4-an de oktobro. Leading 63. Heavy 317. Team 648. Odd Jobs 26,35. Trash 0.08. Spawn 80-132." Tian informon leganto de ĵurnaloj povas trovi ĉiutage en la ekonomia rubriko de sia gazeto inter telegramoj pri prezo de kotono, stano aŭ tritiko. Ĉu jam vi scias, kion signifas ĉi tiuj enigmaj numeroj kaj vortoj? Nu jes, komerco kun salamandroj, aŭ S-Trade; sed kiel ĉi tiu komerco vere aspektas, pri tio plejparto da legantoj havas imagon malpli klaran. Eble ili imagas grandan foirejon, svarmanta de miloj kaj miloj da salamandroj, kie promenas aĉetantoj en tropikaj kaskoj kaj turbanoj, rigardas la ofertatan varon kaj fine fingre montras bone evoluintan, sanan, junan salamandron dirante: "Vendu al mi ĉi tiun pecon; kiom ĝi kostas?"

Fakte la Salamandro-Merkato aspektas nepre alie. En la singapura marmora konstruaĵo S-Trade vi vidos eĉ ne unu salamandron, nur viglajn kaj elegantajn oficistojn en blankaj vestoj, akceptantaj telefonajn komisionojn. "Jes, sinjoro. Leading kostas 63. Kiom? Ducent pecojn? Jes, sinjoro. Dudek Heavy kaj cent okdek Team. Okey, mi komprenas. Ŝipo navigos post kvin semajnoj. Right? Thank

you, sir.” La tuta palaco S-Trade sonas per telefonaj interparoloj; pli vere ĝi impresas kiel oficejo aŭ banko ol ia foirejo; kaj kolonaro fronte estas foirejo pli tutmonda ol la bagdada bazaro dum Harun-al-Raŝido.

Sed ni revenu al la citita merkato-informo kun ĝia komerca ĵargono.

Leading estas simple speciale selektitaj inteligentaj, kutime trijaraj salamandroj, zorgeme instruitaj por esti inspektistoj kaj gvidantoj en la salamandraj laborkolumnoj. Ili estas vendataj po unu senkonsidere la korpopezon; oni aprecas nur ilian inteligentecon. Singapuraj Leading, parolantaj bone la anglan, estas opiniataj unuarangaj kaj la plej fidindaj; sporade oni ofertas ankaŭ aliajn markojn de gvidantaj salamandroj, kiel tiel nomatajn Capitanos, Inĝenieroj, Malaian Chiefs, Foremanders kaj aliajn, sed Leading estas taksataj maksimume. Nuntempe ilia prezo varias ĉirkaŭ sesdek dolaroj po peco.

Heavy estas pezaj, atletaj, kutime dujaraj salamandroj, kies pezo varias inter cent ĝis cent dudek funtoj. Oni vendas ilin nur po trupoj (tiel nomataj bodies) po ses unuopuloj. Ili estas dresitaj por la plej pezaj korpaj laboroj, kiel rokrompado, forrulado de ŝtonblokoj kaj simile. Se la citita kurzo-raporto indikas Heavy 317, tio signifas, ke la sesmembra trupo (body) de pezaj salamandroj estas pagata per tricent dek sep dolaroj. Por ĉiu trupo de la pezuloj kutime estas destinita unu Leading kiel gvidanto kaj inspektisto.

Team estas ordinaraj labor-salamandroj pezantaj 80 ĝis 100 funtojn, vendataj nur en labortrupoj (teamoj) po dudek pecoj; ili estas destinitaj por amaslaboro kaj estas

uzataj ŝate por dragado, konstruado de remparoj aŭ digoj kaj simile. Por ĉiu dudekmembra teamo estas destinita unu Leading.

Odd Jobs estas aparta klaso. Ili estas salamandroj, kiuj pro diversaj kaŭzoj ne ĝuis amasan kaj specialigitan instrukciadon, ekzemple tial, ĉar ili elkreskis ekster grandaj, fake administrataj salamandraj farmbienoĵoj. Fakte ili estas duonsovaĝaj, sed ofte tre talentaj salamandroj. Ili estas aĉetataj po unu peco aŭ po dekduoj kaj estas uzataj por diversaj helplaboroj aŭ negravaj funkcioj, por kiuj ne valoras alkomando de la tuta salamandra trupo aŭ laborteamo. Se ni povas opinii Leading elito inter la salamandroj, Odd Jobs prezentas ion kiel etproletaron. Lastatempe oni aĉetas ilin ŝate kiel salamandro-krudaĵon, kiun unuopaj entreprenistoj plu bredas kaj klasigas je Leading, la Pezuloj, Teamo aŭ Trash.

Trash aŭ fatraso (defalaĵoj) estas malpli valoraj, malfortaj aŭ korpe difektitaj salamandroj, kiuj estas vendataj nek unuope nek en difinitaj grupoj, sed amase laŭpeze kutime po dekoj da tunoj; kilogramo da vivpezo kostas nun sep ĝis dek centimojn. Fakte ne estas konate por kio ili estas utiligataj kaj kiacele oni aĉetas ilin — eble por pli leĝeraj laboroj sub la akvo; por ke ne estiĝu miskompreno, ni rememorigas, ke la salamandroj ne estas por la homoj manĝeblaj. Ĉi tiun Trash aĉetas preskaŭ senelekte ĉinaj revendistoj; kien ili ĝin transportas, ne estas konstatite.

Spawn estas simple salamandra fraĵo, pli precize dirite larvoj ĝis unu jaro. Oni vendas kaj aĉetas ilin po centoj kaj ili ĝuas tre bonan debiton, ĉefe ĉar ili estas malka-

raj kaj ilia transporto estas plej malmultekosta; nur sur la destinita loko oni finbredas ilin ĝis la tempo, kiam ili kapablas labori. Spawn estas ekspedataj en bareloj, ĉar la larvoj ne forlasas la akvon, kion la maturaj salamandroj bezonas ĉiutage fari. Ofte okazas, ke el Spawn finkreskas unuopuloj kun eksterordinara talento, superantaj eĉ la standartigitan tipon Leading; pro tio la komercado kun la frajo akiras specialan intereson. Alttalentaj salamandroj poste estas vendataj po kelkcent dolaroj popece; usona milionulo Denicker pagis eĉ du mil dolarojn por salamandro flue parolanta naŭ lingvojn, kaj igis ĝin transporti per speciala ŝipo ĝis Miami; ĉi tiu transporto mem kostis preskaŭ dudek mil dolarojn. Lastatempe la salamandra frajo ŝate estas aĉetata por tiel nomataj salamandraj staloj, kie estas selektataj kaj trejnataj rapidaj sportaj salamandroj; tiujn poste oni jungas triope al plataj konkosimilaj boatoj. Vetkonkuroj en konkoj tirataj de salamandroj estas nuntempe altmodaj kaj la plej ŝatata amuzo de junaj usonaninoj en Palm Beach, en Honolulu aŭ en Kubo; oni nomas ilin Triton-Races aŭ Venusaj boatfestoj. En malpeza dekoraci-riĉa konko glitanta sur la marsurfaco, staras konkurantino en maksimume kurta kaj ĉarma bankostumo kaj firme tenas en la manoj silkajn konkudilojn de la salamandra trijungaĵo; oni konkuras simple pri titolo de Venuso. Mr. J. S. Tincker, nomata reĝo de konservujoj, aĉetis por sia filineto konkuran salamandrotrion, Pozidonon, Hengist'on\* kaj King Eduardon, por ne malpli ol tridek ses mil dolaroj. Sed ĉio ĉi estas jam ekster kadro de Hengist kaj Horsa — anglosaksaj armeestroj, konkerintaj en la 5-a jarcento Brition



la propra S-Trade, kiu limigas sin al tio, ke ĝi liveras en la tutan mondon solidan laborajn Leadings, Heavies kaj Teams.

Jam ni menciis la salamandrajn farmobienojn. La leganto ne imagu grandegajn bredstalojn kaj enfermejojn; ĝi estas kelkkilometra nuda bordregiono, sur kiu dise staras dometoj el ondolado. Unu dometo estas por la veterinaro, unu por la direktoro kaj la ceteraj estas por la inspektista personaro. Nur dum la malfluso videblas, ke for de la bordo etendiĝas en la maron longaj digojoj, dividantaj la bordon je kelkaj basenoj. Unu estas por la frajo, la dua por klaso Leding kaj tiel plu; ĉiu specio estas nutrata kaj dresata aparte, kompreneble nokte. Je krepuskiĝo elmergiĝas salamandroj el siaj truoj sur la bordon kaj ariĝas ĉirkaŭ siaj instruistoj; kutime ili estas ekssoldatoj. Unue estas parol-leciono; la instruisto antaŭdiras al salamandroj vortoj, ekzemple "fosi", kaj demonstre klarigas al ili ilian sencon. Poste li vicigas ilin kvarope kaj instruas ilin marŝi; sekvas duonhoro de gimnastikado kaj ripozo en la akvo. Post la paŭzo oni instruas, kiel manipuli kun diversaj instrumentoj kaj armiloj, post kio proksimume dum tri horoj sub kontrolo de instruistoj sekvas praktikaj laboroj en la akvo-konstruado. Poste la salamandroj revenas en la akvon kaj estas nutrataj per salamandro-biskvitoj, entenantaj ĉefe maizan farunon kaj sebon; Leding kaj la Pezaj Salamandroj estas nutrataj per viando. Maldiligenteco kaj malobeemo estas punataj per forpreno de nutraĵo, aliaj korpaj punoj ne ekzistas; cetere la sentemo de salamandroj kontraŭ doloro estas sensignifa. Kun la sunleviĝo komenciĝas en la salamandraj farm-

bienoj morta trankvilo; la homoj iras dormi kaj la salamandroj malaperas sub la mara surfaco.

Ĉi tiu sinsekvo de la aferoj ŝanĝiĝas en la jaro nur dufoje. Unufoje en tempo de pariĝo, kiam la salamandroj estas lasataj al si mem, kaj la duan fojon, kiam al la farmbieno alboridiĝas cisterna ŝipo de la Salamandro-Sindikato kaj transdonas al la direktoro de la farmbieno ordonojn, kiom da salamandroj el tiu aŭ alia klaso estas transportataj. La rekrutado okazas nokte; ŝipoficiro, la direktoro de la farmbieno kaj veterinaro sidas ĉe tableto kun lampo, dum inspektistoj kaj la ŝipanaro fermas ĉe tableto kun salamandroj la retiriĝon al la maro. Poste salamandro post salamandro alpaŝas al la tableto kaj estas deklarita taŭga aŭ ne. La rekrutitaj salamandroj poste enboatiĝas kaj estas transportataj al la cisterna ŝipo. Ili faras tion plejparte volontule, tio estas laŭ nura akra ordono; nur iam necesas modera perforto, kiel ekzemple estas katenado. Spawn aŭ frajo memkompreneble estas kaptataj per retoj.

Same humane kaj higiene okazas la transporto de la salamandroj en la cisternaj ŝipoj; ĉiun duan tagon oni ŝanĝas al ili per pumpiloj la akvon en ujoj kaj ili estas pleje abunde nutrataj. La mortokvanto dum la transporto apenaŭ atingas dek procentojn. Laŭ deziro de la Bestprotektaj Societoj ĉeestas sur ĉiu cisterna ŝipo ŝipkapelano, atentemas super la homeca traktado kun la salamandroj kaj ĉiunokte predikas al ili kaj arde rekomendas ĉefe respekton al la homoj kaj dankeman obeemon kaj amon por iliaj estontaj labordonantoj, volantaj nenion alian ol patrece zorgi pri ilia bonfarto. Certe estas sufiĉe malfacile

klarigi al la Salamandroj ĉi tiun patrecan zorgemon, ĉar la nocio patreco estas al ili nekonata. Inter la pli kleraj salamandroj enkondukiĝis por la ŝipkapelanoj la nomo Paĉjo Salamandro. Ankaŭ edukfilmoj pruviĝis tre taŭgaj, per kiuj al la salamandroj estas prezentataj dum la transporto aŭ mirakloj de la homa tekniko, aŭ iliaj estontaj laboroj kaj devoj.

Ekzistas homoj tradukantaj la mallongigon S-Trade (Salamandro-Sindikato) Sklavo-Trade aŭ sklavokomercio. Nu, kiel senpartiaj observantoj ni povas diri, se la iama komercado kun sklavo estus same bone organizita kaj higieno tiel senripoĉe farata kiel la nuntempa komercado kun la salamandroj, ni povus al la sklavo nur gratuli. Nome, la pli karajn salamandrojn oni traktas vere zorge kaj delikate, jam tial, ĉar la kapitano kaj ŝipano garantias per siaj salajroj kaj laborpagoj por vivo de la salamandroj al ili konfiditaj. La skribinto de ĉi tiu artikolo estis atestanto, kiel eĉ la plej harditaj ŝipanoj sur cistrena ŝipo S.S. 14 estis profunde emociitaj, kiam ducent kvardek unuarangaj salamandroj en ia kuvego malsaniĝis je pezaj diareoj. Ili iradis rigardi ilin kaj kun la larmplenaj okuloj elmontradis siajn homajn sentojn per malmildaj vortoj: "Ĉi tiujn bestaĉojn la diablo ŝuldis al ni!"

10 Ni citas tiutempan aŭtentikan priskribon:

## **PIRATOJ DE LA XX-A JARCENTO**

E.E.K.

Estis la dekunua vespere, kiam la kapitano de nia ŝipo ordonis malhisi la flagon pri ŝtataneco kaj mallevi la bo-

atojn. La nokto estis plenluna sub arĝenta vualo; la insuleto, al kiu ni remis, estis, mi opinias, Gardner Island en la Feniksa Insularo. En tiaj lunnoktoj la salamandroj suriras bordon kaj dancas; vi povas alproksimiĝi al ili kaj ili ne aŭdas vin, tiom ili estas absorbitaj de sia amasa, muta danco. Ni dudekope surpaŝis la bordon kun remiloj enmane, kaj forminte plotonon ni komencis duonronde ĉirkaŭi la malhelan aron svarmanta sur plaĝo en la laktblanka lunlumo.

Estas malfacile priskribi la impreson, kiun elvokas la danco de la salamandroj. Proksimume tricent bestoj sidas sur la malantaŭaj piedoj en absolute preciza rondo, frunte al la centro; la interno de la rondo estas malplena. La salamandroj sidas senmove, kvazaŭ rigide; aspektas kiel ronda palisaro ĉirkaŭ ia mistera altaro; sed estas tie nek altaro nek dio. Subite iu el la bestoj ekŝmacas "ts-ts-ts" kaj komencas balance turni la supran korpoparton; ĉi tiu balanca movo transiras plue kaj plue kaj post kelkaj sekundoj ĉiuj salamandroj tordas la supran korpoparton, ne forlasante la lokon, pli kaj pli rapide, sensone, ĉiam pli fanatike, en furioza kaj ebriiga turbado. Proksimume post kvaronhoro febliĝas unu salamandro, la dua, la tria, balanciĝas senenergie kaj rigidiĝas; denove ĉiuj sidas senmove kiel statuoj; post tempeto aŭdiĝas aliloke la mallaŭta "ts-ts-ts", alia salamandro komenciĝas tordiĝi kaj ĝia danco per unufojo transaltas sur la tutan rondon. Mi scias, ke ĉi tiu priskribo efikas tre mekanike; sed imagu ĉe tio la palan lunlumon kaj la regulan, longan muĝadon de la fluso; ĝi entenis ion senlime magian kaj kvazaŭ ensorĉitan. Mi haltis kun kunpremita gorĝo pro senvola sento de

hororo aŭ mirego. "Homo, movu vin," alkriis min la plej proksima najbaro, "alie vi faros truon en la sablo."

Ni mallarĝigis nian ringon ĉirkaŭ la besta danĉrondo. La viroj tenis la remilojn transverse kaj parolis duonvoĉe, ĉar estis nokto, kaj ne ĉar la salamandroj povus aŭdi ilin. "Mezen, trote," ekkriis la komandanta oficiro. Ni ekkuris al la kirliĝanta rondo; la remiloj ekfrapis kun obtuza bru-falo la dorsojn de la salamandroj. Nur nun la salamandroj ektimegis, retretis mezen aŭ volis tragliti inter la remiloj al la maro, sed la bato per remilo reĵetis ilin, ŝrikantajn pro doloro kaj timo. Ni puŝis ilin per la remilstagnoj en la mezon, kunpremitajn, plenŝtopitajn, superrampantajn unu la alian en kelkaj tavoloj; dek viroj ĉirkaŭfermis ilin en la remilbariero kaj dek puŝis kaj bategis per la remiloj tiujn, kiuj provis subrampi aŭ trakuri. Estis nura volvaĵo de nigra, tordiĝanta, kaose kvakanta karno, sur kiun estis falantaj obtuzaj frapoj. Poste malfermiĝis spaco inter du remiloj; tra ĝi elglitis salamandro kaj estis svenigita per klabfrapo sur la nukon; post ĝi la dua kaj tria, ĝis kuŝis tie proksimume dudeko da ili. "Fermu," ordonis la oficiro, kaj la spaco inter la remiloj fermiĝis. Bully Beach kaj la mestizo Dingo kaptis per ĉiu mano kruron de unu svenigita salamandro kaj trenis ilin trans la sablon al la boatoj kvazaŭ senvivajn sakojn. Iam la trenata korpo fiksiĝis inter ŝtonoj, tiam la maristo ektiris per abrupta kaj kolera ektirego kaj la kruro deiĝis. "Ne gravas," murmuris maljuna Mike, kiu staris apud mi. "Homo, tiu denove elkreskos al ĝi." Kiam ili ĵetamasigis la svenigitajn salamandrojn en la boatoj, la oficiro ordonis seke: "Preparu la pluajn!" Kaj denove falis frapoj per klaboj sur la nukojn de la sala-

mandroj. Tiu oficiro, li nomiĝis Bellamy, estis klera kaj kvieta homo, bonega ŝakisto; sed ĉi tio estis ĉaso aŭ plivere komerco, do kiajn ceremoniojn. Tiel estis ĉasitaj pli ol ducent svenigitaj salamandroj; proksimume sepdek tie restis, versimile ili estis mortaj kaj ne valoris la fortrenon.

Sur la ŝipo la kaptitaj salamandroj estis ĵetitaj en ujojn. Nia ŝipo estis malnova cisterna ŝipo por transporto de nafto; la malbone purigitaj cisternoj fetoris post petrolo kaj la akvo en ili estis tegita grase kaj irize; nur la kovraĵo estis forigita, por alkonduko de aero; kiam oni ĵetamasiĝis tie la salamandrojn, ĝi aspektis dense kaj abomene kiel nudelsupo; ie-tie io senforte kaj plorinde moviĝis, sed dum la tago oni lasis tion en trankvilo, por ke la salamandroj povu rekonsciiĝi. Postmorgaŭ venis kvar viroj kun longaj stangoj kaj per ili puŝis la "supon" (fakte oni vere nomas tion soup); ili kirlis per tiu dense arigitaj korpoj kaj observis, kiuj ne moviĝas aŭ de sur kiu forfalas la karno; tiujn poste ili pike surhokigis kaj elujigis. "Ĉu la supo estas pura?" demandis poste la kapitano. "Jes, sinjoro." "Alverŝu akvon tien!" "Jes, sinjoro." Tia purigado de la supo devis esti ripetata ĉiutage; ĉiufoje oni ĵetis en la maron ses ĝis dek pecojn de la "difektita varo", kiel oni tion nomas; nian ŝipon fidele akompanis kavalkado da grandaj kaj bonege satvorintaj ŝarkoj. Ĉe la ujoj tio abomene fetoris; malgraŭ la perioda ŝanĝado la akvo en la ujoj estis flava, dense kovrita de ekstrementoj kaj trempmoligitaj biskvitoj; en ĝi lace padelis aŭ apatie kuŝis nigraj, peze anhelantaj korpoj. "Ĉi tie estas bone al ili," asertis la maljuna Mike. "Mi vidis ŝipon, kiu transportadis tion en ladbareloj de benzeno; tie ĉio mortaĉis al ili."

Post ses tagoj ni surŝipigis novan varon sur la insulo Nanomea.

\*

Tiel do aspektas la komerco kun la salamandroj; jes, komerco neleĝa, alivorte moderna piratado, trokreskinta preskaŭ dumnokte. Oni asertas, ke preskaŭ kvarono de ĉiuj vendataj kaj aĉetataj salamandroj estas ĉasataj ĉi-maniere. Ekzistas salamandro-kovejoj, kiuj ne valoras la penon flanke de Salamandro-Sindikato, ke ĝi konservu tie daŭrajn farmobienojn; sur etaj pacifikaj insuloj la salamandroj multiĝis tiom, ke ili fariĝis rekte ĝenaj; la indiĝenoj ne ŝatas ilin kaj asertas, ke ili traboras per siaj truoj kaj koridoroj la tutajn insulojn; tial kaj la koloniaj oficuloj kaj la Salamandro-Sindikato mem fermetas la okulojn pro la rabatakado de salamandrejoj. Oni kalkulas, ke ekzistas ĉirkaŭ kvarcent piratŝipoj, kiuj okupiĝas nur pri rabado de salamandroj. Krom entreprenistoj profesias ĉi tiun modernan piratadon tutaj ŝipkompanioj, el kiu la plej granda estas Pacific Trade Comp. kun restadejo en Dublino; ĝia prezidanto estas la estimata sinjoro Charles B. Harriman. Antaŭ unu jaro la situacio estis iom pli malbona; tiam iu ĉina bandito Teng kun tri ŝipoj agresis eĉ farmobienojn de la Sindikato kaj tute ne hezitis masakri ĝian personaron, kiam tiu kontraŭstaris al ĝi; pasintnovembre ĉi tiu Teng kun sia nenombra floto estis pafdetruita de la amerika kanonŝipo Minnetonka apud Midway Island. Ekde tiu tempo la salamandro-piratado akceptis malpli sovaĝajn formojn kaj ĝuas konstantan prosperon, kiam estis interkonsentitaj difinitaj modaloj dum kiuj ĝi

estas silente tolerata: ekzemple, ke ĉe agreso de fremda bordregiono estos forigita desur la masto la flago de la koncerna ŝtato; ke sub preteksto de piratado ne estos praktikata importo kaj eksporto de alia varo; ke la forrabitaj salamandroj ne estos vendataj por dumping-prezroj kaj estos markataj en komerco kiel duaranga kvalito. salamandroj en la neleĝa komerco estas vendataj po dudek ĝis dudek du dolaroj po peco; ili estas konsiderataj malpli valoraj, sed tre hardita specio, rilate tion, ke ili transvivis la teruran traktadon en la pirataj ŝipoj. Oni taksas, ke tian transporton transvivas meznombre dudek kvin ĝis tridek procentoj de la kaptitaj salamandroj; sed tiuj jam kapablas ion elteni. En la komerca ĵargono ili estas nomataj Makaronioj kaj lastatempe ili estas notataj ankaŭ en la regulaj merkat-informoj.

\*

Du monatojn poste mi ŝakludis kun sinjoro Bellamy en halo de hotelo France en Sajgono; tiam ne plu mi estis dungita maristo.

"Rigardu, Bellamy," mi diris al li, "vi estas bonedukita homo kaj kiel oni diras ĝentlemano. Ĉu iam ne estas kontraŭ via naturo, ke vi servas al io, kio esence estas la plej abomena sklavkomerco?"

"Bellamy ŝultrolevetis. "Salamandroj estas salamandroj", li murmuris eviteme.

"Antaŭ ducent jaroj oni diris, ke negroj estas negroj."

"Kaj ĉu tio ne estis vero?" diris Bellamy. "Ŝakon!"

Tiun ludon mi perdis. Subite ŝajnis al mi, ke ĉiu movo sur la ŝaktabulo estas malnova kaj jam iam de iu estis lu-



dita. Eble ankaŭ nia historio iam estis ludita; kaj ni movas la figurojn per la samaj movoj al la samaj malvenkoj kiel iam. Eble ĝuste tia bonmora kaj silentema Bellamy ĉasis iam negrojn sur Eburbordo kaj veturigadis ilin al Haitio aŭ al Luiziano, lasante ilin mortaĉadi en la subferdeko. Tiam li intencis per tio nenion malbonan, tiu Bellamy. Bellamy neniam pensas ion malbonan. Tial li estas nerebonigebla.

”La nigra malvenkis,” diris Bellamy kontente kaj leviĝis por streĉiĝi.

- 11 Ni citas referaĵon pri la scienca kongreso en Parizo laŭ atesto de persona atestanto R.D.

### 1er CONGRES d'URODELES.

Mallongigite oni nomas ĝin Kongreso de amfibioj vosthavaj, sed ĝia oficiala titolo estas iom pli longa: La Unua Internacia Kongreso de Zoologoj por Psikologia Esploro de la Amfibioj Vosthavaj. Vera Parizano ne ŝatas klaftolongajn titolojn; la doktaj profesoroj kunsidantaj en la amfiteatro de Sorbono estas por li simple Messieurs les Urodeles, sinjoroj vosthavaj amfibioj, kaj sufiĉe. Aŭ ankoraŭ pli koncize kaj malpli respekte: Ces Zoos-la\*.

Ni iris do rigardi ces Zoos-la pli pro scivolemo ol pro la referdevo. Pro scivolo, komprenu, ne koncernanta la universitatajn, plejparte nejunajn kaj okulvitrajn kapacitojn, sed ĝuste tiujn ... estaĵojn (kial la vorto ”besto” ne volas de nia plumo?), pri kiuj jam tiom multe estis skribite ekde la sciencaj foliantoj ĝis bulvardaj kanzonoj, kiuj oni-dire estas — laŭ opinio de kelkaj — ĵurnalblufo, laŭ aliaj

Ces Zoos-la — (*france*) tiuj bestoj

estaĵoj multrilate pli talentaj ol mem la mastro de la kreitaro kaj krono de kreitaĵoj, kiel ankoraŭ nun (mi opinias post la mondmilito kaj la aliaj historiaj cirkonstancoj) oni nomas la homon. Mi esperis, ke la renomaj sinjoroj partoprenantoj de la kongreso por psika esploro de la amfibioj vosthavaj donos al ni laikoj klaran kaj finan respondon, kiel statas la fama lernemo de Andrias Scheuchzeri; ke ili diros al ni: jes, ĉi tio estas kreito racia aŭ almenaŭ tiom same kapabla por la civilizacio kiel vi aŭ mi; tial oni devas kalkuli kun ĝi por la futuro, same kiel ni devas kalkuli kun la estonteco de la homaj rasoj, iam opiniataj sovaĝaj kaj primitivaj ... Mi diras al vi, nenia tia respondo, nek demando estis farita en la kongreso; la nuntempa scienco estas por tio tro ... faka, por okupiĝi pri tiaŝpecaj problemoj.

Nu, ni instruiĝu do pri tio, kion science oni nomas spirita vivo de bestoj. Tiu longa sinjoro kun flirtanta mago-barbo ĝuste brueganta sur la podio estas la fama profesoro Dubosque; ŝajnas, ke li venkobatas ian absurdan teorion de iu estimata kolego, sed tiun parton de lia komento ni ne povas bone sekvi. Nur post iom longa tempe to ni ekkomprenas, ke tiu pasia magiulo parolas pri la perceptemo de Andrias por la koloroj kaj ĝia kapablo distingi diversajn kolorajn nuancojn. Mi ne scias, ĉu mi bone komprenis, sed mi ricevis impreson, ke Andrias Scheuchzeri estas eble iom daltonisma, sed ke profesoro Dubosque estas nepre ege miopa laŭ tio, kiel li levadis siajn paperojn ĝis la dika, sovaĝe brilanta okulvitro. Poste parolis ridetema japana sciencisto, d-ro Okagawa; estis io pri reago-arko kaj pri fenomenoj, kiuj estiĝos, se oni tra-

tranĉas ian sesorian vojon en la cerbo de Andrias; poste li priskribis, kion faras Andrias, se oni frakasas ĝian organon respondanta al la orel-labirinto. Poste profesoro Rehman detale klarigis, kiel Andrias reagis je elektra incitado. Tuj ekfuriozis pasia disputo inter li kaj profesoro Bruckner. C'est un type\*, ĉi tiu profesoro Bruckner; malgranda, kolerema kaj preskaŭ tragike vigla; interalie li asertis, ke Andrias koncerne la sensorganojn estas same malbone ekipita kiel la homo kaj estas karakterizata per la sama instinkto-malriĉo; nete biologie, ĝi estas laŭdire same dekadenca besto kiel la homo, kaj simile kiel li ĝi klopodas anstataŭi sian biologian minusecon per tio, kion oni nomas intelekto. Sed ŝajnas, ke la ceteraj fakuloj ne akceptis profesoron Bruckner serioze, versimile tial, ĉar li ne tratranĉadis iajn sensoriajn vojojn kaj ne kondukis en la cerbon de Andrias elektrajn impulsojn. Post tio profesoro van Dieten malrapide kaj preskaŭ pie priskribis, kiaj perturboj manifestiĝas ĉe Andrias, de kiu estis forprenita la dekstra frunta cerbolobo aŭ okcipita volvo sur la maldekstra flanko de la cerbo. Poste usona profesoro Devrient prelegis —

Pardonu, vere mi ne scias, kion li prelegis; ĉar tiuomente mi komencis cerbumi, kiaj difektoj estiĝus ĉe profesoro Devrient, se mi desekcus lian dekstran fruntan cerbolobon; kiel reagis la ridetema d-ro Okagawa, se mi incitus elektre lin, kaj kiel versimile kondukus profesoro Rehman, se iu pistus lian orel-labirinton. Mi ankaŭ sentis ian malcertecon, kiel fakte statas mia distingado de

C'est un type — (*france*) kia tipo

koloroj aŭ de faktoro **t** en miaj motoraj reagoj. Turmentis min dubo, ĉu (en rigore scienca senco) ni rajtas paroli pri nia (mi opinias homa) spirita vivo, se ni unu al la alia ne dissekis la cerbolobojn kaj ne tratranĉis la sensoriajn vojojn. Fakte ni devus ĵetiĝi unu kontraŭ la alian kun skalpeloj en la manoj por reciproke studi nian spiritan vivon. Kio min koncernas, mi estus preta en intereso de la scienco frakasi la okulvitrojn de profesoro Dubosque aŭ konduki elektrajn malŝargojn sur la kalvon de profesoro Dieten, post kio mi publikigus artikolon pri tio, kiel je tio ili reagis. Por diri la veron, mi scias tion vigle imagi. Malpli vigle mi scias imagi, kio dum tiaj eksperimentoj okazis en la animo de Andrias Schuechzeri; sed mi kredas, ke ĝi estas treege pacienca kaj bonula kreito. Neniu el la prelegintaj kapacitoj diris, ke la povrulo Andrias Scheuchzeri ankaŭ iam ekfuriozis.

Mi ne dubas, ke la Unua Kongreso de la amfibioj vosthavaj estas konsiderinda scienca sukceso; sed kiam foje mi havos ferian tagon, mi iros en Jardin des Plantes\* rekte al la akvujo de Andrias Scheuchzeri, por diri mallaŭte al ĝi: "Vi, salamandro, kiam foje venos via tago .... ne venu al vi ideo science esplori la psikan vivon de la Homoj!"

- 12 La utileblojn de la salamandroj esploris nome la Hamburga sciencisto Wuhrmann, el kies kompetentaj eseoj ni citas almenaŭ en konciza ekstrakto lian *Bericht über die somatische Verlangung der Molche*.

La eksperimentoj, kiujn mi entreprenis kun la pacifika gigantsalamandro (Andrias Scheuchzeri Tschudi) en mia

Jardin des Plantes — (france) Botanika Ĝardeno en Parizo

Hamburga laboratorio, sekvis tute difinitan celon: elprovi la rezistecon de la salamandroj kontraŭ ŝanĝoj de medio kaj aliaj eleksteraj intervenoj kaj per tio dokumenti ilian praktikan uzeblon en diversaj geografiaj sferoj kaj dum diverse variigataj kondiĉoj.

Per la unua eksperimentado estis konstatote, kiel longe eltenos salamandro ekster la akvo. La eksperimentbestoj estis tenataj en sekaj kuvoj dum temperaturo de 40-50 Celsiusgradoj. Post kelkaj horoj videblis laciĝo; se ili estis priŝprucigitaj, ili denove reviviĝis. Post dudek kvar horoj ili kuŝis senmove, movante nur la palpebrojn; la pulso malrapidiĝis, ĉia korpa aktiveco estis malaltigita je minimumo. La bestoj videble suferas kaj la plej eta movo kostas al ili grandan penon. Post tri tagoj komenciĝas stato de katalepsia rigideco (xerosa); la bestoj ne reagas, eĉ kiam ili estas brulvundataj per elektrokaŭtero. Se estas altigita humido de la atmosfero, ili komencas montri almenaŭ kelkajn vivosignojn (ili fermas la okulojn antaŭ forta lumo kaj simile). Se la tiel sekigita salamandro estis ĵetita post sep tagoj en la akvon, ĝi reviviĝis post forpaso de iom longa tempo; sed dum pli daŭra sekigado pereis pli granda nombro da eksperimentbestoj. Sub rekta sunlumo ili pereas jam post kelkaj horoj.

Aliaj eksperimentbestoj estis devigataj turni ŝafton en mallumo en neordinare seka spaco. Post tri horoj ilia laborkapacito komencis sinki, sed denove ĝi altiĝis post abunda priŝprucigo. Dum ofte ripetata priŝprucigo la bestoj eltenis turni krandon de la ŝafto dek sep, dudek kaj en unu kazo dudek ses horojn seninterrompe, dum la kontrolhomo jam post kvin horoj de la sama mekanika

laboro estis konsiderinde elĉerpita. El la eksperimentoj ni povas konkludi, ke la salamandroj estas bone uzeblaj ankaŭ por laboro sur la seka tero, memkompreneble sub du kondiĉoj: ke ili ne estos elmetitaj al la rekta sunlumo, kaj de temp'al tempo iliaj korpoj estos pliŝprucigitaj per akvo.

La dua eksperimento koncernis la rezistecon de la salamandroj, bestoj origine tropikaj, kontraŭ malvarmo. Ĉe subita malvarmigo de la akvo ili pereis pro intestaj katastroj; sed dum malrapida alklimatigo al la pli malvarma medio baldaŭ aperis kutimo; post ok monatoj ili restadis viglaj ankaŭ ĉe temperaturo de la akvo de sep Celsiusgradoj, dum oni donadis al ili en nutraĵo pli da graso (tage 15 ĝis 20 dekagramojn por unu peco). Se la temperaturo de la akvo estis malaltigita sub 5 Celsiusgradojn, ili falis en malvarm-rigidecon (geloso); en tiu stato ili povus esti frigiditaj kaj konservataj frostigite en glacibloko dum kelkaj monatoj; kiam la glacio degelis kaj la temperaturo de la akvo altiĝis super 5 Celsiusgradojn, ili komencis denove montri vivosignojn kaj dum sep aŭ dek gradoj ili komencis vikle serĉi nutraĵon. El tio oni povas konkludi, ke la salamandrojn oni povas facile alklimatigi ankaŭ al nia klimato ĝis norda Norvegio kaj Islando. Por klimataj kondiĉoj polusaj necesus pluaj eksperimentoj.

Kontraŭe neordinaran malharditecon vidigas la salamandroj rilate kemiajn reakciojn; dum la eksperimentado kun tre diluita lesivo, kloakakvoj, taniloj ktp. defaladis ĉifone ilia haŭto kaj la eksperimentaj bestoj pereadis de ia blanko-gangreno. Por niaj riveroj do la salamandroj estas praktike neuzeblaj.

En plua serio de eksperimentoj ni sukcesis konstati, kiel longe la salamandroj povas vivi sen nutraĵo. Ili povas malsati tri semajnojn eĉ pli longe, sen vidigi aliajn signojn krom ia malvigleco. Iun eksperimentan salamandron mi igis malsati ses monatojn; dum la lastaj tri monatoj ĝi dormis senmove kaj senĉese; kiam poste mi ĵetis al ĝi en kuvegon hakitan hepaton ĝi estis tiel malforta, ke ĝi ne reagis al tio kaj devis esti arte nutrata. Post kelkaj tagoj ĝi manĝis normale kaj oni povis uzi ĝin por pluaj eksperimentoj.

La lasta eksperimentado okupiĝis pri la regeneraj kapabloj de la salamanandroj. Se oni forhakas voston de salamandro, elkreskas al ĝi nova dum dek kvar tagoj; ĉe ia salamandro ni ripetis ĉi tiun eksperimenton sepfoje kun la sama rezulto. Same rekreskas al ĝi ankaŭ forhakitaj kruroj. Al ia eksperimenta besto ni amputis ĉiujn kvar membrojn kaj la voston; post tridek tagoj ĝi estis denove tuta. Se oni rompas al salamandro femuralon aŭ humeron, forfalas ĝia tuta rompita membro kaj surkreskas al ĝi alia. Same se kreskas al ĝi elpikita okulo aŭ eltranĉita lango; estas interese, ke salamandro, kies langon mi forigis, forgesis paroli kaj devis tion denove lerni. Se oni amputas la kapon al salamandro aŭ se oni tratranĉas ĝian korpon inter la kolo kaj pelv-ostoj, la besto pereas. Kontraŭe, eblas forpreni de ĝi stomakon, parton da intestoj, du trionojn de hepato kaj aliajn organojn, sen difekti ĝiajn vivfunkciojn, oni povas do diri, ke vivisekcie sentripigita salamandro ankoraŭ kapablas pluan vivon. Neniu alia besto havas tian rezistemon kontraŭ ia ajn lezo kiel salamandro. Tiurilate ĝi povus esti unuaranga, preskaŭ ne-

detruebla militbesto; bedaŭrinde malhelpas tion ĝia pacamo kaj natura sendefendeco.

Krom ĉi tiuj eksperimentoj mia asistanto d-ro Walter Hinkel esploris la valoron de salamandroj laŭ vidpunkto de utilaj krudaĵoj. Nome li trovis, ke la korpo de salamandroj entenas neordinare altan procenton da jodo kaj fosforo; ne estas ekskludite, ke oni povus el ili en kazo de neceso ekspluati gravajn elementojn industrie. La haŭton de la salamandroj, per si mem malbonkvalitan, oni povas mueli kaj premi sub premego; la tiel akirita arta ledo estas leĝera, sufiĉe firma kaj povus esti surogato de bovoledoj. La graso de la salamandroj estas nemanĝebla pro abomena gusto, sed ĝi taŭgas por la teknika lubrikado, ĉar ĝi frostiĝas nur dum temperaturoj ege malaltaj. Ankaŭ la viando de la salamandroj estis konsiderata nemanĝebla, eĉ venena; se ĝi estas manĝata kruda, ĝi kaŭzas kruelajn dolorojn, vomadon kaj halucinojn. D-ro Hinkel konstatis post multaj eksperimentoj, kiujn li faris sur si mem, ke la malutilaj efikoj perdiĝas, se la distranĉita viando estas infuzita per varmega akvo (same kiel ĉe kelkaj amanitoj, kaj post funda lavado peklita dum dudek kvar horoj en diluita solvaĵo de permanganato. Poste oni povas ĝin kuiri aŭ stufi kaj ĝi bongustas kiel malbona bovoviando. Tiel ni formanĝis salamandron, kiun ni nomis Hans; ĝi estis klera kaj sagaca besto kun speciala talento por scienca laboro; ĝi laboris en la sekcio de d-ro Hinkel kiel lia laboratoria helpanto kaj oni povis konfidi al ĝi ankaŭ delikatajn kemiajn analizojn. Ni babilis kun ĝi dum longaj vesperoj, amuzante nin pro ĝia nesatigebla sci-avido. Bedaŭrinde ni devis nian Hans mortigi, ĉar ĝi blindiĝis post miaj eks-



perimentoj pri trepanado. Ĝia viando estis malhela kaj fungeca, sed postlasis neniajn malagrablajn sekvojn. Estas certe, ke en militkazo la salamandro-viando povas esti bonvena kaj malkara surogato de bovoviando.

- 13 Karakterizan dokumenton prezentas enketo de la ĵurnalo "Daily Star" je la temo: **ĈU SALAMANDROJ HAVAS ANIMON?** Ni citas el ĉi tiu enketo (memkompreneble sen garantio pri la ĝusteco) kelkajn citaĵojn de eminentaj personecoj:

Dear Sir\*,

mia amiko, pastoro H. B. Bertram, kaj mi observis salamandrojn iom longan tempon dum konstruado de digo en Adeno; ni ankaŭ parolis kun ili dufoje aŭ trifoje, sed ni rimarkis ĉe ili nenian signon de superaj sentoj, kiel estas Honoro, Kredo, Patriotismo aŭ Sporta Spirito. Kaj kion alian, mi demandas, ni povas prave karakterizi kiel animon?

Truly yours\*

Kolonelo John W. Britton

Neniam mi vidis iun salamandron; sed mi estas konvinkita, ke estaĵoj ne havantaj propran muzikon, ankaŭ ne havas animon.

Toscanini

Ni flanklasu problemon de animo; sed dum mi povis observi Andriason, mi dirus, ke ili ne havas individuecon; ili

Dear Sir — (*angle*) tre estimata sinjoro

Truly yours — (*angle*) via sindona

ŝajnas esti unu kiel la alia, same strebemaj, same kapablaj — kaj same senesprimivaj. Unuvorte: ili plenumas difinitan idealon de la moderna civilizacio, nome la Mezon.

Andé d'Artois

Nepre ili ne havas animon. En tio ili konformiĝas kun la homo.

Via G. B. Shaw

Via demando embarasas min. Ekzemple mi scias, ke mia ĉina hundeto Bibi havas etan kaj amindan animon; same mia persa katino Sidi Hanum havas animon, kaj kian belegan animon kaj kruelan! Sed la salamandroj? Jes, ili estas t r e talentaj kaj inteligentaj, tiuj povruoj scias paroli, kalkuli kaj esti treege utilaj; sed ili estas t i e l malbelaj!

Via Madeleine Roche

Ili estu salamandroj, ĉefe ke ili ne estas marksistoj.

Kurt Hubert

Ili ne havas animon. Se ili havus ĝin, ni devus atribui al ili ekonomian egalecon kun la homo, kio estus absurda.

Henry Bond

Ili ne havas seks-allogon. Tial ankaŭ animon ili ne havas.

Mae West

Ili havas animon, kiel ĝin havas ĉiu kreaĵo kaj ĉiu planto, kiel ĝin havas ĉio vivanta. Granda estas la sekreto de ĉia vivo.

Sandrabharata Nath

Ili havas interesan teknikon kaj naĝostilon; ni povas lerni multon de ili, nome en la naĝado sur longdistancaj vojoj.

Johny Welssmüller\*

- 14 Pliajn detalojn vidu en libro: Mme Zimmermann, sa vie, ses idées, son oeuvre\* (Alcan). El ĉi tiu verko ni citas pietatan rememoron de la salamandro, kiu estis unu el ŝiaj unuaj lernantoj:

”Ŝi recitadis al ni Lafonten-fablojn, sidante ĉe nia simpla, sed pura kaj komforta baseno; ŝi suferis pro humideco, sed ne atentis tion, estante plene sindona al sia instruista devo. Ŝi nomis nin ‘mes petits Chinois’\*, ĉar ni, simile kiel ĉinoj, ne sciis prononci la sonon r. Sed post iom da tempo ŝi kutimiĝis je tio, ke ŝi mem prononcadis sian nomon Mme Zimmermann; ni salamandridoj adoris ŝin; la etaj, ne havantaj ankoraŭ evoluintajn pulmojn kaj tial ne povantaj forlasi la akvon, ploris, ke ili ne povas akompani ŝin dum la promenoj tra la lerneja ĝardeno. Ŝi estis tiel milda kaj afabla, ke — laŭ mia scio — ŝi nur unufoje ekkoleris; tio estis, kiam nia juna instruistino pri historio iun varman someran tagon survestis bankostumon kaj mal-supreniris inter nin en la basenon, kie ŝi sidante ĝiskole en la akvo, prelegis al ni pri la nederlandaj bataloj por libereco. Tiam nia kara Mme Zimmermann efektive ekkoleris: ”Iru tuj lavi vin, Mademoiselle, iru, iru,” ŝi vokis

Johny Weissmüller — amerika naĝisto kaj filmaktoro (Tarzan)  
 Mme Louise Zimmermann, sa vie, ses idées, son oeuvre —  
 (france) Madame L. Z., ŝia vivo, ŝiaj ideoj, ŝia verko  
 mes petits Chinois — (france) miaj etaj ĉinoj

okullarme. Por ni tio estis delikata, sed komprenebla leciono, ke tamen nur ni ne apartenas inter la homojn; poste ni estis dankemaj al nia spirita patrino, ke tion ŝi konsciigis al ni en maniero tiel decida kaj taktoplana.

Kiam ni bone lernis, rekompence ŝi legis al ni modernajn poemojn, kiel de François Coppée. "Ĝi estas tamen **tro** moderna," ŝi diradis, "sed finfine, nuntempe ankaŭ tio apartenas al la ĝenerala klereco." Je la fino de la lerneja jaro estis aranĝita publika Matineo, al kiu estis invititaj sinjoro prefekto el Nico kaj aliaj oficialaj kaj eminentaj personecoj. La talentaj kaj progresintaj lernantoj, havantaj jam pulmojn, estis sekigitaj de pedelo kaj vestitaj per iaj blankaj tunikoj; poste ili deklamis malantaŭ maldika kurteno (por ke la sinjorinoj ne timiĝu pro ili) fablojn de Lafonteno, matematikajn formulojn kaj tronsekvon de Kapetidoj en kronologia ordo. Post tio sinjoro prefekto en bela kaj longa parolo esprimis sian dankon kaj komplimenton al nia kara direktorino, per kio la ĝoja tago finiĝis. Same kiel pri nia spirita progreso oni zorgis ankaŭ pri nia korpa bonfarto; unufoje monate inspektis nin loka veterinaro kaj unufoje duonjare ĉiu el ni estis pesita, ĉu ni havas la preskribitan pezon. Aparte arde nia estimata komandantino rekomendis al ni, ke ni formetu la abomenan, senbridan kutimon de la Monataj Dancoj; mi hontas diri, ke malgraŭ tio kelkaj pli maturaj zorgatoj kaŝe dum la plenluno kulpiĝadis pri ĉi tiu besta infamio. Mi esperas, ke nia patrineca amikino neniam sciiĝis pri tio; tio frakasus ŝian grandan, noblan kaj amoplenan koron."

15 Inter alie proponis la renoma filologo Curtius en la verko *Janua linguarum aperta\**, ke estu adoptita kiel sola komunuza lingvo por la salamandroj la latino el la ora tempo de Vergilio. Nuntempe estas en nia povo, li vokis, ke la latino, la lingvo plej perfekta, plej riĉa je gramatikaj reguloj kaj science plej bone ellaborita, iĝu denove vivanta mondlingvo. Se la klera homaro ne eluzos ĉi tiun okazon, faru tion vi mem, *salamandrae, gens maritima\**; elektu por via gepatra lingvo la eruditajn *linguam latinam\**, unikan lingvon indan tion, ke ĝin parolu *orbis terrarum\**. *Nepasema estos, salamandrae, via merito, se vi revivigos al la nova vivo la eternajn lingvon de dioj kaj herooj, ĉar kun ĉi tiu lingvo, gens Tritonum\**, foje vi transprenos ankaŭ la heredaĵon de la mondreganta Romio.

Aliflanke iu latva telegraf-oficisto, nomata Wolteras, kune kun pastoro Mendelius eltrovis kaj ellaboris specialajn lingvon por la salamandroj, nomitan lingvo Pontika (pontic lang); por ĝi li uzis elementojn de ĉiuj lingvoj de la mondo, ĉefe afrikajn dialektojn. Ĉi tiu salamandraĵo (kiel ankaŭ oni ĝin nomis) atingis certan disvastiĝon nome en la nordaj ŝtatoj, sed bedaŭrinde nur inter homoj; en Upsalo estis eĉ instalita katedro por la salamandra lingvo, sed kiom estas konate, inter salamandroj eĉ ne unu parolis ĉi tiun lingvon. Verdire, plej multe enradikiĝis

*Janua linguarum aperta* — (lat.) Apertita Eniro al la Lingvoj  
*Salamandrae, gens maritima* — (lat.) Salamandroj, la margento  
*eruditam linguam latinam* — (lat.) la latino, lingvo de kleruloj  
*orbis terrarum* — (lat.) terglobo  
*gensTritonum* — (lat.) gento de Tritonoj

inter la salamandroj Basic-English, kiu pli poste fariĝis la oficiala lingvo de la salamandroj.

- 16 Komparu felietonon el plumo de Jaromír Seidl-Novoměstský\*, konservita en la kolekto de sinjoro Povondra.

### NIA AMIKO SUR GALAPAGOJ

Farante kun mia edzino, la poetino Henrika Seidlová-Chrudimská\*, vojaĝon ĉirkaŭ la mondo, per la sorĉo de tiom da novaj kaj potencaj impresoj almenaŭ parte transvivis la doloran perdon de nia kara onjo, la verkistino Bohumila Jandová-Střešovická\*, ni venis ĝis la solecaj, de multaj sagaoj ĉirkaŭteksitaj Galapagoj. Ni havis nur du horojn por la restado, ni utiligis ilin por promeno sur la bordo de ĉi tiu dezerta insularo.

”Vidu, kiel belege hodiaŭ la suno subiras,” mi diris al mia edzino. ”Ĉu ĝi ne aspektas, kvazaŭ la tuta firmamento dronus en inundo da oro kaj sango?”

”Ĉu la sinjorino bonvolas esti ĉeĥa?” aŭdiĝis neatendite post ni en ĝusta kaj neta ĉeĥa lingvo.

Ni rigardis surprizite en direkto, de kie aŭdiĝis la vortoj. Neniu tie estis, nur granda, nigra salamandro sidis sur ŝtonblokoj tenante en la mano ion, kio aspektis kiel libro. Dum nia vojaĝo ĉirkaŭ la mondo ni vidis jam plurajn salamandrojn, sed ĝis nun ni ne havis okazon ekparoli kun ili. Tial la afabla leganto komprenos nian miron, kiam sur

Jaromír Seidl Novoměstský, Henrieta Seidlová-Novoměstská, Bohumila Jandová-Střešovická — Ĉapek mokas la ĉeĥajn verkistojn el la fino de la pasinta jarcento, kiuj aldonadis al siaj nomoj pseŭdonomojn de geografia deveno

la bordo tiel forlasita ni renkontiĝis kun salamandro kaj krome ekaŭdis demandon en nia gepatra lingvo.

”Kiu parolas ĉi tie?” mi vokis ĉeĥe.

”Mi tiel aŭdacis, sinjoro,” diris la salamandro respektive levigante. ”Mi ne povis rezisti, aŭdante unuafoje en la vivo ĉeĥan interparolon.”

”Kio,” mi miregis, ”ĉu vi scias la ĉeĥan?”

”Ĵus mi amuziĝis konjugaciante la neregulan verbon esti,” diris la salamandro. ”Ĉi tiu verbo nome estas neregula en ĉiuj lingvoj.”

”Kiel, kie kaj kial,” mi insistis, ”vi lernis la ĉeĥan lingvon?”

”Hazardo alportis al mi ĉi tiun libron,” rediris la salamandro kaj prezentis al mi libreton, kiun ĝi tenis en la mano; estis La ĉeĥa por salamandroj, kaj ĝiaj folioj vidiĝis spurojn de ofta kaj diligenta uzado. ”Ĝi aperis ĉi tie kun sendaĵo de libroj kun enhavo instrua. Mi povis elekti inter Geometrio por la superaj mezlernejaj klasoj, Historio de milit-taktiko, Gvidlibro tra Dolomitoj aŭ Principoj de bimetalismo. Mi elektis tamen ĉi tiun libreton, kiu iĝis mia kunulo plej kara. Mi konas ĝin jam tute parkere, sed mi trovas en ĝi senĉese novajn fontojn de amuzo kaj instruo.”

Mia edzino kaj mi montris nian ne afektatan ĝojon kaj miron super ĝia ĝusta, preskaŭ komprenebla prononco. ”Bedaŭrinde, neniuj estas ĉi tie, kun kiu mi parolus ĉeĥe,” diris nia nova amiko modeste, ”kaj tute mi ne certas, ĉu la instrumentalo de vorto ĉevalo estas kun ĉevaloj aŭ per ĉevaloj.”

”Per ĉevaloj,” mi diris.

”Ho ne, kun ĉevaloj,” vokis mia edzino vigle.

”Ĉu vi estus tiel afabla kaj dirus al mi,” demandis nia kara societano fervore, ”kio nova en la centotura panjo Prago?”

”Ĝi kreskas, amiko,” mi respondis estante ĝojigita pro ĝia intereso kaj en kelkaj vortoj mi skizis al li floradon de nia ora metropolo.

”Kiel ĝojigaj estas la sciigaĵoj”, diris la salamandro kun nekaŝata kontentiĝo. ”Ĉu ankoraŭ pendas la dehakitaj kapoj de la ekzekutitaj ĉeĥaj nobeloj sur Mostecká věž\*?”

”Jam delonge ne,” mi diris al li, iom (mi konfesas) surprizita pro lia demando.

”Vere domaĝe,” opiniis la simapatia salamandro. ”Ĝi estis rara historia memoraĵo. Estu al dio plendate, ke tiom da valoraj memorindaĵoj detruigis dum la tridekjara milito! Se mi ne eraras, tiam la ĉeĥa lando estis ŝanĝita je dezertejo, dronante en sango kaj larmoj. Feliĉe, ke tiam ne formortis la genitivo de la negativo. En ĉi tiu libreto tekstas, ke onidire ĝi estas formortonta. Tion mi tre bedaŭrus, sinjoro.”

”Vin do interesas ankaŭ nia historio,” mi vokis ĝoje.

”Certe, sinjoro,” rediris la salamandro. ”Nome la Blankomonta katastrofo kaj la tricentjara servuto. Pri tio mi le-

dehakitaj kapoj de la ekzekutitaj ĉeĥaj nobeloj sur Mostecká věž — (sur Pontoturo); estas opiniata la ribelo de la ĉeĥaj protestantaj nobeloj kontraŭ Habsburgoj (1618), kiu gvidis al la tridekjara milito. La ribelo estis venkita en la jaro 1620 sur Blanka Monto (monteto apud Prago) kaj dudek sep gvidintoj estis senkapigitaj sur la Malnovurba Placo en Prago kaj iliaj kapoj pendigitaj sur la Pontoturo de Karol-Ponto



gis tre multe en ĉi tiu libro. Certe vi tre fieras pri via tricentjara servuto. Tio estis granda tempo, sinjoro.”

”Jes, peza tempo,” mi jesis. ”Tempo de subpremado kaj aflikto.”

”Kaj ĉu vi lamentegis?” demandis nia amiko kun avida intereso.

”Ni lamentegis, suferante neeldireble sub la jugo de ferocaj subpremantoj.”

”Mi ĝojas,” respiris la salamandro. ”En mia libro tio ĝuste tiel tekstas. Mi estas tre ĝojigita, ke ĝi estas vero. Tio estas bonega libro, sinjoro, pli bona ol Geometrio por superaj mezlernejaj klasoj. Foje ŝate mi stariĝus sur la memorinda loko, kie estis ekzekutitaj la ĉeĥaj nobeloj, kaj ankaŭ sur la aliaj gloraj lokoj de la kruela senrajteco.”

”Vi soltus viziti nin,” mi proponis kore al li.

”Mi dankas por la afabla invito,” riverencis la salamandro. ”Bedaŭrinde, tiomgrade miaj paŝoj ne estas liberaj...”

”Ni aĉetus vin,” mi ekkriis. ”Mi volas diri, eble per nacia kvesto ni povus havigi rimedojn, kiuj ebligus al vi ...”

”Plej ardajn dankojn,” murmuris nia amiko evidente emociita. ”Sed mi aŭdis, ke la vultava akvo ne estas bona. Nome ni suferas en river-akvo pro malagrabra disenterio.” Post kio li iom enpensiĝis kaj aldiris: ”Ankaŭ nur tre peze mi forlasus mian amatan ĝardeneton.”

”Aĥ,” ekkriis mia edzino, ”ankaŭ mi estas entuziasma ĝardenistino! Kiel dankema mi estus al vi, se vi montrus al ni la infanojn de ĉi tiu flaŭro!”

”Kun plej granda ĝojo, nobla sinjorino,” diris la salamandro ĝentile kliniĝante. ”Se nome ne ĝenos vin, ke mia parko estas sub akvo.”

”Sub akvo?”

”Jes. Dek kaj duonon de metroj.”

”Kaj kiajn florojn tie vi kultivas?”

”Maranemonojn,” diris nia amiko, ”en kelkaj raraj specioj. Ankaŭ marstelojn kaj markukumojn, ne kalkulante la koral-arbustojn. Beatul’, kultivinta al la patrio unu rozon, unu arbon, kiel diras poeto.”

Bedaŭrinde ni estis adiaŭontaj, ĉar la ŝipo jam signalis forveturon. ”Kaj kion vi mesaĝus, sinjoro — sinjoro — ” mi diris, ne sciante, kiel nia kara amiko nomiĝas.

”Mi nomiĝas Boleslav Jablonský\*,” atentigis nin la salamandro sinĝene. ”Ĝi estas mia opinie bela nomo, sinjoro. Mi elektis ĝin el mia libro.”

”Kion, sinjoro Jablonský, vi mesaĝus al nia nacio?”

La salamandro pripensis iom. ”Diru al viaj samlandanoj,” li diris fine kun profunda emocio, ”diru al ili, ... ke ili ne falu en malnovan slavan malkonkordon ... ke ili tenu en la dankema memoro Lipany\* kaj ĉefe la Blankan Monton! Saluton, mian respekton,” li subite finis, penante venki siajn sentojn.

Ni malproksimiĝis per boato de la bordo, enpense kaj emociitaj. Nia amiko staris sur la rifo kaj mangestis al ni; ŝajnis, ke ion li vokas.

Boleslav Jablonský — pseŭdonomo de la ĉeĥa sentimentala poeto Eŭgeno Tupý

Lipany — batalo apud Lipany en la jaro 1434, kiu signifis la finon de la Husanaj militoj

”Kion li vokis?” demandis mia edzino.

”Mi ne scias,” mi diris, ”sed sonis kiel Salutu sinjoron ĉefurbestron doktoron Baxa.”

- 17 Ĉefe en Germanio ĉia vivisekcio estis severe malpermesita, kompreneble nur al judaj esploristoj.
- 18 Ŝajnas, ke ankaŭ temis pri iaj moralaj motivoj. Inter la paperoj de sinjoro Povondra oni trovis en multaj lingvoj PROKLAMON publikigitan evidente en ĉiuj ĵurnaloj de la mondo kaj subskribitan de la dukino of Huddersfield mem, kie estis dirite:

”Ligo por protekto de salamandroj turniĝas ĉefe al vi, virinoj, ke vi en la intereso de deco kaj bonmoreco atribuu per laboro de viaj manoj al la granda agado, kies celo estas provizi la salamandrojn per konvena vestaĵo. Por tiu celo plej celhava estas jupeto kvardek centimetrojn longa, talio-larĝo sesdek centimetrojn, plej bone kun enkudrita gumbendo. Estas rekomendata jupeto faldita (plisita), bone konvenanta kaj permesanta pli grandan movo-liberon. Por la tropikaj landoj sufiĉas antaŭtuketo provizita per laĉo por ĉirkaŭligo de la talio, pretigita el tute simpla lavŝtofo, eventuale el nenovaj partoj de via vestaĵo. Per tio vi helpas al la povraj salamandroj, por ke ili ne devu sin montri dum sia laboro sen ia ajn vestaĵo, kio certe ofendas ilian hontemon kaj malagrable tuŝas ĉiun decan homon, nome ĉiun virinon kaj patrinon.”

Ŝajne ĉi tiu aktiveco ne renkontiĝis kun la dezirata rezulto; ne estas konate, ĉu la salamandroj iam konsentus porti jupetojn kaj antaŭtuketojn; versimile tio malhelpis ilin en la akvo aŭ ĝi ne volis resti sur ili. Kiam poste la sa-

lamandroj estis apartigitaj for de la homoj per lignotabulaj bariloj, kompreneble falis ambaŭflanke ĉiaj ajn kaŭzoj por hontemo aŭ malagrablaj sentoj.

Kio koncernas nian mencion, ke necesis gardi la salamandrojn antaŭ diversa ĝenado, ĉefe ni pensis pri hundoj, kiuj neniam paciĝis kun la salamandroj kaj persekutis ilin feroce ankaŭ sub la akvo, ne atentante, ke en iliaj muzeloj mukozoj inflamis, kiam ili mordvundis fuĝantan salamandron. Iam ankaŭ la salamandroj defendis sin kaj ne unu rara hundo estis batmortigita per hakfosilo aŭ pioĉo. Entute inter la hundoj kaj salamandroj evoluis daŭra eĉ mortiga malamikeco, kiu neniel ŝanĝiĝis, male plivere plifortiĝis kaj profundiĝis per establo de la bariloj inter ili ambaŭ. Sed tio jam okazas ne nur en la vivo kaj ne nur ĉe hundoj.

Pretere dirite, la gudritajn barilojn, etendiĝantaj multloke je centoj kaj centoj da kilometroj laŭ la marbordo, oni eluzis por edukaj celoj; laŭ la tuta longo ili estis pripentritaj per grandaj surskriboj kaj sloganoj konvenaj por la salamandroj, ekzemple: VIA LABORO-VIA SUKCESO-ELUZU ĈIUEN SEKUNDON! LA TAGO HAVAS NUR 86 400 SEKUNDOJN! — ĈIU NUR TIOM VALORAS, KIOM DA LABORO LI PLENUMAS. — UNU METRON DE LA DIGO VI POVAS KONSTRUI DUM 57 MINUTOJ! — KIU LABORAS, SERVAS AL ĈIUJ. — KIU NE LABORAS, NE MANĜU!

Kaj tiel plu. Konsiderante, ke la lignotabulaj bariloj borderis en la tuta mondo pli ol tricent mil kilometrojn da marbordoj, ni scias imagi, kiom da instigaj kaj ĝenerale utilaj sloganoj tie troviĝis.

19 Komp. la unuan salamandran proceson, okazinta en Durban, kaj kiu estis abunde komentita en la mondgazetaro (vidu eltranĉaĵojn de sinjoro Povondra). Havenofico en A. okupadis laborlokon de salamandroj. Tiuj dumtempe tiel multiĝis, ke en la haveno ili ne plu havis sufiĉe da loko; kelkaj junsalamandraj kolonioj do ekloĝis en la ĉirkaŭaj bordoj. Bienulo B., al kies terpecoj apartenis parto de la menciita bordo, postulis, ke la havenofico elloĝigu siajn salamandrojn el lia privata bordo, ĉar tie li havas sian privatan banejon. La havenofico oponis, ke tio ne rilatas ĝin; tuj kiam la salamandroj ekloĝis sur terpecoj de la plendanto, ili iĝis lia privata posedaĵo. Dum la traktado proporcie treniĝis, komencis la salamandroj (parte pro la denaska instinkto, parte pro laborfervoro, al ili memorfiksita per eduko) sen respektiva ordono kaj permeso konstrui digojn kaj haven-basenojn sur bordoj de sinjoro B. Tiam sinjoro B. prezentis al la koncerna ofico akuzon pro damaĝo de sia posedaĵo. En la unua instanco la akuzo estis rifuzita kun motivigo, ke la posedaĵo de sinjoro B. ne estis per la digoj damaĝita, sed pliperfektigita. La dua instanco pravigis la akuzantan partion en tio, ke neniu estas devigata toleri sur sia terpeco bredbestojn de sia najbaro, kaj ke la havenofico en A. garantias por ĉiaj damaĝoj kaŭzitaj de la salamandroj, same kiel kampulo kompensas damaĝojn, kiujn kaŭzis al la najbaro lia brutaro. La akuzita partio kompreneble obĵetis, ke ĝi ne povas garantii por la salamandroj, ĉar ĝi ne povas ilin fermi en la maro. Post tio la juĝisto deklaris, ke liaopinie necesas rigardi la damaĝojn faritajn de la salamandroj same kiel damaĝojn kaŭzitajn fare de kokinoj, kiujn ankaŭ ne eblas

enfermi, ĉar ili scias flugi. Reprezentanto de la havenofico demandis, kiamaniere do lia kliento devas elloĝigi la salamandrojn aŭ igi ilin al tio, ke ili mem forlasu la privatan bordon de sinjoro B. La juĝisto respondis, ke la afero ne koncernas la tribunalon. La reprezentanto demandis, kion la respektinda juĝisto opinius, se la akuzita ofico igus la nedeziratajn salamandrojn pafekstermi. Post tio la juĝisto respondis, ke tion, kiel la brita ĝentlemano, li opinius ekstreme malkorekta procedo kaj krome atenco de la ĉasrajto de sinjoro B. La akuzita partio estas do devigata unuflanke elloĝigi la salamandrojn el la privata posedajo de la akuzanto, aliflanke kompensi la damaĝojn tie kaŭzitajn per digoj kaj reguligo de la bordo kaj nome tiel, ke ĝi refaros tiun bordopecon en la originan staton. La reprezentanto de la akuzita partio poste metis demandon, ĉu oni darfus uzi por la malkonstruado la salamandrojn. La juĝisto respondis, ke liaopinie ne, ĉar tion ne permesos la akuzanto, kies edzino abomenas salamandrojn kaj ne povas baniĝi sur la bordo, naŭza pro la salamandroj. La akuzita partio oponis, ke sen la salamandroj ĝi ja ne povas forigi digojn, konstruitajn sub la marsurfaco. Post tio la juĝisto deklaris, ke la tribunalo nek volas nek povas decidi pri la teknikaj detaloj; la tribunaloj ekzistas ĉi tie por gardi la posedrajtojn, kaj ne por prijuĝi, kio estas realigebla kaj kio ne. Per tio la afero el la jura flanko estis finita; ne estas konate, kiel la havenofico en A. elvenis el ĉi tiu peniga situacio; sed la tuta kazo montris, ke la salamandran problemon tamen nur necesos ordigi per novaj juraj rimedoj.

20 Pluraj opiniis la egalrajtecon de la salamandroj tiel laŭvorte, ke ili postulis, ke la salamandroj povu okupi kiajn ajn publikajn oficojn en la akvo kaj sur la tero (J. Courtaud); aŭ ke el ili estu kreitaj plenarmitaj submaraj regimentoj kun la propraj enprofundaj komandantoj (em. generalo Desfours); eĉ tio, ke estu permesataj intermiksitaj geedziĝoj inter homoj kaj salamandroj (advokato Louis Pierrot). Natursciencistoj kontraŭis, ke tiaj geedziĝoj ne pre ne estas eblaj; sed maitre Pierrot deklaris, ke ne temas pri la natura eblo, sed pri la jura principo, kaj ke li mem estas preta edzinigi al si salamandran femalon, por pruvi, ke la menciita reformo de la geedza rajto ne restos nur sur papero. (M. Pierrot pli poste iĝis tre elserĉata advokato en divorc-aferoj).

(En ĉi tiu kroma konekseco estu menciite, ke nome en la usona gazetaro de temp' al tempo aperis informo pri knabinoj, kiuj laŭdire dum la banado estis sekse perfortitaj de salamandroj. Tial en Usono multiĝis kazoj, kiam salamandroj estis kaptataj kaj linĉataj, ĉefe ŝtiparumataj. Vane sciencistoj protestis kontraŭ ĉi tiu popola kutimo asertante, ke pro la anatomiaj kaŭzoj simila krimo flanke de la salamandroj estas fizike ekskludita; multaj knabinoj ĵuris, ke ili estis ĝenataj de salamandroj, per kio por ĉiu ĝusta amerikano la afero estis klara. Pli poste la ŝatata ŝtiparumado de salamandroj estis almenaŭ tiel limigata, ke ĝi rajtis okazi nur sabate kaj sub inspekto de fajrobriĝadanoj. Tiam ankaŭ estiĝis Movado kontraŭ linĉado de salamandroj, fronte de kiu staris la nigra pastoro Robert J. Washington kaj al kiu anonciĝis centmiloj da membroj, kompreneble preskaŭ senescepte nur negroj. La amerika

preso komencis aserti, ke la movado estas politika kaj renversema; tial okazis agresoj kontraŭ la negraj kvartaloj kaj estis brulmortigitaj multaj negroj, preĝantaj en siaj preĝejoj por Fratoj Salamandroj. La indigno kontraŭ negroj atingis kulminon, kiam de la brulanta negra preĝejo en Gordonville (L.) ekbrulis la tuta urbo. Sed ĉi tio apartenas al la historio de la salamandroj nur nerekte.)

El la civilaj aranĝoj kaj avantaĝoj, kiujn la salamandroj vere ricevis, ni citu almenaŭ kelkajn: ĉiu salamandro estis enskribita en la Salamandra Matrikulo kaj registrita en loko de sia laboro; ĝi devis havi oficialan permeson por restado; ĝi devis pagi kap-imposton, kiu anstataŭ ĝi pagis ĝia posedanto kaj deprenis ĝin de ĝia nutrado (ĉar la salamandroj ne ricevis salajron en mono); same ĝi devis pagi lupagon el la loĝata bordo, komunumajn alpagojn, depagojn por stablo de la lignotabula barilo, lernejan takson kaj aliajn publikajn ŝarĝojn; simple ni devas lojale konfesi, ke tiurilate oni traktis ĝin same kiel la aliajn civitanojn, sekve ĝi tamen ĝuis ian egalrajtecon.

- 21 Vidu la enciklikon de la Sankta Patro Mirabilia Dei opera\*.
- 22 Pri la afero aperis tiel grandega literaturo, ke nur ĝia bibliografio ampleksus du egajn volumojn.
- 23 Vidu en la paperoj de sinjoro Povondra ege pornan broŝuron, kiu onidire estis represita el la policaj raportoj en B. Indikojn de ĉi tiu "privata ekzemplero, eldonita por

"Mirabilis Dei Opera" — (lat.) Admiraj dignaj verkoj de Dio



scienca celo” ne eblas citi en deca libro. Ni prezentas nur kelkajn detalojn:

Templo de la salamandro-kulto, troviĝanta en strato xxx domnumero xxx, havas en sia mezo grandan basenon, garnitan per malhelruĝa marmoro. La akvo en la baseno estas parfumata per bonodoraj esencoj, varmigata kaj de elprofunde tralumigata per konstante ŝanĝiĝanta kolorlumoj; alie en la templo estas mallume. Dum kanto de la Salamandraj Litanioj eniras en la irizan basenon sur marmorŝtupoj per nenio vestitaj kredantaj salamandroj kaj salamandrinoj, de unu flanko viroj, de la alia flanko virinoj, senescepte el la plej bona societo; ni mencias ĉefe baroninon M., filmakoron S., ambasadoron D. kaj multajn aliajn eminentajn personecojn. Subite blua reflektoro prilumas grandegan marmoran blokon, leviĝantan super la akvon, sur kiu ripozas kaj peze respiras granda, olda, nigra salamandro, nomata Majstro Salamandro. Post nelonga silento la Majstro komencas paroli; li alvokas la kredantojn, ke ili plene kaj tutanime fordonu sin al la komenciĝantaj ceremonioj de la Salamandro-Danco kaj honoru la Grandan Salamandron. Post tio ĝi leviĝas kaj komencas balanci kaj tordi la supran duonon de la korpo. Ankaŭ la viraj kredantoj, mergiĝintaj ĝiskole en la akvo, komencas impete, ĉiam pli rapide kaj rapide balanciĝi kaj tordiĝi, onidire tial, por ke kreiĝu la Seksa Medio; dume la salamandrinoj elbuŝigas akrajn ts-ts-ts kaj kvakajn kriĉojn. Poste estingiĝas sub la akvo lumo post lumo kaj senbridiĝas ĝenerala orgio.

Ni ja ne povas garantii pri ĉi tiu priskribo; sed estas certe, ke en iuj pli grandaj urboj de Eŭropo la polico unu-

flanke severe persekutis ĉi tiujn salamandrajn sektojn, aliflanke ĝi havis plenmanojn da laboro kun sekretigado de grandegaj societaj skandaloj, ligitaj kun ĉi tio. Tamen ni opinias, ke la kulto de la Granda Salamandro estis ja neordinare disvastigita, sed ĝi okazadis plejparte kun lukso malpli fabela, kaj en la neriĉaj tavoloj eĉ sur la seka tero.

- 24 Ankaŭ jam la menciita katolika preĝo por la salamandroj difinis ilin kiel Dei creatura de gente Molche (diaj kreitaĵoj de la salamandra nacio)
- 25 Proklamo, konservita en la paperoj de sinjoro Povondra, tekstis:

### **KAMARADOJ SALAMANDROJ!**

La kapitalisma ordo trovis al si la lastan viktimon. Kiam ĝia tiranado komencis definitive splitiĝi kontraŭ la revolucia impeto de la klaskonscia proletaro, aljungis la putra kapitalismo en siajn servojn vin, Laboristojn de la Maro, sklavigis vin spirite per sia burĝa civilizacio, subigis vin al siaj klasleĝoj, senigis vin de ĉia libereco kaj faris ĉion, por povi senpune kaj brutale vin ekspluatigi.

(14 linioj konfiskitaj)

Laborantaj salamandroj! Proksimiĝas la momento, kiam vi komencas konsciigi al vi la tutan ŝarĝon de la sklaveco, en kiu vi vivas.

(7 linioj konfiskitaj)

kaj pretendos viajn rajtojn kiel klaso kaj nacio!

Kamaradoj salamandroj! La revolucia proletaro de la tuta mondo aletendas al vi la manon.

(11 linioj konfiskitaj)

per ĉiuj rimedoj. Fondu uzinajn konsilantarojn, elektu konfidulojn, establu strikfundusojn! Kalkulu kun tio, ke la laboristaro vin ne forlasos en via justa batalo kaj man-en-mane entreprenos kun vi la lastan atakon.

(9 linioj konfiskitaj)

Subpremataj kaj revoluciaj salamandroj de la tuta mondo, unuiĝu! Komenciĝas la lasta batalo!

Subskribita MOLOKOV

26 En la kolekto de sinjoro Povondra ni trovis nur kelkajn tiajn proklamojn; la ceterajn versimile forbruligis dumtempe sinjorino Povondrová. El la konservita materialo ni citas almenaŭ kelkajn titolojn:

salamandroj, for la batalilojn! (Pacifista manifesto).

Salamandroj, elĵetu la judojn! (Germana flugfolio).

Kamaradoj salamandroj! (Alvoko de la anarkiista-Bakuninista grupo).

Kamaradoj salamandroj! (Publika alvoko de la akvo-skoltoj).

Amikoj salamandroj! (Publika adreso de la Cetralo de akvariistaj societoj kaj bredantoj de la akvobestaro).

Salamandroj, amikoj! (Alvoko de Societo por la Morala Reformo).

Civitanoj salamandroj (Alvoko de la Reforma civitana frakcio en Dieppe).

Kolegoj salamandroj, eniru niajn vicojn! (Subtena societo de eksmaristoj).

Kolegoj salamandroj! (Naĝklubo Aegir).

Ekstre grava (se ni povas juĝi laŭ tio, ke sinjoro Povondra ĝin zorge subgluis (estis alvoko, kiun ni citas en plena origina teksto:

27 En la kolekto de sinjoro Povondra konserviĝis al ni felietona, sufiĉe supraĵa priskribo de la soleno; bedaŭrinde nur duono, la alia parto iel perdiĝis.

Nico, la 6-an de majo

En bela, hela konstruaĵo de la Instituto por Mediteraneaj Studoj sur Promenade des Anglais estas hodiaŭ vigle; du agens de police prizorgas liberan vojon sur trotuaro por la invititaj personecoj, paŝantaj sur la ruĝa tapiŝo en bonvenigan, agrable malvarman amfiteatron. Ni vidas la ridetantan sinjoron urbestron de Nico, sinjoron prefekton kun cilindro, generalon en lazurkolora uniformo, sinjorojn kun ruĝa butono de Honorlegio, damojn de necerta aĝo (ĉijare regas la moda terakotkoloro), vicadmiralojn, ĵurnalistojn, profesorojn kaj respektindajn oldulojn de ĉiuj nacioj, da kiuj sur Côte d' Azur estas ĉiam abunde. Subite eta incidento: inter ĉia ĉi honorularo timide kaj nerimarkate penas tragliti kurioza kreaĵeto; ĝi estas vualita de la kapo ĝis la tero en longan nigran pelerinon aŭ domenon, sur la okuloj ĝi havas grandegajn nigrajn okulvitrojn kaj haste, malcerte ĝi plandas al la troplenigita vestiblo. "Hé, vous," ekkriis iu policisto, "qu' est-ce que vous cherchez ici?\*" Sed jam al la timigita alvenanto alpaŝas la universitataj altranguloj kaj "cher docteur, ĉi tien, cher docteur tien". Do ĉi tiu estas d-ro Charles Mercier, la

He', vous, qu'est-ce que vous cherchez ici? — (*france*) Hej, kion vi serĉas ĉi tie?

klerega salamandro, hodiaŭ prelegonta antaŭ la elito de la Lazura Bordo! Rapide internen, por ke ankoraŭ ni kaptu loketon en la solene ekscitita aŭditorio!

Sur la podio eksidas Monsieur le Maire, Monsieur Paul Mallory, granda poeto, Mme Maria Dimineanu, kiel delegitino de Internacia Instituto por Intelekta Kunlaboro, rektoro de Instituto por Mediteraneaj Studoj kaj aliaj oficialaj personecoj; flanke de la podio estas pupitro por la prelegonto kaj post ĝi — Nu jes, ĝi estas vere ladkuvo. Ordinara ladkuvo, kiaj estas en la banĉambroj. Kaj du funkciuloj kondukantaj sur la podion timidan estaĵon, vualitan en longan kapuĉon. Aŭdiĝas iom embarasa aplaŭdo. D-ro Charles Mercier sinĝene riverencas kaj ĉirkaŭrigardas, kie sidigi sin. "Voilà, Monsieur," flustras iu funkciulo kaj montras la ladkuvon. "Jen por vi." D-ro Mercier videble ege hontas, ne scias, kiel rifuzi ĉi tiun afablaĵon; li provas kiel eble diskrete okupi lokon en la kuvo, sed li involviĝas en la longan pelerinon kaj kun brua plaŭdo falas en la kuvon. La sinjoroj sur la podio estis ege surŝprucigitaj, sed ili mienas, kvazaŭ nenio okazus; en la aŭditorio iu histerie ekridis, sed la sinjoroj el la unuaj vicoj riproĉe ĉirkaŭrigardas kaj siblas ŝŝ! Tiumomente leviĝas Monsieur le Maire et Député kaj ekparolas. Sinjorinoj kaj sinjoroj, li diras, mi havas la honoron bonvenigi sur la tero de nia bela urbo Nico doktoron Charles Mercier, eminentan reprezentanton de la scienca vivo de niaj proksimaj najbaroj, la loĝantoj de la marprofundoj. (D-ro Mercier elmergiĝas ĝis la talio kaj profunde riverencas). Unuafoje en la historio de civilizacio la maro kaj la tero donas al si la monojn por la intelekta kunlabo-

ro. Ĝis nun estis metita al la spirita vivo netransigebla limo: la mond-oceano. Ni povis ĝin transpaŝi, ni povis ĝin transversi ĉiudirekte per niaj ŝipoj; sed sub ĝian surfacon, sinjorinoj kaj sinjoroj, la civilizacio ne povis penetri. Ĉi tiu eta peco de la firma tero, sur kiu vivas la homaro, estis ĝis nun ĉirkaŭita de maro virga kaj sovaĝa; ĝi estis belega kadro, sed ankaŭ depratempa dislimo: unuflanke la leviĝanta civilizacio, aliflanke la eterna neŝanĝebla naturo. Ĉi tiu limo, miaj karaj aŭskultantoj, nun falas. (Aplaŭdo). Ni, infanoj de la granda tempo, partoprenas la senkomparan feliĉon esti atestantoj-vidantoj de tio, kiel kreskas nia spirita patrio, kiel ĝi transpaŝas siajn proprajn bordojn, descendas en la marondojn, konkeras la akvoprofundojn kaj ligas al la malnova klera firma tero oceanon modernan kaj civilizitan. Kia miriga spektaklo! (Brave!) Sinjorinoj kaj sinjoroj, nur pro naskiĝo de la oceana kulturo, kies eminentan reprezentanton ni havas la honoron hodiaŭ bonvenigi en nia mezo, nia terglobo iĝis planedo vere kaj plene civilizita (Entuziasma aplaŭdo! D-ro Mercier leviĝas en la kuvo kaj riverencas).

Kara doktoro kaj granda sciencisto, poste Monsieur le Maire et Député turniĝis al d-ro Mercier, apoganta sin je rando de la kuvo, emociite kaj peze tikante siajn branĉojn, vi povos transdiri al viaj samlandanoj kaj amikoj sur la marfundo niajn gratulojn, nian admiron kaj nian plej ardan simpation. Diru al ili, ke en vi, niaj mar-najbaroj, ni salutas la avangardon de progreso kaj klereco, avangardon, kiu paŝon post paŝo koloniigos la senfinajn marteitoriojn kaj sur fundo de Oceano konstruos novan kulturan mondon. Jam mi vidas kreski en la marfundoj no-

vajn Atenojn kaj novajn Romojn; mi vidas tie flori novan Parizon kun la submaraj Luvroj kaj Sorbonoj, kun la submaraj Triumfarkoj kaj Tomboj al la Nekonataj Soldatoj, kun teatroj kaj bulvaroj; kaj permesu, ke mi eldiru ankaŭ mian ideon plej sekretan: mi esperas, ke kontraŭ nia kara Nico elkreskos en la bluaj ondoj mediteraneaj nova glora Nico, via Nico, kiu per siaj superbaj submaraj avenuoj, parkoj kaj promenejoj borderos nian lazuran bord-regionon. Ni volas vin ekkoni kaj volas, ke vi ekkonu nin; persone mi estas konvinkita, ke pli proksima scienca kaj societa rilatoj, kiujn hodiaŭ sub tiel feliĉaj aŭspicioj ni inaŭguras, kondukos niajn naciojn al ĉiam pli strikta kultura kaj politika kunlaboro en intereso de la tuta homaro, en intereso de la tutmonda paco, bonfarto kaj progreso. (Longdaŭra aplaŭdo.)

Nun leviĝas d-ro Charles Mercier kaj provas per kelkaj vortoj danki al sinjoro urbestro kaj deputito de Nico; sed unuflanke li estas tro emociita, aliflanke li havas iom apartan prononcadon; el lia parolo mi kaptis nur kelkajn pene elbuŝigitajn vortojn; se mi ne eraras, tio estis "tre honorita", "kulturaj rilatoj" kaj "Viktoro Hugo". Poste, evidente timtrema, denove li kaŝiĝis en la kuvo.

Poste ekparolas Paul Mallory; tio, kion li eldiras, ne estas parolo, sed himna poemo, tralumigita de profunda filozofio. Mi dankas la sorton, li diras, ke mi ĝisvivis la plenumiĝon kaj konfirmon de unu el la plej belaj sagaoj de la tuta homaro. Ĝi estas konfirmo kaj plenumiĝo stranga: anstataŭ la mita Atlantido, enmergiĝinta, ni vidas kun mirego novan Atlantidon, elmergiĝanta el la profundoj. Kara kolego Mercier, vi, kiu estas poeto de la spa-

ca geometrio, kaj viaj doktaj amikoj, vi estas la unuaj senditoj de ĉi tiu nova mondo leviĝanta el la maro, ne el la ŝaŭmo naskiĝinta Afrodita, sed Palasa Anadyomene. Sed multe pli stranga kaj nekompreneble pli mistera estas, ke al ĉi tiu

(La fino mankas)

28 En la paperoj de sinjoro Povondra konserviĝis iom nekklara ĵurnalfoto, sur kiu ambaŭ salamandraj delegitoj ascendas la ŝtupetojn el la Ĝeneva Lago sur Quai du Mont Blanc, por iri en kunsidon de la Komisiono. Ŝajnas do, ke oficiale ili estis loĝigitaj rekte en Lemano.

Kio koncernas la Ĝenevan Komisionon por Studo de la Salamandra Demando, ĝi plenumis grandan kaj meritplenan laboron ĉefe per tio, ke ĝi zorgeme evitis ĉiujn brulajn politikajn kaj ekonomiajn problemojn. Ĝi kunsidis permanente dum multaj jaroj kaj havis pli ol mil tricent kunvenojn, dum kiuj oni diligente traktis pri la internacia unuigo de terminologio por la salamandroj. Tiurilate nome regis senespera ĥaoso; apud la sciencaj terminoj salamandro, Molche, Batrako kaj similaj (kiujn oni komencis senti kiel iom malĝentilajn), estis proponata aro da aliaj nomoj; la salamandroj estu nomataj Tritonoj, Neptunidoj, Tetisidoj, Nereidoj, Atlantidoj, Oceanidoj, Pozidonidoj, Lemuroj, Pelagoj, Litoraluloj, Pontikoj, Bathidoj, Abisoj, Hidrionoj, Gendemaroj (Gens de Mer), Submari-doj kaj tiel plu.

La Komisiono por Studo de la Salamandra Demando estis elektonta el ĉiuj ĉi terminoj la nomon plej konvenan kaj okupiĝis pri tio fervore kaj konsciencie ĝis finiĝo de la



Salamandra Epoko; la finan kaj unuaniman konkludon neniam ĝi atingis.

29 Sinjoro Povondra ankaŭ envicigis en sian kolekton du aŭ tri artikolojn el *Národní politika*\*, rilatantaj la nuntempan junularon; versimile nur pro misaranĝo li atribuis ilin al ĉi tiu periodo de la salamandra civilizacio.

30 Iu sinjoro el Dejvice rakontis al sinjoro Povondra, ke li baniĝis sur plaĝo en Katwijk am Zee. Li naĝis malproksimen en la maron, kiam la naĝmastro vokis lin al reveno. La nomita sinjoro (iu sinjoro Příhoda, komisiulo) ne atentis tion kaj naĝis plu; tiam la naĝmastro saltis en boaton kaj padelis post lin. "Hej, sinjoro," li diris al li, "ĉi tie vi ne rajtas vin bani!"

"Kial ne?" demandis sinjoro Příhoda.

"Ĉi tie estas salamandroj."

"Mi ne timas ilin," oponis sinjoro Příhoda.

"Ili havas ĉi tie sub la akvo fabrikojn aŭ ion," murmuris la naĝmastro. "Ĉi tie neniu baniĝas, sinjoro."

"Kaj kial ne?"

"La salamandroj ne ŝatas tion."

31 Ĉi tiu propono evidente koneksis kun la grandskala politika propagando, kies altgrade gravan dokumenton ni havas en la manoj, dank' al kolekta aktiveco de sinjoro Povondra. La dokumento sonas laŭvorte:

Libro tria

MILITO KONTRAŬ SALAMANDROJ

## *1. Masakro sur la Kokosa Insularo*

**E**n unu afero sinjoro Povondra eraris: la interpafado apud la urbo Kankesanturai ne estis la unua kolizio inter homoj kaj salamandroj. La unua historie konata konflikto okazis kelkajn jarojn antaŭe sur la Kokosa Insularo, ankoraŭ dum la ora epoko de la pirataj ekspedicioj je salamandroj; sed eĉ tio ne estis la plej malnova incidento tiuspeca, kaj en la pacifikaj havenoj oni sufiĉe rakontis pri iaj bedaŭrindaj kazoj, kiam salamandroj iel tiel aktive rezistis eĉ al la normala S-Trade; kompreneble tiajn malgravaĵojn la historio ne notas.

Sur la Kokosaj aŭ Keeling-Insuloj tio okazis jene: la kaperŝipo Montrose de la konata Harriman-Kompanio Pacific Trade sub kapitano James Lindley albordiĝis por la kutima ĉasado de salamandroj de tipo nomata Macaroni. Sur la Kokosaj Insuloj estis konata kaj riĉa salamandra golfo, koloniigita ankoraŭ de kapitano van Toĥ, sed pro sia izoliteco lasita, kiel oni diras, al sia sorto. Al kapitano Lindley eblas riproĉi nenian malatentemon, ankaŭ tion ne, ke la ŝipanaro suriris la bordon nearmita. (Nome tiam la piratkomerco kun la salamandroj havis jam siajn regulajn formojn; sed estas vero, ke antaŭe

estis piratŝipoj armitaj per mitraloj, jes eĉ per leĝeraj kanonoj, tamen ne kontraŭ la salamandroj, sed kontraŭ nelojala konkurenco de la aliaj piratoj. Sur la insulo Karakelong foje ekbatalis la ŝipanaro de la Harriman-vaporŝipo kontraŭ la ŝipanaro de dana ŝipo, kies kapitano opiniis Karakelong sia ĉasejo; tiam ambaŭ ŝipanoj kvitigis siajn malnovajn kalkulojn, ĉefe prestiĝajn kaj komercajn konfliktojn tiel, ke ili flankklasis la salamandro-ĉasadon kaj komencis pafi kontraŭ si el fusiloj kaj hotchkissoj; la danoj tamen sur la firma tero venkis per bajonet-atako, sed la Harriman-ŝipo poste sukcese kanonis la danan ŝipon kaj dronigis ĝin nepre kun ĉio, ankaŭ kun kapitano Nielsen — la tiel nomata Karakelong-incidento. Tiam devis interveni en la afero ankaŭ oficoj kaj registaroj de la koncernaj ŝtatoj; al la banditaj ŝipoj estis malpermesite plu uzadi kanonojn, mitralojn kaj grenadojn; krome filibustraj kompanioj dividis inter si tiel nomatajn liberajn ĉasejojn tiel, ke ĉiu salamandrejo estis vizitata nur de difinita rabŝipo; ĉi tiu gentlemen's agreement de grandaj piratoj estis vere plenumata kaj respektata ankaŭ de malgrandaj pirataj entreprenantoj.) Sed ni revenu al kapitano Lindley, li agis tute laŭ la spirito de la tiamaj komercaj kaj maraj uzancoj, kiam li sur la Kokosa Insularo sendis siajn homojn armitajn nur per klaboj kaj remiloj por la ĉaso de salamandroj, kaj la pos-

ta oficiala enketado donis al la mortinta kapitano plenan satisfakcion.

La ŝipanaron, kiu en tiu luna nokto suriris la Kokos-Insulojn, komandis ŝipleŭtenanto Eddie Mc Carth, jam sperta en tiu ĉasmaniero. Estas fakto, ke grego da salamandroj, kiun li trovis sur la bordo, estis nekutime multnombra, laŭ takso sescent ĝis sepcent adoltaj fortaj maskloj, dum leŭtenanto Mc Carth komandis nur dek ses virojn; sed oni ne povas akuzi lin, ke li ne cedis de sia entrepreno, jam tial ne, ĉar al oficiroj kaj ŝipanoj de la rabŝipoj laŭkutime estis pagata premio por nombro da peditaj bestoj. En la sekvinta enketado la marofico konstatis, ke "leŭtenanto Mc Carth estas tamen responsa por la fatala okazaĵo," sed ke "sub la respektivaj kondiĉoj versimile neniu agus alie." Male la malfeliĉa juna oficiro montris konsiderindan pripensemon per tio, ke anstataŭ malrapida ĉirkaŭigado de la salamandroj, kiu dum la donita nombra malproporcio cetere ne povus esti plena, li ordonis akutan atakon, per kiu la salamandroj estis apartigitaj de la maro, puŝataj internen de la insulo kaj po unu senkonsciigataj per klab- kaj remilfrapoj. Malfeliĉe dum la formiĝinta sturmo ŝiriĝis la ataklinio de la maristoj kaj preskaŭ ducent salamandroj eskapis en la akvon. Dum la sturmantaj viroj prilaboris la salamandrojn apartigitajn de la maro, komencis post iliaj dorsoj knali kurtaj pafoj el submaraj pistoloj (shark-

gun); neniu scietis, ke ĉi tiuj *naturaj*, sovaĝaj salamandroj sur la Keeling-Insuloj estas armitaj per pistoloj kontraŭ ŝarkoj, kaj neniam estis konstatite, kiu havigis al ili la armilojn.

Maristlernanto Mikaelo Kelly, transvivinta la tutan katastrofon, rakontas: "Kiam komenciĝis knali la pafoj, ni opiniis, ke ia alia ŝipanaro, veninta ĉasi salamandrojn, pafas kontraŭ nin. Leŭtenanto Mc Carth tuj turniĝis kaj kriis: 'Kion vi faras, vi bovoj, ĉi tie estas la ŝipanaro de Montrose!' Tiumomente li estis vundita en la kokson, sed ankoraŭ li eligis sian revolveron kaj komencis pafi. La dua pafo trafis lian kolon kaj li falis. Nur nun ni vidis, ke la salamandroj pafas kaj ke ili volus apartigi nin de la maro. Tiam Long Steve levis remilon kaj ĵetiĝis je la salamandroj, kriante Montrose! Montrose! Ankaŭ ni ceteraj kriis Montrose kaj bategis la bestaĉojn per remiloj, kiel nur eblis. Ĉirkaŭ kvin restis tie kuŝantaj, sed ni ceteraj trabatiĝis al la maro. Long Steve saltis en la akvon kaj vadis al boato; sed tie alkroĉiĝis al li kelkaj salamandroj kaj tiris lin sub la akvon. Ankaŭ Karolon ili dro-nigis; li kriegis 'knaboj, pro Jesuo Kristo, knaboj, ne lasu min', sed ni ne povis helpi al li. Tiuj porkuloj pafis dorsen al ni; Bodkin turniĝis kaj estis trafita ventren, li diris nur 'ba ne' kaj falis. Ni klopodis do retreti en la internon de la insuloj; je la bestaĉoj ni frakasis remilojn kaj klabojn, kaj tiel ni kuris kiel leporoj. Ni estis nur kvar. Ni

timis kuri malproksimen de la bordo, ĉar ni ne povus reveni al la ŝipo; ni kaŝiĝis post ŝtonblokoj kaj vepro kaj devis rigardi, kiel la salamandroj batmortigas niajn kamaradojn. Ili dronigis ilin en la akvo kiel katidojn, kaj kiam ankoraŭ iu naĝis, ricevis kapbaton per kriko. Nur nun mi sentis, ke mi havas elartikigitan piedon kaj ne povas pluiri.”

Ŝajnas, ke intertempe kapitano James Lindley, restinta sur Montrose, aŭdis la pafadon sur la insulo; ĉu li opiniis, ke io tumultiĝis tie kun indiĝenoj, ĉu tio, ke estas tie aliaj komercistoj kun salamandroj, simple li prenis la kuiriston kaj du maŝinistojn, kiuj ankoraŭ estis sur la ŝipo, ŝargiĝis sur la restantan boaton mitralon, kiun li antaŭvideme, malgraŭ severa malpermeso kaŝis sur la ŝipo kaj navigis helpi al sia ŝipanaro. Li estis sufiĉe singardema, por ne surpaŝi la bordon; li nur albordiĝis per la boato, sur kies pruo estis preparita la mitralo, kaj starigis ”kun la krucitaj brakoj”. Ni lasu plu rakonti la maristlernanton Kelly.

”Ni ne volis voki la kapitanon, por ke la salamandroj ne trovu nin. Sinjoro Lindley staris en la boato kun krucitaj brakoj kaj vokis: ’Kio okazas ĉi tie?’ Tiam la salamandroj turniĝis al li. Sur la bordo estis kelkcent da ili kaj senĉese novaj naĝis en la maro kaj estis ĉirkaŭantaj la boaton. ’Kio okazas ĉi tie?’ diras la kapitano kaj tiam

iu granda salamandro iras al li kaj diras: 'Veturu returne!'

La kapitano ekrigardis ĝin, dum tempeto nenion diris kaj poste demandis: 'Vi estas salamandro?'

'Ni estas salamandroj,' diris tiu salamandro. 'Veturu returne, sinjoro.'

'Mi volas scii, kion vi faris kun miaj homoj,' diras nia maljuna.

'Ili ne estu sturmintaj nin,' diris la salamandro. 'Reiru al via ŝipo, sinjoro!'

La kapitano tempeton silentis, kaj poste tute trankvile diras: 'Nu bone. Jenkins, pafu!'

Kaj la maŝinisto Jenkins komencis pafi la salamandrojn per la mitralo."

(Ĉe la pli posta enketado de la tuta afero deklaris la marofico laŭvorte: "Tiurilate Cptn. James Lindley kondukis, kiel necesas atendi de brita maristo.")

"La salamandroj estis en arego," daŭrigas atesto de Kelly, "kaj tial ili estis falantaj kiel falĉata greno. Kelkaj pafis el siaj pistoloj je sinjoro Lindley, sed tiu staris kun la krucitaj brakoj tute senmove. Tiumomente elmergiĝis el la akvo post la boato nigra salamandro, tenanta en la manaĉo ion similan al ladkonservujo, per la dua mano ion de ĝi forŝiris kaj ĵetis en la akvon sub la boaton. Apenaŭ oni kalkulis ĝis kvin, erupciis tiuloke akvokolono kaj



aŭdeblis obtuza, sed forta eksplodo, ke ankaŭ la tero detonaciis sub niaj piedoj.”

(Laŭ priskribo de Kelly la enketanta ofico konkludis, ke temis pri eksplodaĵo W 3, liverata al la salamandroj, laborantaj per fortikigo de Singapuro, por krevigo de rokoj sub la akvo. Sed kiel la ŝargoj venis el la manoj de la tieaj salamandroj al la Kokos-Insuloj, restis mistero; laŭ iuj konjektoj eble ilin transportis homoj, laŭ la aliaj jam tiam la salamandroj nepre havis inter si ian longdistancon komunikon. La publika opinio tiam postulis, ke estu malpermesite doni al la salamandroj en la manojn tiel danĝerajn eksplodaĵojn; sed la kompetenta ofico deklaris, ke provizore ne eblas ”altekfikan kaj relative sekuran” eksplodaĵon W 3 anstataŭigi per ia alia; kaj tiel restis.)

”La boato flugis aeren,” daŭrigas la depozicio de Kelly, ”kaj pecŝiriĝis. Al la loko alkuris salamandroj, kiuj restis ankoraŭ vivantaj. Ni ne povis vidi, ĉu sinjoro Lindley vivas; sed ĉiuj tri kamaradoj — Donovan, Burke kaj Kennedy — eksaltis kaj kuris helpi al li, por ŝirmi lin antaŭ la salamandroj. Ankaŭ mi volis kuri, sed mi havis elartikigitan maleolon, kaj tial mi eksidis kaj ambaŭmane tiris la plandon, por rekunigi la artikojn. Mi ne scias do, kio tiumomente okazis, sed kiam mi ekrigardis, Kennedy kuŝis vizaĝalsable kaj pri Donovan kaj Burke eĉ ne spuro; nur sub la akvo io ankoraŭ kirliĝis.”

Maristlernanto Kelly poste fuĝis en la internon de la insulo, ĝis li trovis indiĝenan vilaĝon; sed tiuj kondukis strange al li kaj volis al li disponigi eĉ ne rifuĝejon; ver-simile ili timis la salamandrojn. Nur post sep semajnoj iu fiŝista ŝipo trovis la tute elrabitan kaj forlasitan Mont-rose, ankritan apud la Kokos-Insuloj, kaj savis ankaŭ Kelly'n.

Kelkajn semajnojn poste alnavigis al la Kokos-Insuloj kanonŝipo de Lia Brita Majesto Fireball kaj ankrante ĝi atendis la nokton. Denove estis arĝenta plenluna nokto; el la maro eliradis salamandroj, eksidis larĝronde sur sablejo kaj komencis solene danci. Tiam la ŝipo de Lia Majesto pafis la unuan ŝrapnelon en ilian mezon. La salamandroj, se ili ne estis disŝiritaj, en momento rigidiĝis kaj poste diskuris al la akvo; tiumomente ektondris terura salvo el ses kanonoj, kaj nur kelkaj frakasitaj salamandroj ankoraŭ rampis al la akvo. Poste ekknalegis la dua kaj tria salvo.

Poste la ŝipo de Lia Majesto Fireball retiriĝis je duon-mejlo kaj komencis pafi sub la akvon, navigante lante laŭ la bordo. Tio daŭris ses horojn kaj estis elpafitaj proksimume okcent pafoj. Poste la ŝipo Fireball fornavigis. Ankoraŭ du tagojn poste la marsurfaco apud la Keeling-Insuloj estis kovrita de miloj kaj miloj da disŝiritaj salamandroj.

Samnokte la nederlanda batalŝipo Van Dijck pafis trifoje en amason da salamandroj sur insuleto Goenong Api; la japana kruzŝipo Hakodate sendis tri grenadojn al la salamandra insuleto Ailinglaplap; la franca kanonŝipo Bechamel per tri pafoj diskurigis salamandran dancan sur la insulo Rawaiwai. Tio estis averto al la salamandroj. Ĝi ne estis vana: simila kazo (oni nomis ĝin Ke-eling-killing) nenie plu ripetigis, kaj la orda same kiel la kontraŭleĝa komerco kun la salamandroj povis plu neĝenate kaj benate flori.

## 2. Konflikto en Normandio

**A**likarakterata estis konflikto en Normandio, okazinta iom pli poste. Tie salamandroj, laborantaj ĉefe en Ĉerburgo kaj loĝantaj apud la ĉirkaŭa bordo, ege ekŝatis pomojn; sed ĉar iliaj labordonantoj ne volis liveri pomojn al ili kun la kutima salamandra nutraĵo (onidire ĝi altigus la konstrukostojn super la difinita budĝeto), la salamandroj entreprenadis ŝtelekspediciojn al la proksimaj fruktĝardenoj. La kampuloj plendis ĉe la prefektejo, kaj al la salamandroj estis severe malpermesite vagi sur la bordo ekster la tiel nomata salamandra zono, sed senefike; la fruktoj el la ĝardenoj plu perdiĝis, onidire perdiĝis ankaŭ ovojn en la demetejoj, kaj ĉiumatene ĉiam pli da hundoj estis trovataj batmortigitaj. Tiam la kampuloj, armitaj per malnovaj fusiloj, mem komencis gardiasajn fruktĝardenojn kaj paflikvidis la ŝtelantajn salamandrojn. Finfine tio estus restinta nur loka afero; sed la normandaj kampuloj, ekscititaj krom alio ankaŭ pro tio, ke estis la altigitaj impostoj, kaj kariĝis la municio, morte ekmalamis la salamandrojn kaj entreprenadis kontraŭ ili invadojn per tutaj armitaj trupoj. Kiam ili arepafmortigadis salamandrojn ankaŭ sur iliaj laborlokoj,

plendis ĉe la prefekto aliflanke la entreprenantoj de la akvokonstruaĵoj, kaj la prefekto ordonis, ke al la kampuloj estu konfiskitaj iliaj rustaj pafiloj. Memkomprene la kampuloj rezistis, kaj okazis malagrablaj konfliktoj kun ĝendarmoj; la obstinaj normandoj komencis pafi krom salamandroj ankaŭ ĝendarmojn. En Normandion estis venigitaj ĝendarmaj helptrupoj, kiuj traserĉadis en la vilaĝoj domon post domo.

Ĝuste en tiu tempo okazis ekstreme malagraba afero: en la ĉirkaŭaĵo de Coutance vilaĝaj knaboj atakis salamandron, kiu laŭdire suspekto ŝteliris al kokinejo, ĉirkaŭis ĝin, dorse alpremitan al muro de garbejo kaj komencis ŝtonumi ĝin per brikoj. La vundita salamandro disetendis la brakon kaj terenĵetis ion similantan al ovo; sekvis eksplodo, per kiu la salamandro estis dispecigita, sed ankaŭ la tri knaboj: la dekunuajara Pierre Cajus, la deksesjara Marcel Bérard kaj la dekkvinjara Louis Kermadec; krome kvin infanoj estis pli-malpli peze vunditaj. La informo pri tio disflugis tra la tuta regiono; proksimume sepcent homoj alveturis aŭtobuse el larĝvasta regiono kaj ekatakis, armitaj per fusiloj, forkoj kaj draŝiloj, la salamandran setlejon en la golfo Basse Coutance. Ĉirkaŭ dudek salamandroj estis mortigitaj, antaŭ ol la ĝendarmoj sukcesis repuŝi la furiozantan homamason. Venigitaj sapeistoj el Ĉerburgo ĉirkaŭis la golfon Basse Coutance per barilo el pikdrato; sed nokte la sala-

mandroj eliris el la maro kaj per grenadoj disŝiris la drat-obstaklojn kaj evidente viciĝis por penetri enlanden. Militkamionoj haste alveturigis kelkajn infanteriajn kompaniojn kun mitraloj kaj soldatĉeno klopodis apartigi la salamandrojn disde la homoj. Dume la kampuloj ruinigis la impostoficejojn kaj ĝendarmejojn kaj unu nepopulara impost-ekzekuciisto estis pendumita sur lanterno kun tabuleto: for kun la salamandroj! Ĵurnaloj, ĉefe germanaj, skribis pri revolucio en Normandio; sed la Pariza registaro demarŝis per energia demento.

Dume la sangkonfliktoj inter la kampuloj kaj salamandroj plu vastiĝis laŭ la bordo de Kalvadoso, Pikardio kaj la Kaleza Markolo, el Ĉerburgo forŝipis la malnova franca krosŝipo Jules Flambeau en direkto al la okcidenta bordo de Normandio: la celo estis, kiel poste estis certigate, nur ke ĝia ĉeesto efiku per trakviliga impresoj, kaj al la loka loĝantaro, kaj al la salamandroj. Jules Flambeau ankris mejlon kaj duonon de la golfo Basse Coutances; kiam noktiĝis, la ŝipkomandanto ordonis, por altigi la impreson, eligi kolorajn raketojn. Multaj homoj sur la bordo alrigardis ĉi tiun belan spektaklon; subite oni aŭdis siblan muĝadon kaj apud la pruo de la krosŝipo erupciis giganta akvokolono; la ŝipo kliniĝis kaj tiumomente ekknalis tondra eksplodo. Estis evidente, ke la krosŝipo dronas; en kvaronhoro alhastis helpi el la apudaj havenoj motorboatoj, sed ili ne plu estis bezona-

taj; escepte de tri viroj mortigitaj ĉe la eksplodo, la tuta ŝipanaro saviĝis, kaj Jules Flambeau dronis kvin minutojn poste, kiam ĝia komandanto kiel lasta forlasis la ferdekon kun la memorindaj vortoj: "Nenio fareblas."

La oficiala raporto, eldonita ankoraŭ tiunokte, anoncis, ke "la malnova krozŝipo Jules Flambeau, kiu cetere en la plej proksimaj semajnoj estis elrangigota, karambolis dum la nokta navigo kontraŭ rifo kaj pro eksplodo de kaldronegoj dronis," sed la gazetaro ne lasis sin trankviligi per tio; dum la duonoficiala preso asertis, ke la ŝipo karambolis kontraŭ germana mino de nova deveno, la opozicia kaj eksterlanda preso prezentis colgrandajn titolojn:

FRANCA KROZŜIPO  
TORPEDITA DE SALAMANDROJ!  
M i s t e r a e v e n t o  
apud la normanda bordo  
R I B E L O D E  
S A L A M A N D R O J !

"Ni vokas al responseco tiujn," pasie skribis en sia ĵurnalo la deputito Berthelémy, "kiuj armis la bestojn kontraŭ la homoj; tiujn, kiuj metis en la manaĉojn de la salamandroj bombojn, por ke ili mortigadu per ili francajn kampulojn kaj ludantajn senkulpajn infanojn; tiujn, kiuj disponigis al la marmonstroj la plej modernajn torpe-

dojn, por ke ili povu dronigadi per ili la francan ŝiparon, kiam ajn ili ekdeziros. Mi diras, ni vokas ilin al responseco: ili estu akuzitaj pro murdo, ili estu venigitaj antaŭ la militan tribunalon pro landoperfido, oni enketu, kiom ili ricevis de la armil-fabrikantoj por tio, ke ili provizis la maran kanajlaron per armiloj kontraŭ la civilizita floto!” Kaj tiel plu; simple estis ĝenerala konsterno, la popolo rotiĝis en la stratoj kaj oni komencis konstrui barikadojn; sur la parizaj bulvaroj staris senegalianaj pafistoj kun fusiloj en faskoj kaj en la antaŭurboj atendis tankoj kaj kirasaŭtoj. En tiu momento staris en la parlamento la ministro de mar-aferoj, M. François Ponceau, pala, sed decida: La registaro akceptas la responsecon por tio, ke ĝi armis la salamandrojn sur la franca bordo per fusiloj, akvomitriloj, submaraj baterioj kaj torpedĵetiloj. Sed dum la francaj salamandroj havas nur leĝeran artelieron de malgranda kalibro, la germanaj salamandroj estas armataj per submaraj bombkanoj de la kalibro 32 cm; dum sur la franca bordo estas unu submara magazeno de grenadoj, torpedoj kaj eksplodaĵoj meze sur ĉiu dudekkvara kilometro, sur la itala bordo estas surfundaj depotoj de milita materialo sur ĉiu dudeka kaj en la germanaj akvoj sur ĉiu dekoka kilometro. Francio ne povas lasi kaj ne lasos siajn bordojn ne ŝirmitajn. Francio ne povas rezigni la armadon de siaj salamandroj. La ministro jam nun igas plej severe enke-



ti, kiu kulpas pro la fatala miskompreno sur la normanda bordo; ŝajnas, ke la salamandroj opiniis la kolorajn raketojn signalo al milita interveno kaj volis defendi sin. Intertempe estis senpostenigitaj kaj la komandanto de la ŝipo Jules Flambeau, kaj la prefekto de Ĉerburgo; speciala komisiono sekve konstatas, kiel la entreprenantoj de akvokonstruaĵoj traktas la salamandrojn; por la estonteco estas ordonita tiurilate severa inspekto. La registaro profunde bedaŭras la perdojn je la homvivoj; la junaj naciaj herooj Pierre Cajuŝ, Marcel Bérard kaj Louis Kermadec estos dekoritaj kaj sepultitaj je ŝtataj kostoj kaj iliaj gepatroj ricevos honoran pension. En la plej supera gvido de la franca floto okazos esencaj ŝanĝoj. La registaro prezentos al la parlamento demandon pri konfido, tuj kiam ĝi kapablos prezenti pli detalajn informojn. Post tio la kabineto anoncis sian permanentan kunsidon.

Dume la ĵurnaloj — laŭ sia politika koloro — proponis punan, eksterman, koloniigan aŭ krucmilitan ekspediciojn kontraŭ la salamandroj, ĝeneralan strikon, demision de la registaro, areston de la salamandro-entreprenistoj, areston de la komunistaj gvidantoj kaj agitantoj kaj multajn aliajn sav-aranĝojn. Sekve de onidiroj pri ebla fermo de la bordoj kaj havenoj la homoj komencis sin febre provizi per nutraĵoj kaj la prezoj de ĉia varo altiĝis en kapturna ritmo; en la industriaj urboj eksplo-

dis kontraŭkarecaj tumultoj; la borso estis fermita por tri tagoj. Estis simple la plej streĉa kaj minaca situacio dum la lastaj tri aŭ kvar monatoj. Sed tiumomente en la aferon lerte intervenis la ministro de agrikulturo, M. Monti. Li aranĝis, ke sur la franca bordo estu dufoje semajne ŝutata por la salamandroj tiom kaj tiom da vagonoj da pomoj, kompreneble je ŝtataj kostoj. Ĉi tiu aranĝo neordinare kontentigis la salamandrojn kaj trankviligis la fruktkulturistojn en Normandio kaj alie. Sed M. Monti iris tiudirekte plue: ĉar jam delongtempe estis malfacilaĵoj pro la profunda kaj konsiderinda maltrankvilo en la vinregionoj, suferantaj pro manko de debito, li ordonis, ke la ŝtato kontribuu je la salamandroj tiamaniere, ke ĉiu salamandro ricevos ĉiutage duonlitron da blanka vino. La salamandroj komence estis senkonsilaj pri la vino, ĉar ĝi kaŭzis al ili fortajn laksojn, kaj ili verŝadis ĝin en la maron; sed dumtempe versimile ili kutimiĝis je ĝi, kaj estis observite, ke ekde tiu tempo la francaj salamandroj pli fervore pariĝis, kvankam kun malpli granda fekundeco ol antaŭe. Tiel per unufojo estis solvita la agrara kaj salamandra aferoj; la minaca streĉo estis forigita, kaj kiam post nelonge venis nova registara krizo pro la financa skandalo de Mme Töppler, la lerta kaj elpruvita M. Monti iĝis en la nova kabineto ministro de la maraferoj.

### *3. Incidento en la Manika Markolo*

Nelonge poste la belga transportsîpo Oudenbough navigis el Ostendo al Ramsgato. Kiam ĝi estis meze de la Kaleza Markolo, la deĵoranta oficiro observis, ke duonmejlon sude de la kutima kurso "io okazas en la akvo"; ĉar li ne povis distingi, ĉu temas pri iu dronanto, li ordonis navigi al la potence ondigita loko. Proksimume ducent pasaĝeroj rigardis de la alventa flanko strangan spektaklon: ie-tie la akvo ekŝprucis en perpendikla kolono, ie-tie elĵetiĝis io kvazaŭ nigra korpo; la marsurfaco en diametro de ĉirkaŭ tricent metroj sovaĝe ruliĝis kaj bolis kaj aŭdeblis elprofunde ŝtorma bruego aŭ muĝado. "Ŝajnis, kvazaŭ sub la akvo erupcius negranda vulkano." Kiam Oudenbough lante proksimiĝis al tiu loko, subite ekŝprucegis proksimume dek metrojn de la pruo grandega apika ondo kaj ekbruegis terura detonacio. La tuta ŝipo impete leviĝis kaj la ferdekon inundis pluvo de preskaŭ bolanta akvo; samtempe kun ĝi klakis sur la pruo forta nigra korpo, tordiĝanta kaj eliganta akresonan kriĉon; estis brogita salamandro kun rompita spino. La komandanta oficiro ordonis retronavigon, por ke la ŝipo ne troviĝu rekte en la mezo de ĉi tiu eksplodanta

infero; sed intertempe komenciĝis eksplodoj en ĉiuj flankoj kaj la marsurfaco estis plenkovrita de pecoj de disŝiritaj salamandroj. Fine oni sukcesis turni la ŝipon, kaj Oudenbourgh plenvapore fuĝis norden. Tiam ekkrakegis terura detonacio proksimume sescent metrojn post ĝia pobo kaj el la maro leviĝis grandegaj, eble cent metrojn altaj akvo- kaj vaporkolonoj. Oudenbourgh direktis al Harwich kaj disaŭdigis ĉiuflanken sendratan averton: "Atenton, atenton, atenton! Sur linio Ostendo — Ramsgato granda danĝero de submaraj eksplodoj. Kaŭzo nekonata. Ni konsilas eviton al ĉiuj ŝipoj!" Intertempe daŭris la bruegado kaj krakegado, preskaŭ same, kiam okazas marmanovroj; sed nenio estis videbla pro la ŝprucanta akvo kaj vaporo. Sed el Dovero kaj Kalezo jam plenvapore navigis torpedŝipoj kaj destrojeroj kaj rapidegis militaj aerflotoj al tiu loko; sed atinginte ĝin, ili trovis nur la surfacon malklarigitan de flava ŝlimo kaj plenkovritan de senvivaj fiŝoj kaj disŝiritaj salamandroj.

En la unua momento oni parolis pri mineksplodoj en la Markolo; sed kiam ambaŭflanke de la Kaleza Markolo la bordoj estis fermitaj de soldatĉenoj kaj kiam la angla ĉefministro la kvaran fojon en la mondhistorio interrompis sabate vespere sian semajnfinojn kaj haste revenis en Londonon, oni komencis suspekti, ke temas pri evento de ekstreme grava internacia signifo. La ĵurnaloj alportadis la plej alarmajn onidirojn, sed mirige ĉifoje ili

restis ankoraŭ malproksime de la realaĵo; tiam neniu eĉ scietis, ke dum kelkaj krizaj tagoj Eŭropo kaj kun ĝi la tuta mondo staris nur paŝon de milita konflagracio. Nur kelkajn jarojn poste, kiam ano de la tiama brita kabineto, Siro Tomaso Mulberry malvenkis en la balotado por la parlamento kaj sekve de tio eldonis siajn politikajn memuarojn, eblis legosciigi, kio fakte tiam okazis; sed tiutempe jam neniu ĝi interesis.

La afero tutkoncize estis jena: Kiel Francio, ankaŭ Anglio komencis, ĉiu de sia flanko, konstrui en la Manika Markolo submarajn salamandrajn fortikaĵojn, per kiuj eblus en kazo de milito fermi la tutan Markolon; kompreneble poste ambaŭ grandpotencoj reciproke sin kulpigadis, ke komencis la alia flanko; sed al la vero respondas, ke ambaŭ komencis la fortikigajn laborojn samtempe pro timo, ke la najbara kaj amikiĝinta ŝtato povus devanci la alian. Mallonge, sub la surfaco de la Kaleza Markolo elkreskis unu kontraŭ la alia du kolosaj betonfortikajoj, armitaj per pezaj kanonoj, torpedĵetiloj, vastaj minzonoj kaj entute per ĉiuj plej modernaj akiraĵoj, kiujn tiutempe la homa progreso atingis en la militarto; sur la angla flanko ĉi tiu terura marfunda fortikaĵo estis ekipita per du divizioj de pezarmitaj salamandroj kaj per tridek mil laborsalamandroj, sur la franca flanko per tri divizioj da unuarangaj militsalamandroj.

Ŝajnas, ke la krizan tagon renkontiĝis meze de la Markolo sur la marfundo laborkolono de la britaj salamandroj kun la salamandroj francaj, kaj ke inter ili okazis ia miskompreno. Sur la franca flanko estis asertite, ke iliaj trankvile laborantaj salamandroj estis atakitaj de la britaj, kiuj volis ilin forpeli; la britaj armitaj salamandroj laŭdire provis fortreni kelkajn salamandrojn francajn, kiuj kompreneble defendis sin. Post tio la britaj militsalamandroj komencis pafi kontraŭ la francajn salamandrajn laboristojn per grenadoj kaj minĵetiloj, tial la francaj salamandroj estis devigitaj uzi la samajn armilojn. La franca registaro sentis sin devigata postuli de la registaro de Lia Brita Majesto plenan satisfakcion kaj evakuon de la disputebla submara sektoro kaj same certigon, ke similaj kazoj venonte ne ripetiĝos.

Kontraŭe la brita registaro anoncis per speciala noto al la registaro de la Franca Respubliko, ke la francaj militizitaj salamandroj penetris sur la anglan duonon de la Markolo kaj pretis meti tie minojn. La britaj salamandroj atentigis ilin, ke ili troviĝas sur ilia laborteritorio; la francaj ĝisdente armitaj salamandroj respondis per ĵetado de grenadoj, kaj mortigis kelkajn salamandrajn laboristojn britajn. La registaro de Lia Majesto kun bedaŭro sentis sin devigata postuli de la registaro de la Franca Respubliko plenan satisfakcion kaj garantion, ke venon-

te la francaj militaj salamandroj ne surpaŝos la anglan duonon de la Manika Markolo.

Post tio la franca registaro anoncis, ke ĝi ne povas plu toleri, ke la najbara ŝtato konstruu submarajn fortresojn en senpera proksimo de la francaj bordoj. Kio koncernas la miskomprenon sur la fundo de la Markolo, la registaro de la respubliko proponas, ke en senco de la Londona Konvencio la disputiga afero estu prezentita al la Haga Arbitracia Tribunalo.

La brita registaro respondis, ke ĝi ne povas kaj ne intencas la sekurecon de la britaj bordoj subigi al ia ekstera decido. Kiel la atencita ŝtato ĝi postulas denove kaj kun ĉia emfazo senkulpigon, kompenson de damaĝo kaj garantion por estonteco. Samtempe la mediteranea angla floto, ankranta apud Malto, fornavigis plenvapore direkte okcidenten; la atlantika ŝiparo ricevis ordonojn koncentriĝi apud Portsmouth kaj Yarmouth.

La franca registaro ordonis mobilizon de kvin klasoj maristaj.

Ŝajnis, ke neniu el ambaŭ ŝtatoj povas jam cedi; finfine estis klare, ke temas pri nenio pli malgranda ol pri hegemonio super la tuta Markolo. En tiu kriza momento Siro Tomaso Mulberry konstatis la surprizan fakton, ke sur la angla flanko nek militaj nek laboraj salamandroj (almenaŭ de jure) ekzistas, ĉar sur la britaj insuloj ĝis nun validas la malpermeso, eldonita de Siro Samuelo

Mandeville, laŭ kiu eĉ ne unu salamandro rajtas esti okupata sur la bordo aŭ en la suverenaj akvoj de la britaj insuloj. Laŭ tio la brita registaro ne povis oficiale supozi, ke la francaj salamandroj atakis la anglajn salamandrojn; la tuta afero ŝrumpis je demando, ĉu la francaj salamandroj intence aŭ nur erare suriris fundon de la suverenaj akvoj britaj. La oficoj de la respubliko promesis enketi la aferon; la angla registaro eĉ ne proponis, ke la konflikto estu prezentita al Haga Arbitracia Tribunalo. Poste la brita kaj franca admiralitatoj akordiĝis, ke inter la submaraj fortresoj en la Manika Markolo restos neŭtrala zono en larĝo de kvin kilometroj, per kio neordinare estis firmigita amikeco inter ambaŭ ŝtatoj.



## 4. *Der Nordmolch*

**N**emultajn jarojn post la loĝigo de la unuaj salamandraj kolonioj en la Norda kaj Balta Maroj la germana esploristo d-ro Hans Thüring konstatis, ke la balta salamandro montras — versimile pro influo de la medio — iajn diferencajn korpajn kvalitojn; laŭdire ĝi estas iom pli hela, paŝas pli rekte kaj ĝia krania indekso atestas pri kranio pli longa kaj mallarĝa ol estas la kapo de la aliaj salamandroj. Ĉi tiu varianto ricevis nomon *Der Nordmolch* aŭ *Der Edelmolch* (Andrias Scheuchzeri var. nobilis erecta Thüring).

Nun ankaŭ la germana gazetaro komencis fervore okupiĝi pri la balta salamandro. Speciale emfaze oni atentis, ke ĝuste sub la influo de la germana medio ĉi tiu salamandro evoluis al diferenca kaj pli supera rasa tipo, nekontesteble superordigita al ĉiuj ceteraj salamandroj. Malestime oni skribis pri la degeneraj salamandroj mediteraneaj, nanaj korpe kaj morale, pri necivilizitaj salamandroj tropikaj kaj entute pri malnoblaj, barbaraj kaj bestaj salamandroj de la aliaj nacioj. De la Gigantsala-

Albiono — la kelta nomo por Britio, tial la angloj ankaŭ nomiĝas filoj de Albiono

mandro al la germana Supersalamandro, tiel sonis flugilhava slogano tiutempa. Ĉu la praorigino de ĉiuj novtempaj salamandroj ne estis sur la germana tero? Ĉu ne ilia lulilo staris apud Oeningen, kie la germana sciencisto d-ro Johanes Jakob Scheuchzer trovis ilian belegan spuron jam en mioceno? Estas do ekster ĉia dubo, ke la origina Andrias Scheuchzeri naskiĝis antaŭ geologiaj epokoj sur la ĝermana tero; poste ĝi disiĝis en la aliajn marojn kaj zonojn, por tio ĝi pagis per sia evolua degrado kaj degenero; sed tuj kiam ĝi ekloĝis denove sur la tero de sia prapatrio, ĝi iĝis ree tio, kio ĝi estis origine: la nobla norda Salamandro Scheuchzeri, hela, rekta kaj dolikocefala. Nur sur la ĝermana tero la salamandroj povas reveni al sia neta kaj plej supera tipo, kiel ĝin trovis la granda Johano Jakobo Scheuchzeri sur premspuro en ŝtonminejo apud Oeningen. Tial Germanio bezonas novajn kaj pli longajn bordojn, bezonas koloniojn, bezonas mondmarojn, por ke ĉie en la germanaj akvoj povu evolui novaj generacioj de la rase netaj praoriginaj germanaj salamandroj. Ni bezonas novan vivspacon por niaj salamandroj, skribis la germanaj gazetoj; kaj por ke ĉi tiu fakto ne estu preterlasita de la germana nacio, en Berlino estis konstruita grandioza monumento al Johano Jakobo Scheuchzer. La granda doktoro estis tie figurita kun dika libro enmane; ĉe liaj piedoj sidas rektiĝinte

la nobla norda salamandro, rigardanta malproksimen, la vid-neatingeblajn bordojn de la mondoceano.

Ĉe inaŭguro de ĉi tiu nacia monumento kompreneble estis diritaj solenaj paroloj, vekintaj neordinaran atenton en la mondpreso. **Germanio denove minacas**, konstatis nome la anglaj voĉoj. Ni jam kutimiĝis al tia tono, sed se ĉe tiel oficiala okazo oni parolas, ke Germanio bezonas dum tri jaroj kvin mil kilometrojn da nova marbordo, ni estas devigataj respondi kiel eble plej klare: Bone, provu tion! Kontraŭ la britaj bordoj vi elrompos viajn dentojn. Ni estas preparitaj kaj ni estos preparitaj des pli bone en tri jaroj. Anglio havos kaj devas havi tiom da militŝipoj, kiel la du plej grandaj kontinentaj grandpotencoj sume; ĉi tiu fortorilato estas por ĉiam nerenversebla. Se vi volas deĉenigi frenezajn vetkonkurojn en la mar-armado, estu tiel; neniu brito toleros, ke ni postrestu eĉ minimumon.

”Ni akceptas la germanan defion,” deklaris en la parlamento la lordo de admiralitato Siro Francis Drake\* en nomo de la registaro. ”Kiu etendas la manon al kiu ajn maro, kolizios kun blendoj de niaj ŝipoj. Granda Britio estas sufiĉe forta por rebati ĉian atakon kontraŭ siaj remparoj kaj bordoj de niaj dominioj kaj kolonioj. Ankaŭ kiel atakon ni konsideros konstruadon de novaj kontinentoj, insuloj, fortikaĵoj kaj aviadilbazoj en ĉiu Drake — Siro Francis Drake, angla maristo (1540-1596)

maro, kies ondoj lavas la plej etan pecon de la brita bordo. Ĉi tio estu la lasta averto al kiu ajn, kiu volus eĉ nur je unu jardo forŝovi la marbordojn.” Post tio la parlamento konsentis konstruadon de novaj militŝipoj kun antaŭproponita budĝeto de duonmiliardo da pundoj sterlingaj. Fakte ĝi estis impona respondo kontraŭ provoka starigo de monumento al Johano Jakobo Scheuchzer en Berlino; ĉi tiu monumento kostis cetere nur dek du mil markojn.

Je ĉi tiuj deklaroj respondis la brila franca publicisto markizo de Sade, kutime bonege informita, ĉi-sence: La brita lordo de la admiralitato deklaris, ke Granda Britio estas preparita je ĉiuj eventualoj. Bone; sed ĉu al la nobla lordo estas konate, ke Germanio havas en siaj baltaj salamandroj konstantan kaj terure armitan armeon, nombrantan nuntempe kvin milionojn da profesiaj militsalamandroj, kiun ĝi povas tuj starigi por milito en la akvo kaj sur la bordo? Al tio alkalkulu ĉirkaŭ dek sep milionojn da salamandroj por teknika kaj etapa servoj, preparitaj kiam ajn ekmarŝi kiel rezerva kaj okupacia armeoj. Nuntempe la balta salamandro estas la plej bona soldato en la mondo; psikologie perfekte preparita, ĝi vidas en milito sian ĝustan kaj plej superan mision; ĝi iros en ĉiun batalon kun la entuziasmo de fanatikulo, kun la malvarma inĝenio de teknikisto kaj kun la monstra disciplino ĝuste de prusa salamandro.

Ĉu plue estas konate al la brita lordo de la admirali-  
tato, ke Germanio febre konstruas transportsipojn, po-  
vantaj transporti per unu fojo tutan brigadon da milit-  
salamandroj? Ĉu al li estas konate, ke ĝi konstruas cen-  
tojn kaj centojn da malgrandaj submarŝipoj kun radiu-  
sa distanco de tri ĝis kvin mil kilometroj, kies ŝipanaro  
estos nur baltaj salamandroj? Ĉu al li estas konate, ke ĝi  
establas en diversaj partoj de la oceano gigantajn sub-  
marajn cisternojn por fuelo? Nu, ni demandu denove:  
ĉu la brita civitano certas, ke lia granda lando estas v e  
r e bone preparita por ĉiaj eventualoj?

Ne estas malfacile imagi, daŭrigis markizo de Sade, kion signifos en venonta milito la salamandroj armitaj per submara longtrafa kanonaro, minĵetiloj kaj torpedoj por blokado de bordoj; kredis min, unuafoje en la histo-  
rio de la mondo neniu bezonas envii Anglion pro ĝia  
brila insulsituo. Sed se ni komencis jam demandi: ĉu al  
la brita admiralitato estas konate ankaŭ tio, ke la baltaj  
salamandroj estas ekipitaj per instrumento alie pacama,  
kiu nomiĝas pneŭmata borilo; kaj ĉi tiu plej moderna  
borilo dum unu horo eniĝas ĝis dek metrojn profunden  
en la plej bonan svedan graniton kaj kvindek ĝis sesdek  
metrojn profunden en la anglan kreton? (Pruvite per ek-  
sperimenta borado, kiun sekrete entreprenis germana  
teknika ekspedicio nokte la 11., 12. kaj 13. de la pasinta  
monato inter Hythe kaj Folkestone, do rekte antaŭ la

nazo de la Dovera fortikaĵo.) Ni rekomendas al niaj amikoj trans la Markolo, ke ili mem elkalkulu, post kiom da semajnoj Kent aŭ Essex povas esti traboritaj sub la marsurfaco per truoj kiel fromaĝbulo. Ĝis nun la brita insulano observis zorgeme la firmamenton, de kiu onidire sole povas veni la detruo de liaj prosperantaj urboj, de lia Bank of England aŭ de liaj pacaj familiaj dometoj, tiel hejmecaj en la eterne verda kadro de hedero. De nun prefere li almetu la orelon al la tero, sur kiu ludas liaj infanoj: ĉu li ne ekaŭdos en ĝi hodiaŭ aŭ morgaŭ grinci kaj paŝon post paŝo pli profunden enmordiĝi la senlacan kaj teruran borilon de la salamandra drilo, traiganta vojon por ŝargoj de ĝis nun neantaŭviditaj eksplodaĵoj? Ne plu milito en la aero, sed milito sub la akvo estas la lasta vorto de nia epoko. Ni aŭdis aplombajn vortojn desur la kapitanponto de la fiera Albiono\*; jes, ĝis nun ĝi estas potenca ŝipo ŝvebanta sur ondoj kaj reganta ilin; sed foje la ondoj povus fermiĝi super ŝipo frakasita kaj sinkanta en la marfundojn. Ĉu ne estus pli bone fronti la danĝeron prefere pli frue? Antaŭ la paso de tri jaroj estos por tio tro malfrue!

Ĉi tiu averto de la brila franca publicisto elvokis en Anglio grandegan eksciton; malgraŭ ĉiaj dementoĵoj oni aŭdis en la plej diversaj partoj de Anglio subteran grin-cadon de la salamandraj boriloj. La germanaj oficialaj rondoj kompreneble energie rifuzis kaj refutis la cititan

artikolon, deklarante ĝin de komenco ĝis fino sovaĝa provokado kaj malamika propagando; sed samtempe okazis sur la Balta Maro grandaj kombinitaj monovroj de la germanaj flotoj, terarmeoj kaj militsalamandroj. Dum la manovroj la salamandraj sapeo-taĉmentoj eksplodigis antaŭ la okuloj de la eksterlandaj militataŝeoj parton da sapeitaj sablodunoj proksime al Rügenwalde en amplekso de ses kvadratkilometroj. Onidire estis grandioza spektaklo, kiam kun terura detonacio la tero leviĝis "kvazaŭ rerompita glacierego" — kaj nur poste disiĝis je grandega muro da fumo, sablo kaj ŝtonegoj; mallumiĝis preskaŭ kiel nokte kaj la levita sablo estis falanta en sfero de ĉirkaŭ cent kilometroj, ĝi sinkis ja post kelkaj tagoj kiel sablopluvo sur Varsovion. En la ter-atmosfero restis post ĉi tiu grandioza eksplodo tiom da libere ŝvebanta fajna sablo kaj polvo, ke ĝis la fino de tiu jaro la sunsubiroj en tuta Eŭropo estis neordinare belaj, sangruĝaj kaj fajraj kiel neniam antaŭe.

La maro, kiu inundis la frakasitan bordopecon, estis nomita Scheuchzer-See kaj fariĝis celo de sennombraj lernej-ekskursoj kaj de la germanaj infan-karavanoj, kantantaj la ŝatatan salamandran himnon: SOLCHE ER-FOLGE ERREICHEN NUR DEUTSCHE MOLCHE.

## 5. *Wolf Meynert skribas sian verkon*

**E**ble estis la ĵus menciitaj grandiozaj kaj tragikaj sunsubiroj, kiuj inspiris la soleculan filozofon Wolf Meynert el Königsberg al kreo de lia monumenta verko "Untergang der Menschheit." Ni povas lin vigle imagi, kiel li migras sur la marbordo, nudkapa kaj en la flirtanta mantelo, kaj rigardas per ravitaj okuloj la inundon de fajro kaj sango, flamiganta pli ol duonon de la firmamento. "Jes," li flustras ekstaze, "jes, jam estas tempo verki epilogon al historio de la homaro." Kaj li verkis ĝin.

Finiĝas la tragedio de la homa gento, komencis Wolf Meynert. Ne erarigu nin ĝia febra entreprenemo kaj teknika bonfarto; ĝi estas nur hektika ruĝo sur vizaĝo de organismo jam signita de morto. Neniam la homaro estis travivanta tiel altan vivkonjunkturaron kiel nuntempe; sed trovu al mi iun homon, kiu estus feliĉa; trovu al mi klason, kiu estus kontenta, aŭ nacion, kiu ne sentus sin endanĝerigita en sia ekzistado. Meze de ĉiuj donacoj de la civilizacio, en Kreza riĉo da spiritaj kaj materialaj bonumoj ekregas nin ĉiujn pli kaj pli trudiĝema sento de malcerteco, angoro kaj malkomforto. Kaj Wolf Meynert senindulge analizas la spiritan staton de la nuntempa



mondo, tiun miksaĵon de timo kaj malamo, malkonfido kaj megalomanio, cinikismo kaj deprimateco: unuvorte malespero, konkludis Wolf Meynert koncize. Tipaj simptomoj de fino. Morala agonio.

La demando estas: ĉu estas kaj ĉu entute iam kapablis la homo esti feliĉa? Homo certe, kiel ĉiu vivanta estaĵo; sed ne la homaro. La tuta malfeliĉo de la homo estas, ke li estis devigita fariĝi homaro, aŭ ĉar li fariĝis homaro tro malfrue, kiam li estis diferencigita nekorekteble je nacioj, rasoj, kredoj, kastoj kaj klasoj, je riĉaj kaj malriĉaj, je kleraj kaj malkleraj, je regantaj kaj sklavigitaj. Trudpelu en unu gregon ĉevalojn, lupojn, ŝafojn kaj katojn, vulpojn kaj kapreolojn, ursojn kaj kaprinojn; fermu ilin en unu gregejo kaj igu ilin vivi en ĉi tiu sensenca aro, kiun vi nomas Socia ordo kaj igu ilin konservi komunajn vivregulojn; ĝi estos malfeliĉa, malkontenta, fatale malunueca grego, en kiu eĉ ne unu dia kreitaĵo sentos sin hejmece. Tio estas sufiĉe preciza bildo de la granda kaj senespere heterogena grego, kiu sin nomas la homaro. La nacioj, kastoj, klasoj ne povas daŭre vivi sen reciproka ĝenado kaj malhelpado ĝis stato de neelteneblo; ili povas aŭ vivi eterne apartigitaj de si — kio eblus nur tiel longe, dum la mondo estus por ili sufiĉe granda — aŭ kontraŭ si, en batalo por la vivo kaj morto. Por la biologiaj homaj tutoj, kiel raso, nacio aŭ klaso, la sola natura vojo al homogena kaj neĝenata feliĉego estas: fari lo-

kon nur por si kaj ekstermi la aliajn. Kaj jen ĝuste tio, kion la homa gento neglektis ĝustatempe fari. Nuntempe jam malfruas. Ni kreis al ni eĉ tro multajn doktrinojn kaj devoligojn, per kiuj ni protektas "la aliajn" anstataŭ likvidi ilin; ni elpensis moralan kodon, homajn rajtojn, kontraktojn, leĝojn, egalecon, humanismon kaj ĉion ajn; ni kreis fikcion pri la homaro, kiu inkluzivas nin kaj ankaŭ "la aliajn" en ia abstrakta supera unueco. Kia fatala eraro! Ni starigis moralan kodon super la biologian leĝon. Ni difektis grandan naturan premison de ĉia komuneco: ke nur homogena socio povas esti socio feliĉa. Kaj ĉi tiun atingeblan feliĉon ni oferis al granda, sed nebla revo: krei u n u homaron kaj u n u mondordon el ĉiuj homoj, nacioj, klasoj kaj niveloj. Ĝi estis grandanima stultaĵo. Siamaniere ĝi estis la sola respektinda provo de homo superi sin mem. Kaj por ĉi tiu sia plej supera idealismo la homa gento pagas per sia neretenebla ĥaoso.

La procedo, per kiu la homo provas iel organiziĝi je homaro, estas samaĝa kun la civilizacio mem, kun la unuaj leĝoj kaj la unuaj komunumoj; se fine oni venis post tiom da jarmiloj nur al tio, ke la abismoj inter rasoj, nacioj, klasoj kaj mondkonceptoj profundiĝis tiel akre kaj senfunde, kiel nuntempe ni vidas tion, ni ne plu fermos la okulojn antaŭ tio, ke la malfeliĉa historia eksperimento krei el ĉiuj homoj ian tian homaron definitive

kaj tragike fiaskis. Finfine ni jam komencas tion konscii-gadi al ni; tial la provoj kaj planoj unuigi la homan socion alie, per tio, ke radikale oni faros lokon nur por *unu* nacio, *unu* klaso aŭ *unu* kredo. Sed kiu povas diri, kiel profunde jam ni estas infektitaj de la neresanigebla malsano de diferencigado? Pli-malpli frue ĉiu ŝajne homogena tutaĵo neeviteble denove disfalos en heterogenan konglomeraĵon de diversaj interesoj, partioj, klasoj kaj tiel plu, kiuj aŭ kontraŭbatalos aŭ denove suferos pro la kunvivado. Ekzistas nenia elirejo. Ni moviĝas en magia rondo; sed la evoluo ne turniĝos eterne en rondo. Tion la naturo mem aranĝis, farinte en la mondo lokon por la salamandroj.

Estas neniu hazardo, cerbumis Wolf Meynert, ke la salamandroj validiĝis kiel vivfaktoro ĝuste en la tempo, kiam la kronika malsano de la homaro, de ĉi tiu mise kunkreskinta kaj disfalanta grandorganismo, transiras en agonion. Krom sensignifaj devioj la salamandroj prezentiĝas kiel unu grandega kaj homogena tutaĵo; ĝis nun ili ne kreis pli funde diferencigitajn rasojn, lingvojn, naciojn, ŝtatojn, kredojn, klasojn aŭ kastojn; inter ili estas eĉ ne mastroj kaj sklavoj, liberaj kaj malliberaj, riĉaj kaj malriĉaj; ekzistas ja inter ili diferencoj taskitaj al ili pro labordivido, sed en si mem ĝi estas homogena, kompakta, tiel dirante samgrajna maso, en ĉiuj siaj partoj egale biologie primitiva, same malriĉe de la naturo dotita,

same subjugita kaj vivanta same sur la malalta vivnivelo. La lasta negro aŭ eskimo vivas en senkompare pli bonaj vivkondiĉoj, ĝuante senfine pli riĉajn bonumojn materialajn kaj kulturajn, ol ĉi tiuj miliardoj da civilizitaj salamandroj. Kaj tamen estas neniuj signoj, ke la salamandroj suferus pro tio. Male. Ni vidas ja, ke ili bezonas preskaŭ nenion el tio, en kio serĉas mildigon kaj konsolon la metafizika hororo kaj vivangoro de homo; ili povas malhavi filozofion, postmortan vivon kaj artojn; ili ne scias, kio estas fantazio, humuro, mistiko, ludo aŭ revo; ili estas absolutaj vivrealistoj. Al ni homoj ili estas same malproksimaj kiel formikoj aŭ haringoj; ili diferencas de ili nur per tio, ke ili establis sin en la alia vivmedio, nome en la homa civilizacio. Ili ekloĝis en ĝi, kiel la hundoj ekloĝis en homaj loĝejoj; ili ne povas vivi sen ĝi, sed tial ili ne ĉesos esti tio, kio ili estas: tre primitiva kaj malmulte diferencita besta familio. Al ili sufiĉas vivi kaj multiĝi; ili povas esti eĉ feliĉaj, estante ĝenataj inter si de nenia sento de malegaleco. Simple ili estas homogenaj. Tial iun tagon ili povas, jes k i u n a j n venontan tagon, realigi sen malfacilaĵoj tion, en kio la homoj ne sukcesis: sian specian unuecon en la tuta mondo, sian mondan komunecon, unuvorte universalan salamandraron. Tiutage finiĝos la miljara agonio de la homa gento. Sur nia planedo ne estos sufiĉe da loko por du tendencoj,

strebantaj ekregi la tutan mondon. Unu devas cedi. Ni jam scias, kiu estos.

Hodiaŭ vivas sur la tuta terglobo proksimume dudek miliardoj da civilizitaj salamandroj, tio estas dekoble pli ol da ĉiuj homoj; el tio laŭ biologia neceso kaj historia logiko rezultas, ke la salamandroj, estante subjugitaj, devos liberigi sin; ke estante homogenaj, ili devos unuigi; kaj fariĝinte tiel la plej granda potenco, kiun iam ajn la mondo vidis, ili devos transpreni la regadon super la mondo. Ĉu vi opinias, ke ili estas tiaj frenezuloj, ke ili protektos la homon? Ĉu vi opinias, ke ili ripetos lian historian eraron, kiun li de ĉiam faris per tio, ke li subjugadis la venkitajn naciojn kaj klasojn, anstataŭ ekstermi ilin? Ke li pro egoismo kaŭzis eterne novajn diferencojn inter la homoj, por poste pro grandanimeco kaj idealismo strebi ilin tranponti? Ne, pri ĉi tiu historia absurdaĵo la salamandroj ne kulpiĝos, vokis Wolf Meynert, jam tial ne, ĉar mia libro avertos ilin! Ili estos heredantoj de la tuta homa civilizo; en ilian sinon falos ĉio, kion ni faris kaj pri kio ni strebis, volante ekregi la mondon; sed ili estus kontraŭ si mem, se kun ĉi tiu heredaĵo ili volus transpreni ankaŭ nin. Ili devas senigi sin de la homoj, se ili volas konservi sian homogenecon. Se ili ne farus tiel, ni enportus inter ilin pli-malpli frue nian duopan malkonstruivan inklinon: krei diferencojn kaj to-

leri ilin. Sed tion ni ne timu; nuntempe jam neniŭ krei-  
taĵo daŭrigos la historion de homo, ne ripetos la mem-  
mortigan frenezaĵon de la homaro.

Estas eksterdube, ke la mondo de salamandroj estos  
pli feliĉa ol estis la mondo de la homoj; ĝi estos unueca,  
homogena kaj regata de la sama spirito. salamandro  
diferencos de salamandro nek per lingvo, opinioj, kre-  
do, nek per vivpretendoj. Inter ili estos nek kulturaj nek  
klasaj diferencoj, nur labordivido. Neniŭ estos mastro,  
neniŭ sklavo, ĉar ĉiuj servos nur al la Granda Salaman-  
dra Bloko, kiu estos dio, reganto, labordonanto kaj spi-  
rita gvidanto. Estos nur unu nacio kaj nur unu nivelo.  
Estos mondo pli bona kaj perfekta ol estis la nia. Estos  
la sole ebla Feliĉa Nova Mondo. Nu, ni faru lokon al ĝi;  
la estingiĝanta homaro povas jam nenion fari, nur akceli  
sian finon — en tragika beleco, dum ankaŭ por tio ne  
estos malfrue.

— Ni prezentas ĉi tie opiniojn de Wolf Meynert en  
formo laŭeble alirebla; ni konscias, ke per tio ili perdas  
multon je sia efiko kaj profundo, per kiuj siatempe ili  
fascinis la tutan Eŭropon kaj ĉefe la junularon, kiu en-  
tuziasme estis akceptanta la kredon je dekadenco kaj  
komenciĝanta fino de la homaro. La regna registaro ja  
malpermesis la instruon de la Granda Pesimisto pro iaj  
politikaj konsekvencoj, kaj Wolf Meynert devis rifuĝi en

Svislandon; tamen la tuta klera mondo alproprigis al si kun kontento la teorion de Meynert pri pereco de la homaro; la libro (632-paĝa) aperis en ĉiuj lingvoj de la mondo kaj estis disvastigita multmilione ankaŭ inter la salamandroj.

## 6. *X avertas*

**E**ble estis sekvo de la profeta Meynert-libro, ke la literatura kaj artista avangardoj en la kulturaj centroj proklamis la devizon: Post ni venu la salamandroj! La estonteco apartenas al la salamandroj. La salamandroj, jen la kultura revolucio. Eĉ se ili ne havas propran arton: almenaŭ ili ne estas ŝarĝitaj de idiotaj idealoj, sekigintaj tradicioj kaj la tuta sekputra, enuiga, skolastika brikabrako, kiun oni nomis poezio, muziko, arkitekturo, filozofio kaj entute kulturo, — senilaj vortoj, ĉe kiuj nia stomako perturbas. Des pli bone, ke ili ne fordoniĝis al remaĉado de la eksviva homa arto: ni faros al ili la novan. Ni junaj breĉas la vojon al la estonta mondsalamandrismo: ni volas esti la unuaj salamandroj, ni estas la salamandroj de la morgaŭo! Kaj tiel naskiĝis juna poezia movado de salamandranoj, estiĝis tritona (tri-tona) muziko kaj pelaga pentro-arto, kiu inspiriĝis per formomondo de meduzoj, maraj koelenteroj kaj koraloj. Krome oni trovis la reguligajn laborojn de la salamandroj kiel la novan fonton de beleco kaj monumenteco. Da naturo ni havas ĝiskole, oni vokis; ĉi tien kun la glataj betonbordoj anstataŭ la malnovaj fendiĝintaj rifoj! La



romantikismo estas morta; la estontaj kontinentoj estos konturataj de netaj rektoj kaj refaritaj je sferaj trianguloj kaj lozanĝoj. La malnovan geologian mondon devos anstataŭi la geometria. Mallonge, estis ĉi tie denove io nova kaj futura, novaj spiritaj sensacioj kaj novaj kulturaj manifestoj; tiuj, neglektintaj ĝustatempe ekiri la vojon de la venonta salamandrismo, sentis amare, ke ili preterpasis sian tempon kaj venĝis tiel, ke ili proklamadis la netan homecon, revenon al la homo kaj naturo kaj aliajn reakciulajn devizojn. En Vieno estis prifajfita koncerto en tritona muziko, en la Pariza Salono de la Sendependaj nekonata farinto distranĉis pelagan bildon, nomatan Kapriĉo en Bluo; simple la salamandrismo venke kaj nehaltigeble progresis.

Kompreneble ne mankis reakciaj voĉoj, oponentaj al la "salamandra manio", kiel oni nomis ĝin. Tiurilate la plej principa estis anonima angla pamfleto, aperinta sub titolo **X avertas**. Ĉi tiu broŝuro atingis atentindan disvastiĝon, sed la identeco de ĝia aŭtoro neniam estis malkovrita; multaj homoj opiniis, ke ĝin verkis iu eklezia altrangulo, juĝante laŭ tio, ke en la angla lingvo X estas mallongigo por Kristo.

En la unua ĉapitro la verkinto provis fari statistikon de la salamandroj, samtempe senkulpigante sin pro malprecizeco de la citataj numeroj. Jam takso de la suma nombro de ĉiuj salamandroj varias tiutempe inter sep-

oblo kaj dudekoblo de la suma nombro de ĉiuj homoj en la mondo. Same malcertaj estas niaj scioj pri tio, kiom da fabrikoj, naftofontoj, algo-plantejoj, angilbredejoj, utiligata akvoforto kaj aliaj naturfontoj havas la salamandroj sub la maro; ni havas eĉ ne proksimumajn datumojn, kia estas produkt-kapacito de la salamandra industrio; plej malmulte estas al ni konate, kiel statas la armigo de la salamandroj. Ni ja scias, ke la salamandroj en sia konsumo de metaloj, maŝin-konsistaĵoj, eksplodaĵoj kaj multaj kemiaĵoj dependas de la homoj; sed unuflanke ĉiuj ŝtatoj severe sekretigas, kiajn armilojn kaj kiom da aliaj produktoj ili liveras al siaj salamandroj, aliflanke ni scias frapante malmulte, kion fakte la salamandroj en la profundoj fabrikas el duonproduktoj kaj krudaĵoj, kiujn ili aĉetas de la homoj. Certas, ke la salamandroj eĉ ne deziras, ke ni sciu tion; en la lastaj jaroj pereis pro dro- no aŭ sufokiĝo tiom da skafandristoj malsuprenigitaj sur la marfundon, ke tion oni ne plu povas atribui al nura hazardo. Kaj tio estas ja fenomeno alarmanta kiel de la industria flanko, tiel ankaŭ en rilato milita.

Kompreneble oni povas malfacile imagi, daŭrigis X en la pluaj paragrafoj, kion povus aŭ volus la salamandroj preni de la homoj. Ili ne povas vivi sur la firma tero, kaj ni entute ne povas malhelpi ilin en tio, kiel ili vivas sub la akvo. Nia kaj ilia vivmedioj disde si precize kaj por eterne estas apartigitaj. Estas vere, ke ni postulas de ili

certajn laborefektojn; sed grandparte ni ilin nutras kaj liveras al ili krudaĵojn kaj produktojn, kiujn sen ni ili tute ne havus, ekzemple metalojn. Sed eĉ se ne ekzistas praktika kaŭzo por ia antagonismo inter ni kaj la salamandroj, estas ĉi tie, mi dirus, antagonismo metafizika: kontraŭ estaĵoj surfacaj staras estaĵoj de profundoj (abyssal); estaĵoj noktaj kontraŭ estaĵoj tagaj; obskuraj akvopropundoj kontraŭ la hela kaj seka tero. La limo inter akvo kaj tero estas iel pli akra ol estis: *nian* teron tuŝas *ilia* akvo. Ni povus vivi dum ĉiuj tempoj perfekte ekster ni kaj interŝanĝadi nur certajn servojn kaj produktojn; sed estas malfacile seniĝi de angora sento, ke tiel versimile ne restos. Kial? Mi ne povas prezenti al vi precizajn kaŭzojn; sed la sento estas ĉi tie; estas io kvazaŭ antaŭsento, ke foje la akvaro mem turniĝos kontraŭ la teron, por ke decidiĝu la demando, kiu kiun.

Per tio mi konfesas angoron iom neracionalan, plu diras X; sed trankviligus min tre, se la salamandroj eki-rus kontraŭ la homaro kun iaj postuloj. Oni povus almenaŭ trakti kun ili, oni povus interkonsenti kun ili diversajn koncesiojn, kontraktojn kaj kompromisojn; sed ilia silentado estas terura. Mi timas ilian nekompreneblan detenemon. Ekzemple ili povus postuli por si iajn politikajn avantaĝojn; sincere dirite, leĝodonado por la salamandroj en ĉiuj ŝtatoj estas iom malnoviĝinta kaj ne indas kreitaĵojn tiel civilizitajn kaj laŭnombre tiel fortajn.

Decus nove ordigi la rajtojn kaj devojn de la salamandroj kaj nome en maniero por ili pli avantaĝa; oni povus konsideri ian gradon de aŭtonomio por la salamandroj; estus juste plibonigi iliajn laborkondiĉojn kaj rekompenci ilian laboron pli konforme. Multilate do eblus plibonigi ilian sorton, *se ili almenaŭ postulus tion*. Poste ni povus doni al iliajn cedaĵojn kaj dankemigi ilin per kompensaj interkonsentoj; minimume oni akirus tempon por pluraj jaroj. Sed la salamandroj postulas neniom; nur ili plialtigas sian produktivecon kaj siajn mendojn; hodiaŭ fine jam ni devas demandi, kie ambaŭ haltos. Oni parolis iam pri la flava, nigra aŭ ruĝa danĝeroj; sed almenaŭ tio estis homoj, kaj ĉe homoj ni scias iel tiel imagi, kion ili povas voli. Sed se ankoraŭ ni eĉ ne scietas, kiel kaj kontraŭ kio la homaro foje estos devigita defendi sin, devas esti klare almenaŭ unu: se sur unu flanko estos la salamandroj, sur la alia flanko staros la *tuta* homaro.

La homoj kontraŭ la salamandroj! Estas jam tempo, ke tiel estu formulite. Ja, sincere dirite, normala homo instinkte malamas la salamandrojn, naŭzas ilin — kaj timas ilin. Sur la tutan homaron falas io, kiel frosta ombro de hororo. Kio alia estas la freneza ĝuavidemo, la nemildigebla soifo pri amuzo kaj volupto, tiu orgia deĉeniĝo, kiu ekregis la nuntempajn homojn? Simila malbonmoriĝo ne estis ekde tempoj, kiam sur la romian

regnon jamjam ŝoviĝis invado de barbaroj. Tio ne estas nur fruktoj de la eksterordinara materia bonfarto, sed malespere superbruata angoro pro ĥaoso kaj pereco. Al ni kun la lasta vinpokalo, antaŭ ol estos nia fino! Kia honto, kia deliro! Ŝajnas, ke Dio pro la senfina mizerikordo lasas kadukiĝi naciojn kaj klasojn, falegantajn en pereon. Ĉu vi volas legi la fajran Menetekel, skribitan super festenado de la homaro? Rigardu la lumreklaĵojn, lumantajn dum la tutaj noktoj sur la muroj de la diboĉaj kaj malvirtaj urboj! Tiurilate ni homoj proksimiĝas al la salamandroj: ni vivas pli en la nokto ol en la tago.

Se almenaŭ la salamandroj ne estus tiel terure mezvalitaj, ekvortis X iel deprime. Jes, ili estas iel-tiel kleraj; sed tial ili estas ankoraŭ pli spiritmankaj, ĉar ili alproprigis al si el la homa civilizacio nur tion, kio en ĝi estas mezvalora kaj uzvalora, mekanika kaj ripetebla. Ili staras ĉe la flanko de la homaro kiel famulus Wagner ĉe flanko de Faŭsto; ili lernas el la samaj libroj kiel la homa Faŭsto, nur kun tiu diferenco, ke tio sufiĉas al ili, ke en ili ronĝas neniu dubo. Plej terure estas, ke ili multigis tiun lerneman, malsaĝulan kaj memplaĉan tipon de civilizita mezeco pogranda, en milionoj kaj miliardoj samspecaj; aŭ ne, mi eraras: plej terure estas, ke ili havas tian sukceson. Ili lernis manipuli maŝinojn kaj ciferojn, kaj montriĝis, ke tio sufiĉas, por ke ili iĝu mastroj de la

mondo. El la homa civilizacio ili ellasis ĉion, kio en ĝi estis sencela, ludema, fantazia aŭ antikva; per tio ili ellasis el ĝi, kio estis en ĝi homa, kaj transprenis nur ĝian nudan praktikan, teknikan kaj utiligan flankon. Kaj ĉi tiu plorinda karikaturo de la homa civilizacio ĝuas egan vitalecon; ĝi konstruas teknikajn mirindaĵojn, renovigas nian malnovan planedon kaj fine komencas mem fascini la tutan homaron. Ĉe sia lernanto kaj servisto Faŭsto lernos la sekretojn de sukceso kaj mezeco. Aŭ la homaro ekbatalos kontraŭ la salamandroj en historia konflikto pri vivo kaj morto, aŭ ĝi neeviteble salamandriĝos. Kio min koncernas, konkludis X. melankolie, mi preferus vidi la unuan.

Nu, X avertas vin, daŭrigis la nekonata verkisto. Ankoraŭ eblas forskui tiun malvarman kaj mukozan ringon, kiu nin ĉiujn premegas. Ni devas senigi nin de la salamandroj. Ili estas jam treege multaj; ili estas armitaj kaj povas turni la milit-materialon kontraŭ nin, pri kies resuma forto ni scias preskaŭ nenion; sed pli terura danĝero ol en ilia nombro kaj forto estas por ni homoj en ilia triumfanta minuseco. Mi ne scias, kion ni timu pli, ĉu ilian homan civilizacion aŭ ilian malican, fridan kaj bestan kruelecon; sed ambaŭ sume prezentas ion neimageble hororan kaj preskaŭ satanan. En la nomo de kulturo, en la nomo de kristanismo kaj de homaro ni de-

vas liberigi nin de la salamandroj. Kaj tiam vokis la anonima apostolo:

**Vi frenezuloj, ĉesu fine manĝigi la salamandrojn!**

Ĉesu ilin okupi, rezignu je iliaj servoj, lasu ilin, ili translokiĝu ien ajn, kie ili mem sin nutros, kiel la alia akvo-bestaro! La naturo mem faros ordon en ilia supernombro: nur se la homoj, la homa civilizacio kaj la homa historio ne plu *laboros por la salamandroj*

**Kaj ĉesu liveri armilojn al la salamandroj**, ĉesigu por ili liveradon de metaloj kaj eksplodaĵoj, ne plu sendadu al ili maŝinojn kaj homajn produktojn! Vi ne liveros dentojn al la tigroj kaj venenon al la serpentoj; vi nek hejtos sub fajro vulkana, nek breĉos digojn kontraŭ inundoj. Estu ordonita malpermeso de liveroj por ĉiuj maroj, la salamandroj estu starigitaj ekster leĝon, ili estu anatemitaj kaj ili estu ekskluditaj el nia mondo, kreu Ligon de Nacioj kontraŭ la Salamandroj!

La tuta homaro estu preta defendi sian ekzistadon per armilo en la mano; laŭ impulso de la Ligo de Nacioj, de la sveda reĝo aŭ de la roma papo kunvenu tutmonda konferenco de ĉiuj civilizitaj ŝtatoj, por fondi Mond-Union aŭ almenaŭ ligon de ĉiuj kristanaj nacioj kontraŭ la salamandroj! Hodiaŭ estas la fatala momento, kiam sub la terura premo de la salalamandra danĝero kaj de la homa respondeco povas sukcesi, kion la tutmonda milito kun ĉiuj siaj senmezuraj viktimoj ne atingis: kon-

stituon de la Unuiĝintaj Ŝtatoj de la Mondo. Dio donu tion! Se ĉi tio sukcesus, tiam la salamandroj ne venis vane kaj ili estus instrumento de Dio.

\*

Ĉi tiu patosa pamfleto elvokis viglan eĥon en la plej larĝa publiko. Nejunaj sinjorinoj konsentis precipe en tio, ke estiĝis eksterordinara dekadenco de moroj. Male, la ekonomiaj rubrikoj en ĵurnaloj rajte rimarkigadis, ke ne eblas limigi la liverojn al la salamandroj, ĉar tio kaŭzus grandan malkreskon de la produktado kaj pezan krizon en multaj branĉoj de la homa industrio. Ankaŭ la agrokulturo nuntempe senkondiĉe kalkulas kun grandega debito de maizo, terpomoj kaj aliaj kampfruktoj por la salamandra nutraĵo; se estus reduktita la nombro de salamandroj, estiĝus grava prezfalo sur la merkato de vivbezonaĵoj, per kiu la terkulturistoj troviĝus ĉe rando de pereco. Laboristaj sindikatoj suspektis sinjoron X pri reaktiismo kaj deklaris, ke ili ne allasos la bremsadon de iu ajn varo por la salamandroj; apenaŭ la laboranta popolo akiris plenokupon kaj taskopremiojn, volas sinjoro X faligi panon el ĝia mano; la laboristaro sentas kun la salamandroj kaj rifuzas ĉiujn provojn malaltigi ilian vivnivelon kaj eldoni ilin mizerigitajn kaj sendefendajn en la manojn de la kapitalismo. Kio koncernas la Ligon de Nacioj kontraŭ Salamandroj, ĉiuj seriozaj politikaj instancoj oponis, ĝi estus ja superflua; ni havas unuflan-



ke la Ligon de Nacioj, aliflanke la Londonan Konvencion, per kiu la apudmaraj ŝtatoj devoligis sin, neniam armigi siajn salamandrojn per peza armilaro. Entute ne estas facile postuli tian senarmigon de ŝtato, kiu ne havas la certecon, ĉu alia marpotenco ne armigas sekrete siajn salamandrojn kaj per tio altigas sian militan potencon por malutilo de siaj najbaroj. Same neniu ŝtato aŭ kontinento povas devigi siajn salamandrojn, ke ili translokiĝu alilanden, simple tial, ĉar per tio altiĝus en nedezirinda maniero unuflanke la industria kaj agrokultura debitoj, aliflanke la armita forto de la aliaj ŝtatoj aŭ kontinentoj. Kaj da tiaj objetoj, kiujn ĉiu prudenta homo devis rekoni, estis cititaj multaj.

Tamen la pamfleto *X avertas* ne restis sen profunda efiko. Preskaŭ en ĉiuj landoj vastiĝis popola Kontraŭsalamandra movado kaj estis fondataj Societoj por Pereigado de Salamandroj, kluboj de Antisalamandranoj, Komitatoj por Protekto de la Homaro kaj multaj tiaspecaj organizoj. La salamandraj delegitoj en Ĝenevo estis insultataj, kiam ili estis irantaj al la mil ducent dektria kunsido de la Komisiono por Studado de la Salamandra Demando. La lignotabulaj bariloj sur la marbordo estis pripentritaj per minacaj surskriboj, kiel Morto al la salamandroj, For la salamandrojn kaj simile. Multaj salamandroj estis ŝtonumitaj; neniu salamandro kuraĝis dumtage eligi la kapon el la akvo. Malgraŭ tio de *ilia*

flanko okazis neniam protestoj aŭ agoj de revenĝo. Ili estis simple nevideblaj, almenaŭ dumtage; kaj la homoj rigardantaj trans la salamandrajn barilojn vidis nur senfinan kaj indiferente muĝantan maron. "Vidu, la bestaĉoj," diradis la homoj malame, "tute ne montriĝas!"

Kaj en ĉi tiun angoran silenton ekbruegis tiel nomata *Tertremo en Luiziano*.

## 7. *Tertremo en Luiziano*

**T**iutage — tio estis la dek-unuan de novembro je la unua frumatene — estis sentebla en Nov-Orleano impeta terskuo; kelkaj domaĉoj en la negraj kvartaloj ŝutiĝis; homoj panike kuris en la stratojn, sed la skuoj ne plu ripetiĝis; nur feroce ekblovegis muĝanta, kurta ciklono, kiu frakasis fenestrojn kaj forbalais tegmentojn en la negraj stratetoj; kelkdek homoj estis mortigitaj; poste falis potenca ŝlimpluvego.

Dum la orleanaj fajrobrigadistoj ekveturis helpi en la plej peze trafitaj stratoj, klakis telegrafoj el Morgan City, Plaquemine, Baton Rouge kaj Lafayette: S.O.S.! Sendu savkolonojn! Ni estas duone forbalaitaj pro tertremo kaj ciklono; la digoj de Misisipo minacas breĉiĝi; tuj ekspedu sapeistojn, ambulancojn kaj ĉiujn laborkapablajn virojn! — El Fort Livingstone venis nur lakona demando: Allo, ĉu vi havas tian pridonacon? — Tuj poste venis depeŝo el Lafayette: Atenton! Atenton! Plej terure estas trafita New Iberia. Ŝajnas, ke estas interrompita la komunikado inter Iberia kaj Morgan City. Sendu tien helpon! — Tuj sekve telefonas Morgan City: Ni ne havas komunikon el New Iberia. Versimile estas interrompitaj la

ŝoseo kaj la fervojlinio. Sendu ŝipojn kaj aviadilojn al Vermillion Bay! Ni bezonas jam nenion. Ni havas proksimume tridek mortigitojn kaj cent vunditojn. — Tuje venas telegramo el Baton Rouge: Ni havas informon, ke plej terure New Iberia. Ĉefe zorgu New Iberia'n. Ĉi tien nur laboristojn, sed rapide, aŭ breĉiĝos la digoj. Ni faras, kio poveblas. — Tuj: Allo, allo, Shreveport, Natchitoches, Alexandria sendas helptrajnajn al New Iberia. Allo, allo, Memphis, Winona, Jackson sendas trajnojn trans Orleanon. Ĉiuj aŭtoj veturigas homojn direkto digoj Baton Rouge. — Allo, ĉi tie Pascagoula. Ni havas plurajn mortigitojn. Ĉu vi bezonas helpon?

Intertempe jam ekveturis fajrobrigadistaj veturiloj, ambulancoj kaj helptrajnaj en la direkto al Morgan City — Patterson — Franklin. Post la kvara matene venis la unua pli preciza informo: La trako inter Franklin kaj New Iberia, sep kilometrojn okcidente de Franklin, interrompita per akvo; ŝajnas, ke tie estiĝis pro la tertremo profunda fendo, ligita kun Vermillion Bay kaj inundita de maro. Kiom estis konstateble, la fendo de Vermillion Bay penetras en direkto orientnordorienta, apud Franklin ĝi kurbiĝas norden, enfluas la Grandan Lagon, poste ĝi etendiĝas norden ĝis la linio Planquemine — Lafayette, kie ĝi finiĝas en malnova lago; la dua branĉo de la fendo ligas la Grandan Lagon okcidente kun Lago Napoleonville. La suma longo de la kaviĝo estas proksi-

mume okdek kilometroj, la larĝo du ĝis dek unu kilometroj. Ĉi tie estis, probable, la centro de la tertremo. Oni povas paroli pri miriga hazardo, ke la fendo evitis ĉiujn iom grandajn lokojn. Malgraŭ tio la vivperdoj estas ver-simile grandaj. En Franklin pluvfalis 60 centimetroj da ŝlimo, en Patterson 45 centimetroj. Homoj el Atchafalaya Bay rakontas, ke dum la terskuo la maro regresis tri kilometrojn, post kio ĝi ĵetiĝis al la bordo per ondo tri-dek metrojn alta. Oni timas, ke sur la bordo pereis multe da homoj. Kun New Iberia ankoraŭ nenia interkomuniko.

Intertempe alveturis al New Iberia de okcidente trajno de la ekspedicio el Natchitoches; la unuaj informoj, senditaj malrektvoje trans Lafayette kaj Baton Rouge, estis teruraj. Jam kelkajn kilometrojn antaŭ New Iberia la trajno ne povis plu, ĉar la trako estis obstrukcita de ŝlimo. Fuĝintoj rakontas, ke proksimume du kilometrojn oriente de la urbo apertiĝis ŝlimvulkano, kiu subite el-putis amasegojn da maldensa, malvarma ŝlimo; New Iberia onidire malaperis sub ŝlimtorento. Plua antaŭeni-ro en la mallumo kaj en la daŭra pluvo ekstreme malfacila. Kun New Iberia ankoraŭ nenia interkomuniko.

Samtempe venis informoj el Baton Rouge:

Sur la digoj de Misisipo laboras kelkmil viroj stop se almenaŭ ĉesus pluvi stop ni bezonas pioĉojn ŝovelilojn

veturilojn homojn stop ni sendas helpon al Plaquemine ili estas en embarasa situacio tiuj fuŝuloj.

Depeŝo el Fort Jackson:

*je la dua matene marondo forlavis de ni tridek domojn ni ne scias kio ĝi estis proksimume sepdek homojn ĝi kune forlavis nur nun mi riparis aparaton ankaŭ poŝtoficejon ĝi forportis allo rapide telegrafu kio fakte ĝi estis telegrafisto fred dalton allo dirigu al minnia lacoste ke nenio okazis al mi nur ĝi rompis mian manon kaj la vestojn forportis sed ĉefe nur ke estas denove la aparato okey fred*

El Post Eads venis la plej konciza informo:

*ni havas mortigitojn burywood tuta estas forbalaita en la maron*

Intertempe — estis proksimume la oka matene — revenis la unuaj aviadiloj senditaj super la katastrofan teritorion. La tuta bordregiono ekde Port Arthur (Teksaso) ĝis Mobile (Alabamo) onidire nokte estis inundita de flusondo; ĉie oni vidas detruitajn aŭ damaĝitajn domojn. Sudorienta Luizano (ekde la ŝoseo Lake Charles — Alexandria — Natchez) kaj la suda Misisipo (ĝis la linio Jackson — Hattiesburg — Pascagoula) kuŝas sub ŝlimo. En Vermillion Bay penetras en la landon nova margolfo larĝa ĉirkaŭ tri ĝis dek kilometrojn, etendiĝanta sinue en la kontinenton kiel longa fjordo preskaŭ ĝis Plaquemine. New Iberia ŝajnas esti peze damaĝita, sed oni vidas multajn homojn, forŝovelantajn ŝlimon inundantan la

domojn kaj vojojn. Alteriĝi ne eblis. La plej pezaj vivo-perdoj estos versimile sur la marbordo. Apud Point au Fer dronas vaporŝipo ŝajne meksika. Apud Chandeleur Islands la maro estas kovrita de ruinoj. Pluvo ĉesas en la tuta teritorio. Videblo bona.

La unuaj ekstraj eldonoj de la nov-orleanaj ĵurnaloj aperis jam post la kvara matene; kun la progresanta tago pliiĝis novaj eldonoj kaj detaloj; ĉirkaŭ la oka matene la ĵurnaloj alportis fotojn de la kataklisma teritorio kaj mapojn de la nova margolfo. Je la oka tridek ili publikigis intervjuon kun eminenta sismologo de la memfisa universitato d-ro Wilbur R. Brownell pri la kaŭzoj de la terskuoj en Luiziano. Provizore ni ne povas fari finajn konkludojn, deklaris la renoma sciencisto, sed ŝajnas, ke ĉi tiuj skuoj havas nenion komunan kun la vulkana aktiveco, ĝis nun intensa en la mezmeksikia vulkana zono, situanta rekte kontraŭ la trafita teritorio. La hodiaŭa tertremo ŝajnas esti plivere de tektonika deveno, tio estas, ĝi estas kaŭzita pro premo de montaraj masivoj: unuflanke de Rokmontaro kaj Sieramadro, aliflanke de la Apalaĉa Montaro, al la vastega sinkaĵo de la Meksikia Golfo, kies daŭrigo estas la larĝa ebenaĵo ĉe la malsupra fluo de Misisipo. La fendo, etendiĝanta nun el Vermillion Bay, estas nur nova kaj relative eta rompo, sensignifa epizodo en la geologia sinkado, per kiu estiĝis la Meksikia Golfo kaj la Kariba Maro ankaŭ kun la florkro-

no de Grandaj kaj Malgrandaj Antiloj, ĉi tiu resto de iama kompakta montarsono. Estas eksterdube, ke la mezamerika sinkprocedo plu progresos per novaj skuoj, rompoj kaj fendoj; ni ne povas ekskludi, ke la fendo apud Vermillion estas nura uverturo al la reviviĝinta tektonika procedo, kies centro estas ĝuste en la Meksikia Golfo; tiukaze ni povas esti atestantoj de gigantaj geologiaj katastrofoj, pro kiuj preskaŭ kvinono de Usono povus iĝi marfundo. Sed se tio okazus, ni povus kun probable atendi, ke komenciĝos sin levi marfundo en ĉirkaŭo de Antiloj aŭ ankoraŭ pli oriente, en lokoj, kie la malnova mito konjektas la subakviĝintan Atlantidon.

Kontraŭe, daŭrigis la renoma sciencisto, iom trankvilige, ne necesas havi seriozajn zorgojn, ke en la trafita regiono manifestiĝus vulkana aktiveco; la konjektataj krateroj sputantaj ŝlimon estas nenio alia ol erupcio de marĉgaso, kiu okazis en la fendo apud Vermillion. Ne estus mirige, se en la aluvio de Misisipo aperus grandegaj subteraj gasbobeloj, kiuj ĉe kontakto kun aero povas eksplodi kaj kune levi centmilojn da akvo- kaj ŝlimtunoj. Kompreneble por la definitiva klarigo, ripetis d-ro W. R. Brownell, necesos pluaj spertoj.

Dum la ŝancoj de Brownell je geologiaj katastrofoj kuris tra la rotaciaj maŝinoj, la guberniestro de la ŝtato Luiziano ricevis el Fort Jackson telegramon kun jena teksto:



*ni bedaŭras perdojn je la homvivoj stop ni intencis eviti viajn urbojn sed ni ne kalkulis kun ekfrapo kaj retrofrapo de la marakvo ĉe la eksplodo stop ni konstatis tricent kvardek ses homajn viktimojn sur la tuta marbordo stop ni esprimas kondolencon stop chief salamander stop allo allo jen fred dalton poŝta stacio fort jackson ĵus foriris de ĉi tie tri salamandroj ili venis antaŭ dek minutoj prezentis telegramon alcelis min per pistoloj sed jam estas for la malbelaj bestaĉoj pagis kaj kuris en la akvon nur hundo de apotekisto persekutis ilin ili ne iradu tra la urbo alie nenio nova salutu minnia lacoste'n ke mi kisas ŝin telegrafisto fred dalton*

La guberniestro de la ŝtato Luiziano longe kapskuis super la telegramo. Iu ŝercemulo, tiu Fred Dalton, li diris fine. Prefere ne publikigu tion en la ĵurnaloj.

## 8. Chief Salamander prezentas postulojn

Tri tagojn post la tertremo en Luiziano estis anoncita nova geologia katastrofo, ĉifoje en Ĉinio. Dum potenco, detonacia terskuo krevis en la provinco Giangsu la marbordo norde de Nankino, proksimume en la mezo inter enfluo de Jangzio kaj malnova riverujo Hwang-ho; en ĉi tiun fendon penetris la maro kaj kuniĝis kun la grandaj lagoj Pan-jün kaj Hung-tsu inter la urboj Hwangan kaj Fugjang. Ŝajnas, ke sekve de la tertremo Jangzio forlasas sub Nankino sian fluujon kaj fluegas direkte al la lago Tai kaj plu al Hangĝoŭo. La perdojn je homvivoj eblas dume eĉ ne proksimume taksi. Centmiloj da homoj fuĝas en la nordajn kaj sudajn provincojn. Japanaj militŝipoj ricevis ordonon eknavigi al la trafita bordregiono.

Kvankam la terskuoj en Giangsu laŭ la amplekso tre superis la katastrofon en Luiziano, oni dediĉis al ili entute malmulte da atento, ĉar la mondo jam kutimiĝis je ili en Ĉinio kaj ne gravas, kiel ŝajnas, je unu miliono da vivoj; krome estis science klare, ke temas pri nura tektonika tertremo koneksanta kun enprofunda marsulko apud la insularo Riukiu kaj Filipinoj. Tri tagojn poste

eŭropaj sismografoj notis novajn terskuojn, kies centro troviĝis ie apud la Verdakaba Insularo. Pli detalaj informoj sciigis, ke peza tertremo trafis la bordregionon de Senegambio sude de San Luis. Inter la lokoj Lampul kaj Mboro estiĝis profunda kaviĝo, inundita de la maro kaj etendiĝanta de Merinaghen ĝis Dimar. Laŭ personaj atestoj erupciis dum terurega bruego el la tero fajro- kaj vaporkolonoj, disĵetantaj en vastan sferon sablon kaj ŝtonojn; tuj poste estis aŭdebla muĝado de la maro ĵetiĝanta en la apertitan sinkaĵon. La perdoj je la homvivoj ne estas konsiderindaj.

Ĉi tiu tria terskuo kaŭzis ion, kio similis jam al paniko. **Ĉu eble reviviĝas la vulkana aktiveco de nia tero?** demandis la ĵurnaloj. LA TERKRUSTO KOMENCIĜAS KREVI, raportis la vesperĵurnaloj. Fakuloj esprimis la konjekton, ke la "fendego senegambia" estiĝis eble nur pro erupcio de vulkana gango, koneksanta kun la vulkano Pico sur la insulo Fogo en la Verdakaba Insularo; ĉi tiu vulkano erupciis ankoraŭ en la jaro 1847 kaj ekde tiu tempo estis opiniata malaktiva. La okcidentafrika tertremo havas do nenion komunan kun la sismografaj fenomenoj en Luiziano kaj Giangsu, kiuj estis videble de la tektonika deveno. Sed al la homoj, kiel ŝajnas, estis entute egale, ĉu la tero krevas pro kaŭzoj tektonikaj aŭ vulkanaj. Fakto estas, ke tiutage ĉiuj preĝejoj

estis plenplenaj de preĝantaj homamasoj. En kelkaj regionoj la preĝejoj devis esti malfermitaj ankaŭ nokte.

Ĉirkaŭ la unua matene (la dudekan de novembro) radioamatoroj en pli granda parto de Eŭropo konstatis en siaj radioaparatoj fortajn perturbojn, kvazaŭ estus disaŭdiganta nova, neordinare potenca radiostacio. Ili trovis ĝin sur la ondolongo ducent tri; aŭdeblis io kvazaŭ muĝado de maŝinoj aŭ de marondoj; meze de tiu kontinua, senfina muĝado subite aŭdiĝis terura, kvaka voĉo (ĉiuj ĝin priskribis simile: kavsona, kvaka, kvazaŭ artefarita voĉo kaj krome ankoraŭ ege fortigita per megafono); kaj tiu ranvoĉo ekscitite vokis: "Allo, allo, allo! Chief Salamander speaking\*. Allo, Chief Salamander speaking. Stop all broadcasting, you men\*! Stop your broadcasting! Allo, Chief Salamander speaking!" Poste alia, strange kavsona voĉo demandis: "Ready\*?" Tuj poste aŭdeblis kraketado, kvazaŭ oni komutus kondukon; kaj denove alia nenature sufoka voĉo vokis: "Attention\*! Attention! Attention!" "Allo!" "Now\*!"

Kaj nun aŭdiĝis raŭka, laca, sed tamen komandema voĉo en la noktan silenton: "Allo, vi homoj! Jen Luizia-

Chief Salamander Speaking — (*angle*) Jen la ĉefsalamandro

Stop all broadcasting, you men! — (*angle*) Stopu ĉiujn

disaŭdigojn, vi homoj!

Ready? — (*angle*) Ĉu prete?

Attention! — (*france*) Atenton!

Now! — (*angle*) Nun!

no! Jen Giangsu. Jen Senegambio. Ni bedaŭras la homajn vivojn. Ni ne volas kaŭzi al vi nenecesajn perdojn. Ni nur volas, ke vi evakuu la marbordojn en lokoj, kiujn ni indikos anticipe al vi. Se vi faros tion, vi evitos bedaŭrindajn akcidentojn. Venonte ni anoncos al vi minimume du semajnojn anticipe, sur kiu loko ni larĝigos nian maron. Ĝis nun ni faris teknikajn provojn. Viaj eksplodaĵoj pruviĝis. Ni dankas vin.

Allo, vi homoj! Restu trankvilaj. Ni ne havas kontraŭ vi malamikajn intencojn. Ni bezonas nur pli da akvo, pli da bordoj, pli da malprofundaĵoj por nia vivo. Ni estas tro multaj. Jam ne estas por ni sufiĉe da loko sur viaj bordoj. Tial ni devas likvidi viajn kontinentojn. El ili ni faros nurajn golfojn kaj insulojn. Per tio eblas kvinobligi la longon de la mondbordoj. Ni konstruos novajn malprofundaĵojn. Ni ne povas vivi en profunda maro. Ni bezonas viajn kontinentojn kiel materialon por ŝutple-nigi la profundaĵojn. Nenion ni havas kontraŭ vi, sed ni estas tro multaj. Intertempe vi povas transloĝiĝi enlanden. Vi povas rifuĝi en la montarojn. La montarojn ni likvidos kiel la lastajn.

Vi volis nin. Vi disvastigis nin tra la tuta mondo. Nun vi havas nin. Ni volas bone vivi kun vi. Vi liverados al ni ŝtalon por niaj boriloj kaj pioĉojn. Vi liverados al ni eksplodaĵojn. Vi liverados al ni torpedojn. Vi laboros por ni. Sen vi ni ne povus forigi la malnovajn kontinentojn.

Allo, vi homoj. Chief Salamander proponas al vi kunlaboron en la nomo de ĉiuj salamandroj de la mondo. Vi kunlaboros kun ni je malkonstruo de via mondo. Ni dankas vin.”

La laca, raŭka voĉo eksilentis, kaj aŭdeblis nur daŭrema muĝado kvazaŭ de maŝinoj aŭ de la maro. ”Allo, allo, vi homoj,” denove aŭdiĝis la kvakanta voĉo, ”nun ni disaŭdigos por vi amuzan muzikon el viaj gramofondiskoj. La unua programero estas Marŝo de Tritonoj el la revua filmo Pozidono.”

La ĵurnaloj nomis ĉi tiun noktan disaŭdigon ”vulgara kaj plumpa ŝerco” de ia pirata sendostacio; malgraŭ tio milionoj da homoj atendis la postan nokton ĉe siaj radioaparatoj, ĉu denove parolos tiu terura, asidua, kvaka voĉo. Ĝi aŭdiĝis akurate je la unua dum akompano de larĝa kaj plaŭda muĝado. ”Good evening, you people\*,” ĝi kvakis gaje. ”Unue ni ludos al vi per gramofondiskoj la Salamandro-Dancon el via opereto Galatea.” Kiam finsonis la brusona kaj malĉasta muziko, aŭdiĝis denove la terurega kaj iel ĝoja kvakado. ”Allo, vi homoj! Ĵus estis dronigita per torpedo la brita kanonŝipo Erebus, kiu volis detrui sur Atlantiko nian sendostacion. La ŝipnaro dronis. Allo, ni vokas la britan registaron al laŭtparolilo. La ŝipo Amenhotep, haveno Port Said, rifuzis doni al ni en nia haveno Makallahu la menditajn eksplodi-  
Good evening, you people — (*angle*) bonan vesperon, vi homoj

gajn substancojn. Versimile ĝi ricevis ordonojn ĉesigi pluan transporton de eksplodaĵoj. La ŝipo memkomprene estis dronigita. Ni konsilas al la brita registaro, ke ĝi nuligu perradie la ordonon antaŭ la morgaŭa tagmezo, alie estos dronigitaj la ŝipoj Winnipeg, Manitoba, Ontario kaj Quebec, navigantaj kun greno el Kanado al Liverpolo. Allo, ni vokas al laŭtparolilo la francan registaron. Revoku la krozŝipojn navigantajn al Senegambio. Ni bezonas ankoraŭ larĝigi tie la nove kreitan golfon. Chief Salamander ordonis, ke mi transdonu al ambaŭ registaroj lian firman volon ligi kun ili la plej amikan rilaton. Fino de raportoj. Nun ni disaŭdigos per gramofondiskovian kanton Salamandria, erotika valso.”

La sekvantan posttagmezon sudokcidente de Mizen Head estis dronigitaj la ŝipoj Winnipeg, Manitoba, Ontario kaj Quebec. La mondon trakuris ondo de konsterno. Vespere B.B.C. disaŭdigis, ke la registaro de Lia Majeŝto eldonis malpermeson liveri al la salamandroj ian ajn nutraĵojn, kemiaĵojn, ilaron, armilojn kaj metalojn. Nokte je la unua kvakis ekscitita voĉo en disaŭdigo: ”Allo, allo, allo, Chief Salamander speaking! Allo, Chief Salamander is going to speak\*!” Kaj tiam aŭdiĝis la laca, raŭka kaj kolera voĉo: ”Allo, vi homoj! Allo, vi homoj! Allo, vi homoj! Ĉu vi opinias, ke ni lasos nin malsatigi?

Chief Salamander is going to speak — (*angle*) La ĉefsalamandro parolos

Lasu viajn stultaĵojn! Kion ajn vi faros, turniĝos kontraŭ vi! En la nomo de ĉiuj salamandroj de la mondo mi vokas Grandan Brition. Ekde ĉi tiu horo ni deklaras nelimititan blokadon de la britaj insuloj, escepte de la Libera Ŝtato Irlanda. Mi fermas la Manikan Markolon. Mi fermas la Suezan Kanalon. Mi fermas la Ĝibraltaran Markolon por ĉiuj ŝipoj. Ĉiuj britaj havenoj estas fermitaj. Ĉiuj britaj ŝipoj en kiu ajn maro estos torpeditaj. Allo, mi vokas Germanion. Mi dekobligas la mendon de eksploĉdaĵoj. Liveru tuj loko ĉefdepono Skagerrak. Allo, mi vokas Francion. Urĝe liveru la menditajn torpedojn en la submarajn fortresojn C 3, BFF kaj Ouest 5. Allo, vi homoj! Mi avertas vin. Se vi limigos al ni nutraĵ-liverojn, mi prenos ilin mem el viaj ŝipoj. Ankoraŭ foje mi avertas vin.” La laca voĉo sinkis je stertora apenaŭ komprenebla raŭkado. ”Allo, mi vokas Italion. Preparu la evakuon de la teritorio Venecio — Padova — Udine. Lastfoje mi avertis vin, homoj. Jam sufiĉe da viaj stultaĵoj.” Estiĝis longa paŭzo, dum kiu ĝi muĝis kiel nigra kaj malvarma maro. Kaj denove komencis la gaja kaj kvaka voĉo: ”Nun ni ludos al vi el viaj gramofondiskoj la lastan furorkanton Triton-troton.”



## 9. Konferenco en Vaduco

**Ĝ**i estis stranga milito, se entute oni povas ĝin nomi milito; ĉar estis nek Salamandra Ŝtato, nek agnoskita salamandra registaro, al kiu oni povus deklari la malamikecon. La unua ŝtato, kiu troviĝis en militŝtato kontraŭ la salamandroj, estis Granda Britio. Jam en la unuaj horoj la salamandroj dronigis preskaŭ ĉiujn iliajn ŝipojn, ankrantajn en havenoj; tion oni povis neniel malhelpi. Nur la ŝipoj sur la vasta maro estis dumtempe en relativa sekureco, ĉefe kiam ili krosis super pli grandaj profundoj; tiel saviĝis pli granda parto de la brita militfloto, kiu trarompis la salamandran blokadon apud Malto kaj koncentriĝis super la jona profundo; sed ankaŭ ĉi tiuj grupoj baldaŭ estis elserĉataj de malgrandaj salamandraj submaraj ŝipoj kaj dronigitaj unu post la alia. Dum ses semajnoj Granda Britio perdis kvar kvinonojn de sia ŝipa tonelaro.

John Bull povis denove en la historio montri sian faman obstinecon. La registaro de Lia Majesto ne traktis kun la salamandroj kaj la malpermeson de liveroj ne nuligis. "Brita ĝentlemano," deklaris la angla ĉefministro por la tuta nacio, "la bestojn protektas, sed ne trak-

tas kun ili.” Jam post kelkaj semajnoj montriĝis sur la britaj insuloj malespera manko de nutraĵoj. Nur infanoj ricevadis pantranĉon kaj kelkajn kulerojn da teo aŭ lakto; la brita nacio toleris tion kun senekzempla braveco, eĉ se ĝi sinkis tiel profunde, ke ĝi formanĝis ĉiujn siajn kurĉevalojn. La princo de Kimrujo propramane elplugis la unuan sulkon sur la golfejo de Royal Golf Club, por ke tie estu kultivataj karotoj por londonaj orfejoj. Sur la tenisejoj en Wimbledon estis plantitaj terpomoj, sur la vetkurejo en Ascott estis semita tritiko. ”Ni alportos ĉiajn, eĉ la plej grandajn oferojn,” certigis en la parlamento la gvidanto de la konservativa partio, ”sed la britan honoron ni alte tenos.”

Ĉar la blokado de la britaj insuloj sur la maro estis kompleta, restis al Anglio nur unu libera vojo por la proviantado kaj rilato kun kolonioj, nome tra la aero. ”Ni Devas Havi Cent Mil Aviadilojn”, anoncis la ministro de aviado, kaj ĉio havanta la manojn kaj krurojn disponigis sin por tiu devizo; estis entreprenataj febraj preparoj, por ke oni povu fabriki ĉiutage mil aviadilojn; sed tiam intervenis la registaroj de la ceteraj eŭropaj potencoj akre protestante kontraŭ tiu atenco de la aerflota ekvilibro; la brita registaro devis rezigni je sia aerflota programo kaj devoligi sin, ke ĝi ne konstruos pli ol dudek mil aviadilojn, kaj tion nur dum kvin jaroj. Restis nenio alia ol plu malsati aŭ pagi kapturnajn prezojn por la nu-

traĵoj, kiuj estis liverataj per aviadiloj el la aliaj ŝtatoj; funto da pano kostis dek ŝilingojn, paro da ratoj unu gineon, skatoletto da kaviaro dudek kvin pundojn sterlingajn. Mallonge, tio estis oraj tempoj por la kontinenta komerco, industrio kaj agrokulturo. Ĉar la militfloto estis tuj dekomence likvidita, la milit-operacoj kontraŭ la salamandroj estis farataj nur desur la firma tero aŭ el la aero. La ter-armeo pafadis el kanonoj kaj mitraloj en la akvon, farinte, kiel ŝajnas, al la salamandroj neniajn rimarkindajn perdojn; iom pli sukcesaj estis aviadilbomboj, ĵetataj en la maron. La salamandroj respondis pafante el submaraj kanonoj kontraŭ la britaj havenoj, kiujn ili ŝanĝis je rub-amasoj. El la enfluejo de Tamizo ili bombardis ankaŭ Londonon; tiam la arma komando provis veneni la salamandrojn per bakterioj, petrolo kaj kaŭstikaĵoj, verŝataj en Tamizon kaj kelkajn margolfojn. La salamandroj reagis tiel, ke ili nebuligis cent dudek kilometrojn de la angla bordo per militgasoj. Estis nur provo, sed sufiĉis; la brita registaro estis devigita unuafoje en la historio peti la ceterajn grandpotencojn pri interveno, apelaciante malpermeson de gasmilito.

La nokton poste aŭdiĝis perradie la raŭka, kolera kaj peza voĉo de Chief Salamander: "Allo, vi homoj! Anglio ne faru stultaĵojn! Se vi venenos al ni la akvon, ni venenos al vi la aeron. Ni uzas nur viajn proprajn armilojn. Ni ne estas barbaroj. Ni ne volas militi kontraŭ la homoj.

Ni volas nenion, nur povi vivi. Ni proponas al vi pacon. Vi liverados al ni viajn produktojn kaj vendos al ni viajn kontinentojn. Ni estas pretaj ilin bone pagi al vi. Ni proponas al vi pli ol pacon. Ni proponas al vi negocon. Ni proponas al vi oron por viaj landoj. Allo, mi vokas la registaron de Granda Britio. Anoncu al mi vian prezon por la suda parto de Lincolnshire apud la golfo Wash. Mi donas al vi tri tagojn por konsidero. Por tiu tempo mi ĉesigas la malamikecon, escepte la blokadon.”

Tiumomente ĉesis sur la angla bordo bruegi la submara kanonado. Ankaŭ la kanonoj sur la tero eksilentis. Estis stranga, preskaŭ terura silento. La brita registaro deklaris en la parlamento, ke ĝi ne intencas intertrakti kun la salamandroj. La loĝantoj apud la golfoj Wash kaj Lynn Deep estis avertitaj, ke versimile minacas granda atako de salamandroj, ke estus bone evakui la bordregionon kaj transloĝiĝi ien enlanden; sed la preparitaj trajnoj, aŭtoj kaj busoj forveturigis nur infanojn kaj malmulte da virinoj. La viroj senescepte restis surloke; simple ili neniel povis kompreni, ke anglo povus perdi sian grundon. Minuton post la paso de la tritaga armistico falis la unua pafo; estis pafo el angla kanono, kiun elpafis Loyal North Lancashire Regiment, ludante ĉe tio la regimentan marŝon Ruĝa Rozo. Poste ektondregis kolosa detonacio. La enfluejo de la rivero Nen dronis ĝis Wisbeck kaj estis inundita de la maro el la golfo Wash.

Krome malaperis en la akvoj la fama ruino Wisbeck Abbey, Holland Castle, la gastejo Ĉe Georgo kaj la Drako kaj aliaj memorindaj lokoj.

La tagon poste la brita registaro anoncis en la parlamento: milite estis farita ĉio por defendo de la brita bordo; ne estas ekskluditaj pluaj kaj multe pli ampleksaj atakoj kontraŭ la brita tero; la registaro de Lia Majesto ne povas intertrakti kun la malamiko, kiu indulgas nek civilajn loĝantojn, nek virinojn. (Konsento.) Nun ne plu temas pri la sorto de Anglio, sed pri la tuta civilizita mondo. Granda Britio estas preta konsideri internaciajn garantiojn, kiuj limigus la terurajn kaj barbarajn atakojn, endanĝerigantaj la homaron mem.

Kelkajn semajnojn poste okazis la tutmonda konferenco de ŝtatoj en Vaduco.

\*

Ĝi okazis en Vaduco, ĉar en la Altaj Alpoj ne ekzistis la salamandra danĝero kaj ĉar tien rifuĝis jam pli frue plejparto de la bonstataj kaj societe gravaj homoj el la apudmaraj landoj. La konferenco alpaŝis, kiel ĝenerale estis rekonite, energie al solvado de ĉiuj aktualaj mondproblemoj. Antaŭ ĉio ĉiuj landoj, krom Svislando, Etiopio, Afganio, Bolivio kaj aliaj kontinentaj landoj, principe rifuzis agnoski la salamandrojn kiel memstaran militantan potencon, ĉefe tial, ĉar ankaŭ iliaj salamandroj

povus opinii sin anoj de la salamandra ŝtato; ne estas ekskludite, ke tiel agnoskita salamandra ŝtato pretendus ŝtatan suverenecon super ĉiuj akvoj kaj bordoj, kie vivas la salamandroj. Ĉi-kaŭze kaj jure kaj praktike ne eblas deklari militon al la salamandroj aŭ uzi kontraŭ ili alian internacian premon; ĉiu ŝtato rajtas interveni nur kontraŭ *siaj* salamandroj; tio estas nepre ĝia interna afero. Tial tute ne eblas paroli pri kolektiva diplomata aŭ milita demarŝoj kontraŭ la salamandroj. Al la ŝtatoj atakitaj fare de salamandroj eblas disponigi internacian helpon nur tiel, ke oni permesos al ili eksterlandan prunton por sukcesa defendo.

Poste Anglio prezentis proponon, ke ĉiuj ŝtatoj almenaŭ devoligu sin ĉesi liveri al la salamandroj armilojn kaj eksplodaĵojn. La propono estis post funda konsidero rifuzita, unue, ĉar tiu devoligo enestas jam en la Londona Konvencio; due, al neniu ŝtato oni povas malhelpi, ke ĝi ne liveru al siaj salamandroj "nur por la propra bezono" teknikan ekipaĵon kaj armilojn por defendo de la propraj bordoj; trie, por la ĉemaraj ŝtatoj "memkompreneble gravas la konservado de bonaj rilatoj kun la loĝantaro de la maro" kaj tial ili opinias konvena "deteni sin intertempe de ĉiaj disponoj, kiujn la salamandroj povus opinii reprezaliaj"; tamen ĉiuj ŝtatoj estas pretaj promesi, ke ili liveros armilojn kaj eksplodaĵojn ankaŭ al la ŝtatoj, kiujn la salamandroj ekatakos.

En konfidenca debato estis akceptita propono de Kolumbio, ke estu komencita kun la salamandroj almenaŭ neoficiala traktado. Chief Salamander estos invitita sendi al la konferenco siajn plenrajtigitojn. Reprezentanto de Granda Britio akre protestis kontraŭ tio, rifuzante kunsidi komune kun la salamandroj; fine li kontentiĝis kun tio, ke provizore li forveturos pro sanstato al Engadino. Tiunokte estis disaŭdigata per kodoj de ĉiuj ĉemaraĵaj potencoj invito, ke Lia Ekscelenco sinjoro Chief Salamander nomu siajn reprezentantojn kaj sendu ilin al Vaduco. La respondo estis raŭka: "Jes; ĉi-foje ankoraŭ ni venos al vi; venonte viaj delegitoj venos al mi en la akvon." Kaj ankoraŭ oficiala raporto: "La akredititaj reprezentantoj de la salamandroj alveturos postmorgaŭ vespere per Orient-Ekspreso en la stacion Buchs."

Kun maksimuma urĝo estis entreprenataj ĉiaj preparoj por akcepto de la salamandroj; estis preparitaj la plej luksaj banĉambroj en Vaduco kaj ekstra trajno transportis en cisternoj la marakvon por la kuvoj de la salamandraj delegitoj. En la stacidomo de Buchs estis vespere okazonta nur tiel nomata neoficiala bonvenigo; al ĝi venis nur la sekretarioj de la delegacioj, reprezentantoj de la lokaj oficoj kaj proksimume ducent ĵurnalistoj, fotografistoj kaj kino-operatoroj. Akurate je la sesa dudek kvin enveturis la Orient-Ekspreso en la stacion. El la salon-vagono eliris tri altaj elegantaj sinjoroj kaj surpaŝis

ruĝan tapiŝon kaj post ilin kelkaj perfektaj, mondanaj sekretarioj kun pezaj tekoj. "Kaj kie estas la salamandroj?" demandis iu duonvoĉe. Du aŭ tri oficialaj personoj alpaŝis necerte renkonte al la tri sinjoroj; sed jam la unua el ili obtuze kaj rapide diris: "Ni estas la salamandra delegitaro. Mi estas profesoro doktoro Van Dott el Hago. Maitre Rosso Castelli, advokato el Parizo. Doktoro Manoel Carvalho, advokato el Lisbono." La sinjoroj riverencis kaj prezentis sin. "Vi ne estas do salamandroj," elspiris la franca sekretario. "Nature ne," diris d-ro Rosso Castelli. "Ni estas iliaj advokatoj. Pardonu, tiuj sinjoroj eble volas ĉi tie filmi." Poste la ridetanta salamandra delegitaro estis fervore filmata kaj fotografata. Ankaŭ la ĉeestantaj legaciaj sekretarioj vidigis sian kontenton. Tamen estis prudente kaj dece de la salamandroj, ke ili sendis kiel siajn reprezentantojn homojn. Kun homoj eblas plivere paroli. Kaj antaŭ ĉio ne necesas iaj malagrablaj societaj embarasoj.

Ankoraŭ samnokte okazis la unua konsiliĝo kun la salamandra delegacio. En programo estis la demando, kiel eblus plej rapide restarigi la pacon inter la salamandroj kaj Granda Britio. Al la parolo anoncis sin profesoro Van Dott. Estas nekontesteble, li diris, ke la salamandroj estis atakitaj de Granda Britio; la brita kanonŝipo Erebus surprizatakis sur la vasta maro la disaŭdigantan ŝipon de la salamandroj; la brita admiralitato atencis la



pacan komercan rilaton kun la salamandroj per tio, ke ĝi malhelpis al la ŝipo Amenhotep elŝipigi la menditan kargon de eksplodigaj substancoj; trie, la brita registaro pro sia malpermeso de ĉiaj liveraĵoj komencis blokadon de la salamandroj. La salamandroj povis plendi pro la malamikaĵoj nek en Hago, ĉar la londona Konvencio ne rajtigas la salamandrojn plendi, nek en Ĝenevo, ĉar ili ne estas membroj de Ligo de Nacioj; restis al ili donenio alia ol ekuzi memdefendon. Malgraŭ tio Chief Salamander estas preta ĉesigi la milit-operacojn sub ĉi tiuj kondiĉoj: 1. Granda Britio ekskuzos sin al la salamandroj pro la cititaj maljustaĵoj; 2. ĝi nuligos ĉiujn malpermesojn de liveroj al la salamandroj; 3. kompanse ĝi cedos al la salamandroj senpage la riverregionojn en la ebenaĵoj de Panĝabo, por ke ili povu tie fari novajn bordojn kaj margolfojn. — Tuj poste la prezidanto de la konferenco anoncis, ke li prezentos la raporton pri ĉi tiuj kondiĉoj al sia estimata amiko, la reprezentanto de Granda Britio, kiu ĝuste ne ĉeestas; sed li ne kaŝis sian timon, ke ĉi tiuj kondiĉoj apenaŭ estos akcepteblaj; tamen oni povas esperi, ke en ili ni povas vidi elirejon por la plua traktado.

Plua punkto en la programo estis plendo de Francio en afero de la senegambia bordregiono, kiun la salamandroj eksplodigis, atencante tiel la francajn koloniajn enklavojn. Al la parolo anonciĝis reprezentanto de la

salamandroj, la fama pariza advokato d-ro Julien Rosso Castelli. Pruvu tion, li diris. La mondkapacitoj el la sfero de sismografio deklaras, ke la terskuo en Senegambio havis vulkanan devenon, ke ĝi koneksas kun la iama aktiveco de la vulkano Pico sur la insulo Fogo. Jen, vokis d-ro Rosso Castelli, manfrapante sian dosieron, estas iliaj sciencaj ekspertizoj. Se vi havas pruvojn, ke la tertremo en Senegambio estiĝis pro la agado de miaj klientoj, bonvolu; mi atendas ilin.

Belga delegito Creux: Via Chief Salamander mem deklaris, ke la salamandroj tion faris.

Profesoro Van Dott: Lia deklaro estis neoficiala.

Me Rosso Castelli: Ni estas komisiitaj la menciitan lian deklaron dementi. Mi postulas, ke estu aŭdataj teknikaj ekspertoj, ĉu eblas artefarite kaŭzi en la terkrusto fendon longan sesdek sep kilometrojn. Mi proponas, ke ili prezentu al ni praktikan eksperimenton en la sama amplekso. Dum tiaj pruvoj ne ekzistas, sinjoroj, ni parolos pri vulkana aktiveco. Tamen Chief Salamander estas preta aĉeti de la franca registaro la margolfon, kiu kreĝis en la senegambia fendego kaj konvenas por fondo de salamandra setlejo. Ni estas plenrajtigataj akordiĝi kun la franca registaro pri la prezo.

La franca delegito ministro Deval: Se ni povas vidi en tio kompenson por la kaŭzita damaĝo, ni povas trakti pri tio.

Me Rosso Castelli: Tre bone. La salamandra registaro postulas tamen, ke la koncerna aĉetkontrakto ankaŭ inkluzivu la teritorion Landes ekde la enfluejo de Ĝirondo ĝis Bayonne en la amplekso de ses mil sepcent dudek kvadratkilometroj. Alivorte, la registaro de la salamandroj estas preta aĉeti de Francio ĉi tiun pecon de la sud-franca tero.

Ministro Deval (naskiĝinta en Bayonne, deputito por Bayonne): Por ke viaj salamandroj faru el peco de Francio marfundon? Neniam! Neniam!

D-ro Rosso Castelli: Francio bedaŭros ĉi tiun vorton, sinjoro. Hodiaŭ oni parolis ankoraŭ pri la aĉetkontrakto.

Post tio la kunsido estis interrompita.

En la posta kunveno la temo de la traktado estis granda internacia propono al la salamandroj: anstataŭ la neallasebla damaĝado de la malnovaj, dense loĝataj kontinentoj ili konstruu por si novajn bordojn kaj insulojn; tiukaze oni garantias al ili abundan krediton; la novaj kontinentoj kaj insuloj poste estos agnoskitaj kiel ilia memstara kaj suverena ŝtata teritorio.

D-ro Manoel Carvalho, granda lisbona juristo, dankis por ĉi tiu propono, kiun li transdonos al la salamandra registaro; sed ĉiu infano komprenos, li diris, ke konstrui novajn kontinentojn estas multe pli longdaŭra kaj multekosta ol malkonstrui malnovajn landojn. Niaj klientoj

bezonas novajn bordojn kaj golfojn en la plej mallonga tempo; tio estas por ili demando de esto aŭ neesto. Por la homaro estus pli bone akcepti la grandaniman proponon de Chief Salamander, kiu ankoraŭ nun pretas aĉeti la mondon de la homoj, anstataŭ uzurpi ĝin perforte. Niaj klientoj inventis procedon, kiel ekstrakti oron troviĝantan en la marakvo; sekve de tio ili disponas pri rimedoj preskaŭ senlimaj; ili povas bone pagi al vi por via mondo, jes eĉ brile. Kalkulu kun tio, ke por ili la prezo de la mondo intertempe sinkos, ĉefe, se okazos, kiel estas antaŭvideble, plujaj vulkanaj aŭ tektonikaj katastrofoj, multe pli ampleksaj ol tiuj, kies atestantoj ni estis, kaj se pro ili altgrade malgrandiĝos la areo de la kontinentoj. Ankoraŭ hodiaŭ eblas vendi la mondon en ĝia tuta ĝisnuna amplekso; kiam el ĝi restos super la marsurfaco nur montruinoj, neniu donos al vi por ili eĉ ne monereton. Mi estas ĉi tie kiel reprezentanto kaj jura konsilisto de la salamandroj, vokis d-ro Carvalho, kaj mi devas defendi *iliajn* interesojn; sed mi estas homo kiel vi, sinjoroj, kaj prospero de la homoj bazas en mia koro ne malpli ol al vi. Tial mi konsilas al vi, ne, mi ĵurligas vin: vendu la kontinentojn dum ne estas malfrue! Vi povas vendi ilin tutajn aŭ disvendi po unuopaj landoj. Chief Salamander, kies grandanima kaj moderna pensado jam estas nuntempe al ĉiu konata, devoligas sin, ke ĉe la es-tontaj necesaj ŝanĝoj de la tersurfaco, laŭeble li respek-

tos la homajn vivojn; inundo de la kontinentoj okazos pograde kaj tiel, ke ne okazu paniko aŭ nenecesaj katastrofoj. Ni estas plenrajtigataj komenci la traktadon kun la glora tutmonda konferenco aŭ kiel kun la tuto aŭ kun unuopaj ŝtatoj. La ĉeesto de tiel eminentaj juristoj, kiel estas profesoro Van Dott aŭ Maitre Julien Rosso Castelli, povas esti garantio al vi, ke krom la justaj interesoj de niaj klientoj salamandroj ni defendos man-en-mane kun vi tion, kio al ni ĉiuj estas plej kara: la homan kulturon kaj bonon de la tuta homaro.

Dum iom deprimita humoro estis prezentita plua punkto: ke al la salamandroj estu cedita por subakvigo la meza Ĉinio; por tio la salamandroj devoligus sin, ke por eterne ili garantios la bordojn de la eŭropaj ŝtatoj kaj de iliaj kolonioj.

D-ro Rosso Castelli: Por eterne, tio estas iom longe. Ni diru por dek du jaroj.

Profesoro Van Dott: Meza Ĉinio, tio estas iom mal multe. Ni diru provincojn Nganhuei, Giangsu, Honan, Ĉi-li kaj Föng-tien.

La japana reprezentanto protestas kontraŭ cedo de la provinco Föng-tien, kuŝanta en la sfero de japanaj interesoj. La ĉina delegito komencas paroli, sed bedaŭrinde oni ne komprenas lin. En la sesia halo regas kreskanta maltrankvilo; estas jam la unua post noktomezo.

Tiumomente eniras en la halon sekretario de la itala delegitaro kaj flustras ion enorelen al la itala reprezentanto, grafo Tosti. Grafo Tosti paliĝas, leviĝas kaj ne atentante, ke la ĉina delegito d-ro Ti plu parolas, raŭke vokas: "Sinjoro prezidanto, mi petas la parolon. Ĝus venis informo, ke la salamandroj subakvigis parton de nia venecia provinco en la direkto al Portogruaro."

Estiĝis terura silento, nur la ĉina delegito plu parolis.

"Chief Salamander vin ja delonge avertis," murmuris d-ro Carvalho.

Profesoro Van Dott malpacience ekmovis sin kaj levis la manon. "Sinjoro prezidanto, eble ni povos reveni al la afero. En la programo estas la provinco Föng-tien. Ni estas rajtigitaj oferti por ĝi al la japana registaro kompencon en oro. Plua demando estas, kion donos la interesataj ŝtatoj al niaj klientoj por la evakuo de Ĉinio."

\*

En la sama momento noktaj amatoroj aŭskultis la salamandran disaŭdigon. "Ĝus vi aŭdis el gramofondisko Barkarolon el la Rakontoj de Hofmann," kvakis la anoncisto. "Allo, allo, nun ni komutas al la itala Venecio."

Kaj tiam aŭdeblis nur nigra kaj senfina muĝado kva-zaŭ de leviĝantaj akvoj.

## 10. *Sinjoro Povondra ĉion surprenas*

**K**iu estus dirinta, ke forpasis tiom da akvo kaj tiom da jaroj! Ja, ankaŭ nia sinjoro Povondra ne plu estas pordisto en la domo de G. H. Bondy; li estas nun, por tiel diri, majesta maljunulo, kiu povas en trankvilo ĝui la fruktojn de sia longa kaj laborema vivo en formo de eta pensio; sed ĉu sufiĉus tiuj kelkaj centoj dum tia militkareco! Bone, ke iam tiam oni kaptas ian fiŝeton; li sidas en boato kun fiŝvergo enmane kaj rigardas, — kiom da akvo forpasis dumtage, kaj de kie ĝi tiakvante aperas! Iam kaptiĝas je la vergeto blankfiŝo, iam ĝi estas perko; entute da fiŝoj estas nun ial pli multe, eble tial, ĉar la riveroj nun estas multe pli mallongaj. Tia perko ankaŭ ne estas malbona; ĝi estas ja nura osteto, sed la viando gustas laŭ migdaloj. Kaj panjo scias ilin prepari. Sinjoro Povondra eĉ ne scias, ke la panjo hejtas sub liaj perkoj kutime per la gazet-eltranĉaĵoj, kiujn li iam kolektis kaj klasifikis. Fakte, sinjoro Povondra jam lasis la kolekton, kiam li pensiiĝis; sed li havigis al si akvarion, kie krom la oraj karpetoj li bredis etajn tritonojn kaj salamandrojn; horojn li rigardis ilin, kiel senmove ili kuŝas en la akvo aŭ surrampas la bordon, kiun li faris al ili el

ŝtonoj; poste li kapskuis dirante: "Kiu nur pensus tion pri ili, panjo!" Sed oni ne eltenas nur rigardi; tial sinjoro Povondra fordonis sin al la fiŝado. Kion fari, la viroj ĉiam devas ion havi, pensas indulgeme panjo Povondrová. Pli bone, ol se li iradus en gastejon kaj politikumus.

Vere, multe, multege da akvo forfluis. Ja nek Francisko plu estas lernanto studanta geografion, nek junulo, truanta siajn ŝtrumpetojn pro ĉasado de la mondanaj vanaĵoj. Jam li estas neĵuna sinjoro, tiu Francisko; dank' al Dio, li estas suboficisto en poŝto — tamen ja ĝi estis por io bona, ke li lernis geografion tiel konsciencie. Ankaŭ li komencas havi prudenton, opinias sinjoro Povondra kaj direktas sian ŝipeton iom laŭ la fluo sub la ponton de Legioj. Hodiaŭ li venos al mi, estas dimanĉo kaj li ne deĵoras. Mi prenos lin en la boaton kaj ni navigos supren al la pinto de Pafinsulo; tie la fiŝoj pli bone kaptiĝas; kaj Francisko diros al mi, kio estas en la ĵurnaloj. Kaj poste ni iros hejmen, al Vyšehrad, kaj la bofilino alkondukos al ni ambaŭ infanojn ... Sinjoro Povondra tempeton fordonis sin al trankvila feliĉo de avo. Jes, post unu jaro Marinja frekventos lernejon, li ĝojas; kaj la eta Francisko, nome nepo, pezas jam tridek kilogramojn — Sinjoro Povondra havas fortan, profundan senton, ke ĉio tamen nur estas en granda kaj bona ordo.

Jen tie jam atendas apud la akvo lia filo kaj mangestas. Sinjoro Povondra remis kun la boato al la bordo.



”Nu, fine vi estas ĉi tie,” li diris mentore. ”Kaj atentu, ke vi ne falu en la akvon!”

”Ĉu kaptiĝas?” demandas la filo.

”Ne parolinde,” murmuris la maljuna sinjoro. ”Ni veturos supren, ĉu?”

Estas bela dimanĉa posttagmezo; ankoraŭ ne venis la horo, kiam la frenezuloj kaj gapuloj portiĝas el futbalo kaj aliaj stultaĵoj hejmen. Prago estas hom-malplena kaj silenta; kelke da homoj sporadas sur la kajo kaj ponto, ili ne urĝiĝas kaj dece paŝas kaj digne. Ili estas pli bonaj homoj kaj prudentaj, kiuj ne faras hom-amasetojn kaj ne mokas la vultavajn fiŝistojn. Patro Povondra denove havas tiun bonan kaj profundan senton de ordo.

”Kio do estas en la ĵurnaloj?” li demandas kun la patreca severeco.

”Entute nenio, paĉjo,” diras la filo. ”Ĝuste ĉi tie mi legas, ke la salamandroj laborpenetras jam ĝis Dresdeno.”

”Do kun Germanio ankaŭ amen,” konstatas la maljuna sinjoro. ”Sciu, Francisko, tiuj germanoj, ili estis ege stranga nacio. Klera, sed stranga. Mi konis iun germanon, li estis ŝoforo en iu fabriko; li estis kruda homo, tiu germano. Sed la veturilon li havis en ordo, jen ĉio, nur laŭvere. — Nu, nu, Germanio do ankaŭ jam malaperis de sur la mondmapo,” rezonis sinjoro Povondra. ”Kaj kian konfuzegon pli frue ĝi faris! Kia teruro: ĉiam nur

armeoj kaj ĉiam nur militoj — Ba, la salamandrojn venkos eĉ ne germanoj. Sciu, mi konas la salamandrojn. Ĉu vi memoras, kiel mi montris ilin al vi, kiam vi estis ankoraŭ nur tiel malgranda?”

”Atentu, paĉjo,” diris la filo. ”Fiŝo kaptiĝas.”

”Ĝi estas nur alburno,” murmuris la maljuna sinjoro kaj ektiris la fiŝvergon. Do vidu, ankaŭ Germanio, li pensis. Nu jes, oni miras jam pri nenio. Kiom da kriadado estis, kiam la Salamanadroj subakvigis iun landon! Eĉ se tio estis nur Mezopotamio aŭ Ĉinio, kaj ĉiuj ĵurnaloj plenplenis pri tio. Hodiaŭ oni ne akceptas tion tiel tragike, cerbumas melankolie sinjoro Povondra, lante palpebrumante super sia fiŝvergo. Oni kutimiĝas al tio, kion fari. Ĉe ni ĝi ne estas, do kion; nur se ne ekzistus tia kareco! Ekzemple, kion nur oni postulas por kafo — nu vere, Brazilo jam ankaŭ malaperis en la ondoj. Tamen oni sentas tion en la butikoj, se peco de la mondo subakviĝas!

La flosilo de sinjoro Povondra dancas sur la moderaj ondetoj. Kiom nur la salamandroj sinkigis jam en la maron, rememoras la maljuna sinjoro. Jen Egiptio kaj Hindio kaj Ĉinio. — Ankaŭ kontraŭ Rusion ili ekkuraĝis; kaj kia granda lando estis Rusio! Kiam nur oni pripensas, ke Nigra Maro etendiĝas supren al la norda polusa cirklo, — ja kiom da akvo! Jes, laŭvere jam sufiĉe da fir-

ma tero ili formordis de ni! Ankoraŭ bone, ke nur tiel lante tio progresas al ili —

”Vi diras do,” aŭdiĝis la maljuna sinjoro, ”ke la salamandroj estas jam apud Dresdeno?”

”Dek ses kilometrojn de Dresdeno. Sub la akvo estas preskaŭ tuta Saksio.”

”Foje mi estis tie kun sinjoro Bondy,” diris patro Povondra. ”Ĝi estis enorme riĉa lando, Francisko, sed ke oni tie bone manĝus, tion oni ne povus diri. Alie ĝi estis ege brava popolo, pli bona ol la prusoj. Nu jes, neniel komparebla.”

”Sed ankaŭ Prusio jam estas for.”

”Ne mirigas min,” lakonis la maljuna sinjoro. ”Mi ne ŝatas la prusojn. Sed tio estas nun bona por la francoj, kiam la germanoj estas for. Tiuj respiros.”

”Ne tro, paĉjo,” oponis Francisko. ”Antaŭ nelonge estis en la ĵurnaloj, ke jam ankaŭ triono de Francio estas sub akvo.”

”Jes,” ekĝemis la maljuna sinjoro. ”Ĉe ni, nome ĉe sinjoro Bondy, estis iu franco, servisto, Jean li estis nomata. Kaj tiu avidis la virinojn, ke estis skandale. Sciu, tia facilanimeco ĉiam venĝiĝas.”

”Proksimume dek kilometrojn de Parizo la salamandroj estis venkitaj,” anoncis filo Francisko. ”Onidire oni ĉion subminis kaj eksplodigis en la aeron. Oni frakasis tie laŭdire du salamandrajn armeajn korpusojn.”

”Jes, la francoj estas bonaj soldatoj,” opiniis sinjoro Povondra eksperte. ”Tiu Jean ankaŭ neniam ion toleris. Tute li ne aspektis laŭ tio. Li bonodoris kiel drogerio, sed kiam li interbatiĝis, vere li interbatiĝis. Sed du salamandraj korpusoj estas malmulte. Rigardante tion,” enpenŝiĝis la maljuna sinjoro, ”la homoj kontraŭ homoj sciis pli bone batali. Kaj tio ne daŭris tiel longe. Kun la salamandroj treniĝas jam dek du jarojn kaj daŭre nenio, nur ĉiam preparado de pli avantaĝaj pozicioj — Ba, dum mia junaĝo, tiam ankoraŭ okazis bataloj. Ĉi tie estis tri milionoj da homoj kaj tie estis tri milionoj da homoj,” montris la maljuna sinjoro, ke eĉ la boato balanciĝis, ”kaj nun, damne, ili atakis unu la alian. — Ĉi tio estas ja nenia ĝusta milito,” koleris patro Povondra. ”Nuraj betondigoj, sed eĉ ne spuro pri ia bajonet-atako. Tute ne!”

”Ja la homoj kaj la salamandroj ne povas kontraŭ si, paĉjo,” defendis la juna Povondra la modernan militmanieron. ”Fari bajonet-atakon en la akvo, tio ja ne eblas.”

”Nu ĝuste,” murmuris sinjoro Povondra malestime. ”Ili ne povas ĝuste unu kontraŭ la alia. Sed lasu homojn kontraŭ homoj kaj vi vidos, kion ili kapablas. Kion ja vi scias pri milito!”

”Nur ĝi ne venu ĝis ĉi tie,” diris filo Francisko iom neatendite. ”Sciu ja, se oni havas infanojn —”

”Kiel, ĉi tien,” elbuŝiĝis la maljuna sinjoro iom ekscitite. ”vi opinias, ke ĉi tien en Pragon?”

”Entute al ni, en Bohemion,” diris la juna Povondra iom zorgoplene. ”Mi opinias, se la salamandroj estas jam apud Dresdeno —”

”Ci saĝulo,” mentoris lin sinjoro Povondra. ”Kiel ili venus ĉi tien? Trans niajn montojn?”

”Eble laŭ Elbo — kaj poste plu laŭ Vultavo.”

Patro Povondra incitite eksnufis. ”Mi petas, laŭ Elbo! Ili povus veni maksimume al Podmokly, sed ne plu. Tie estas, hometo, nuraj rokoj. Mi estis tie. Ba, ĉi tien la salamandroj ne venos, tio estas por ni bona. Kaj Svislando ankaŭ bone statas. Estas grandega avantaĝo, ke ni havas nenian maron, ĉu? Kiu nun havas maron, estas povrulo.”

”Sed nun, kiam la maro atingas Dresdenon — ”

”Tie estas germanoj,” deklaris la maljuna sinjoro rifuzeme. ”Ilia afero. Sed al ni la salamandroj ne povas, estas ja klare. Unue ili devus forigi la rokojn; kaj vi eĉ ne scietas, kia laboro tio estus!”

”Nu, laboro,” oponis morne la maljuna Povondra. ”Jen io por ili. Vi scias ja, ke en Gvatemalio ili kapablis subakvigi la tutan montaron.”

”Jen io alia,” diris nepre rezolute la maljuna sinjoro. ”Ne parolu tiel malsaĝe, Francisko! Tio estis en Gvatemalio, sed ne ĉe ni. Ĉi tie estas alia situacio.”

La juna Povondra ekĝemis. "Kiel vi opinias, paĉjo. Sed konsiderante, ke la bestaĉoj subakvigis jam proksimume kvinonon de ĉiuj kontinentoj —"

"Apud la maro, ci stultulo, sed nenie alie. Ci ne komprenas la politikon. La ŝtatoj, situantaj apud la maro, militas kontraŭ ili, sed ne ni. Ni estas neŭtrala ŝtato, kaj tial ili ne povas kontraŭ ni. Tiel statas. Kaj ne parolu senĉese, alie nenion mi kaptos."

Estis silente super la akvo. La arboj sur la Pafinsulo jam estis ĵetantaj longajn delikatajn ombrojn sur la surfaco de Vultavo. Sur la ponto tintintis tramo, sur la kajo promenis infanvartistinoj kun infanveturiloj kaj prudentaj, dimanĉaj homoj —

"Paĉjo," elspiris la juna Povondra preskaŭ infanece.

"Nu, kio?"

"Ĉu tie estas silurio?"

"Kie?"

El Vultavo, ĝuste antaŭ la Nacia Teatro rigardis el la akvo granda, nigra kapo kaj naĝis lante kontraŭ la fluon.

"Ĉu estas silurio?" ripetis Povondra la juna.

La maljuna sinjoro igis fali la fiŝvergon. "Ĉi tio?" li elbuŝigis, montrante per la tremanta fingro. "Ĉi tio?"

La nigra kapo malaperis sub la akvo.

"Tio ne estis silurio, Francisko," diris la maljuna sinjoro, per ia fremda voĉo. "Ni iros hejmen. Jen la fino."

"Kia fino?"

”Salamandro. Do jam ili estas ankaŭ ĉi tie. Ni iros hejmen,” li ripetis kunmetante per la malcertaj manoj sian fiŝvergon. ”Jen do la fino.”

”Vi tute tremas,” ektimis Francisko. ”Kio estas al vi?”

”Ni iros hejmen,” dentklakis la maljuna sinjoro, kaj lia mentono povre tremis. ”Mi frostas. Mi frostas. Ankoraŭ ĉi tio mankis al ni! Sciu, do jen la fino. Ili estas do jam ĉi tie. Hergot, kia malvarmo! Mi irus hejmen.”

La juna Povondra explore ekrigardis lin kaj ekprenis la remilojn. ”Mi kondukos vin, paĉjo,” li diris ankaŭ deprimvoĉe kaj per fortaj rembatoj pelis la boaton al la insulo. ”Lasu tion, mi alligos ĝin.”

”Kial nur estas tiel malvarme,” miris la maljuna sinjoro, dentklakante.”

”Mi tenos vin, paĉjo. Nur iru,” kuraĝigis lin la juna kaj prenis lin subbrake. ”Mi opinias, ke vi malvarmumis ĉe la akvo. Tio estis nur peco da ligno.”

La maljuna sinjoro tremis kiel folio. ”Mi scias, peco da ligno. Al mi vi ion rakontos! Mi scias plej bone, kio estas la salamandroj. Lasu!”

Povondra la pli juna faris, kion ankoraŭ neniam li faris en sia vivo: li mangestis al taksio. ”Al Vyšehrad,” li diris kaj puŝis la paĉjon en la veturilon. ”Mi veturigos vin hejmen, paĉjo. Estas jam malfrue.”

”Jes, jes, estas jam malfrue,” dentklakis patro Povondra. ”Ege malfrue. Estas jam la fino, Francisko. Tio ne estis lignopeco. Tio estas ili.”

La juna Povondra devis la paĉjon preskaŭ porti sur la ŝtuparo. ”Preparu liton, panjo,” li flustris urĝe en la por-do. ”Ni devas enlitigi la paĉjon, li ekmalsanis.”

Do, kaj nun kuŝas patro Povondra en kusenoj; la nazo iel strange elstaras el lia vizaĝo kaj la lipoj ion nekompreneble maĉas kaj murmuretas; kiel aĝa li aspektas, kiel aĝa! Nun li iom trankviliĝis —

”Ĉu estas al vi pli bone, paĉjo?”

Ĉe la piedoj de la lito snufas kaj ploras en la antaŭtukon panjo Povondrová, la bofilino hejtas en la forno kaj la infanoj, Francisko kaj Marinja, fiksas la largajn, konfuzajn okulojn al la avo, kvazaŭ ili ne povus lin ekkoni.

”Ĉu venigi doktoron, paĉjo?”

Patro Povondra rigardas la infanojn kaj ion flustras; kaj subite larmoj fluis el liaj okuloj.

”Paĉjo, ĉu vi volas ion?”

”Mi mem, mi mem,” flustras la maljuna sinjoro. ”Por ke vi sciu, mi mem kulpas pri ĉio. Se tiam mi ne estus enlasinta la kapitanon al sinjoro Bondy, do ĉio ĉi neniam okazus — ”

”Nenio ja okazis, paĉjo,” kvietigis lin la juna Povondra.



”Tion vi ne komprenas,” sible spiris la maljuna sinjoro. ”Tio ja estas la fino. Fino de la mondo. Nun venos la maro ankaŭ ĉi tien, kiam la salamandroj jam ĉi tie estas. Tion mi faris; mi ne bezonis enlasi la kapitanon pluen. — Por ke la homoj foje sciu, kiu pri ĉio kulpis.”

”Sensencaĵo,” aŭdiĝis la filo bruske. ”Tio nepre ne venu en vian kapon, paĉjo. Tion faris ĉiuj homoj. Tion faris la ŝtatoj, tion faris la kapitalo. — Ĉiuj volis havi plej multe da salamandroj. Ĉiuj volis per ili profiti. Ankaŭ ni sendadis al ili armilojn kaj ĉion eblan. — Ni ĉiuj kulpas pri tio.”

Patro Povondra maltrankvile turniĝis: ”Iam ĉie estis la maro, kaj denove estos. Jen fino de la mondo. Foje diris al mi iu sinjoro, ke ankaŭ apud Prago estis marfundo — Mi opinias, ke ankaŭ tiam faris tion la salamandroj. Sciu, mi ne devis anonci la kapitanon. Io senĉese diradis al mi, ne faru tion, — sed poste mi pensis, eble la kapitano donos al mi trinkmonon. — Kaj vidu, li ne donis. Tiel oni senbezone ruinigos la tutan mondon —” La maljuna sinjoro glutis ion, eble larmojn. ”Mi scias, mi scias bone, ke estas jam fino kun ni. Mi scias, ke mi faris tion — ”

”Avo, ĉu vi volus teon?” demandis kompate la juna sinjorino Povondrová.

”Mi volus nur,” ekĝemis la maljuna sinjoro, ”mi volus nur, ke la infanoj pardonu tion al mi.”

## 11. La aŭtoro parolas kun si mem

Ĉu tiel vi lasos tion?” aŭdiĝis tiuloke la interna voĉo de la aŭtoro.

”Nu, kion?” demandis la aŭtoro iom necerte.

”Ĉu vi lasos sinjoron Povondra tiel morti?”

Nu, defendis sin la aŭtoro, mi ne faras tion ŝate, sed — Finfine sinjoro Povondra jam havas siajn jarojn; ni diru, ke li aĝas multe pli ol sepdek —

”Kaj vi lasos lin, ke li turmentu sin tiom spirite? Vi eĉ ne diros al li, avo, ne estas ja tiel malbone; la mondo ne pereos pro la salamandroj kaj la homaro saviĝos, nur ankoraŭ atendu kaj vi ĝisvivos tion? Mi petas vin, ĉu vi povas fari nenion por li?”

Mi venigos do kuraciston al li, proponis la aŭtoro. La maljuna sinjoro havas versimile nervofebzon; en tiu aĝo li povus havi pulmiton el tio, sed eble dank'al Dio, li transvivos tion; eble ankoraŭ li balancos Marinjan sur la genuoj kaj demandas, kion ŝi lernis en la lernejo. — Ĝojoj de la maljuneco: la maljuna sinjoro havu ankoraŭ ĝojojn de la maljuneco!

”Belajn ĝojojn,” mokis la interna voĉo. ”Per siaj maljunaj manoj li premos la infanon al si kaj timos, homo,

timos, ke ankaŭ ŝi foje devos fuĝi antaŭ la muĝetantaj akvoj, inundantaj nedeteneble la tutan mondon; en hororo li sulkigos siajn vilajn brovojn kaj flustros: Tion faris mi, Marinja, tion faris mi — Aŭskultu, ĉu *vere* vi volas lasi pere i la tutan homaron?”

La aŭtoro morniĝis. Ne demandu min, kion mi volas. Ĉu vi opinias, ke pro *mia* volo dispecetiĝas la homaj kontinentoj, ĉu vi opinias, ke *mi* volis ĉi tiujn finojn? Jen simple la logiko de eventoj; ĉu povas mi ĝin interveni? Mi faris, kion mi povis; mi avertis la homojn ĝustatempe; tiu X, tiu ankaŭ parte mi estis. Mi predikis, ne donadu al la salamandroj armilojn kaj eksplodaĵojn, ĉesigu la fian negocadon kun la salamandroj kaj tiel plu — vi scias, kiel ĝi finiĝis. Ĉiuj havis mil absolute ĝustajn ekonomiajn kaj politikajn kontraŭdirojn, kial ne eblas. Mi estas nek politikisto, nek ekonomo; mi ja ne povas ilin konvinki. Kion fari, la mondo eble sinkiĝos kaj subakviĝos; sed almenaŭ tio okazos pro ĝenerale agnoskataj kaŭzoj politikaj kaj ekonomiaj, almenaŭ tio okazos helpe de scienco, tekniko kaj publika opinio, kaj uzo de ĉia homa inĝenio! Nenia kosma katastrofo, sed la nuraj ŝtataj, grandpotencaj, ekonomiaj kaj aliaj kaŭzoj. — Kontraŭ tio nenio fareblas.

La interna voĉo tempeton silentis. ”Kaj ĉu vi ne bedaŭras la homaron?”

Atendu, ne tiel rapide! Ne necesos ja, ke formortu la tuta homaro. La salamandroj bezonas nur pli da bordoj, por povi ie loĝi kaj demeti la ovojn. Eble ili faros el la firma tero nurajn longajn terstriojn anstataŭ la kontinuaĵojn, por ke estu kiel eble plej multe da bordoj. Ni diru, ke sur la terstrioj konserviĝos iom da homoj, ĉu? Kaj ili povos fari metalojn kaj aliajn objektojn por la salamandroj. La salamandroj ne povas ja mem labori per fajro, ĉu?

”La homoj do servos al la salamandroj.”

Jes, se vi volas tion nomi tiel. Simple ili laboros en fabrikoj kiel nun. Ili havos nur aliajn mastrojn. Finfine eble eĉ ne tiom multe ŝanĝiĝos.

”Kaj ĉu vi ne bedaŭras la homaron?”

Diomia, lasu min! Kion mi faru? La homoj ja volis tion; ĉiuj volis havi salamandrojn, volis ilin la komerco, industrio, tekniko, volis ilin la ŝtatviroj kaj la sinjoroj de la milito. — Ankaŭ la juna Povondra diradis: ni ĉiuj kulpas pri tio. Mi petas vin, kial mi ne bedaŭrus la homaron! Kaj pleje mi bedaŭris ĝin, vidante kiel mem ĉiel ĝi ĵetiĝas en la pereon. Oni krius, rigardante tion. Oni krius kaj levus ambaŭ manojn kvazaŭ oni vidus trajnon surveturantan falsan relon. Nun oni ne povas tion helptigi. La salamandroj plu multiĝos kaj plu splitigos la malnovajn kontinentojn. — Nur rememoru, kiel Wolf Meynert tion pruvis: ke la homoj devas fari spacon por la sa-

lamandroj; kaj nur la salamandroj kreos feliĉan, unuecan kaj homogenan mondon —

”Aĥ, Wolf Meynert! Wolf Meynert estas intelektulo. Ĉu vi trovis jam ion tiel teruran kaj murdigan kaj absurdan, per kio iu intelektulo ne volus renovigi la mondon? Nu, lasu tion! Ĉu vi scias, kion nun faras Marinja?”

Marinja? Mi opinias, tiu ludas sur Vyšehrad. Vi devas silenti, ili diris al ŝi, la avo dormas. Kaj nun ŝi ne scias, kion fari kaj ege enuas —

”Kaj kion ŝi faras?”

Mi ne scias. Plej versimile ŝi provas atingi per la pinto de la lango la pinton de sia nazo.

”Nu, vidu. Kaj vi volus lasi okazi ion kiel novan diluvon de la mondo?”

Do, ĉesu! Ĉu miraklojn mi povas fari? Okazu, kio devas okazi. La aferoj havu sian ne deturneblan kurson! Ankaŭ en tio estas io kiel konsolo; ke tio, kio okazas, plenumas sian neceson kaj sian leĝon.

”Ĉu ne eblus iel haltigi la salamandrojn?”

Ne. Ili estas tro multaj. Oni devas fari spacon por ili.

”Ĉu eblus, ke iel ili formortu? Eble povus trafi ilin ia malsano aŭ danĝero —”

Tro malkara, amiko. Ĉu la Naturo senĉese rebonigadu, kion la homoj fuŝis al si? Vi mem do ne plu kredas, ke ili helpos al si? Vidu, vidu; fine denove vi volus fidi, ke io aŭ iu vin savos! Ion mi diros al vi: ĉu vi scias, kiu

*ankoraŭ nun*, kiam la kvinono de Eŭropo estas jam subakvigita, liveras al la salamandroj la eksplodaĵojn kaj torpedojn kaj borilojn? Ĉu vi scias, kiu febre, tage-nokte laboras en la laboratorioj, por inventi ankoraŭ pli rendimentajn maŝinojn kaj substancojn por la detruo de la mondo? Ĉu vi scias, kiu pruntas monon al la salamandroj, ĉu vi scias, kiu financas ĉi tiun Finon de la Mondo, ĉi tiun novan Diluvon?

”Mi scias. Ĉiuj fabrikoj. Ĉiuj bankoj. Ĉiuj ŝtatoj.”

Do vidu. Se nur la salamandroj estus kontraŭ la homoj, eble estus io farebla; sed homoj kontraŭ homoj, mia kara, tio ne estas haltigebla.

— Atendu, homoj kontraŭ la homoj! Mi havas ideon. Eble fine povus esti salamandroj kontraŭ salamandroj.”

Salamandroj kontraŭ salamandroj? Kiel vi opinias tion?

”Ekzemple ... se estas tiom da salamandroj, ili povus inter si batiĝi pri ia peceto da bordo aŭ ia golfo aŭ io simila; poste jam ili batalos inter si pri la pli kaj pli grandaj bordoj; fine ili devus batali pri la mondbordoj, ĉu? Salamandroj kontraŭ salamandroj! Kion vi opinias, ĉu ĉi tio ne estus historia logiko?”

— Ne, ne, ne eblas. La salamandroj ne povas batali kontraŭ la salamandroj. Tio estus kontraŭ la naturo. La salamandroj estas ja unu gento.

”Ankaŭ la homoj estas unu gento, mia kara. Kaj vi vidas, tio ne ĝenas ilin; unu gento, kaj jen pri kio entute ili batalas! Jam ne pri loko, kie ili vivus, sed pri potenco, prestiĝo, influo, gloro, merkatoj kaj ĉu scias mi pri kio ankoraŭ! Kial ankaŭ la salamandroj ne povus batali inter si, ni diru pri prestiĝo?

Kial ili farus tion? Mi petas vin, kion ili havus el tio?

”Nenion, eble nur tion, ke unuj havus dumtempe pli da bordoj kaj pli da potenco ol la aliaj. Kaj post iom da tempo denove male.”

Kaj kial unuj devus havi pli ol la aliaj? Ja, ili ĉiuj estas egalaj, ĉiu estas salamandroj; ĉiuj havas la saman skeleton, ĉiuj estas same malbelaj kaj same mezkvalitaj — Kial ili reciproke murdu sin? Mi petas vin, en kies nomo ili interbatalus?

”Nur lasu ilin, io jam troviĝos. Rigardu, unuj loĝas sur la okcidenta bordo kaj aliaj sur la orienta; ili kontraŭbatalos eble en nomo de Okcidento kontraŭ Oriento. Jen vi havas eŭropajn salamandrojn kaj tie malsupre la afrikajn; diablo devus enesti, se fine unuj ne volus esti pli ol la aliaj! Nu, kaj ili ekmarŝos por pruvi tion al ili en nomo de civilizacio, ekspansio aŭ mi ne scias kio; ĉiam troviĝos iaj ideoj aŭ politikaj kaŭzoj, pro kiuj la salamandroj de unu bordo devos subtranĉi la salamandrojn sur alia bordo. La salamandroj estas civilizitaj same kiel ni, kara; ili

ne havos mankon pri grandpotencaj, ekonomiaj, juraj, kulturaj aŭ aliaj argumentoj.”

Kaj ili havas armilojn. Ne forgesu, ke ili estas fabele armitaj.

”Jes, ili havas superabundon da armiloj. Nu, vidu. Ne mirigus min, se ili ellernus de homoj, kiel oni faras la historion!”

Atendu, atendu momenton! (La aŭtoro eksaltis kaj komencis trakuradi sian laborĉambron.) Vere, diablo devus enesti, se ili ne scius tion! Jam mi vidas tion. Sufiĉas rigardi la mondmapon — diable, kie estas ia mondmapo!

”Mi vidas ĝin.”

Do bone. Jen vi havas la Atlantikon kun la Mediteraneo kaj la Norda Maro. Jen Eŭropo, jen Ameriko. Jen estas lulilo de la kulturo kaj de la moderna civilizacio. Ie ĉi tie estas la subakvigita la malnova Atlantido —

”Kaj ĝuste la salamandroj sinkigas tie novan Atlantidon.”

Ĝuste. Kaj jen vi havas — Pacifikon kaj Hindan Oceanon. Malnova, mistera Oriento, ho homo. Lulilo de la homaro, kiel oni diradas. Ie tie oriente de Afriko estas dronigita la mita Lemurio. Jen Sumatro, kaj iom okcidente de ĝi —

” — la insuleto Tana Masa. La lulilo de salamandroj.”



”Jes. Tie regas King Salamander, la spirita kapo de la salamandroj. Ĉi tie ankoraŭ vivas la tapa-boys de kapitano van Toĥ, la originaj pacifikaj, duonsovaĝaj salamandroj. Simple *ilia* Oriento, ĉu? La tuta teritorio nomiĝas nun Lemurio, dum la alia sfero, civilizita, eŭropigita kaj amerikanigita, moderne kaj teknike progresinta, estas Atlantido. Tie do estas la diktatoro Chief Salamander, granda konkeranto, teknikisto kaj soldato, Ĝingis-Ĥano de la salamandroj, kaj detruanto de kontinentoj. Grandioza personeco, homo.

(”... Aŭskultu, ĉu *vere* li estas salamandro?”)

(... Ne. Chief Salamander estas homo. Fakte li nomiĝas Andreas Schultze kaj estis dum la mondmilito ie ĉefserĝento.)

(”Tial!”)

(Nu, jes. Tiel estas.) Jen Atlantido kaj Lemurio. Ĉi tiu divido havas siajn geografiajn kaŭzojn, administrajn, kulturajn...

”... kaj naciajn. Ne forgesu la naciajn kaŭzojn. Lemuriaj salamandroj parolas piĝinon, dum la atlantikaj parolas Basic English.

Nu bone. Dumtempe la atlantikaj salamandroj penetras tra la eksa Sueza Kanalo en Hindan oceanon —

”Nature. La klasika vojo orienten.”

Ĝuste. Kontraŭe la lemuriaj salamandroj penetras trans Bonesperan Kabon al la okcidenta bordo de iama Afriko. Nome ili asertas, ke al Lemurio apartenas *tuta* Afriko.

”Nature.”

La slogano estas Lemurio al Lemuroj, For kun la fremduloj kaj simile. Inter la atlantikaj salamandroj kaj la lemuriaj salamandroj profundiĝas abismo de malkonfido kaj depratempa malamikeco. Malamikeco je vivo kaj morto.

”Tio signifas, el ili fariĝas Nacioj.”

Jes. La atlantikaj salamandroj malestimas la lemuriajn salamandrojn kaj nomas ilin malpuraj sovaĝuloj; la lemuriaj tial fanatike malamas la atlantikajn salamandrojn kaj vidas en ili imperiistojn, okcidentajn diablojn kaj atencantojn de la malnova, pura origina salamandrecio. Chief Salamander pretendas koncesiojn sur la lemuriaj bordoj, onidire en intereso de eksporto kaj civilizacio. La majesta maljunulo King Salamander, eĉ se malvolonte, devas cedi; nome li estas malpli armita. En la Tigrisa Golfo ne malproksime de la iama Bagdado ĝi krakos: la indiĝenaj lemuriaj salamandroj ekatakas la atlantikan koncesion kaj mortigas du atlantikajn oficirojn, onidire pro ia nacia ofendo. Sekve de tio —

” — okazas milito. Nature.”

Jes, okazas la tutmonda milito de salamandroj kontraŭ salamandroj.

”En nomo de Kulturo kaj Rajto.”

Kaj en la nomo de Vera Salamandreco. En la nomo de la nacia Gloro kaj Grandeco. La devizo estas: Aŭ ni aŭ ili! La lemuriaj salamandroj armitaj per malajaj krisoj\* kaj ponardoj de la joganaj salamandroj, tranĉbuĉas senkompate la entrudulojn el Atlantiko; tial la pli progresintaj, eŭrope civilizitaj atlantikaj salamandroj enlasas en la lemuriajn marojn kemiajn venenojn kaj kulturojn de pereigaj bakterioj kun tia milita sukceso, ke per tio ili infektas ĉiujn mond-oceanojn. La maro estas infektita per arte kultivita blankpesto. Kaj jen la fino, mia kara. La salamandroj formortas.

”Ĉiuj?”

Ĉiuj ĝis la lasta. Ĝi estos formortinta gento. Post ili nur konserviĝos la malnova eoningena spuro de Andrias Scheuchzeri.

”Kaj kion la homoj?”

La homoj? Ha, vere, la homoj. Nu, tiuj malrapide revenos desur la montoj sur la bordojn de tio, kio restas el la kontinentoj; sed la oceano ankoraŭ longe fetoros pro putrado de la salamandroj. La kontinentoj denove grandiĝos pro la aluviado de la riveroj; la maro paŝon post paŝo cedos kaj ĉio estos preskaŭ kiel antaŭe. Estiĝos nokriso — ponardo de malajoj

va legendo pri diluvo de la mondo, kiun Dio sendis pro la pekaj homoj. Ankaŭ estos rakontaĵoj pri subakvigitaj mitaj landoj, kiuj onidire estis lulilo de la homa kulturo; eble ankaŭ oni fabelos pri ia Anglio aŭ Francio aŭ Germanio —

”Kaj poste?”

— Ion pluan mi ne scias.

**L**a salamandro elpensita fare de Čapek estas mamulo, devenanta el Azio, tre inteligenta kaj tre milda, ekipita per la manoj. Post transporto en Eŭropon ĝi aklimatiĝas, ellernas la anglan kaj poste oni ĝin amase uzadas por submaraj konstruaĵoj, sub kondiĉoj rememorigantaj traktadon kun negroj kaj la mondon de koncentrejoj. La sobra, fekunda kaj tre laborema salamandro, malgraŭ tio, ke ĝi estas subigita al rasaj diskriminacioj, iom-post-iome plibonigas siajn poziciojn kaj sciojn, konstruas proprajn submarajn fabrikojn kaj utiligas siajn krudaĵojn ĝis tempo, kiam urĝe ĝi bezonas pligrandigi la vivspacon, ĉar la anoj de ĝia specio, loĝantaj laŭlonge de la marbordo, daŭre nombre kreskas; fine ĝi akiras mankantajn bordojn por forpafado de konsiderinde grandaj partoj de la kontinentoj en Ameriko, Azio kaj Eŭropo, jam antaŭe traboritaj kaj subminitaj ... Laŭgrade estas absorbataj la plej fekundaj ebenaĵoj kun urboj kaj vilaĝoj kaj kun teruro homoj observas, kiel sub ili ŝrumpas la firma tero kiel ŝagrino.

La libro, aperinta en la jaro 1936, surprizas pro sia artisma formo kaj profeta tono. La postmilitaj koloniaj

bataloj, la mondo de koncentrejoj, atombombo kaj eble ankaŭ treege impeta modernigo de la ĉina popolo (mi persone opinias ĝin eĉ ne iom maltrankviliga), ĉio estas ĉi tie priskribita ok, naŭ eĉ dudek jarojn anticipe. La apokalipsa karaktero de la lasta parto ankaŭ anoncas militajn destrukciojn. Ĉapek antaŭvidis la proksimecon de milito kaj mortis ĉe ĝia sojlo, per kio li senigis la naziojn, post kiam ili enmarŝis Pragon, pri ĝojo pro lia aresto.

... la scienco ekde la tempo de Ĉapek progresis kaj nun jam ni scias, ke la besto, pri kiu li revis, jam ekzistas: ĝi estas la delfeno. Ankaŭ en tio manifestiĝis Ĉapek kiel profeto.

*Robert Merle (1967): Animalo dotita de racio  
(Un animal doué de raison)*

[www.omnibus.se/inko](http://www.omnibus.se/inko)

ISBN 91-7303-168-2